

莊子

世界语译

ZHUANGZI

Ideologio de antikva ĉina dialektiko

Esperantigita

de

Sasaki Teruhiro

翻译者 佐佐木 照央

Zaozhuang, 2018, 3 月

枣庄学院

目录

卷一 内篇 KANONOJ

1	逍遥游 LIBERA VAGADO-LUDO	6
2	齐物论 UNUECO DE AĴOJ	11
3	养生主 PRIZORGADO DE SANECO	20
4	人间世 LA MONDO DE HOMOJ	23
5	德充符 SIGNO DE PLENECO JE VIRTO	32
6	大宗师 GRANDA RESPEKTIGINDA INSTRUISTO	38
7	应帝王 KONFORMO AL IMPERiestro-REĜO	48

卷二 外篇 EKSTERAJ ĈAPITROJ

8	骈拇 PALMOPIEDULO	53
9	马蹄 ĈEVALAJ HUFOJ	57
10	胠箝 ŜTELADO DE KOFRO	59
11	在宥 LASU ESTI	64
12	天地 LA ĈIELO KAJ LA TERO	71
13	天道 LA ĈIELA VOJO	82
14	天运 LA ĈIELA TURNADO	90
15	刻意 POLURADO DE VOLO	99
16	缮性 FLIKADO DE DENASKA NATURO	101
17	秋水 AŬTUNA AKVEGO	103
18	至乐 LA PLEJA PLEZURO	112
19	达生 KOMPreno DE VIVO	117
20	山木 LA ARBO DE MONTO	125
21	田子方 TIAN ZIFANG	133
22	知北游 SCIO VAGAS NORDE	140

卷三 杂篇 ĈAPITROJ DE DIVERSAĴOJ

23	庚桑楚 GENGSANG CHU	149
24	徐无鬼 XU WUGUI	156
25	则阳 ZEYANG	166
26	外物 EKSTERAJ AĴOJ	174

27	寓言 PARABOLOJ	179
28	让王 CEDI LA TRONON	183
29	盗跖 RABISTO ZHI	192
30	说剑 RAKONTO PRI SKERMADO	200
31	渔父 FIŜISTO	204
32	列御寇 LIE YUKOU	209
33	天下 LA MONDO	215
	POSTPAROLO JE ESPERANTIGO DE ZHUANGZI	224

Dediĉita

al samideano

Sun Shoude, la fondinto

de Esperanto-Arbaro

en Lu-regno

KANONOJ

1 LIBERA VAGADO-LUDO

En norda mallumo vivas iu fiŝo, nomata Kun. Tiu Kun estas tiel grandega, ke ne sciate je kiom mil *lioj* longa ĝi estas. Ĝi ŝanĝiĝas en birdon, nomatan Peng. Ne sciate, je kiom mil *lioj* longa estas la dorso de tiu Peng. Kiam ĝi ekflugas impete, ĝiaj flugiloj similas al nuboj pendantaj el la ĉielo. Kiam maro ekmoviĝas, ĉi tiu birdo tuj transflugas al suda mallumo, t. e. la ĉiela lago.

Iu humoristo el Qi-regno, sciulo de mirakloj, diris: “Kiam transflugas Peng al la suda mallumo, ondoj furioze huladas daŭre je tri mil *lioj*. Ĝi, batante ventegon, leviĝas alten je naŭdek mil *li*, kaj post ses monatoj ĝi surteriĝas por ripoza spiro.”

Blovas ĉien la vento de spirado kiel aeroflagreto, polvo kaj elspiro de vivaĵoj. Ĉu lazuro de la ĉielo estas ĝia ĝusta koloro? Aŭ ĝi estas tre malroksima, ke neatingeblas la limo? Kiam Peng rigardas suben, verŝajne videblas ĉio tiel same.

Se akumulita akvo ne estas sufiĉe dika, granda boato ne povas flosi sur ĝi. Se unu taso da akvo estas verŝita sur la planko de halo, nur polvo povas flosi laŭ ĝi kiel boateto, sed eĉ taseto, alfundiĝinte, ne povas flosi, ĉar la akvo estas tro malprofunda kaj la boato estas tro granda. Kie vento ne akumuliĝas sufiĉe dense, tie ne eblas subteni la grandajn flugilojn. Por ke Peng leviĝu naŭdek mil *liojn*, vento nepre devas blovi sube. Nun, sub tiu kondiĉo, ĝi flugas sur la vento, surdorse portante la bluan ĉielon, kaj nenio malhelpas al ĝi daŭre veturi. Nun, tiele, go gusted strebas al la sudo.

Cikado kaj eofono mokridas tion, dirante: “Ni foje ekflugas supren impete, strebas sidi sur branĉoj de arboj, kiel ulmo kaj pterokarpo, tamen ne atingante eĉ tien, estas tiritaj suben al tero. Por kio do necesus flugi suden je naŭdek mil *lioj*?”

Tiu, kiu iras al proksima kampo, portas manĝaĵon je tri fojoj kaj revenas ankoraŭ sata kun plena ventro. Tiu, kiu iras cent liojn, pretigas antaŭe nutraĵon de muelita greno. Tiu, kiu iras mil liojn, kolektas nutraĵon por tri monatoj. Kion do povus kompreni tiuj du malgrandaj? Al malgranda scio ne eblas atingi grandan scion¹. Mallonga vivanto ne povas kompreni longan vivanton. Kiel estas sciate pri tio? Matena fungo ne scias monaton, ĵiĉikado ne scias jaron kun printempo kaj aŭtuno, ĉar ili vivas mallonge.

Sude de Chu-regno kreskas arbo, nomata Ming Ling, por kiu unu printempo egalas al

¹¹ Sokrato esprimas tion kiel “miskredon de nespertinto”. Vidu: Platono, *La Respubliko*. Trad. Donald Broadribb. pp. 309-310 Estas skribite: “... starante en la mezo, rigardante malsupren al sia antaŭa loko, ĉu li kredus ion alian ol ke li nun estas supre? Tamen li ankoraŭ ne vidis la veran supron.” Kaj ankaŭ skribite: “Ĉu do estas mirige, ke personoj, kiuj neniam spertis la veron pri multaj aferoj, miskredus pri plezuro kaj doloro kaj la meza stato? Sekve kiam ili devus sperti suferon, ili prave kredus, ke ili vere suferas. Sed kiam ili forlasis la suferon kaj atingis la mezan staton, ili firme kredus, ke ili trovis absolutan plezuron.

500 jaroj kaj unu aŭtuno egalas al 500 jaroj. Antikve estis arbo, nomata Granda Kamelio, kies unu printempo estis egala al ok mil jaroj kaj unu aŭtuno – ok mil jaroj. Sed nun inter homoj iu Peng Zu² estas fama je longa vivo kaj popolo dezirus sekvi lin je longviveco. Estas mizere, ĉu ne? Pri tio estis la demando de la reĝo Tang al la saĝulo Qi.³

En dezerta ekstrema nordo estas malluma maro, t. e., la ĉiela akvujo. Tie vivas iu fiŝo, vasta je kelkmil lioj, kaj neniuj scias kiomlonga ĝi estas. Oni nomas ĝin Kun. Tie vivas birdo, nomata Peng. Ĝia dorso kvazaŭ la monto Taishan, kaj ĝiaj flugiloj kvazaŭ nuboj, pendantaj sur la ĉielo. Ĝi, ekbatante kirloventegon, leviĝas supren je naŭcent mil lioj. Kaj forlasinte nubojn, kun blua ĉielo surdorse, direktas sin suden, celante al suda mallumo.

Koturno, mokridante ĝin, diris: “Kien do li intencas iri? Mi eksaltas supren sed, dum ne atingante eĉ kelk *renoj*⁴, tuj iras suben, kaj flugadas inter kampoj kun artemizioj kaj dornarbustoj⁵. Tio estas ja kulmino de mia flugado. Malgraŭe, kien do li intencas iri?” Jen tia estas diferenco inter la malgranda kaj la granda.

Tiel do kiuj havas intelekton por enoficiĝi, aŭ havas kapablon administri vilaĝon, aŭ estas dungitaj de iu reĝo por regi la landon, tiuj, eble, rigardas sin tiel same, kiel la koturno.

Kaj Song Rongzi⁶ nur aplombe ridas tion. Kion ajn oni en la tuta mondo laŭdus, tion⁷, li ne rekomendas, kion ajn oni en la tuta mondo akuzus, al tion li ne aldonas riproĉon. Ĉar li definitive dividas temon de interna kaj ekstera kaj klarigis la limon de honorinda kaj hontinda. Rilate al la mondo, li estas tute ne kalkulema. Sed eĉ por li ankoraŭ estas io ne establiĝinta.

Lie-zi⁸ povis veturi, rajdante vetron, kviete kaj bonhumore dum 15 tagoj, kaj poste revenis teren. Je akirado de feliĉo, li ne estis kalkulema. Kvankam li liberiĝis eĉ de piedirado, tamen li havis ankoraŭ ion esperi. Se al tiu homo, kiu, veturante ĝuste ĉielon kaj teron, kontrolante valvojn de ses aerroj⁹, per tio ludvagadas en senlimo, kion do estus

² Legenda longevivulo, kiu vivis 700 – 800 jarojn.

³ Tang estas la reĝo de Yin-dinastio, kiu batis la tiranon Jie de Xia-dinastio. En *Beishanlu* (ĉ. 800 a. K) estas skribite: “Tang demandis Qi – ‘Ĉu ekzistas limo al kvar direktoj kaj al supro - subo?’ Qi respondis – ‘Trans senlimo ankoraŭ estas alia senlimo.’”

⁴ reno 仞 – unuo de longeco, unu reno egalas al ĉirkaŭ 160 centimetroj.

⁵ 蓬蒿 laŭlitere artemizioj aŭ manĝebla krizantemo, sed signifas “kampo”.

⁶ 宋輕、宋 pensulo de la epoko de Milit-landoj en 4-a jc., fama je senperfortismo kaj senavideco. Xun-zi kritikis ambaŭ lin kun Mozi.

⁷ Multaj esploristoj prenas ĉi tiun pronomon 之 por persona, t. e. Song Rongzi, sed mi konsideras, ke ĝi estas sama, kiel la antaŭiranta 之. Do mia traduko estas tute alia.

⁸ 列子, 列御寇 Taoisto en 4-a aŭ 3-a jc. Estas dirite, ke li verkis la libron “Liezi”.

⁹ 六氣之辯 Ses aerroj konsistas el yin 陰, yang 陽, feng 風, yu 雨, mei 晦, ming 明. 辯 signifas regado 治 aŭ ŝanĝo 變.

ankoraŭ por atendi¹⁰? Tiel do estas dirite: “Ĉe la pleja homo ne estas egoo, ĉe la dia homo ne estas merito, ĉe la sankta homo ne estas nomo¹¹.”

Yao¹² volus mem abdiki kaj cedi la mondon al Xu You¹³, dirante: “Se temas pri lumigo, kiam suno kaj luno jam aperis, tiam ne ĉesigi torĉon estas malfacile, ĉu ne? Se temas pri akvumo, kiam pluvos oportune, estas jam vane irigacii, ĉu ne? Se vi heredos la tronon, la mondo estos bone regata. Se mi daŭrigus estri, mi vidus min faranta nur fuŝojn. Do mi petas vin mastri la mondon.

Xu You diris: “Vi, Sinjoro, ekregis la mondon kaj la mondo jam estas regata bone. Nun se mi anstataŭus vin, tio signifas, ke mi farus tion nur por la nomo. La nomo devas esti gasto de realo. Ĉu mi fariĝus ja la gasto? Troglodito, farante neston en profunda arbaro, kolektas nur branĉetojn; talpo trinkas da riverakvo nur tiom, kiom ĝi iĝas sata. Vi foriru hejmen ripozi, ĉar mi ne estas uzebla por la monda afero. Kiam kuiristo mem ne povus mastri en kuirejo, tiuokaze ne povas anstataŭi lin iu pastro, forlasinte sanktan vinujon kaj hakplaton¹⁴.”

Jian Wu demandis Lian Shu¹⁵, dirante: “Mi turnis min al Jie Yu¹⁶ kun demandoj, sed li estas tre granda, ke mi ne ricevis trafan respondon. Miaj demandoj nur iris tien unu-direkte sen respondo. Mi terurigiĝis je lia parolo kvazaŭ je senlima Galaksio. t. e. tro malproksima, kaj ne proksima al homa sento.”

Lian Shu demandis: “Kion li parolis?”

Jian Wu respondis: “Li diris: ‘En la fora monto Guye¹⁷ vivas unu dia-homo. Lia haŭto estas kvazaŭ glacia neĝo, kaj li estas supla kvazaŭ virgulino. Ne manĝante kvin grenojn, li enspiras venton kaj trinkas roson. Rajdante nubon kaj aeron, kontrolante flugantan

¹⁰ 待 signifas atendi aŭ esperi. Multaj esploristoj prenas ĝin por signifo de “dependo” 依靠, 依赖

¹¹ 至人、神人、聖人

¹² 堯 Antikva sankta reĝo. Li kreis kalendaro, laŭ kiu popolo okupiĝis pri agrikulturo. Li cedis la tronon al Shun 舜, famulo je akvoregado.

¹³ 許由 Antikva ermito. Laŭ Mozi li influis al Shun: “Shun estis tinkturita de Xu You..” Li, rifuzinte akcepton de trono, estis pli respektata de taoistoj, ol Shun, heredinta la tronon. Eble, taoistoj elknedis tiun epizodon de Xu You.

¹⁴ 樽、俎 Vinujo kaj hakplato estas aĵoj por religia rito.

¹⁵ 肩吾、連叔 Ambaŭ estas konsiderata, kiel fikciaj personoj.

¹⁶ 接輿 Freneza ermito de Chu-regno, aperanta en Analektoj, ĉ. Weizi.

¹⁷ 藐姑射 Legenda monto, kie loĝas dihomoj 神仙. Pri la monto estas menciite en *Shanhai jing* 山海經(東山經) Je prononco de Guye mi sekvis Yu Wanjun 俞婉君.

drakon, vagadas ekster kvar maroj. Per kondensa koncentriĝo de dioj, li ne lasas aĵojn putri, sed lasas grenojn maturiĝi ĉiujare.’ Mi ne kredas lin kiel frenezulon.”

Lian Shu diris: “Tia vi estas. Blindulo ne povas aprezi desegnon de brokaĵo, suldulo ne povas aŭdi belsonojn de perkut-instrumentoj. Blinda kaj sulda estas homoj ne nur je la korpo, sed ankaŭ je la intelekto. Vin trafas nun tiu eldiro. Tiu dia-homo kun la virto ĝuste intencas ampleksi ĉiujn aĵojn kaj fari ĉion unuiginta. Oni petus lin regi la mondon, tamen lin ne interesas la ĝenplena monda afero. Nenio povas damaĝi tiun homon. Lin ne dronigas eĉ granda inundo, atinganta la ĉielon, lin ne bruligas eĉ lafa fluo en granda sekeco, karboniganta teron kaj monton. Li povus el sia polvo kaj malpuraĵo, aŭ el ŝeloj, fari reĝojn kiel Yao kaj Shun. Kial li devus okupi sin aparte per la mondo de aĵoj?”

Iu Song-landano iris al Yue-lando por vendi ceremoniajn ĉap-kronojn de Yin-stilo¹⁸. Sed Yue-landanoj estas kun haŭtoj tatuitaj kaj haroj tonditaj, tiel do la kronoj estas ne utilaj. Yao volus regi la popolon en la mondo kaj ordigi ĝuste la regadon ene de kvar maroj. Sed vizitinte la foran monton de Guye kaj supre menciitajn kvar homojn¹⁹, poste alveninte al nordo de la rivero Fen²⁰, li foranime tute forgesis la mondan aferon.

Hui-zi²¹ diris al Zhuang-zi: “Reĝo de Wei-regno²² donis al mi semon de granda kalabaso-kukurbo. Mi semis ĝin, kaj ĝi tiel kreskis, kiel fruktis granda je 5 *dan*oj²³. Se en ĝi oni enverŝas akvon aŭ sukron, ĝi estas tiom malmola, ke ne eblas levi ĝin. Se oni hakas kaj faras el ĝi ĉerpilon, tamen ne eblas trempi ĝin en akvon. Ĝi estas tro grandaĉa, ke mi frakasis ĝin pro senutileco.”

Zhuang-zi diris: “Sinjoro, vi estas ja mallerta je la uzado de granda aĵo. Iu Song-landano inventis bonan medikamenton kontraŭ haŭtofendeto. Li de generacio al generacio okupadis sin pri blankigo de silkaĵoj per riverakvo. Iu gasto aŭdis pri tio kaj petis, ke li aĉetu la unĝventon por cent oroj. Li konsiliĝis kun sia familio, dirante: “Mi de generacio al generacio laboris blankigi silkajojn nur ricevi kelke da oroj. Nun momente mi vendas mian teknikon por cent oroj. Mi petas, permesu al mi doni ĝin al li.”

La gasto ricevis ĝin. Poste li turnis sin al la reĝo de Wu-regno. Tiam okazis tie

¹⁸ 章甫 Song-landanoj estas posteuloj de Yin-dinastio, heredis la lastan kostumon.

¹⁹ 四子 Yu Wanjun konsideras illin alie: 王倪, 啮缺, 被衣, 许由 (laŭ Sima Biao kaj Li Yi)

²⁰ 汾水 Fluas en la provinco Shanxi. La ĉefurbo de Yao situis en Ping Yang 平陽 laŭ la rivero.

²¹ 惠子 Hui Shi 惠施, estas unu el reprezentantoj de nominalistoj en la epoko de Milito-Landoj. Ministro (343-322 a. K.) ĉe la reĝo Liang Hui, poste anstataŭigita de Zhang Yi 張儀.

²² 魏王、梁惠 Liang Hui surtrone 370-319 a. K.

²³ 石 unuo de pezo – 1 *dan* egalas ĉ. al 19 litroj. 100 *sheng* 升 = 10 *dou* 斗 = 1 *dan* 石.

malfacilo kun Yue-lando. La reĝo de Wu faris lin generalo, kaj en vintro ili batalis sur akvo kontraŭ Yue-landanoj²⁴, kaj plene venkis ilin. La reĝo feŭdis lin land-estro per dividita teritorio. Medikamento estas sama en tio, ke kuraceblas la haŭtofendeto. Sed unu estas feŭdita, la alia ne povas liberiĝi el blankigo de silkaĵoj. Malsameco kuŝas en la utiligo. Nun vi havas kukurbon je kvin *danoj*. Kial vi ne pripensus fari el grandaj bareloj flosan por rivero aŭ lago? Vin nur ĝenas tio, ke nenie eblas uzi la ĉerpilon. Vi ĉagreniĝas, ĉar vi tenas koron malvasta kvazaŭ artemizio!²⁵”

Hui-zi parolis kun Zhuang-zi, dirante: “Ĉe mi staras granda arbo, nomata ailanto. Ĝia trunko estas tre tuberoza kaj malglata, ke ne estas uzebla la ĉarpentista tuĉ-lineo. Kaj ĝiaj branĉoj kurbiĝis nemezureble. Ĝi staras ĉe la vojo, sed metiistoj ne atentis ĝin. Nuna via parolo estas tro granda, sed neutila, ke publiko same foriras.”

Zhuang-zi diris: “Ĉu vi ne vidis linkon aŭ mustelon? Ili kaŭras kaj gvatas, atendante preterirontetojn. Aŭ ĉirkaŭsaltadas ĉien ajn, negrave ĉu altan ĉu malaltan, sed finfine falas en kaptilon aŭ mortas en maŝreto. La gruntbovo estas granda, kvazaŭ nubo pendanta el ĉielo, sed, kvankam grandega, tamen ĝi ne povas kapti muson. Nun vi havas grandan arbon kaj vin ĝenas la neutileco. Kial vi ne plantus ĝin en iu dezerta kampo aŭ iu vilaĝo, kie nenio ekzistas? Promenante apud ĝi, nenion farante, vi ripozus kaj dormus malstreĉite sub ĝi. Ĝi ne estos mortigita antaŭtempe per hakiloj, kaj staros, per neniu damaĝite, nenie uzate. Jen troviĝos nenia ĝeno.”

²⁴ En 494 a. K. Yue-lando estis venkita de Wu-lando.

²⁵ 蓬之心 Laŭ rimarko de Yu Wanjun – metaforo de malvasta koro.

2 UNUECO DE AĴOJ

Nanguo Ziqi²⁶, apogante sin je kubutapogilo, suprenrigardas la ĉielon kaj suspiras. Foranimite, li ŝajnas kvazaŭ perdinta sian kunulon²⁷.

Yancheng Ziyou²⁸ staris antaŭ li kaj diris: “Kiel vi fartas? Via korpo iĝis ja kvazaŭ velkinta arbo kaj via koro iĝis ja kvazaŭ forbrulinta cindro. Nuna apogiĝanto je kubutapogilo ne estas antaŭa apogiĝinto je kubutapogilo.”

Ziqi diris: “Yan-ĉjo, estas bone, ke vi demandis tiel. Nun mi perdis min mem, mian egoon²⁹. Ĉu vi komprenas tion? Vi aŭdis fajfojn³⁰ de homo, sed ankoraŭ ne aŭdis fajfojn de la tero. Aŭ kvankam vi, eble, aŭdis la fajfojn de la tero, tamen ankoraŭ ne aŭdis fajfojn de la ĉielo.”

Ziyou diris: “Permesu al mi demandi vin pri tio.”

Ziqi diris: “Granda Glebo³¹ ruktadas, tion oni nomas ‘vento’. Se³² fojon okazas tio, ĉiuj truoj ekhurlas kaj hojlas. Ĉu vi mem ne aŭdus tion ululanta? Kavernoj de altaj kurbaj montoj kaj arbaroj, kavoj de granda arbo kun ĉirkaŭo je cent³³, estas similaj al nazoj, buŝoj, oreloj, aŭ kestoj³⁴, tasoj, pistuoj, aŭ fosaĵoj, sulkoj. Estas tiu, kiu sonas kiel torento, aŭ kiel flugo de sago, aŭ kiel akrega skoldo, aŭ kiel enspiro, aŭ kiel krio, aŭ kiel plorado, aŭ kiel ĝemado, aŭ kiel ululo. Iu ekkantas antaŭe kiel “yu”, kaj la alia sekvas kun sono de “yu”³⁵. Al venteto harmonias milde, al forta vento – laŭte. Kun ĉesiĝo de la ventego truoj eksilentas en malpleno. Ĉu vi mem ne vidis, kiel tio moviĝas skuiĝante aŭ tremante?

Ziyou diris: “Fajfo de la tero konsistas el amaso da truoj, kaj fajfo de la homo – el blov-instrumentoj kiel bambuoj. Lasu min, ke mi aŭdacas demandi, kio estas fajfo de la

²⁶ 南郭子綦 Unu konsideras lin reale ekzistinta, duonfrato de Zhao, la reĝo de Chu-regno. Ziqi estas nomo, Nanguo, t. e. “suda muro” estas lokonomo, kie li loĝis. Alia konsideras lin fikcia nomo.

²⁷ 耦 Lau iu opinio, ĝi signifas korpon kaj animon. Sed mi sekvas la ordinaran signifon “paro, kunulo”.

²⁸ Lernanto de Nanguo Ziqi. Alinomo – Yan. 偃

²⁹ 吾喪我 La esprimo incitis gramatikistojn pri uzado de du unuapersonaloj. Mi prenis 我 kiel egoo – centro de individuo konscia pri si mem.

³⁰ 籟 unu speco de antikvaj blov-instrumentoj.

³¹ 大塊 La vorto estas uzata, samkiel naturo 自然.

³² 唯無 signifas subjunkcion “se”.

³³ 百围 Laŭ Li Yi 李頤 ĝi egalas al 10 *zhang* 丈, t. e. 22.5 m diametre.

³⁴ 枅 Multaj esploristoj prenas la ideogramon kiel stango sur pilastro. Mi prenas ĝin kiel volumenmezurilo.

³⁵ 于, 喁 esprimas imitsonon de vento. Laŭ nuna ĉina lingvo ambaŭ prononco estas sama “yú”, sed laŭ la japana lingvo la unua estas “wū”, la dua – “gyō”.

ĉielo.”

Ziqi diris: “Ĉe tio³⁶ ĉiuj blovas malsamaj. Sono eliras per si mem kaj haltas per si mem. Ĉiu el ili prenas sin mem. Kiu do lasas ĉiun esti tiel?”

Intelektego estas vasta kaj trankvila, intelekteto – malvasta kaj gvatemala. Granda eldiro estas arda kaj forta, malgranda eldiro – detalema kaj malkonciza. Dum dormado la animoj interrilatatas, en vekigo malfermiĝas la korpo kaj, tuŝante aliajn, kunlaboras aŭ kore luktas tutan tagon inter si. Iam estas iu milde ruza, iam – iu bonkore insidema, iam – iu skrupula. Timemuleto maltrankvilas, timemulego stuporas.

Estas dirite, ke, kiu ekagas kvazaŭ arbalesta pafo, tiu regas pravecon kaj malpravecon. Estas dirite, ke, kiu restas kvazaŭ laŭ ĵurpromeso, tiu konservas la venkon. Sed oni diras, ke eĉ tiu mortas kvazaŭ aŭtuno kaj vintro, ĉar li estingiĝas ĉiutage. Dronigite li iras tien, de kie ne eblas jam reveni. Oni diras, ke li maljuniĝas, kvazaŭ kovrite kaj fermite. Koro, proksimiĝanta al morto, estas nerevigligebla.

Estas ĝojo, kolero, malĝojo, plezuro. Estas zorgo, bedaŭro, kaprico, aligiteco. Estas facilanimeco, diboĉo, malkaŝeco, impertinenteco. Kiel muziko aperas el vanto, kiel fungoj naskiĝas el vaporo, tiel tagnokte ŝanĝiĝas homa koro unu post la alia, ne sciate kial tio naskiĝas. Nu, forlasu, forlasu! Ne eblas momente de mateno ĝis vespero ekscii, de kie estiĝas tiel.

Sen Li ne estas Mi, kaj sen Mi nenio estas prenita. Tio ja estas proksima al realo. Sed ne estas sciate, de kiu estas farata tio. Eĉ se ekzistas vera mastro³⁷, tamen aparte ne troviĝas lia signo. Kredeblas al mi la ago, tamen nevideblas la formo. Estas io sentebla, tamen ne estas la formo. Estas ekipitaj cent artikoj, naŭ truoj, ses visceroj. Kiu el ili estas plej intima al mi? Ĉu vi ĝojas je ĉiuj ĉi-tiuj? Ĉu vi pli favoras unu el ili? Se vi favoras ĉiujn, ili ĉiuj iĝas subuloj, kiel vasaloj kaj kromedzinoj. Ĉu subuloj mem povas regi sin reciproke unuj la aliajn? Aŭ ili fariĝus alterne reĝo kaj subuloj? Devas ekzisti ilia vera reĝo. Negrave ĉu oni sukcesus serĉi kaj akiri la realon aŭ ne, la valoro de vera mastro neniom pliiĝas nek malpliiĝas.

Se la korpo estas ricevita kiel la plena formo, kvankam ĝi ne tuj perdiĝus, tamen pli malpli frue elĉerpiĝos. Kolizianta kun la aliaj kaj forfrotiĝante, ĝi iras ĝis la fino subite kvazaŭ kuranta ĉevalo. Neniu povas haltigi tion. Ĉu ne estas, vere, malĝoje? Dum la tuta vivo ĝi laboras kaj laboras, ne vidante la sukceson. Laciĝinte ĝisoste pro laboro, ĝi

³⁶ Esploristoj diversas je opinioj pri kiu indikas la pronomo “tio”: fajfo de la ĉielo, aŭ la homo, aŭ la tero? Mi konsentas kun la opinio, ke tio estas la fajfo de la ĉielo.

³⁷ 真宰 Tiu, kiu vere mastrumas ĉion.

ne scias kien reveni por ripozi. Kiel mizera ĝi estas! Kvankam tiu homo ankoraŭ ne mortas, tamen kia merito troviĝas? La korpo, kiel formo, ŝanĝiĝas, kaj ankaŭ la koro tiel same, kiel ĝi. Ĉu ne eblus diri, ke tio estas granda mizero. Ĉu la homa vivo estas tiom vanta? Vanta³⁸ nur sole al mi? Aŭ al la aliaj ne vantas?

Se ĉiu homo prenis sian propran koron de sia korpo por sia gvidanto, kiu do ne havus gvidanton? Sed kial povus esti tiel, ke la koro, sciante nepre ŝanĝiĝon, prenis por si mem tion? Tiel kondukas ja nur stultulo. Dum ankoraŭ ne kreskas koro, la koro decidas pri praveco kaj malpraveco. Tio estas sama, kiel diri: “Hodiaŭ mi ekiris al Yue-lando kaj hieraŭ alvenis tien.” Tio farus neeston esto. Eĉ la dieca reĝo Yu ne povis fari neeston esto³⁹, des pli mi povas fari tion neniel.

La parolo estas malkiel la blovo de ventoj. Kiu parolas, tiu havas ion por diri. Se ne estus decidite, kion oni devas diri, ĉu la parolo povus estiĝi? Oni konsideras la parolon malsama ol naskiĝepado de birdeto el ovo. Ĉu la lasta havas lingvon⁴⁰, aŭ ne havas lingvon?

Kial estas kovrita la Vojo, distinganta inter vero kaj malvero? Kial estas kovritaj la vortoj, distingantaj inter praveco kaj malpraveco? Kial la Vojo foriris kaj ne ekzistas? Kial la vortoj ekzistas sed ne havas eblon? La Vojo kovriĝis sub malgrandaĵoj, la vortoj kaŝiĝis sub pompaĵoj.

Antaŭe estis disputo pri praveco kaj malpraveco inter konfuceanoj kaj mohistoj. Kio estas ne prava ĉe unu, tio estas prava ĉe la alia, aŭ, kio estas prava ĉe unu, tio ne estas prava ĉe la alia. Nur per lumiga klareco⁴¹ tio solveblas.

Aĵo ne povas esti ne “tio” kaj aĵo ne povas esti ne “ĉi-tio”. Kiu ne videblas el la vidpunkto de “tio”, ties scio, okaze, estas konebla el “ĉi-tio”. Tial do estas dirite: “Tio devenas de ĉi-tio, kaj ankaŭ ĉi-tio dependas de tio.” Jen la teorio, ke ambaŭ tio kaj ĉi-tio kune naskas sin samtempe. Kvankam ili kune naskiĝas, tamen kune mortas. Kune mortinte, kune naskiĝas. Kvankam ili kune estas allaseblaj, tamen kune iĝas neallaseblaj. Kune estas neallaseblaj, tamen iĝas kune allaseblaj. Kie estas jesado, tie estas neado de tio. Kie estas neado, tie estas jesado de tio. Tial do la sanktulo ne dependas de tia teorio, kaj kofidas ĉion ĉi-tion al la Ĉielo, kiu baziĝas sur jesado.

Ankaŭ ĉi-tio estas tio. Ankaŭ tio estas ĉi-tio. Ankaŭ ĉi-tio estas unu tuto kun jesado kaj neado. Ankaŭ tio estas unu tuto kun jesado kaj neado. Ĉu finfine en limo troviĝas tio

³⁸ 芒 Esploristoj prenas la ideogramon por 昧 stulta, 闇 mallumo, 糊塗 konfuzo. La ideogramo estas uzata, samkiel 茫 (senlime vasta).

³⁹ 無有為有 Estas dirite, ke “neesto 無” estas distinga trajto de taoismo, sed ĉi tie troviĝas la aserto, ke eĉ al dieca Yu 神禹 “ne eblas fari neeston esto”.

⁴⁰ 辯 diskutado, parolado, ĉi tie signifas lingvon, ne distingon 辨.

⁴¹ 明 Estas donite al klareco la ŝlosilan rolon en la argumento de Ziqi.

kaj ĉi-tio? Aŭ en limo ne troviĝas tio kaj ĉi-tio? Kie ne troviĝas paro de tio kaj ĉi-tio, tiu punkto estas nomata la akso de Vojo⁴². Kiam la akso estas metita en la centro de cirklo, ĝuste nur tiam eblas respondi al senlimo. Jesado estas ankaŭ unu el senlimo. Neado estas ankaŭ unu el senlimo. Tial do estas dirite: “Estas la plej preferinde apogi sin sur klareco.”

Por klarigi koncepton de “atributo”⁴³, ekz., klarigi, ke tio havas la econ aŭ ne, iĝas pli bone kompari tion kun aĵoj, kiuj ne havas la econ. Por klarigi, ke tio estas ĉevalo aŭ ne, iĝas pli bone kompari tion kun ne-ĉevalo, t. e., kun aĵoj, kiuj ne estas ĉevalo. La eco ekzistas kiel unu en la Ĉielo kaj tero, la ĉevalo ekzistas kiel unu el ĉiuj aĵoj.

Io allasebla estas allasebla, kaj io neallasebla ne estas allasebla. Vojo estiĝas per irado, ankaŭ aĵo estiĝas tia per dirado. Kion oni faras tia? Oni faras tia ion naturan. Kion oni ne faras tia? Oni ne faras tia ion nenaturan. Aĵo en si mem enhavas ion naturan, aĵo en si mem havas ion allaseblan. Nenio estas nenatura kaj nenio estas neallasebla.

Tiel do, negrave ĉu tigo aŭ trunko, ĉu leprulo aŭ Xishi, ĉu grandioza aŭ maldeca, ĉu prudenta aŭ stranga, la Vojo faras ĉion ĉi-tion unu tuto. Kio dividiĝis, tio kompletas; kio kompletis, tio difektiĝas. Ne estas ĉio kompleta, nek ĉio difekta, kaj tiel ĉio fariĝas denove unu tuto. Nur tiu, kiu atingis, scias pri la unu tuto, tial do tiu ne alteniĝas aparte al io, kaj lasas ĉion sekvi al ordinareco. Ordinaraĵo estas utila, kaj la utila kondukas, kaj la kondukanto akiras. Eĉ se hazarde akirita, tio estas kompleta. Ĉar li konfidas nur al natura nepreco. Li mem ne konscias kion li faras nature per si mem. Tio estas nomata “Vojo”(Dao).

Sed eluzante saĝon por unuigo, se vi ne scias, ke la rezulto estas tute sama, tion oni nomas “Tri en mateno”. Kiel estas dirite, ke “Tri en mateno”? Jen tiel: “Iu simikondukisto, dononte al simioj hipokaŝtanajn glanojn, diris al ili: ‘Mi donas al ĉiu el vi matene po tri *sheng* da glanoj kaj vespere po kvar.’ Simioj ĉiuj koleris pro tio. Tiam Simikondukisto diris: ‘Se tiel, mi donas al vi matene po kvar kaj vespere po tri.’ Ĉiuj simioj ĝojis.”

La propono estas sama je nomo kaj esenco sen ajna ŝanĝo, tamen tie agis kolero kaj ĝojo. Li lasas ilin laŭplaĉe fari kion ili ŝatas. Tiel do sanktulo per apliko de jesado kaj neado harmoniigis ĉion kaj mem ripozis en la Ĉiela ekvilibro. Tio estas nomata “gajno de ambaŭ flankoj”⁴⁴

⁴² 道枢 De iuj esploristoj ĝi estas tradukita kiel “ĉarnilo de Vojo” (hinge of the Way).

⁴³ 指 Ĉi tie la ideogramo estas uzata rilate al titolo de la verko far Gongsung Long “指物論” kaj “白馬論”.

⁴⁴ 兩行 Rekta traduko: “Ambaŭ iras.”

Estis iu antikvulo, kies intelekto atingis kulminon. Kien li atingis? Li konsideris, ke nenio ekzistis en la komenco. Jam estis atingite ĝis la limo, ke al tio nenion eblas aldoni.

Sekve, la alia konsideris, ke aĵo ekzistis, tamen, sendistinge en la komenco.

Sekve, la tria konsideris, ke, kvankam aĵo ekzistis kun distingo, tamen ne troviĝis diferenco inter praveco kaj malpraveco.

Estiĝis distingo de praveco kaj malpraveco, kaj tio estas la kaŭzo, ke kaŝiĝis la Vojo (Dao). Ĉar kasiĝis la Vojo, estiĝis la Amo⁴⁵.

Sed ĉu tia estiĝo kaj kaŝiĝo vere okazas aŭ ne okazas? Okazas vere la estiĝo kaj la kaŝiĝo. Ekzemple, ĉar estas estiĝo kaj kaŝiĝo, estis la kotoo-ludado de majstro Zao. Se ne estus estiĝo kaj kaŝiĝo, ne estus la ludado de majstro Zhao. Zhao Wen ludis kotoon, Shi Kuang agordis-temperis, Hui-zi rezonis sub platano⁴⁶. Tri homoj atingis la plej alton je la tekniko, do iliaj nomoj estas postlasitaj al generacioj.

Sed tiuj Zhao kaj Kuang malsamas al ĉi-tiu Hui-zi⁴⁷, ke ili ŝatis, do ili volis klarigi sian muzikon, nur ĉar ili ŝatis. Li provis klarigi tion, kio estas neklarigebla, do li falis en absurdon de sofismo pri “solideco” kaj “blankeco”⁴⁸. Liaj posteuloj ne fariĝis pli ol kudrantoj de rezonoj⁴⁹, tiel do tutan vivon fariĝis nenio perfekta pli. Ĉu eblas diri, ke ili fariĝis perfektaj? Se tiel, ankaŭ mi fariĝus perfekta. Ne eblas diri, ke ili fariĝis perfektaj. Aĵoj kaj mi ne povas fariĝi perfektaj. Montriĝon de ĥaoso kaj dubo penis eviti la sanktuloj. Tiel do ili ne uzas tion kaj lasas sin vivi en ordinareco. Eblas diri, ke tio estas ja klarigo.

Nun mi intencas diri ion, tamen mi ne scias, ĉu tio konformas al alies kategorio aŭ ne. Negrave ĉu komformas aŭ ne komformas al alies kategorio, tio certe ne estas la alia ol kategorio. Interalie, lasu min eldiri pri tio.

Je la Estaĵo estis la komenco. Antaŭ la komenciĝinta Estaĵo estis io, ke ankoraŭ ne komenciĝas. Ĉe la antaŭa komenciĝonta Estaĵo estis ankaŭ io, ke ankoraŭ ne komenciĝis. Estis Estaĵo. Estis Ne-estaĵo⁵⁰. Ĉe Ne-estaĵo estis antaŭe io, ke ankoraŭ ne komenciĝas. Ĉe la komenciĝonta Ne-estaĵo estis antaŭe ankaŭ io, ke ankoraŭ ne

⁴⁵ 愛 Multaj esploristoj prenas la amon por aparta amo 偏好. Sed laŭ mia opinio, ĝi estas la Amo 兼愛, kiun Mozi predikis kiel solvon de konfliktoj.

⁴⁶ 昭文, 師曠, 惠子 Zhao estis muzikisto de Zheng-regno 鄭, Shi Kuang estis muzikisto ĉe la duko Ping en Jin-regno 晉平公樂師. Iuj esploristoj prenas 梧 por “kotoo” [司馬 “稊文”]

⁴⁷ Mi prenas ideogramon 其 kiel tiu, 彼 kiel ĉi-tiu. Sed multaj esploristoj komprenas alie, prenante 其 kiel tri homojn.

⁴⁸ 堅白. Laŭ ĉinaj nominalistoj kiel Gongsun Long 公孫龍, ŝtono estas sentata per vidado kaj tuŝado, kiuj diferencas je persepto.

⁴⁹ 文之綸 Iuj prenis 綸 por 琴瑟 [俞 “庄子”, 崔 “稊文”]

⁵⁰ Mi uzas por esprimo de 有 kaj 無 vortojn “Estaĵo” kaj “Ne-estaĵo”, anstataŭ “Nenio”.

komenciĝis. Subite, ekestis Estaĵo kaj Ne-estaĵo. Inter Estaĵo kaj Ne-estaĵo Estas ne sciate, kiu estas Estaĵo aŭ kiu estas Ne-estaĵo.

Nun mi jam diris ion. Sed estas ne sciate, ĉu, io dirita de mi, estas Estaĵo aŭ Ne-estaĵo.

En la mondo neniu estas pli granda ol pinto de la haroj, kreskantaj ĉe aŭtunaj bestoj, kaj neniu estas malpli granda ol la monto Taishan. Neniu vivas pli longe ol mortinta bebo. Kaj neniu vivas malpli longe ol Peng Zu⁵¹.

Universo⁵² kaj mi naskiĝis kune. Ĉiuj aĵoj kunfandiĝis kun mi en unu. Ĉar jam unuiĝis, ĉu mi havus ion diri? Ĉar jam unuiĝis, ĉu mi havus nenion diri? $1 + \text{vortoj} = 2$; $2 + 1 = 3$ ⁵³. Per tio estas supozate, ke eĉ matematikisto ne povas kalkuli, des malpli ordinaruloj. Se mi turnas min de Ne-estaĵo al Estaĵo, estiĝos 3. Se mi turnos min de Estaĵo al Estaĵo, kiom estos? Estas pli bone lasi ĉion moviĝi per si mem ol mi mem turnadas min.

Ĉe la Vojo estis neniu limo en la komenco, Vortoj ne estis konstantaj. Pro distingo de “Tio Ĉi-tio”⁵⁴ estiĝis kampolimo⁵⁵. Permesu al mi diri pri la kampolimo. Estas maldekstra kaj estas dekstra, estas etiko kaj estas justo, estas divido kaj estas diskurso, estas konkurenco kaj estas lukto. Jen tiuj estas nomataj “ok virtoj”⁵⁶.

Rialte al ekstero de ses sferoj⁵⁷ sanktuloj⁵⁸ ne opinias pri ekzisto. Koncernante internon de ses sferoj, sanktuloj opinias, sed ne asertas. Okaze de politika historio⁵⁹ kaj aferoj de antaŭaj reĝoj, sanktuloj asertas, sed ne rezonas. Je analizo restas io neanalizebla, je rezonado restas io nerezonebla. Kion signifas tio? Kion sanktuloj tenas en koro, tion amaso rezonas, asertante kaj argumentante. Tial do estas dirite: “Kiu rezonas, tiu ne vidas.”

La Granda Vojo estas nenomebla. La granda rezono estas nedirebla. La granda bonvoleco estas ne bonvoleca. La granda modesteco estas ne humila. La granda kuraĝo

⁵¹ 彭祖 Lengenda longevivulo.

⁵² 天地 Ĉielo kaj tero, t. e. Universo.

⁵³ Laŭ mia kompreno la argumento estas jena. Kunfanditaĵo konsistas el aĵoj kaj mi ($1 + \text{①} = 1$), ĉar mi iĝis nenio. Se poste aldonita la mondo, esprimita de vortoj, $1 + 1 = 2$. Kaj se aldoniĝas mia subjekto, leganta vortojn, $2 + 1 = 3$. Se mia subjekto ne malaperas kiel nenio, mondo multobliĝas senlime.

⁵⁴ 其 Tio kaj Ĉi-tio.

⁵⁵ 畛 limoj por dividi kampojn. Tio signifas, kompreneble, la simboligon de subdividoj.

⁵⁶ 八德 : 左右倫義分辯競争 Laŭ Laozi, estas skribite: “post kiam la Taŭo estas perdita, leviĝas la Virto” 故失道而后德 道德經 38 章。 [Trad. de Wang Chongfang]

⁵⁷ 六合 Ĉielo, Tero kaj kvar direktoj. 六合之外 signifas sferon de metafiziko.

⁵⁸ 聖人 Ĉi tie estas uzata kiel signifo de altnivela intelektulo.

⁵⁹ 春秋 Printempo kaj aŭtuno analogj. Konfuceo kompilis analogjn de Lu-regno. Sed ekzistis analogj de aliaj regnoj.

estas ne violenta. Asertita Vojo ne estas La Vojo. Vorta rezonado ne trafas. Bonvoleco laŭkutima ne esprimas bonan volon. Pura modesteco ne estas fidinda. Brutala temerareco ne sukcesas. La kvin menciitaj, strebante skribi rondon, skribas kvadraton.

Tiel do scio, kiu haltas antaŭ la nekognebla, estas la plej alta. Kiel eblus scii nedireblan rezonon, kaj neaserteblan Vojon? Kiu povus scii, tiu estus nomata la Ĉiela trezorejo⁶⁰. Enverŝadi tien sed tie ne iĝas plene, ĉerpadi de tie sed ne elĉerpiĝas. Estas ne sciate, de kie tio venas. Tio estas nomata “Kaŝita Lumo”⁶¹.

Antikve Yao demandis Shun, dirante: “Mi volus bati landojn: Zong, Kuai, Xu’ao. Ĉar ĉe mi, sidanta surtrone⁶², ne malaperas malklara suspekto al ili. Kial?”

Shun diris: “Tiuj tri ekzistas inter herboj de artemizioj. Kio igas vin suspekti? Antikve dek sunoj aperis vice kaj lumigis ĉion⁶³. Sed nenio estas pli bona ol suno de virto⁶⁴.”

Nie Que demandis al Wang Ni, dirante: “Ĉu vi scias en kio kuŝas la sameco de aĵoj?”

Wang Ni diris: “Kiel do mi scius pri tio?”

Nie diris: “Ĉu vi scias tion, ke vi mem ne scias?”

Wang diris: “Kiel do mi scius tion?”

Nie diris: “Tiel do nenion eblus scii pri aĵoj?”

Wang diris: “Kiel do mi scius tion? Tamen mi provas diri jene: Kiel estas sciate, ke la scio, dirita de mi, ne estas nescio? Kiel estas sciate, ke nescio, dirita de mi, ne estas scio? Mi provas demandi vin. Kvankam homoj, se ili dormas, kuŝante en humido, li eksentas doloron je lumbo aŭ mortas pro paralizo, tamen kiel fartas kobitidoj? Homoj, se ili grimpas arbon, ege konstruiĝas tremetante, tamen kiel fartas simioj? Kiu el tiuj tri vivaĵoj scius bone pri la ĝustan lokon por vivi.?”

Popolo manĝas viandojn de dombestoj, alkoj kaj cervoj manĝas herbojn, skolopendroj manĝas serpentojn kiel bongustaĵon, milvoj kaj korvoj gustumas musojn. Kiu el tiuj kvar scias ĝustan guston? Hundosimila virsimio⁶⁵ kuras post simiion, alko seksumas kun cervo, kobitido ludas kun fiŝo. Mao Qiang kaj Li Ji⁶⁶ estas konsiderataj kiel belulinoj. Sed, vidante ilin, fiŝoj subnaĝas profunden, birdoj ekflugas supren kaj alten, cervoj ekkuras impete. Kiu el tiuj kvar scius ĝuste belon en la mondo? El mia vidpunkto, konfuziĝas la logiko de bonvoleco kaj justo, kaj komplikiĝas la vojo de praveco kaj

⁶⁰ 天府

⁶¹ 葆光 Laŭ 俞婉君, Lumo, kaŝita interne.

⁶² 南面 Reĝoj sidis sur seĝo, vidante sudon.

⁶³ Pri dek sunoj estas skribite en diversaj libroj: 吕覽, 淮南子, 楚辞, 說苑, 山海經

⁶⁴ Ĉi tie estas uzata la vorto “Virto 德” en bona senco.

⁶⁵ 獬豸 Harplena hundosimila simio. (Laŭ rimarko de 俞婉君)

⁶⁶ 毛嬙 · 麗姬 Mao Qiang estis belulino de Yue-lando, Li Ji – en Jin-regno.

malpravenco. Kiel do mi sciis pri la distingo?”

Nie Que diris: “Vi ne zorgas pri profito-utileco kaj malprofito-malutileco⁶⁷. Ĉu ankaŭ pleja homo ne zorgas pri profito-utileco kaj malprofito-malutileco?”

Wang Ni diris: “Pleja homo⁶⁸ estas dieca! Por li ne eblas esti varme en brulanta marĉego, ne malvarme en glaciĝinta rivero. Lin ne povas konsterni eĉ tondro, batanta monton, nek ventego, skuanta maron. Homo, kiel li, povas sidi sur nubo kaj aero, rajdi sur suno kaj luno, travagi eĉ eksteren de kvar maroj. Lin ne povas ŝanĝi morto kaj vivo, des malpli tia profito-utileco kaj malprofito-malutileco.”

Juque-zi demandis Zhangwu-zi, dirante: “Mi aŭdis Konfuceon diranta: ‘Sanktulo ne okupiĝas pri laboro, nek sekvas profiton, nek evitas damaĝon, nek ĝojas esti sekvata, ne insistadas la Vojon. Li diras sen eldiro, ne diras kun eldiro, kaj vagadludas ekstere de monda rubo-malpuraĵo.’ Konfuceo rigardis tion kiel frivolan, sed mi konsideras tion kiel la praktikadon de la mistera Vojo. Kiel vi opinias pri tio?”

Zhangwu-zi diris: “Eĉ Huang-ti konfuziĝus, aŭdante tion. Kial do Qiu⁶⁹ povus sufiĉe kompreni pri tio. Ankaŭ vi tro haste traktis tion, kvazaŭ esperus kokokrion, vidante ovon, kvazaŭ imagus rostitan kolombon, vidante nur katapultan kugleton. Mi parolas al vi neseriozan rakonton, do ankaŭ vi aŭdu neserioze, ĝuste tiel, kiel sklavoj respektus sin reciproke, metante ambaŭflanke sunon kaj lunon, portante universon, kunfandinte ilin kaj mergiĝinte en ĥaason⁷⁰. Popolo estas laborema, sanktulo estas stulta kaj obtuza. La sanktulo, rigardante la tempon kaj ĉiujn aĵojn pura unu tuto, aprobas ĉion kiel pozitivan kaj ampleksas ĉion kiel pravencan.

Oni ĝuas la vivon. Ĉu tio estas freneza aŭ ne? Kiel mi povas scii pri tio? Oni timas la morton. Ĉu tio similas aŭ ne, al tiu, kiu, en infaneco forpelite eksteren, ne scias reveni hejmen? Kiel mi povas scii pri tio? Li Ji estis filino de iu limgardanto en Ai-provinco⁷¹. Kiam ŝin ekprenis Jin-regno, ŝi tiom ploregis, kiom malsekiĝis ŝia kolumo. Ŝi, venigite al reĝo⁷², ekkuŝis kun la reĝo en lito kaj gustumis viandon. Poste ŝi pentis pro tio, ke ŝi ploris antaŭe.

Mi ne scias, ĉu iu mortinto pentus aŭ ne, ke li preĝis por plia vivo antaŭe. Tiu, kiu drinkis vinon en sonĝo, matene vekiginte esploras. Tiu, kiu plorkriis en sonĝo, matene jam ekiras ĉasi. En sonĝo oni ne scias, ke tio estas sonĝo. Povas esti, ke en sonĝo oni

⁶⁷ 利害 La ideogramo 利 estas uzata kunmetite kiel 利益(profito) • 利用(utiligo).

⁶⁸ 至人 Tiu, kiu atingis.

⁶⁹ 丘 Nomo de Konfuceo.

⁷⁰ Multaj esploristoj konsideras la frazon (kiel...ĥaason) dirita de sanktulo.

⁷¹ 麗戎国艾地 Ai de Li Rong

⁷² 獻公 Princo Xian (surtrone 676-651)

faras eĉ songodivenon. Nur poste, vekiginte, oni ekscias, ke tio estis songo.

Ĝuste kun la granda vekigo oni nur poste sciigos, ke ĉi tio estas ja granda songo. Sed stultulo opinias sin jam vekiginta, apenaŭ sciis klare tion. S-roj nobluloj, oficistoj, kiel obstinaj vi estas! Kaj Konfuceo, kaj vi, ĉiuj estas en songo. Tio, ke mi diras al vi “Songo”, estas ankaŭ songo. Tiuj vortoj kaj tiuj nomoj pendas je falso. Post dekmil generacioj hazarde aperos unu granda sanktulo, kiu komprenos tion. Eblus renkontiĝi kun li nur en unu momento de mateno ĝis vespero.

Supozu, ke mi kaj vi diskutas. Se vi venkis min, mi ne venkis, sed, en tiu okazo, ĉu vi vere pravas kaj mi vere ne pravas? Se mi venkis vin, vi ne venkis min. Ĉu mi vere pravas kaj vi vere ne pravas? Ĉu iu el ni estas prava, aŭ ne prava? Ĉu ambaŭ ni pravas, aŭ ambaŭ ni ne pravas? Nek mi, nek vi povas scii tion. Tiel do oni perdiĝas en mallumo. Ĉu ni tion ĝustigas al la alia homo? Se al via samideano ĝustigi tion, kiel eblus ĝustigi al tiu, kiu havas saman opinion kun vi? Se lasas al mia samidano tion ĝustigi, kiel eblus ĝustigi al tiu, kies opinio estas sama kun mi? Se lasu ĝustigi tion al la tria homo, havanta alian opinion ol ni, ĉar tiu havas tute alian vidpunkton, kiel al li eblus ĝustigi la nian diskuton? Lasu solvi tion al la kvara homo, havanta saman opinion kun mi kaj vi⁷³. Ĉar li estas sama je opinio kun mi kaj vi, kiel eblus al li ĝustigi tion? Tiel do nek mi, nek vi, nek aliaj ne povas scii reciproke. Ĉu ni devus atendi ankoraŭ aliajn? Atendi por ambaŭ la aliajn voĉojn estas same, kiel nenion atendi.

Lasu ambaŭ vidpunktojn akordiĝi kun la Ĉiela Rigardo⁷⁴ kaj dependi de senĉesa ŝanĝigo de limoj⁷⁵ – jen en tio kuŝas kialo por atingi longdaŭran vivon. Kion signifas “Akordiĝo kun la Ĉiela Rigardo”? Tio signifas jenon:

“La Jeso ne estas Jeso, la Tia ne estas Tia⁷⁶. Se la Jeso restas vere Jeso, tiam alia ol la Jeso estas ne Jeso. En tiu okazo ne estiĝas diskuto. Se la Tia estas vere Tia, tiam alia ol Tia estas ne Tia. En tiu okazo ne estiĝas diskuto. Forgesu jaron⁷⁷, forgesu juston. Agu je senlimo, tiel do loĝu en la mondo de senlimo⁷⁸.”

⁷³ 使同乎我与若 Tiu frazo estas memkontraŭdiro. Logike ne povas ekzisti tia homo, ĉar opinioj diferencas inter mi kaj vi. Ĉu estas allasebla tia kontraŭdiro por tiu, kiu rigardas ĉion prava?

⁷⁴ 天倪 Laŭlitere - Ĉiela rigardo.

⁷⁵ 曼衍 Laŭlitere - senlima etendiĝo

⁷⁶ 是 – jeso, praveco 然 – tia, tiel Iuj komprenas la frazon 是不是、然不然 jene: “Fari ne Jeson Jeso, ne Tia-n Tia.” [Ikeda, 86] Aliaj – jene: “Ekzistas praveco kaj nepraveco, ekzistas naturareco kaj nenaturareco.” [Kcr, 477]

⁷⁷ 年 jaro. Iuj prenas la ideogramon por “vivdaŭro”. Mi komprenas ĝin kiel “tempon”.

⁷⁸ 無竟 sen limo Eblus alie kompreni: “Agu kun koro de Nenio..” Alia kompreno: “Agu en eterneco, vivu en eterneco.” [Kcr, 477] Sed mi komprenas tiun frazon kiel neniigo de “limo”, kiu distingas aĵojn.

Duonombro⁷⁹ demandis ombbron, dirante: “Antaŭe vi iris, sed nun vi haltas; antaŭe vi sidis, sed nun staras. Kiel senprincipa vi estas!”

La ombro diris: “Mi iĝas tia, atendante tiun, kiu agas. Ankaŭ tiu iĝas tia, atendante la alian aganton. Ĉu mi esperus iri mem per skvamo de serpento aŭ per flugilo de cikado? Kial mi scias pri kaŭzo, ke mi iĝas tia? Kial mi scias pri kaŭzo, ke mi iĝas ne tia?”

Antaŭe Zhuan Zhou⁸⁰ songis, ke li fariĝis papilio, fluganta laŭplaĉe, gaje kaj flirte. La papilio ĝuis mem, forrevite, ne sciis, ke ĝi estas Zhou. Subite li, vekiĝinte, elreviĝis kaj trovis, ke li estas Zhou. Li ne scias, ĉu en songo de Zhou li fariĝis papilio, ĉu en songo de papilio li fariĝis Zhou. Sed nepre estas distingo inter Zhou kaj papilio. Tio estas nomata “Aliiĝo⁸¹ de aĵoj”.

⁷⁹ 罔兩 Ombreto, formiĝanta ĉirkaŭ la ombro. Iuj supozas, ke tio estas “spirito”.

⁸⁰ 莊周 Zhou estas nomo de Zhuangzi.

⁸¹ 物化 aliĝo, transformado.

3 PRIZORGADO DE SANECO

Nia vivo estas limigita, sed scio estas senlima. Estas dangere, ke la limigito sekvu la senliman. Do estas tre dangere strebadi al scio.

Se fari bonon, ne proksimiĝu al renomo⁸²; se fari malbonon, ne proksimiĝu al puno. Se fari la reguligadon⁸³ principo, oni povas teni sin sekura, povas plenumi sian vivon, povas nutri siajn parencojn, kaj povas atingi la altan aĝon.

Kuiristo Ding dispecigis bovon por la reĝo Wen Hui⁸⁴. Ĉe ĉiu tuŝado per mano, ĉe ĉiu levado de ŝultro, ĉe ĉiu paŝado de piedoj, ĉe ĉiu premado per genuoj, membroj de bovo estas stranĉataj kun belsono⁸⁵. Kun ĉiu movo de haktranĉilo eksonas muzikharmonie, simile al la danco de Morusa Arbaro aŭ al la movimento Jingshou⁸⁶. La reĝo Wen Hui diris: “Ho, bonege! La tekniko atingis tioman altecon.”

Kuiristo Ding flankenmetis la tranĉilon kaj diris: “Mi ŝatas la Vojon pli ol altan teknikon. Kiam mi komencis tiun laboron de bovo-dispecigo, ĉiuj, kiuj mi vidis, estis nenio alia ol bovo. Post tri jaroj, iĝis jam nevidebla la tuta bovo. Nun, mi vidas ne per okuloj, sed per animo. Haltis percepta kapablo kaj funkcias anima volo. Laŭ Ĉiela leĝo estiĝas la granda fendigo kaj estas gvidate al la granda truo, kaj ĉio sekvas ĝuste naturon. Tiel do mi ne tuŝas eĉ ajnan ligamenton aŭ tendenon, des malpli neniam ostegon aŭ artikon. Bona kuiristo ŝanĝas ĉiujare la tranĉilon, ĉar ĝi fendetiĝas. Mezaj kuiristoj ŝanĝas ĝin ĉiumonate, ĉar ĝi rompiĝas. Nun, mia tranĉilo estas uzata dek naŭ jarojn, tranĉinte kelk-mil bovojn. Sed la klingo ŝajnas tia, kvazaŭ ĝuste polurita per akriĝoŝtono. En artikoj estas fendo kaj klingo ne estas dika. La sendika eniras en la fendon, do nepre estas la vasteco, kie oni lasas la klingon ludi libere en la granda spaco. Tiel do dum dek naŭ jaroj mi uzas, la klingo similas al tiu, kvazaŭ nove polurita per akriĝoŝtono.

Sed, tamen, koncernante la meznivelan⁸⁷, ĉiam mi vidas lin trafanta malfacilon. Li aspektas timema kaj skrupula, ĉesas vidi, kondutas malrapide, movas tranĉilon tro feble. Brue ŝirite falas la tranĉitaj partoj kvazaŭ terbuloj surteren. Starante kun

⁸² 名 fameco, honoro, gloro.

⁸³ 督 Iuj esploristoj prenas ĝin por 中 “Mezo”. [WaB, Ikt1, YWj]

⁸⁴ Iuj supozas, ke li estas reĝo de Liang 梁惠王, aliaj – reĝo de Wei 魏惠王.

⁸⁵ 耨, 耨, 耨 ĉiuj ideogramoj estas onomatopeo.

⁸⁶ 桑林 estas nomo de muziko en Shang dinastio. 經首 estas muziko de la reĝo Yao 堯.

⁸⁷ Multaj esploristoj prenas la ideogramon 族 por alia signifo ol antaŭa 族庖. Mi ne povas konsenti kun ili. Mi preferas Waley, kiu prenis ĝin kiel mezan kuiriston. [WaA73]

tranĉilo, li ĉirkaŭobsevas kvar direktojn kun koro plena je hezito-ŝanceliĝo. Se tiel, eĉ bona tranĉilo kaŝiĝus vane.”

La reĝo Wen Hui diris: “Bonege! Mi aŭdis eldiron de la kuiristo Ding. Tio nutras al mi la vivon.”

Gongwen Xuan vidis iun ekskonsiliston de edukado⁸⁸, konsternite, diris: “Kiu vi estas? Kial al vi estas hakita unu kruro? De kiu? Ĉu de la Ĉielo aŭ de iu homo?”

Li diris: “De la Ĉielo. Nepre ne de la homo. La Ĉielo faris min unukrura. Fizionomio estas io donita. Mi scias, ke tion donis al mi la Ĉielo, sed ne iu ajn homo. Fazano ĉe marĉo bekas unu fojon en ĉiu deka paŝo, trinkas unu fojon en ĉiu centa paŝo, sed ĝi ne volas esti nutrata en la kaĝo⁸⁹. Eĉ se oni traktus vin kvazaŭ reĝon, via animo ne sentas sin bona.”

Lao Dan mortis. Qin Shi venis kondolenci pri li, kriante tri fojon, estis forironta.

Disĉiplo diris: “Ĉu vi ne estas amiko de la Majstro?”

Li diris: “Jes.”

Tiu diris: “Se Jes, ĉu estus allaseble kondolenci tiel?”

Li diris: “Jes. Unue, mi pensis, ke ĉeestus liaj homoj⁹⁰, sed nun, ne. Kiam mi eniris kondolenci, mi vidas maljunulojn plorkriantaj, kvazaŭ por liaj mortintaj filoj; junulojn plorkriantaj, kvazaŭ por liaj mortintaj patrinoj. Ili ĉeestas ĉi tie por eldiri certe vortojn, ne havante senton de kondolenco; por plorkrii, ne vere volante plorkrii. Tio estas eviti la Ĉielon kaj kontraŭi sian senton. Ili forgesis kion ricevis de li. Antikvuloj diris, ke tiu, kiu evitus la Ĉielon, estu punita. Laozi venis ĝuste tiam, kiam tempis. Li foriris ĝuste tiam, kiam konformis. Laŭ ĝusta tempo, konforme al naturo. Malĝojo aŭ ĝojo ne povas interveni. Antikvuloj diris: “Tio estas Dia malligiteco”⁹¹.

Estas montrite, ke la lasta celo por la brulligno estas fajrigo. Ĝi ne scias sin

⁸⁸ 右師 Nomo de eduka oficisto en Song-regno.

⁸⁹ Paragrafo al mi ŝajnas ne plena je vorto. Laŭ mi, la ekskonsilisto volas diri, ke pli bone vivi sendepende en povreco, ol servi kiel altranga oficisto senlibera. Se nutrata en la kaĝo, oni devas akcepti ajnan punon, kiel donacon de la Ĉielo. Bredatajn kokojn nepre atendas la mortigo. Neniu el ili mortas nature.

⁹⁰ Iuj esploristoj rigardas la frazon 其人 alie, kaj tradukas: “Mi konsideris Laozi kiel (plejan) homon.” [WaB, Ikt1] Aliaj prenas ĝin kiel “liajn homojn”, ĉar daŭras sama uzado 其子 (liaj filoj), 其母 (liaj patrinoj). [YWj] Mi sekvas la lastan.

⁹¹ 帝之縣解 Cheng Xuanying 成玄英 interpretis la frazon kiel “natura malligiteco (天然之解脫)”.

forkonsumiĝonta.⁹²

⁹² Troviĝas diversaj interpretoj en tiu paragrafo. Iuj konsideras 指(fingron) por 脂 (graso).[WaB, YWj]

4 LA MONDO DE HOMOJ

Yan Hui vizitis Zhong Ni⁹³ kaj petis la permeson ekvojaĝi.

Zhong Ni diris: “Kien vi iras?”

Yan Hui respondis: “Mi iras al Wei-regno.”

Zhong Ni demandis: “Por kio?”

Yan Hui respondis: “Mi aŭdis, ke la reĝo de Wei⁹⁴, plenaĝulo, kundutas arbitre. Li facilanime uzas la ŝtatpotencon kaj ne vidas sian eraron. Eksploatante la popolon, li facilanime kondukas ilin al morto, do la regno estas plena de mortintoj, samkiel marĉo plena de bruligitaj kadavroj. La popolo povas nenion fari. Mi antaŭe aŭdis la Majstron diranta: ‘Foriru de la regno bone regata, iru al la regno malorda. Kuracisto estas bezonata tie, kie estas multe da malsanuloj.’ Mi volus agi laŭ via vorto, kiun mi aŭdis. Mi esperas, ke eble resaniĝos la regno.”

Zhong Ni diris: “Ho, probable, vi iros nur por esti ekzekuti. La Vojo ne deziras miksaĵojn. Miksaĵoj estas ja multediversaj. Pro multediverseco ekbatalas skismuloj. Skismoj ĉagrenas. Kiu ĉagreniĝas, tiu ne povas savi aliajn.

Antikvaj plejaj homoj antaŭ ĉio konvinkis sin havantaj en si mem ion idealan, poste ili kun la konvinko turnis sin al la aliaj homoj. Dum vi ankoraŭ ne konvinkiĝis kion vi mem nun posedas, kial vi havus libertempon por iri tien, kie tirano regas?

Aldone, ĉu vi scias, por kio la virto detruigas, de kie la saĝo⁹⁵ estiĝas? La virto detruigas pro renomo⁹⁶, la saĝo estiĝas de kverelo. Renomoj estas konkure enlistitaj sur dokumentoj⁹⁷, kaj saĝoj estas kverelujoj. Ambaŭ estas iloj por vundi, sed ne por plenumi bonkonducon. Estadas, ke eĉ se kun dika virto kaj kun firma fido, oni ankoraŭ ne atingis la homan senton, aŭ eĉ se ne konkuras je renomo, oni ankoraŭ ne atingis la homon koron. Kiu altrudas per striktaj vortoj⁹⁸ sian bonvolecon-justecon⁹⁹ al tirano kaj akuzas la alies malbonon, fierante je sia belo, tiu estos nomata “kalumniulo-plago¹⁰⁰”. Kiu kalumnias la aliajn, tiun la aliaj nepre kalumnias. Probable, vi estos kalumniita de aliaj homoj.

⁹³ Yan Hui 顏回[521-490 a. K.], Zhong Ni 仲尼 – nomo de Konfuceo[551-479 a. K.].

⁹⁴ Konforma reĝo devas esti Chu 出公(輒 surtrone 492-481 a. K.)

⁹⁵ 知 Scio, intelekto. Ĉi tie saĝo.

⁹⁶ 名 Nomo. Ĉi tie renomo.

⁹⁷ 札 Lignopeco uzata por skribado. La ideogramo ofte estas anstataŭigata de esploristoj per 輒. Mia traduko apogas sin sur 札.

⁹⁸ 繩墨之言 Strikta vorto, kiel mezurata per tuĉsnura lineo.

⁹⁹ 仁義 Terminoj uzataj de Konfuceanoj, kiel esprimo de alta virto.

¹⁰⁰ 菑人 Plago al homoj. Mi interpretas tiun esprimon kiel kalumniulon.

Se oni almenaŭ per si mem ĝis nun ĝojus je saĝo kaj malamus stulton, kial do oni aŭdacus uzi vin por ŝanĝi? Se vi kosilos, la reĝo nepre utiligos vin nur por gajni sian superestrumadon. Tiam vi, kun okuloj blindigitaj de tio, klopodante trankviliĝi je vizaĝo, dezirus diri per buŝo ion ajn, provos tenadi vin bonstilon, volos en koro efektiviĝi ion¹⁰¹. Tio estas samkiel “savi fajron per fajro”, aŭ, “savi inundon per akvo”. Tio estas nomata: “Ju pli, des pli”. Estos senlime, se unufoje sekvas tion. Pro tio, ke vi ripetos vortojn, ne profundajn sen konvinko, vi nepre mortos antaŭ la tirano.

Antikve Jie mortigis Guan Longfeng, Zhou mortigis princon Bi Gan¹⁰². Ĉiuj morigitoj estis edukitaj kaj, estante subuloj, ili humile karesis alies popolon, kaj, estante subuloj, ili kontraŭis al siaj suproj. Tial iliaj reĝoj faligis ilin pro ilia tia personeco, ĉar ili estis ŝatataj famuloj. Antikva reĝo Yao atakis landojn Cong, Zhi, Xu’ao, kaj reĝo Yu atakis landon Youhu¹⁰³. Atakitaj landoj fariĝis ruinoj, kaj landestroj estis punmortigitaj, ĉar ili ne ĉesis uzadi la armeojn, nek ĉesis serĉadi al si profiton. Ĉu vi sola ne aŭdis pri tio? Famecon kaj profiton ne eblas konkeri eĉ al sanktuloj. Des malpli al vi. Malgraŭ tio, vi nepre havas ian ideon, ĉu ne? Diru al mi prove.”

Yan Hui diris: “Mi estu bonetiketa kaj modesta, diligenta kaj kun unu koro, ĉu eblos?”

Zhong Ni diris: “Ho ve, kiel eblus? Vi, konsiderante fervoron kiel animan plenecon, ekscitiĝas kaj vizaĝesprimo estas ŝanĝiĝema. Je tio vi ne diferencas de aliaj ordinaruloj. Tiel do vi antaŭsupozas kion aliuloj sentas, kaj vi klopodas teni vin tia, ke iel vi plaĉu al ili. Tio estas nomata: “Ne validas eĉ la virteto, akumulata ĉiutage.” Des malpli la granda virto. Tiu, kiun vi devas konsili, insistados kaj ne ŝanĝiĝos. Ekstere li akordus kun vi, sed interne ne adoptas vian opinion. Kien utilis via rimedo?”

Yan Hui diris: “Nu, tiuokaze mi estu simple-rekta interne kaj fleksebla ekstere. Por efektiviĝi mian ideon mi komparu kun opinioj de la antikvaj. Estante interne simple-rekta, mi fariĝos samulo kun la Ĉiela naturo. Estiĝante samulo kun la Ĉiela naturo, mi scios la Ĉielan filon kaj min mem. Ĉar ĉiuj estas infanoj de la Ĉielo, kial mi postulos, ke aliaj rigardu nur mian propran opinion bona aŭ alies opinioj ne estu bonaj? Se tiel, oni opinios min infano, t. e., samulo kun la Ĉiela naturo.

Estante ekstere fleksebla, aliaj homoj rigardos min sama, kiel ili mem. Portante tableton, profunde salutante, kaŭrante je korpo, frotante siajn manojn, mi obeos

¹⁰¹ Iuj interpretas paragrafon kiel flatadon [YWj], la aliaj – kiel deziron kritiki [Ikt1]. Ĉiokaze estas skribite, kiel vana estas la pozicio de konsilisto al tirano.

¹⁰² Jie 桀 – tirano, lasta reĝo de Xia-dinastio. Zhou 紂 – tirano, lasta reĝo de Yin-dinastio. Guan Longfeng 關龍逢 – subulo de Jie, Bi Gan 比干 – onklo de Zhou laŭ patro.

¹⁰³ Yao 堯, Yu 禹, - sanktaj reĝoj. 叢, 枝, 胥敖, 有扈 – nomoj de malgrandaj landoj.

decregulojn, kiel subuloj. Ĉiuj homoj povas fari tion, ĉu mi ne povas fari? Oni ne riproĉus min por tio, kion oni mem faras. Tio estas, ke oni opinias min samulo kun si mem.

Por efektiviĝi mian ideon kompari kun la antikvaj estas fariĝi disĉiplo de antikvuloj. La vortoj, enhavantaj kritikon, estis jam diritaj de antikvuloj, ne de mi unue eldirataj. Tiukaze, malgraŭ rekta eldiro eblas eviti riproĉon. Tiel nomata “fariĝi disĉiplo de antikvuloj”. Se tiel, ĉu atingeblas la celo?”

Zhong Ni diris: “Ho ve! Kial do eblas? Havante multe da politikoj kaj rimedoj, vi ne informiĝas. Spite persistecon, vi ne estos punita, sed senpli. Fareblas nur tio. Neniom eblas ŝanĝi per tio. Ankoraŭ vi faras vian koron gvidanto.”

Yan Hui diris: “Mi jam ne havas rimedon por antaŭeniri. Mi aŭdacas demandi vin pri la rimedo.”

Zhong Ni diris: “Unue vi fastu, tion mi devas diri al vi. Fari tion¹⁰⁴ per sia koro, ĉu tio estas facile? Kiu dirus ‘facile’, tiu ne konformas al la hela Ĉielo.”

Yan Hui diris: “Mia familio estas povra. Mi ne drinkas vinon, nek manĝas ajlon dum kelkaj monatoj. Ĉu tio povas esti taksata kiel ‘fasto’?”

Zhong Ni diris: “Via estas fasto por festo, sed ne fasto por koro.”

Yan Hui diris: “Mi volus demandi, kio estas la fasto por koro?”

Zhong Ni diris: “Faru strebon unuigita en vi. Aŭskultu tion ne per oreloj, sed per koro. Ne pere de koro, sed aŭskultu tion per Qi¹⁰⁵. Ĉar oreloj nur aŭdas, koro nur perceptas signon. Qi estas tiu, kiu en malpleneco¹⁰⁶ atendas ion. La Vojo kolektiĝas en la malpleneco. Malplenigo ja estas la fasto de koro.”

Yan Hui diris: “Ĝis kiam mi ne ekaŭdis vian instruon, certe troviĝis mia memo, kiel Hui. Post aŭdado de la instruo, ankoraŭ ne ek troviĝas la ekzisto de Hui. Ĉu eblas nomi tion la malpleneco?”

La Majstro diris: “Jen ĉio! Mi diru al vi, ke vi iru ludi en la kaĝo sed ne zorgu je via fameco. Se oni aŭskultas, vi pepadu; se ne, ĉesu pepi. Sen pordo estos senvenene¹⁰⁷.”

¹⁰⁴ 之 Iuj esploristoj prenas ĝin por “persvasi la reĝon de Wei”. [YWj37] Sed mi prenas ĝin “fasti”. Konfuceo ĉi tie donas al “fasto” ne religian signifon, sed pli filosofian aŭ moralan kiel “sinpurigo” 戒潔.

¹⁰⁵ 氣 aero, spiro. Laŭ la vortaro de Wang Chongfang, *ĉjio* – abstrakta koncepto rilatanta al la homa subjektiva spirito aŭ al la plej elementa substanco en la universo.

¹⁰⁶ 虛 malpleneco, nenieco. Estas notinde, ke la aŭtoro prezentas gravajn konceptojn de taoismo kaj posta zen-budhismo per la buŝo de Konfuceo.

¹⁰⁷ 無門無毒 Esploristoj konfuziĝas antaŭ la esprimo, kaj troviĝas diversaj interpretoj. Mi prenis la pardonon kiel limon, apartigantan, do la signifo estas jena: “Akceptu ĉion ajn, damaĝus vin nenio.”

Loĝu unusole tie, kie nepras, kaj estos sufiĉe. Estus facile ĉesi iradi, sed malfacile ne iri laŭ la tero. Kiel al servanto por homoj, al vi estus facile uzi falson, sed, kiel al servanto de la Ĉielo, al vi estos malfacile uzi falson.

Mi aŭdis, ke havanto de flugiloj flugas, tamen mi ne aŭdis, ke nehavanto de flugiloj flugas. Mi aŭdis, ke havanto de scioj scias, tamen mi ne aŭdis, ke nehavanto de scioj scias. Rigardu, ripozante senmove, kaj en malplena ĉambro estiĝas io blanka. Tie restas fortuna. Se ĝi ne restas, tio estas nomata “sidanta kurado¹⁰⁸”. Lasu orelojn kaj okulojn komuniki kun interno kaj lasu koron scii eksteron, tiam Spiritoj alvenas resti, des pli homoj. Tiel aliĝas ĉiuj kaj ĉio. Jen kion Yu, Shun plektis. Jen kion Fu Xi, Ji Qu¹⁰⁹ faris finfine. Des pli homoj, al kiuj mankas koncentriĝo¹¹⁰.

Duko de She-lando, Zi Gao¹¹¹, sendote al Qi-regno, konsultis Zhong Ni, dirante: “La reĝo, sendas min, ŝargante min per peza respondeco. Qi-regno, kvankam akceptus min kun respekto, tamen ne haste traktus la aferon. Malfacile movi eĉ ordinarulojn, des pli landestrojn. Mi tre timas tion. Vi ĉiam parolas al mi, dirante:

‘Je ĉiu afero, ĉu malgranda aŭ malgranda, sen la ĝusta vojo apenaŭ atingeblas iu ajn agrabla sukceso. Se la afero ne sukcesas, nepre iuj riproĉos la respondeculon. Eĉ se sukcesus, nepre ĉagrenus lin zorgoj diversaj kaŝe aŭ malkaŝe. Povas poste ne suferi nur virtulo en ajna okazo, negrave ĉu sukcesus la afero aŭ ne.’

Mi manĝas mallukse kaj turpa kuiristo ne volas doni al mi ion refreŝigan friskan. Sed nun, ricevinte matene la ordonon, mi prenadis vespere la friskan trinkaĵon, ĉar al mi iĝas varmege en mia korpo. Mi ankoraŭ ne sciigis pri informo de la afero, tamen mi jam estas maltrankvila je diversaj zorgoj kaŝe kaj malkaŝe. Se la afero malsukcesos, nepre oni ekparolos riproĉon, kaj tute egale, ĉu sukcesa aŭ ne. Neniu el reĝaj subuloj kapablus sufiĉe elteni tiun ŝarĝon. Majstro, bonvolu diri al mi ion ajn.”

Zhong Ni diris: Estas du grandaj disciplinoj, la unua estas destino, la dua – devo. Amo de gefiloj al gepatroj estas destino. Tion ne eblas kompreni per koro. Servado de subuloj al la reĝo estas devo. Estas nenie ajn, kie troviĝas neniu reĝo. Nenien eskapi inter la Ĉielo kaj la tero. Tio estas, t. n., Grandaj disciplinoj.

Tial do, kiu servas al gepatroj, tiu estas kontente je tio ĉie ajn. Jen la kulmino de fila pietato. Kiu servas al sia reĝo, tiu estas kontenta je ajna servo. Jen la pinto de lojaleco. Kiu servas mem al sia koro, tiu, ne ŝanceliĝante eĉ malĝojo aŭ ĝojo, trankvile obeas al

¹⁰⁸ 坐馳 Oni komprenas tiun esprimon kiel “korpo sidas, sed koro kuras.” Mi prenas ĝin alie kiel deziron fari maleblon.

¹⁰⁹ 禹, 舜, 伏戲 estis antikvaj reĝoj. Probable, ankaŭ 几蘧, sed ne konstatebla.

¹¹⁰ 散 Mi prenas tiun vorton kiel 散漫 mankon de koncentriĝo.

¹¹¹ 梁子高, parenco de la princoj 昭(515-489 a. K.) kaj 惠(488-432 a. K.) de Chu-regno.

destino, ĉar li scias fari neniel ol obei. Jen la kulmino de virto. Esti subulo aŭ filo tute neeviteble al homo. Oni forgesas sin, plenumante la taskon de ĉiu afero. Ne estas tempo por ĝoji la vivon aŭ por malami la morton. Estas bone por vi ekiri.”

Permesu al mi aldoni tion, kion mi aŭdis. Interŝanĝo estas farata, se inter proksimumoj nepre rilatas kun fido, se inter malproksimumoj nepre per vortoj kun honesteco. Je vortoj nepre devas esti tiuj, kiuj transdonas. Estas tre malfacile en la mondo transdoni vortojn, esprimantajn ambaŭflankan ĝojon kaj ambaŭflankan koleron. Ĉar en la vortoj de ambaŭflanka ĝojo nepre plenas de beligita pufparolo, kaj en la vortoj de ambaŭflanka kolero nepre estas plena de troigita parolaĉo. Ĝenerale, la troigita vorto estas malvera. Se malvera, oni ne kredas ĝin firme. Se ne firma estas la kredo, ricevas plagon la transdoninto de la vorto. Do estas dirite en aforismo: ‘Transdoni la realan fakton, kaj ne transdoni troigitan vorton.’ Se tiel, la tasko estas preskaŭ plenumita.¹¹²

Se ludistoj intertraktas, kvankam en la komenco ili estas gajaj, tamen en la fino ĉiam malgajaj, ĉar ili kun aplombo uzas finfine multajn ruzajojn. Kiuj intertraktas laŭdece, trinkante vinon, tiuj, kvankam en la komenco estas sinregemaj, tamen en la fino ĉiam freneziga, ĉar ili kun aplombo falas finfine en strangan orgion. Ĝenerale entute estas same: komenciĝas sincere, finiĝas maldece. Kio estas simpla en la komenco, tio nepre ege grandiĝas en la fino.

Vorto similas al vento kaj ondoj, konduto estas gajno kaj perdo. Vento kaj ondoj facile moviĝas. Gajno kaj perdo estas facile danĝerigitaj. Kolero estiĝas senkaŭze, do estiĝas ruzaj vortoj kaj unuflanka rezono¹¹³.

Bestoj je sia morto kriegas kun ia ajn voĉoj, spiradas furioze kaj elmontradas vice elkoran ferocon. Kiu iĝas kruela ĝis kulmino, tiu nepre havigas al si malbonan koron per tio, ne sciante pri si mem. Ĉar li ne scias pri si mem, kiel do li scius la finon? Estas dirite en aforismo: “Ne ŝanĝu dekreton, ne klopodu por aliigi.” Ĉar troigo plia. Ŝanĝi dekreton kaj instigi ŝanĝon endanĝerigas la aferon. Belo fariĝas komleta dumlonge. Se foje estiĝas ia malbono, ne eblus korekti ĝin. Estu prudenta.

Se vi foje rajdas sur iu veturilo, lasu vian koron ludi tie. Konfidu ĉion al nepreco, kiel neevitebla, kaj nutru interne vian kernon, tiel do vi atingos celon. Kion fari por raportoj? Nenion alian ol plenumi ordonon. Ĉu estas malfacile tiel fari?¹¹⁴”

¹¹² Iuj esploristoj tradukas la frazon alie: “Se tiel, eblus konservi vin nedifektita.” [YWj]

¹¹³ Troviĝas diversaj interpretoj pri la frazo. Iuj komprenas, ke kolero estiĝas pro ruzaj vortoj. [WaB, YWj] Aliaj prenas koleron por kolero de reĝo. [Ikt1] Mi prenas la vortojn 言, 辭 kiel flatado kaj rezonado, konvena nur por sia flanko.

¹¹⁴ 此其難者 Iuj ne aldonas demansignon, tradukinte: “Tio estas malfacila!” [WaB, Ikt1]

Yan He fariĝis guvernisto por la kronprinco de la duko Ling en Wei-regno¹¹⁵. Yan He demandis Ju Boyu¹¹⁶: “Estas ĉi tie unu homo. Lia karaktero estas laŭ nature murdema. Se senbridi lin per governo, nia regno estos endanĝerigita; se bridi lin per governo, mi mem estos endanĝerigita. Lia saĝo estas limigita, ke li povas scii nur alies erarojn, sed ne scias, de kie la eraroj estiĝas. Kion fari por mi kun tia homo?”

Ju Boyu diris: Bona estas via demando. Estu singarda, estu skrupula, kaj ĝustigu vin mem. Je konduta formo, nenio pli bona ol sekvi. Je koro, nenio pli bona ol akordiĝi. Sed kuŝas malsano en ambaŭ tiuj. Se sekvas, estas preferinde, ke ne volu tro eniri; se akordiĝas, estas preferinde, ke ne volu tro eliri¹¹⁷. Kiu tro eniros laŭ formo, tiu turmentiĝos, pereos, detruigiĝos, stumblante falos. Kiu tro eliros je akordiĝo de koro, tiu, kvankam akirus famon kaj gloron, tamen ricevos malbonsorton kaj malfeliĉon.

Kiam li volas fariĝi bebo, ankaŭ vi kune kun li fariĝu bebo. Kiam li volas neniigi kampolimon, ankaŭ vi kune kun li neniigu la kampolimon. Kiam li volas neniigi bordon, ankaŭ vi kune kun li neniigu la bordon. Tiel li atingu kion li deziras, kaj poste vi enkonduku lin al la vojo senerara.

Ĉu vi ne scius manton? Ekkolerinte, svingante brakojn, ĝi impetas kontraŭ turniĝantan radon. Ĝi ne scias pri la nevenkebleco. Tia estas belulo, kiu rigardas sin kapabla. Singardu kaj estu skrupula je tio. Kiu fieras je sia akumulita beleco, misfaras tion. Estas danĝere.

Ĉu vi ne scius kiel bredi tigron? Ne devas doni al ĝi la vivantan nutraĵon, ĉar pro la kolero tiu mortigas ĉi tiun. Ne devas doni al ĝi la tutan korpon, ĉar pro la kolero tiu disŝiras ĉi tiun. Vidante okazon, ĉu ĝi estas malsata aŭ sata, oni lasas ĝin forkonsumi kolersenton. Kompreneble, tigro diferencas de homaro. Sed ĝi flatas al tiu, kiu donas nutraĵon, kaj sekvas. Tiel ĝi mortigas tiun, kiu kontraŭas.

Inter amantoj de ĉevaloj troviĝas tiu, kiu per kesto ricevas la fekaĵon kaj per konkego la urinon. Tia ĉevalo, kiam oni hazarde ĉe malbona okazo batis pikontan kulon aŭ tabanon, ekmordas enbuŝaĵon, vundas sin je kolo kaj rompas sin je brusto. Malgraŭ plenplena de bona volo, lia amo difektas. Devas esti prudenta.”

¹¹⁵ Yan He 顏闔 estis Lu-regnanto, samtempulo de Konfuceo. Ling 靈公 (surtrone 534-493 a. K.). Kronprinco Kuai Kui 蒯聵 (莊公 480-478 a. K.) surtroniĝis, preninte de sia filo 輒 (出公 492-281, 477-456 a. K.) la tronon.

¹¹⁶ 蘧伯玉 Granda oficisto de Wei-regno, pri kiu estas skribite en la Analektoj, ĉ. Wei Ling gong. Konfuceo alte taksis lin pro lia saĝeco. Tiu paragrafo povas esti daŭrigo de Analektoj.

¹¹⁷ 入出 Laŭ mi, “eniro kaj eliro” ĉi tie signifas same, kiel “iri tro profunden”. “Eliri” estas samkiel “flatadi” aŭ “elmontri sin”. En akordiĝo kunestas danĝero de flatado. Aŭtoro avertas tion.

Ĉarpentisto Shi iris al Qi-regno. Kiam li alvenis iu lokon, nomatan Qu Yuan¹¹⁸, li vidis unu sanktan kverkon¹¹⁹. Ĝia ombro povis kovri kelk-mil bovojn, ĝia trunko estis dika je cent *wei*,¹²⁰ ĝia alteco estis tiom alta, ke ĝi subenrigardas monton. Branĉoj elkreskis nur post dek *ren*¹²¹ de sur tero. Se konstrui ŝipon el ĝi, eblus fari ĉirkaŭ 10 boatojn. Kolektiĝas spekti ĝin amaso da homoj, kvazaŭ sur merkate. Mastro la ĉarpentisto, ne turnante okulojn al ĝi, nur preteriris senhalte.

Lernanto de la ĉarpentisto ne satrigardis ĝin, postkuris mastron Shi, kaj diris: Post kiam mi ekprenis hakilon kaj sekvis vin, mi neniam vidis tiom belan arbon. Sed vi, mastro, ne rigardante ĝin, preteriris senhalte. Kial?”

Li diris: “Ĉesu! Ne diru plu. Sentaŭga arbo. Se per ĝi konstrui ŝipon, la ŝipo tuj subakviĝos. Se per ĝi fari ĉerkojn internan kaj eksteran, ili subite putros. Se per ĝi fari ujojn, ili subite ekkrevos. Se per ĝi fari pordojn, tuj ellikiĝos ĝia mucilago. Se per ĝi fari kolonojn, ilin subite rongos raŭpoj kaj insektoj. Ĝi ne utilas por ajna materialo. Nenie uzeblas. Tial do ĝi longevivas tiel.”

Mastro Shi revenis hejmen. La sankta kverko ekaperis al li en sonĝo, dirante: “Kun kiu vi komparas min? Ĉu vi komparas min kun la utilaj arboj? Fruktarboj el rozacoj, piroj, oranĝoj, citronoj, kaj aliaj fruktarboj kaj vinberoj, - tiuj arboj estos hontigitaj, post kiam iliaj fruktoj, maturiĝinte, estis rikoltitaj. Branĉoj, la grandaj estas rompitaĵ, malgrandaj estas tiritaj. Ili suferas sian vivon pro sia kapablo. Do ili ne plenumas sian donitan de naturo vivon, survoje mortas junaj. Ili estas disbatataj de monda bagatelaĵo. Al neniu el ili eviteblas tia sufero.

Koncernante min, mi delonge serĉis resti senutila, ke nenie mi estu uzata. Nun proksima al morto, mi atingis la celon, per tio mi faris la grandan utilon. Se mi estus iam utila, ĉu al mi eblus atingi la grandan? Vi kaj mi egale estas aĵoj. Kial vi ne povas kompreni nin, kiel ambaŭ aĵojn. Vi mem estas profano, preskaŭ proksima al morto. Kial vi scius pri la profana arbo?”

Vekiĝinte, la mastro Shi provis diveni signifon de la sonĝo. Iu lernanto diris: “Se estus senutila, pro kio do ĝi fariĝis sanktejo?”

Shi diris: “Ŝŝ! Ne diru. Ankaŭ ĝi nur dependas de io. Ĝi konsideras ĉikanemulo tiun, kiu kritikis ĝin. Se ĝi ne fariĝus la sanktejo, ĉu ĝi estus hakita? Tio, ke ĝi tenas sin alie ol amaso, estas ĝuste honorinda. Ĉu estas malproksime supozi tiel?”

¹¹⁸ 曲轅 lokonomo.

¹¹⁹ 櫟社 Sanktejo, kiu faris kverkon dieca, aŭ kverko mem estas adorata kiel la ojo sanktigita. Mi prenas la lastan.

¹²⁰ Iu opinias, ke 1 *wei* egalas al 10 *chi*, la alia – al 8 *chi*.

¹²¹ 仞 Laŭ esploristoj diversas opinioj pri 1 *ren*. Iu opinias, ke 1 *ren* estas 4 *chi*, la alia – 7 *chi*, la tria – 8 *chi*.

Nanpo Ziqi ludvadis sur la monteto de Shang¹²², vidis tie iun grandan arbon, tute diferenca de la aliaj. Sub la ŝirmo de ĝia ombro povas ripozi milo da kvarĉevalaj ĉaroj. Ziqi diris: “Kio estas ĉi tiu arbo? Ĝi devas nepre esti iu eksterordinara materialo!”

Rigardante supren, li trovis la malgrandajn branĉojn kurbaj, ke ne eblas uzi ilin por trabo aŭ ĉervono. Rigardante suben, li trovis la grandan radikon krevinta, ke ne eblas fari el ĝi ĉerkon. Li lekis la folion kaj lia buŝo ulceriĝis vundite. Li ekflaris la odoron, kaj ĝi igis lin freneze ebriaĉi pli ol 3 tagojn.

Ziqi diris: “Ĝi estas ja arbo, ne utila por materialo. Tial do ĝi kreskis tiel grandega. Ho, ankaŭ dieca homo¹²³ fariĝis tiom granda pro neutileco, samkiel tiu arbo.”¹²⁴

En Song-regno estas iu regiono, nomata Jingshi, kiu estas fama je bonaj arboj, kiel katalpoj, cipresoj kaj morusoj. Se ĉirkaŭo de la trunko fariĝas longa je unu spano aŭ du, iu hakas ilin por fari sid-stangon de simioj. Se longa je tri aŭ kvar klaftoj¹²⁵, la alia hakas ilin por altaj firstotraboj. Se longa je 7-8 klaftoj, la tria hakas ilin fari monolitan panelon de ĉerkoj por nobeloj kaj komercistoj. Tiel do ili, ne plenumante sian naturan jaraĝon, estas hakitaj en juneco. En tio kuŝas malfeliĉo de tiuj materialoj. Ĉe la Festo de Ekzorcado ne estas konsiderate taŭgaj kiel ofero al Rivero jen tiuj : bovo kun blanka frunto, porko kun alta nazo, homo kun hemoroidoj. Ĉiuj aŭguristoj-ŝamanoj bone scias, ke ili estas konsiderataj kiel malbonaŭguraj. Sed dieca homo konsideras ilin kiel la simbolo de granda bonaŭguro¹²⁶.

Estis iu handikapulo, nomata Shu, kun mentono alkroĉita al umbriko, kun ŝultroj altigitaj super kapo, kun harplektaĵo direktita al ĉielo, kun kvin truoj turniĝintaj supren, kun gamboj premitaj al ripoj. Per laboro de kudrado kaj lavado li vivtenis sin sufiĉe por manĝi. Per laboro de kribrado kaj senbranigo li sufiĉe povis nutri dek homojn.

Kiam aliaj ekmilitiris, tiu handikapulo, svingante brakojn por adiaŭi, vagadis inter ili. Kiam aliaj estis vokitaj de supro al granda laborservo, tiu handikapulo, havante eternan kriplajon, povis eviti la taskon. Kiam la supro donis al malsanuloj grenojn, li

¹²² sama kun 南郭子綦. 商之丘 estas ĉefurbo de Song-regno. Ĝi estis en nuna Henan.

¹²³ 神人 Ĉi tie estas skribite, ke la grandeco de dieca homo kuŝas en neutileco laŭ ordinara mezurilo. Koncepto de dieca homo estas tute alia ol moderna utilismo.

¹²⁴ Temas pri tuto kaj partoj. Ĉiu parteto ne povas esti elstara aŭ utila. Sed gravas, ke ekzistas la tuto, per kiu troviĝas iu homo, sentanta feliĉon. Malgraŭ ajnaj malbelaj partoj, estas sufiĉe, se la tuto donas al iu feliĉon. Spite ke mezurilo de utileco estus adaptebla al iu parteto en iama mallonga tempo, ĝi ne sufiĉas mezuri valoron de la tuta ekzistado. Mem ekzistado estas grava. Do laŭeble longa ekzistado estas plej bona en taoismo. Dieca homo estas tiu, kiu atingis la tian vidpunkton kaj praktikas en la vivo.

¹²⁵ 絜 *wei*, mezurunuo de longeco. Iuj opinias, ke 1 *wei* egalas al 3 aŭ 4 *chi*. Aliaj – 8 *chi*.

¹²⁶ Ĉar ili evitas morton ĉe la Festo.

ricevis tri *zhong*¹²⁷ da greno kaj dek faskojn da brullignoj.

Eĉ handikapulo, havanta kriplaĵon je korpo, povas sufiĉe nutri sin kaj vivi plene ĝis la jaraĝo donita de la Ĉielo. Despli bone, se virta je koro estu la handikapulo.

Kiam Konfuceo iris al Chu-regno, iu frenezulo, nomata Jie Yu¹²⁸, alvadis al la grupo, dirante: “Ho, fenikso, fenikso, kiel velkis la virto! Estonton ne eblas atendi, estinton ne eblas sekvi. Se sub la Ĉielo estas la Vojo, estiĝas sanktaj homoj; se sub la Ĉielo ne estas la Vojo, al homoj sanktaj restas nur travivi iel. Ĉar en nuna tempo estus bone, se nur eviteblus puno. Feliĉo estas pli malpeza ol plumo, sed oni ne povas ricevi ĝin per sia manplato. Malfeliĉo estas pli peza ol tero, sed oni ne scias kiel eviti ĝin. Ĉesu, ĉesu turni sin kun virto al homoj. Danĝere, danĝere estas kuradi por ĝustigi teron. Urtiko, urtiko, nomata ‘devojĝanta suno’, ne vundu min irantan. Mi iradas zigzage, ne vundu miajn piedojn.”

¹²⁹Montaj arboj atencas sin mem. Torĉo bruligas sin mem. Cinamo estas manĝebla, do oni hakas cinamarbon. Sumako estas uzebla, do oni hakas ĝin. Ĉiuj homoj scias utilecon de io uzebla, sed ne scias utilecon de neuzeblaĵo.

¹²⁷ 一鍾=6斛4斗 egalas al ĉ. 124 litroj.

¹²⁸ 接輿, familia nomo 陸 Lu, persona nomo 通 Tong. Sankta frenezulo, samkiel Jurodivij en Rusio. La paragrafo estas sama, kiel en Analektoj, ĉ. 18. Zhuangzi disvolvas sian ideon surbaze de Analektoj, kvazaŭ Taoismo estas daŭrigo de konfuceanismo.

¹²⁹ Multaj esploristoj igas tiun paragrafon aparteni al eldiro de Jieyu. Sed mi ne sekvas ilin.

5 SIGNO DE PLENECO JE VIRTO

En Lu-regno estis iu Wang Tai, kies piedoj estis dehakitaj. Li havis da lernantoj tiom multe, kiom Konfuceo.

Chang Ji demandis Zhong Ni, dirante: “Wang Tai estas punricevinto, kies piedoj estis dehakitaj. Sed venas al li tiom da lernantoj, kiom al vi, do li dividas kun vi laŭ nombro lernantojn de Lu-regno. Li instruas, ne starante; li diskutas, ne sidante. Oni, venante al li malplena, eliras plena, kontentigite de li. Ĉu vere estas ĉe li iu senvorta instruado aŭ senforma edukado de koro? Kio estas li?”

Zhong Ni diris: “La Majstro estas sankta homo. Mi devintus iri al li, kvankam nur malfruas. Eĉ mi volus fari lin mia instruonto. Despli homoj, ne egalaj al mi, volus lerni ĉe li. Ne nur en Lu-regno, sed el la tuta mondo mi volus venigi al li lernantojn por sekvi lin.”

Chang Ji diris: “Li estas sen piedoj. Se li superus vin, je korstato li devas esti multe pli alta ol ordinaruloj. Kia estas la korstato de liaspeca homo, kaj kiel li uzas ĝin?”

Zhong Ni diris: “Kvankam morto kaj vivo estus grava, tamen li mem ne ŝanĝiĝas kun tio. Eĉ se renversiĝus la Ĉielo kaj Tero, li mem restos nerenversita. Li, iluminante dubojn, senigas falsojn, kaj li mem ne moviĝas malgraŭ ŝanĝiĝo de aĵoj. Lasante aĵojn metamorfoziĝi, li mem konservas firme la originon.”

Chang Ji diris: “Kial?”

Zhong Ni diris: “Se oni rigardas ĉion el la vidpunkto de diferencigo, ĉiu troviĝas diferenca: hepato kaj galo, Chu-regno kaj Yue-regno. Se el la vidpunkto de sameco kaj tuteco, ĉio troviĝas sama kiel unu tuto. Tiuspeca homo ne atentis kion ajn oreloj kaj okuloj sentas bona, sed lasas sian koron ludi harmonie kun virto. En aĵoj li rigardas unu tutecon, kaj ne rigardas la difekton. Tial do li atentis perdon de piedoj same, kiel forĵetitan terbulon.”

Chang Ji diris: “Li faras tion nur por si mem. Li akiris tiun koron per sia propra scipovo, nur atingis sian konstantan korstaton per tiu koro. Kial do kolektiĝas ĉe li la ĉirkaŭaĵoj?”

Zhong Ni diris: “Oni ne povas rigardi sin mem en surfaco de fluanta akvo, sed rigardi sin en la akvo staranta senmove. Nur la staranta senmove povas starigi ĉiun, kiu volas stariĝi. Laŭnature, ricevante ordonon de la Ĉielo, nur sole staras pinoj kaj cipresoj, ĉiam verdaj en vintro kaj somero. Laŭ la ordono de la Ĉielo, staris Yao kaj Shun unusole ĝustaj kiel ĉefoj por ĉio kaj ĉiuj, kaj, feliĉe, povis ĝustigi sin mem en la vivo, kaj per tio

ĝustigis la vivon de la popolo¹³⁰.

Konservi la komencon senŝanceliĝante estas ja esenco de sen-timeco. Bravulo, eĉ unu sola, tamen impetas kontraŭ naŭ armeoj¹³¹.

Eĉ tiu, kiu serĉas nur nomon gloran, povas fari sin tia. Des pli tiu, kiu regas la Ĉielon kaj Teron kaj ampleksas ĉion. Des pli tiu, kiu, konsiderante sian korpon¹³² nur loĝejo, sian orelojn kaj okulojn nur ŝajno, faris akiritajn sciojn unu tuto. Lia koro estas neniam mortinta. Li, elektonte la tagon, certe ascendas for por transformiĝi. Homoj sekvas lin pro tio. Kial li aŭdacus fari la aferon por materiala celo?"

Shentu Jia¹³³ estis sen piedoj, ĉar ili estis dishakitaj. Li kune kun Zi Chan¹³⁴ lernis ĉe Bohun Wuren. Zi Chan diris al Shentu Jia jenon: "Kiam mi eliras, vi restu; kiam vi unue eliras, mi restu."

En la sekva tago, ili ambaŭ ĉeestis kune en la sama klasĉambro, sidante en vico al vico. Zi Chan diris al Shentu Jie: "Se mi unue eliras, tiam vi restu ĉi tie; se vi unue eliras, mi restu. Nun mi ĝuste ekiros eksteren. Ĉu vi povas resti ĉi tie aŭ ne? Vidante ĉefministron, vi aŭdacas ne retiriĝi. Ĉu vi egalas al ĉefministro?"

Shentu Jia diris: "Ĉu inter disĉiploj de nia instruisto estas ia distingo, kiel ĉefministro aŭ ne. Ĝojante je via rango de ĉefministro, vi forpuŝas la aliajn malantaŭen. Mi aŭdis vortojn, ke 'se spegulo estas hela, ne tuŝas polvoj kaj malpuraĵoj; se akumuliĝas polvoj kaj malpuraĵoj, la spegulo malhelas.' Se resti longe kun saĝulo, eviteblas eraroj. Malgraŭ ke vi estimas la instruiston granda, vi eldiras tiajn vortojn, - ĉu tio ne estas eraro?"

Zi Chan diris: "Fariĝinte tia, vi ankoraŭ konkurencas je bono kun Yao. Se mi juĝas laŭ via virteco, ŝajnas, ke al vi ne sufiĉas memkritiko."

Shentu Jia diris: Troviĝas multe da homoj, kiuj, ekskuzante¹³⁵ sian eraron, plendas, ke ili ne meritas punon je la perdo de piedoj, sed troviĝas malmulte da homoj, kiuj, ne ekskuzante sian eraron, akceptas, ke ili ne meritas la plutenadon de piedoj. Sciante

¹³⁰ Starigo de unusola personeco estas grava por ĝustigo de ĉirkaŭaĵoj. Li, starante senmove, povas fariĝi spegulo por ke la aliaj reflektas sin mem kaj per si mem. Pro tio Konfuceo ĉi tie taksas alte la personecon de Wang Tai. Interalie, proverbo diras: "Fluanta akvo estas pli pura ol staranta senmove." Estas notinde, ke el la vidpunkto de "taoismeca" Konfuceo, ĉi tie estas taksata la akvo, staranta senmove."

¹³¹ 九軍 ĉirkaŭ 10,8000 soldatoj. Unu armeo konsistas el 12000 soldatoj.

¹³² 六骸 Ses membroj de la korpo – manoj, piedoj k. a.

¹³³ 申徒嘉 Saĝulo en Zheng-regno.

¹³⁴ 子產, 公孫僑(585?-552? a. K.)Fama ĉefministro de Zheng-regno. 伯昏無人 Bohun estas konsiderata, kiel fikcia persono. Sed li aperas ankaŭ kiel instruisto de Liezi 列子.

¹³⁵ 状 Ekspliki pri plendletero aŭ akuzletero en juĝejo.

neeviteblecon, trankvile sekvi la sorton ordonitan¹³⁶ povas nur virtulo. Estante centre en la pafdistanco de lerta pafarkisto kiel Yi, oni preskaŭ trafiĝus¹³⁷. Se iu ne trafiĝis, tio estas dank' al sorto.

Estas amaso, kiuj, havante du piedojn, mokridas min por hakitaj piedoj. Mi koleras, apenaŭ eksplodigite. Sed kiam mi vizitas nian Majstron, mi tuj retrankviliĝas kaj revenas hejmen. Mi ne scias, ĉu dank' al tio, ke la Majstro lavas min per bono?

Pasis 19 jaroj, post kiam mi komencis interrilati¹³⁸ kun la Majstro, sed ĝis nun mi neniam sentis min senpieda. Nun vi kun mi interrilatus interne de la korpoj, sed vi serĉas min je la ekstero de la korpo. Jen kuŝas la eraro.”

Zi Chan embarasiĝis kaj ŝanĝis mienon, dirante: “Vi ne diru plu.”

En Lu-regno vivis iu senpiedulo, nomata Shushan-Senpieda, kies piedoj estis punite hakitaj. Li stumpiris vidi Zhong Ni.

Zhong Ni diris: “Vi ne estis tiom skrupula, ke vi, kriminte, suferas nun tiel. Hodiaŭ vi alvenis ĉi tien, por kio?”

Senpiedulo diris: “Mi nur ne komprenis devon kaj facilanime tenis min mem. Tiel do mi perdis piedojn. Hodiaŭ mi venis, pensante, ke estas io pli kara ol piedoj, kaj, ke mi dediĉu mian tuton al tiu devo. Nenio ne estas gardata de la Ĉielo, kaj nenio ne estas subtenata de la tero. Mi rigardis vin, la Majstron, la Ĉielo kaj la tero. Kial do vi traktas min en tia sinteno?”

Konfuceo diris: “Mi kondukis malbone. Kial vi ne eniras? Bonvolu! Mi parolos kion mi aŭdis.”

Senpiedulo foriris.

Konfuceo diris: “Karaj lernantoj, diligentu! Li estas senpieda, punhakite. Spite ĉi tion, li diligentas lerni, per tio kompensante malbonon de la antaŭa konduto. Des pli virtuloj sendifektaj!”

La senpiedulo parolis al Lao Dan jene: “Ke Konfuceo estas la pleja homo¹³⁹, ĉu tio estas vere? Kion li fervore lernas ĉe vi kaj praktikas? Li ankoraŭ postkuras ege strangan iluzion kaj famon, ne sciante tiujn nura katenon por la pleja homo.”

Lao Dan diris: “Kial vi ne demetis por li la katenon, predikante, ke morto kaj vivo estas unu samo, kaj, ke jesado kaj neado estas la unu tuto. Ĉu eblus tio?”

¹³⁶ 命 fatalo, sorto, aŭ ordono de la Ĉielo

¹³⁷ 羿 Legenda pafarkisto. Laŭ mi, la frazo aludas pri neevitebleco de puno al ĉiuj vivantoj en la mondo. Taoismo donas konsolon al vivantoj sub tirano.

¹³⁸ 游 ludi kaj vagi. Aŭtoro esprimas la interrilaton de nobluloj per tiu vorto “ludi”.

¹³⁹ 至人 Tiu, kiu atingis la plej altan.

La senpiedulo diris: “La Ĉielo punos¹⁴⁰ lin. Kiel do eblus malkateni?”

La reĝo de Lu-regno, duko Ai¹⁴¹ demandis Zhong Ni, dirante: “En Wei-regno vivas unu malbelulo, nomata Ai Taituo. Se plenkreskuloj, ĉiu ajn, kiu kunestis kun li, ekŝatis lin, ke ne povus foriri de li. Se virinoj, vidante lin, ili petas gepatrojn, dirante: “Estas preferinde fariĝi lia konkubino ol alies edzino.” Tiaj estas pli ol dek kelkaj. Oni ankoraŭ neniam aŭdis, ke li gvidus aliajn, sed li ĉiam nur harmonias kun aliaj. Li ne savis aliajn de la morto, uzante potencon de ajna rango, kiel reĝo, nek faris aliajn sataj per kolektitaj grenoj-salajroj. Li nur igas la mondon miregi per sia malbeleco. Li nur harmonias kaj ne gvidas, lia scio ne transiras kvar sferojn, Malgraŭ tio, geviroj kolektiĝas antaŭ li. Eble, li havas nepre ion neordinaran, diferencon ol aliaj homoj.

Mi alvokis lin kaj vidis lin tiel malbela, ke la mondo miregus. Ne pasis unu monato, post kiam mi kun li konatiĝis, mi jam enamiĝis en lia karaktero. Ne pasis longe ol unu jaro, mi kredis lin tiom, kiom mi konfidus al li la regadon de mia regno, ĉar ne troviĝis ĉefministro. Li siavice elturniĝis iel-tiel kaj poste respondis ambigue, kvazaŭ li rifuzus.

Mi hontis, ke mi hastis konfidi al li la regnon. Kelkajn tagojn poste li forlasis min kaj foriris. Mi iĝis tre malgaja, sentante min perdinta ion, aŭ homon, kun kiu mi povas ĝoji pri la regno. Kio do estas li?”

Zhong Ni diris: “Iam antaŭe mi estis sendita al Chu-regno. Laŭvoje mi vidis hazarde porkidojn suĉantaj mamojn de sia mortinta patrino. Dume ili malkviete movadis okulojn, kaj poste ĉiuj forlasis ŝin kaj forkuris. Ĉar ŝi jam ne rigardas ilin. Ĉar ŝi ne estas sama, kiel ili. Ili amis la patrinnon ne kiel la formon, sed amis ŝin kiel uzanton la formon.

Kiu mortis sur batalkampo, tiun oni ne sepultas per ĉerko ornamita de plumo¹⁴². Kies piedoj estis hakitaj, ties ŝuoj jam ne necesas. Ĉar la fundamento perdiĝis en ĉio.

Kiu fariĝis edzino de la Ĉiela filo, tiu ne tranĉas ungojn, nek trapikas orelojn por orelingo. Kiu edziĝis, tiu restas ekstere kaj ne estas sendota al ekspedicio¹⁴³. Eĉ tiu, kies korpo estas tute sendifekta, estas traktata tiel. Des pli tiu, kies virto estas tute perfekta.

¹⁴⁰ Iuj esploristoj prenas la verbon 刑 por pasinteco kaj tradukas jene: “La Ĉielo punis lin.” [WaB:37, Ikt1:138] Sed aliaj tradukas: “punos”. [YWj:51] Mi konsentas kun la lasta, komprenante: “Kiam liaj piedoj estos hakitaj, li estos liberigita el antaŭjuĝo pri puno.”

¹⁴¹ 哀公 (surtrone 494-467 a. K.)

¹⁴² 鬻 Ĉerko de mortinto en batalo estis ornamita per ĉevala felo. [YWj:53]

¹⁴³ Diversaj estas opinioj pri la paragrafo. Iu tradukas: “Li servas ekster la palaco, ne bezonas servi en la palaco.” [YWj:54] La alia tradukas: “Li servas ekster la palaco, kaj ne estas sendota pli al danĝera misio.” La tria traduko: “Estas permesate, ke li tranoktu hejme, kaj ke li ne bezonas dormi nokte en oficejo.” [WaB:38]

Nun Ai Taituo, parolante nenion, estis kredata; meritante nenion, estis ŝatata kaj tiom konfidata eĉ por administri la regnon, kiom li eĉ timigis petanton, ĉu la peto estus akceptita aŭ ne. Tio signifas, ke li nepre estas persono kun tuteca talento¹⁴⁴ kaj senforma virto.

La duko Ai diris: “Kion signifas la tuteca talento?”

Zhong Ni diris: “Vivo-morto, ekzisto-pereo, promocio-malpromocio, riĉo-malriĉo, saĝo-malsaĝo, honoro-malhonoru, malsato-soifo, varmo-malvarmo, ĉiuj estas ŝanĝiĝo de materio kaj irado de la Ĉiela ordno. Tage kaj nokte ili interŝanĝiĝas unu post la alia, ke oni ne povas scii la originon de ilia ekpuŝo. Tiel do ili ne havas sufiĉan povon por detruu harmonion kaj ili ne devas interveni en la anima regiono. Lasu ilin harmonie interrilati, trapasi kaj ne perdiĝi en procezo. Lasu ilin tage kaj nokte estiĝi glate, taj tiel fari printempon kun materioj. Ili, intertuŝiĝante, estiĝas laŭtempe en la koro. Tio estas nomata la tuteca talento.”

“Kion signifas la senforma virto?”

Zhong Ni diris: Horizontalo estas situacio pleneca de senmova akvo. Oni povas fari tion mezurilo. Ĉar interne estas kun pleneco tenate kaj la surfaco ne moviĝas. Virtulo estas tiu, kiun bone regas estiĝo kaj harmonio. Dum senforma estas la virto, materioj ne povas disiĝi¹⁴⁵.”

En la alia tago, la duko Ai diris al Minzi¹⁴⁶: “Unue, mi estas reĝo, la Ĉiela filo, sidanta surtrone kun vizaĝo direktita al sudo¹⁴⁷. Mi rigardis min mem bone konanta ĉion, sentante, ke mi zorgas pri la administrado de popolo kaj malĝojas pri morto de la popoloj. Nun, aŭdinte eldiron de la pleja homo, mi timas, ke mi, estante nekompetenta, kondutas per si mem facilanime kaj pereigas mian regnon. Rilato inter mi kaj Konfuceo ne estas reĝo kun subulo, sed nur amikoj je virto.”

Iu Lamhandikapulo-leporlipo parolis kun la duko Ling de Wei-regno, la lasta tre ĝojis je tio. Poste, renkontante normalajn homojn, li vidas ilin oblongaj je la kolo. La alia handikapulo kun grandega poto-simila tubero parolis kun la duko Huan¹⁴⁸ de Qi-regno, kaj ĉi tiu tre ĝojis je tio. Poste, kiam li vidis normalajn homojn, al li ŝajnis, ke ili havus

¹⁴⁴ 才全 Mi prenas la vorton kiel talenton, harmonie sekvantan al ĉio okazanta. En la ruslingva traduko estas uzata la vorto: целостные способности. [PzL:182]

¹⁴⁵ 德不形者、物不離也. Signifo estas, ke laŭ naturo ĉio moviĝas en ordo, sen interveno de artefarita ago de virtulo. Simila esprimo videblas en la ĉap. 田子方: “至人之德也、不修而物不離焉”[YWj:204] Sed tie la frazo estas dirita ne per buŝo de Konfuceo, sed de Laozi.

Tia miksiĝo de ambaŭ filozofoj oftas en la verko de *Zhuangzi*.

¹⁴⁶ 子騫 Disĉiplo de Konfuceo, juna pli ol Konfuceo je 15 jaroj.

¹⁴⁷ 南面 Reĝo sidas antaŭ subuloj, kun vizaĝo direktite al sudo.

¹⁴⁸ 桓公(surtrone 685-643 a. K.)

oblongajn kolojn. Se virta estas kies personeco, ties formalaĵo estas forgesita. T. n. forgeso en normala senco estas tio, ke homoj, ne forgesante la forgesendan, forgesas la neforgesendan.

Tiel do sanktulo iam okaze ludvagadas, rigardante scion malaŭgura, regulon gluiĝaĉa, virton akcesora, teknikon komercema. Sanktulo ne ruzas, kial do necesas uzi scion? Ne ĉizas, kial do necesas uzi gluon? Li havas nenion perdi, kial do necesas uzi virton? Ne vendas, kial do necesas negoci aŭ komerci? Tiuj kvar estas Ĉiela kaĉo¹⁴⁹. La Ĉiela kaĉo estas nutraĵo el la Ĉielo. Kial do tiu, kiu ricevas jam nutraĵon el la Ĉielo, bezonus homan artefaritaĵojn? Li havas homan korpon laŭforme, sed li ne havas homan sensan afekcion¹⁵⁰. Havante homan formon, li apartenas la amaso, kiel homo. Ne havante homan sensan afekcion, li ne havigas al si distingon de jesado kaj neado¹⁵¹. Tre malvasta kaj malgranda estas tiu, kiu apartenas al homo. Tre libera kaj granda estas tiu, kiu sole atingis perfektecon laŭ la Ĉielo.

Huizi parolis al Zhuangzi, dirante: “Ĉu vere homo povus ne havigi al si sensan afekcion?”

Zhuangzi diris: “Jes, povas.”

Huizi diris: “Se iu homo ne havus sensan afekcion, kial do oni povas nomi lin homo?”

Zhuangzi diris: “La Vojo donas al li eksteran trajton, la Ĉielo donas al li formon. Kial ne oni devas nomi lin homo?”

Huizi diris: “Se li estas nomata ‘homo’, kial li povus esti sen sensa afekcio?”

Zhuangzi diris: “Tio, pri kio vi temas, ne estas la sensa afekcio, dirata de mi. Sen la sensa afekcio, pri kio mi temas, oni povas ne vundi aliajn kaj sin mem per sento de ŝato-malŝato kaj, ĉiam sekvante naturon, ne avidi por profitigi la vivon.”

Huizi diris: “Se ne profitigi la vivon, per kio oni povus teni sin je sia korpo?”

Zhuangzi diris: “La Vojo donas al homo la eksteran trajton, la Ĉielo donas al li la formon, kaj tiel ne okazas tio, ke la sento de ŝato-malŝato vundas al li la internon kaj la korpon. Nun vi traktas vian animon kiel eksteran kaj lacigas al vi menson. Apogante vin al arbo, vi recitas poemojn; sidante ĉe la tablo el sterkulio, vi meditas. Donite de la Ĉielo elitan formon, vi okupiĝas pri disputo ĉirkaŭ la temo Hardeco kaj Blankeco.¹⁵²”

¹⁴⁹ 天齷

¹⁵⁰ 情

¹⁵¹ 是非

¹⁵² 堅白 Unu el gravaj temoj ĉe ĉinaj sofistoj, kiel Gong Sun Long.

6 GRANDA RESPEKTIGINDA INSTRUISTO

Kiu scias kion la Ĉielo faras, kaj kiu scias kion homoj faras, tiu atingis la plejan. Kiu scias kion la Ĉielo faras, vivas laŭ la Ĉielo¹⁵³. Sciante kion faras homoj, li kompletigas ne sciatajn per jam ekzistanta scio kaj per tio nutras sin mem¹⁵⁴. Kiu, ne mortante juna meze de la vojo, finas jarojn, dotitajn de la Ĉielo, tiu estas plena de scio.

Sed estas malfacilo. Nur kiu atendas ion, ties scio disvolviĝas. Tamen io, kion atendas, ankoraŭ ne certas. Kiel estas sciate pri tio, ke la Ĉielo, dirita de mi, ne estas la homo, aŭ, ke la homo ne estas la Ĉielo? Aldone, nur post kiam estiĝas la vera homo¹⁵⁵, estiĝas la vera scio.

Kio estas la vera homo? Antikva vera homo ne kontraŭis malmultecon, nek fieris je sukceso, nek entreprenis sian karieron. Tia homo, eĉ se erarus, ne bedaŭras. Eĉ se trafas sukcese, ne arogantas. Tia homo ne timas, eĉ se grimpas supren kaj alten. Ne malsekiĝas, eĉ se enirante akvon; Ne sentas varmegon, eĉ se enirante fajron. Li fariĝis tia, post kiam la scio, suprenirante, atingis la Vojon.

La antikva vera homo dormas sen sonĝo kaj vekigatas sen zorgo. Li manĝas, senatentante ĉu bongusta aŭ ne, kaj spiras profunde el de kalkanoj. Amaso da homoj spiras el gorĝo. Ili, kvazaŭ venkite, eldiras vortojn kiel vomante. Ju pli avidemaj ili estas, des pli malprofunde ili ricevas bonŝancon el la Ĉielo.

La antikva vera homo ne sciis la vivon ĝoinda, nek sciis la morton malaminda. Li ne ĝojis je sia elirado, nek rifuzis eniradon. Li senstreĉe iris kaj nur senstreĉe venis. Li ne forgesis la komencon, nek serĉis la finon. Ricevinte, li ĝojis je tio; foregesinte, li relernis. Tio estas, t. n. “Ne forĵeti la Vojon per koro, ne helpi la Ĉielon per homa artefarado.” Tiu estas nomata “vera homo”.

Ĉe tia homo, la koro koncentriĝas je la strebo, la vizaĝo estas kvietita, la frunto estas alte levita. Li estas friska, kiel aŭtuno kaj milda, kiel printempo. Sento de ĝojo kaj kolero stabilas tra la kvar sezonoj. Li bone rilatas al ĉirkaŭaĵoj kaj ne scias la limon. Tiel do kiam sanktulo mobilizas armeon, eĉ se detruas iun landon, ne perdas koron de la popolo. Kiam li bonfare donis abundan profiton por multaj generacioj, li ne konsideras tion kiel amon¹⁵⁶ al homoj. Tiu, kiu ĝojas je sia ago al ĉirkaŭaĵoj, ne estas sanktulo¹⁵⁷.

¹⁵³ 天 Multaj esploristoj prenas la Ĉielon kiel naturon 自然.

¹⁵⁴ 養 Mi komprenas tiun verbon kiel disvolvi.

¹⁵⁵ 真人 La vorto, uzata de Zhuanzi, ne videblas en Analektoj kaj Mozi. Ili uzas la vorton 聖人(sanktulo) ofte. Ankaŭ Zhuangzi poste uzas ĝin anstataŭ 真人.

¹⁵⁶ 愛 Ĉe Mozi, tiu vorto havas la plej gravan koncepton.

¹⁵⁷ 樂通物, 非聖人也 Malgraŭ tia eldiro, Zhuangzi kritikis Mozi pro tio, ke Mozi

Havi senton de intimecon ne estas bonvoleca. Ĉiela tempo ne estas saĝa. Kiu ne allasas profiton kaj malprofiton, tiu ne estas noblulo. Kiu perdas sin mem pro renomo, tiu ne estas brava persono. Kiu detruis sin mem, estante malvera¹⁵⁸ kontraŭ naturo, tiu ne povis laborigi homojn. Tiuj homoj, kiel Hu Buxie, Wu Guang, Bo Yi, Shu Qi, Jizi Xu Yu, Ji Tuo, kaj Shentu Di¹⁵⁹, prenis alies laboron por sia laboro, prenis alies komforton por sia komforto, sed tamen, ne komfortigis sin mem per sia propra komforto.¹⁶⁰

Antikva vera homo, estante laŭforme anguleca, ne detruigis, kaj, kvankam li ŝajnis senplena, tamen li ricevis nenion de aliuloj. Li, estante kunema, estas soleca sed ne rigida; kvankam streĉiĝinta, tamen estas malplena kaj ne paradema; aspektanta malvolonte, li similas ĝoji; aspektante malgraŭvole, li agas laŭ nepreco; ekkolerinte, ŝanĝiĝas koloro de lia vizaĝo, tamen li restas kun si mem ĉe sia virto. Estante iam furioza, li similas al mondanoj. Laŭte parolante, li iam ne povas deteni sin. Eĉ se li estas en vico inter homoj, tamen li sajnas enfermiĝema. Iam foranimite, li forgesas kion diri.

Oni faras punjuĝon korpo, faras decregulojn flugiloj, faras scion tempo, faras virton cirkulanta.¹⁶¹ Kiu faras punjuĝon korpo, tiu motigas homojn aplombe. Kiu faras decregulojn flugiloj, tiu iras laŭ la mondo. Kiu faras scion tempo, tiu rigardas aferojn neeviteblaj. Kiu faras virton cirkulanta, tiu, t. n., atingas monteton, grimpante kune kun piedirantoj. Kaj oni faras tion sincere diligente.

Tiel do ŝati estas unu, kaj ne ŝati ankaŭ estas unu. Io, estanta unu, estas unu, kaj io, ne estanta unu, ankaŭ estas unu. La estanta unu, fariĝas kunulo de la Ĉielo, kaj la ne estanta unu fariĝas kunulo de homoj. Ĉe kiu la Ĉielo kaj la homo ne venkas unu kontraŭ la alia, tiu estas nomata 'vera homo'.

Vivi kaj morti estas destinite. Konstanta sinsekvo de nokto kaj tago estas la agado de la Ĉielo. La movado de materio estas neregebla per ajna homa kapablo. Oni aparte

kontraŭas homan naturon, ignorante muzikon.

¹⁵⁸ 亡身不真 Teni veron(保真) laŭ taoismo signifas teni naturon. Dum konfuceanismo uzas la vorton 誠(honesteco, sincereco), taoismo uzas 真(vereco).

¹⁵⁹ 狐不偕、務光、伯夷、叔齊、箕子胥餘、紀他、申徒狄 Legendaj justuloj en antiva Ĉinio. Preskaŭ ĉiuj el ili mortigis sin mem. Hu Buxie ĵetis sin en la riveron, ne akceptante tronon, kiun Yao volus transdoni al li. Wu Guang mortigis sin en la rivero, proponite de Tang ricevi la tronon. Bo Yi kaj Shu Qi malsate mortis, protestante al uzurpo pere de Wu. Jizi Xu Yu fuĝis de tirano Zhou kaj feŭdita al Koreio. Ji Tuo, kaj Shentu Di estis ermitoj en la epoko de Shang dinastio kaj mortigis sin, timante surtroniĝi post Tang.

¹⁶⁰ 適人之適、而不自適其適者也. Sama frazo troviĝas en la ĉap. 駢拇

¹⁶¹ Esploristoj inklinas preni la frazon daŭrigo de parolado pri la vera homo. Sed laŭ mia opinio, tio kontraŭas al vidpunkto de taoismo. En la paragrafo estas prezentitaj la vidpunktoj de legalismo (punjuĝo), konfuceanismo (decreguloj), mohismo (scio). Ĉiuj ideoj apartenas al "farado" 有為, ne al "ne-farado" 無為.

rigardas la Ĉielon sia patro kaj amas ĝin per si mem. Des pli la elstaran¹⁶². Homo, konsiderante sian reĝon pli supera ol si, dediĉas sin al li per sia morto. Des pli al la Vero¹⁶³.

Kiam fonto senakviĝis, fiŝoj kune restas sur la grundo. Ili, sputante unu al la alia ion humidan, penas malsekigi unu la alian per kraĉaĵoj. Sed tio ne superas la indiferencon, ke ili forgesas unu la alian en la rivero kaj lago. Anstataŭ laŭdi Yao-n kaj kondamni Jie-n, estas multe pli bone forgesi ambaŭ ilin kaj unuiĝi kun la Vojo.

La Granda Glebo¹⁶⁴ donis al mi korpon por subteni sur si. Li penigas min per la vivo, senĝenas min per la maljunigo, kaj ripozigas min per la morto. Tial do kiu vidas sian vivon bona, tiu vidas ankaŭ sian morton bona.

Se oni kaŝas la boaton en ravino aŭ la montan produktaĵon¹⁶⁵ en marĉo, oni pensus la kaŝitan sekura. Tamen okazas, ke nokte forkuras, portante ĝin, iu fortulo. Tion ne scias stultulo. Estas pli facile kaŝi la malgrandan aĵon en la granda ujo, per tio povus esti evitebla la ŝtelado. Sed ne eblas kaŝi la mondon sub la Ĉielo. Kaj ĝi ne perdiĝas. Ĉar tio estas la granda movado de konstantaĵoj.

Speciale, homoj ŝtele¹⁶⁶ havigas al si la korpon, kiel formon, kaj ĝojas je tio. Sed la formo de homo estas plej ŝanĝiĝema dekmiloble de antaŭ la komenco. Ĉu kalkulebla estus ĝia plezuro? Tiel do ĉiuj sanktuloj ludvagadas en ĉirkaŭanta sin materio, ne fuĝante de tie, estas ekzistantaj tie, kie ili estas. Ili vidas la fruan morton bona kaj maljuniĝon bona, vidas la komencon bona kaj la finon bona. Eĉ aliaj homoj lernas tion. Ne bezonas diri pri tio, ke ĉiuj materioj kombiniĝas kaj transformiĝas en unu tuto.

La Vojo havas movadon kaj realon,¹⁶⁷ sed ne havas faradon kaj formon. Ĝi povas esti transdonata, sed ne povas esti ricevata. Ĝi estas akirebla, sed nevidebla. Ĝi havas sian fundamenton kaj sian radikon antaŭ ol la Ĉielo kaj la tero ekestis, do ĝi traekzistas firme deantikve. Ĝi estigis Spiritojn kaj Diojn, la Ĉielon kaj la teron. Kvankam ĝi ekzistas super la pleja firmamento,¹⁶⁸ tamen ĝi mem ne iĝas alta. Ekzistante eĉ sub la limo de ses fundoj, tamen ĝi mem ne iĝas profunda. Ekzistante de antaŭ ol naskiĝo de la

¹⁶² 卓 Esploristoj konsideras tiun ideogramon signifanta “Granda Tao”. [YWj:60] Do estiĝas la demando, kio estas rilato inter la Ĉielo kaj la elstara Tao. [WaB:44]

¹⁶³ 真 Esploristoj komprenas tiun ideogramon kiel 道 “Vojon=Taon”. [YWj:60] 道 estas la pleja fundamenta forto de universo.

¹⁶⁴ 大塊 La vorto estas konsiderata egala al natruo 自然. En la ĉap. 2 aperas la vorto, kiel 大塊噫氣.

¹⁶⁵ 山 suferigas la vorto esploristojn. Iu prenas ĝin por fiŝkapta reto, alia – por monto.

¹⁶⁶ 犯 akiri per krimo. La frazo estas uzata, probable, kiel daŭrigo de antaŭa “ŝtelado”.

¹⁶⁷ 情、信 Nevidebla interna funkcio. 為、形 Videbla ekstera fenomeno.

¹⁶⁸ 太極, 六極 Laŭ ĝenerala opinio, 太極 estas “aerspaco malplena kaj ĥaosa antaŭ ol naskiĝo de la Ĉielo kaj la tero”. 六極 estas “kvar direktoj de la Ĉielo kaj la tero”.

[YWj:61]

Cielo kaj la tero, ĝi ne fariĝas longtempa; Ekzistante pli longe ol antikva epoko, ĝi ne fariĝas maljuna.

Xiwei akiris kaj kontraktis¹⁶⁹ kun la Ĉielo kaj la tero. Fu Xi ricevis ĝin kaj harmoniigis kun patrino aero Qi.¹⁷⁰ La Granda Ursino ricevis ĝin kaj faris ĝin neŝanceliĝi eterne deantikve. La Suno kaj la Luno ricevis ĝin kaj faris ĝin ne halti eterne deantikve. Kan Pei ricevis kaj ekloĝis en Kunlun.¹⁷¹ Ping Yi ricevis kaj ludvagis en la grandaj riveroj.¹⁷² Jian Wu ricevis kaj ekloĝis en la granda monto Tai Shan.¹⁷³ Huangti ricevis kaj supreniris nuban ĉielon.¹⁷⁴ Zhuan Xu ricevis kaj ekloĝis en la Palaco de Xuan.¹⁷⁵ Yu Qiang ricevis kaj staris sur la Norda Poluso.¹⁷⁶ Okcidenta Reĝino-Patrino ricevis kaj sidis sur la monto Shaoguang.¹⁷⁷ Neniu scias pri ŝia komenco, neniu scias pri ŝia fino. Peng Zu ricevis kaj longe vivis de la epoko de Shun ĝis la epoko de kvin Grafoj.¹⁷⁸ Fu Yue ricevis kaj fariĝis ministro sub la reĝo Wu Ding, kiu regis la mondon sub la Ĉielo.¹⁷⁹ Fu Yue supreniris rajdi stelarojn, nomatajn Dongwei kaj Ji-Wei, kaj enviciĝis inter steloj.

Nanpo Zikui demandis Nü Yu, dirante: “Vi havas jam altan aĝon, sed je la kompleksio vi aspektas infano. Kial?”

Li respondis: “Mi aŭdis la Vojon.”

Nanpo Zikui diris: “Ĉu la Vojo estas lernebla?”

Li diris: “Ha, Kiel eblas? Vi ne estas tiu. Jen estis Buliang Yi – Li havis la talenton de sanktulo, tamen li ne havigis al si la Vojon de sanktulo. Mi havigis al mi la Vojon de sanktulo, tamen mi ne havis talenton de sanktulo. Mi ekvolus instrui al li, elkore dezirante, ke per tio ni fariĝu finfine sanktuloj. Eĉ se ne eblas atingi la celon, tamen devas esti facile por la havanto de la Vojo de sanktulo instrui al la havanto de talento de

¹⁶⁹ 挈=契 La verbo signifas trakti, tiri, kontrakti. Okulfrapas la uzado de tia ideogramo por esprimi la komencon de interrilato inter homoj kaj la Ĉielo. Xiwei 羲韋 estas nomo de antikva reĝo.

¹⁷⁰ 伏羲, 伏戲 Legenda Reĝo, kreinta la mondon. 氣母 fundamento de Qi (aero, spiro), la plej elementa substanco de la universo.

¹⁷¹ 崑崙 崑崙山脈, kun homa vizaĝo kaj besta korpo.

¹⁷² 馮夷 Nomo de dio en Huanghe 黃河.

¹⁷³ 肩吾 Nomo de la monto Taishan 泰山.

¹⁷⁴ 黃帝 Legenda reĝo de Ĉinio. 公孫軒轅.

¹⁷⁵ 顓頊 Nepo de Huangti. 玄宮 malluma palaco signifas nordan palacon.

¹⁷⁶ 禺強 Dio de akvo. Homa vizaĝo kun birda korpo.

¹⁷⁷ 西王母 Legenda feino, loĝanta sur la okcidenta monto, nomata 少廣.

¹⁷⁸ 彭祖, 五伯

¹⁷⁹ 傳說 Vasalo de la reĝo Wuding 武丁 en Yin dinastio 殷. Laŭ legendo, 傳說 post la morto fariĝis stelo. 東維, 箕·尾 estas nomoj de stelaroj.

sanktulo.

Ni, havante tian konvinkon, instruis unu al la lia.¹⁸⁰ Tri tagojn poste ni iĝis ekstere de la subĉiela mondo. Ekster la mondo ni kun konvinko daŭre ekzercadis. Sep tagojn poste ni povis troviĝi ekstere de materioj: Ekster materioj ni kun konvinko daŭrigis ekzercadi. Naŭ tagojn poste ni povis troviĝi ekstere de la vivo. Ekster la vivo povis penetri tra io. Post la penetrado povis travidi la nemoveblan. Vidante la nemoveblan, poste neniĝis tempo pasinta kaj tempo estanta. Sen tempoj pasinta kaj estanta, poste povis eniri en la staton de senmorto-senvivo. Kiu mortigis sian vivon, tiu ne mortas. Kiu vivigas sian vivon, tiu ne vivas. Tiu stato de aĵoj estas jena: neniun ne forsendi, neniun ne akcepti; neniun ne detrui, neniun ne estigi. Tio estas nomata ‘Paco en konflikto’.¹⁸¹ Je Paco en konflikto la paco kompletiĝas nur post la konflikto.”

Nanpo Zikuj demandis: “Kie do vi aŭdis tion?”

Li diris: “Mi aŭdis tion ĉe la filo de Inko, La filo de Inko aŭdis tion ĉe nepo de Parkerinto. La nepo de Parkerinto aŭdis tion ĉe Klarvidinto. La Klarvidinto aŭdis tion ĉe Per-aŭdo-kompreninto. Per-aŭdo-Kompreninto aŭdis tion ĉe Praktikinto. La Praktikinto aŭdis tion Emociiĝinto. La Emociiĝinto aŭdis tion ĉe Mallumo-Mistero. La Mallumo-Mistero aŭdis tion ĉe Enirinta en Malplenecon. La Enirinta en Malplenecon aŭdis tion ĉe Pseŭdo-Komenco.”¹⁸²

Kvar sinjoroj, Si, Yu, Li kaj Lai,¹⁸³ kune babilante, diris: “Kiu ajn povus rigardi neniecon kolo, vivon spino, morton pugo, kaj sciis unu tutecon de morto-vivo kaj ekzisto-pereo, kun tiu ni volus amikiĝi.” Tiuj kvar homoj ridas, vidante unu la alian, kaj havas nenion kontraŭan al sia koro. Ili finfine amikiĝis inter si.

Subite s-ro Yu malsaniĝis. S-ro Si vizitis lin kaj demandis. Yu diris: “Mirinde, la Kreinto intencas fari min tiom mallibera!” Lia dorso kurbiĝis, kvin truoj supreniĝis, mentono mergiĝis sub umbiliko, ŝultroj altiĝis pli ol verto, hartufo direktas al la ĉielo. Malekvilibriĝis Ĉi-o de Ying kaj Yang.¹⁸⁴ Sed tamen la koro estas kvieta kaj senŝanĝa. Li genue iris al puto kaj, vidante sin en spegulo, diris: “Ho, la Kreinto ĝuste intencas fari min mallibera!”

¹⁸⁰ 吾 Mi prenas tiun ideogramon ne por “Mi”, sed por “Ni”, t. e. ili instruas unu al la alia. Mi vidas, ke ĉi tie 我 estas uzata kiel “Mi” kaj 吾 – “Ni”.

¹⁸¹ 櫻寧 La signifo de 櫻 estas tuŝo aŭ alproksimiĝo de kontraŭoj.

¹⁸² 副墨、洛誦、瞻明、聶許、需役、於謳、玄冥、參寥、疑始. Tiuj nomoj estas personifigo de filozofia evoluo. Lasta vorto 疑始 tiras atenton, kial estas uzata la ideogramo 疑 (duba, susupekta, necerta, nesolvebla). Laŭ mia opinio, tio, probable, rilatas al filozofio de Taoismo, konsideranta la komencon necerta.

¹⁸³ Ĉiuj nomoj estas fikciaj.

¹⁸⁴ 氣,陰,陽.

S-ro Si demandis: “Ĉu vi malamas lin?”

Li respondis: “Ne, Kial do mi malamas? Se la Kreinto ŝanĝus mian maldekstran brakon en kokon, mi krius anonci la horon de elkrepuskiĝo. Se li ŝanĝus mian dekstran manon en kuglon, mi pafus strigon por rosti ĝin. Se li ŝanĝus mian pugon en radon kaj animon en ĉevalon, mi ekrajodus aŭ aldone kondukus la ĉaron.

Ke mi ricevis, estas laŭ tempo; ke mi perdas, estas laŭ vico. Laŭ tempo kaj laŭ vico ne eblas interveni ĝojo aŭ malĝojo. Estas dirite de antikve, ke tio estas ‘liberiĝo el ligiteco’. Kiu ne povas esti liberigita, tiu estas alligita al materioj. Materioj ne venkas la Ĉielon por ĉiam. Kion ni devus malami?”

Subite s-ro Lai malsaniĝis. Li, ĝuste mortante, spiradis spasme kaj fajfe. Liaj edzino kaj gefiloj ploris, ĉirkaŭante lin. S-ro Li vizitis lin, kaj diris al ili: “Fi, ĉesu! Ne ĝenu la transformiĝon!” S-ro Li, apogante sin al la pordo, parolis kun s-ro Lai, diris: “Granda estas la Kreinto de transformiĝo. Kion do ĝuste nun li faras el vi? Kien do li lasas vin iri. Ĉu li faros vin hepato de muso? Ĉu li faros vin brako de insekto?”

S-ro Lai diris: “Infano, nur obeante al gepatroj, iras laŭ ilia ordono kien ajn, orienten, okcidenten, suden, norden. Koncernante rilaton de Ying kaj Yang al homoj, pli fortan ol de gepatroj, ili¹⁸⁵ igas nin proksima al la morto. Do, se mi ne aŭskusltus, mi mem estus arbitra. Ili kulpas je nenio.

La Granda Glebo ŝarĝis min per la formo¹⁸⁶, penigis min per la vivo, donis komforton al mi per la maljuniĝo, donis al mi ripozon per la morto. Tial do, kiu rigardas sian vivon bona, tiu rigardas ankaŭ sian morton bona.

Kiam iu forĝisto estas muldonta metalon, se la metalo aŭdacus diri, ke “Mi fariĝos la fama glavo, samkiel Moye!”¹⁸⁷, la forĝisto nepre taksus ĝin abomeninda metalo. Se iu, muldate, aŭdacus diri, ke “Mi volas fariĝi nur homo, nur homo!”, la Kreinto nepre taksus lin abomeninda. Konsideru la ĉielon kaj teron granda forno kaj la Kreinton granda forĝisto. Kien ajn mi iru, ĉie estos bone al mi. Mi dormos trankvile, kaj vekigōs iam subite.”

S-roj Sanghu, Mengzi Fan kaj Qinzhang¹⁸⁸ triope amikiĝis reciproke, dirante: “Kiu, ne konsciante fari kune unu kun la alia, povas amikiĝi? Kiu do, ne konsciante fari unu por la alia, povas kunhelpi? Kiu do povus supreniri al la ĉielo, ludi en nebuloj kaj vagadi

¹⁸⁵ 陰陽. La du kontraŭaj elementoj, nome la virinseksa aŭ negativa kaj la virseksa aŭ pozitiva, en la naturo.

¹⁸⁶ 形, t. e. korpo.

¹⁸⁷ 鑄 estas fama glavo, dediĉita al la reĝo de Wu-regno, Helü (surtrone 514-496 a. K.).

¹⁸⁸ Ĉiuj nomoj estas fikciaj, kvankam nomo de Mengzi Fan 孟子反 aperas en la ĉap. Yongye de Analektoj.

senlime. Kiu do povus reciproke forgesi sian vivon senfine kaj senlime?”

Ili triope, rigardante unu la aliajn, ridis sen ajna kontraŭo al koro. Tiel ili amikiĝis reciproke per si mem. Iom poste s-ro Sanghu mortis. Dum li ankoraŭ ne estis enterigita, Konfuceo aŭdis tion, kaj sendis Zigong por servi al la afero. Amikoj de mortinto aŭ komponas muzikon, aŭ ludas liuton, kaj kune kantas jene:

“Ha, Sanghu, ha, Sanghu! Vi revenis al via vero, dum ni restas ankoraŭ kiel homoj.”

Zigong haste antaŭeniris, dirante: “Mi aŭdacus demandi, ĉu komformas al decreguloj kanti ĉe la korpo de mortinto?”

Ili duope rigardis unu la alian kaj, ridante, diris: “Kiel oni¹⁸⁹ scius signifon de decreguloj?”

Zigong, reveninte, raportis al Konfuceo, dirante: “Kio do estas ili? Al ili mankas kulturo. Forlasante la kadavron senzorge, ili kantas apud ĝi, ne ŝanĝante mienojn. Kiel oni povus nomi ilin? Kio do ili estas?”

Konfuceo diris: “Ili estas homoj, ludantaj ekster la socia formaĵo¹⁹⁰. Sed mi estas la homo, ludanta interne de la socia formaĵo. “La Ekstere” kaj “la Interne” ne akordiĝas unu kun la alia. Mi mem estis senskrupula, ke mi sendis vin al ili por kondolenci.

Ili, kiel homoj, amikiĝis kun la Kreinto kaj intencas ludi kun nura Ĉi-o¹⁹¹ de la ĉielo kaj tero. Ili rigardas la vivon nura veruko aŭ tubero, kaj rigardas la morton nura krevo de ŝvelo aŭ ulcero. Tiaj personoj ne atentigas, kie ekzistas morto kaj vivo, kia estas antaŭ la vivo kaj post la morto. Ili portempe aliĝas en diferencaj materioj kaj pensas unuigi en la tuta sameco. Forgesinte siajn hepaton kaj galon, forlasinte sian sencon de oreloj kaj okuloj, illi senfine kaj senlime ripetadas finon kaj komencon. Ili, liberigite, vagadas ekster polvoj kaj malpuraĵo. Ilia afero estas promenado, nenion farante. Kial ili bezonus plenumi la komplikajn mondajn decregulojn kaj montri tion al oreloj kaj okuloj de amaso da mondanoj?”

Zigong diris: “Se tiel, kial vi, Majstro, dependas de via socia formaĵo?”

Konfuceo diris: “Mi estas homo, punita de la Ĉielo.¹⁹² Malgraŭ tio, mi dividas la punon kun vi.”

Zigong diris: “Permesu al mi demandi, kion signifas tiuj formaĵoj?”

Konfuceo diris: “Fiŝoj kune kreiĝas en akvo. Homoj kune kreiĝas en Vojo. Por tiu, kiu kreiĝas en akvo, estas sufiĉe fosi al li lagon kaj nutradi lin. Por tiu, kiu kreiĝas en Vojo,

¹⁸⁹ Iuj esploristoj prenas la subjekton por Zigong.[YWj:67; Ikt1:168]]

¹⁹⁰ 方 Mi prenas la ideogramon kiel ekzistantan socian sistemon.

¹⁹¹ 一氣 Ĉi-o estas pneŭmo aŭ aero. Kaj ĝi iam havas signifon de “elemento, atomo.”

¹⁹² 丘天之戮民 Esprimo estas atentinda. Ne sciante, kiu konsideras Konfuceon tia, ĉu taoistoj aŭ Konfuceo mem?

la vivo iĝus stabila, se nenio okazus.¹⁹³ Tial do estas dirite: ‘Fiŝoj forgesas unu la alian en rivero kaj lago; homoj forgesas unu la alian en la ekzercado de Vojo.’¹⁹⁴”

Zigong diris: “Permesu al mi demandi, kio estas unikulo?”

Konfuceo diris: “Unikulo estas diferenca de aliaj homoj kaj iĝas konforma al la Ĉielo. Tiel do estas dirite: ‘Ĉiela malgrandulo estas homa noblulo, kaj homa noblulo estas Ĉiela malgrandulo.’”

Yanhui demandis Zhong Ni, dirante: “S-ro Mengsun Cai, kiam lia patrino mortis, kvankam plorkriis, tamen sen larmo. Koro ne doloris. En funebro li ne malĝojis. Sen tri menciitaj punktoj, li akiris renomon de bona funebrado en Lu-regno. Ĉu eblas akiri renomon sen certa enhavo? Mi, Hui, dubas pri tio.”

Zhong Ni diris: “S-ro Mengsun faris tion plejble, pli progresinte ol vi scias. Malgraŭ ke li ne povis plisimpligi tion, tio estis jam iom simpligita.

Ne estas sciate de Mengsun pri la kaŭzo de naskiĝo kaj morto, nek pri antaŭnaskiĝo kaj postmorto. Li nur lasis ĝin ŝanĝiĝi en materion kaj atendis la plian ŝanĝiĝon en la nekonatan. Kial estus sciate pri neŝanĝiĝo de materio, kiam ĝi estas poste ŝanĝiĝonta? Kial estus sciate pri ŝanĝiĝo de materio, kiam ĝi ne estas ĝuste ŝanĝiĝonta? Ŝajnas, ke mi kaj vi nun estas dormantaj kaj ankoraŭ ne vekigintaj el sonĝo.

Li komprenas, ke, kvankam formo ŝanĝiĝas, tamen neniu koro difektiĝas, ke, kvankam la loĝejo ŝanĝiĝas, tamen la sento neniam mortas. Nur s-ro Mengsun sola estas vekiginta kaj nur plorkriis ankaŭ mem, kiam la aliaj plorkriis. Jen kial li kondukis tiel.

Vidante sin mem, oni konsiderus tiun sin nur “Mi”. Kiel estas sciate, ĉu mi estas ĉi tiu, kiun oni konsiderus si mem, aŭ ne? Ekzemple, vi fariĝis birdo en sonĝo kaj flugis supren al la Ĉielo, kaj vi fariĝis fiŝo kaj subakviĝis profunden. Ne estas sciate, ĉu tiu, kiu rakontas tion, estus vekiginto, aŭ dormanto.

Konveneco ne superas ol rido, la rido ne superas ol natura aranĝo.¹⁹⁵ Laŭ la aranĝo ĉio elŝanĝiĝas, kaj eniras en la malplenan tutan unuon de la Ĉielo.”

Yi Erzi vizitis Xu You.¹⁹⁶

¹⁹³ 無事而生定 Eblas traduki: “la vivo iĝas stabila, se homo nenion faras.” Sed ambaŭ ne eblas sur la mondo, ĉar nepre okazas io kaj nepre homo faras ion.

¹⁹⁴ 道術 Restas demando, ĉu la ekzercado de Tao estas farado aŭ nenionfarado?

¹⁹⁵ 造適 Mi prenas tiun vorton kiel sinteno de “Comme il faut.” En tiu rakonto al Yanhui 顏回, Konfuceo estas ŝanĝita en predikanton de taoismeca pensmaniero.

¹⁹⁶ 意而子 estas fikcia nomo. 許由 En tiu verko li ofte aperas kiel ermito, rifuzinta heredon de la trono, cedota de la reĝo Yao 堯.

Xu You diris: “Kion Yao donacis al vi?”

Yi Erzi diris: “Yao diris al mi: ‘Vi okupu vin per bonvoleco kaj justeco, kaj parolu klare pri praveco kaj malpraveco.’”

Xu You diris: “Kial vi alvenis ĉi tien? Yao jam tatus al vi la bonvolecon kaj la justecon, puntranĉis vian nazon por instrui al vi mezuron de la praveco kaj la malpraveco. Por kio vi volus ludvagadi laŭ la vojo, vasta, arbitra kaj ŝanĝiĝema?”

Yi Erzi diris: “Spite ĉion ajn, mi dezirus ludi almenaŭ en angulo de tiu sfero.”

Xu You diris: “Ne eblas. Blindulo ne povas ŝati belan vizaĝon de belulino. Blindulo ne povas aprezi desegnon de brodaĵoj, kolorigitaj blue, flave, blanke kaj nigre.”

Yi Erzi diris: “Tio, ke Wuzhuang perdis la belecon, Juliang perdis la fortecon¹⁹⁷ kaj Huang-ti perdis la scion, okazis tiam, kiam ili estis en forno kaj inter martelo kaj amboso. Kial ne estus sciante, ke iam la Kreinto, forviŝinte mian tatuon, redoninte al mi la tranĉitan nazon, kompletigos min kaj lasos al mi sekvi vin?”

Xu You diris: “Ha, ne eblas scii tion. Mi rakontos al vi la ĝeneralan skizon. Mia Majstro, ho, mia Majstro! Li disrompas ĉion, tamen li ne konsideras sian aferon justa; li disvastigas bonfaron al dekmil generacioj, tamen li ne konsideras sian aferon bonvoleca; li ekzistas pli longe ol antikveco, tamen li ne konsideras sin longviva; li subtenas la ĉielon kaj teron kaj skulptas ĉies formojn, tamen li ne konsideras sin lerta. Li nur ludas.¹⁹⁸”

Yan Hui diris: “Mi pliboniĝis.”

Zhong Ni diris: “Kion signifas tio?”

Yan Hui diris: “Mi forgesis bonvolencan kaj justecon.”

Zhong Ni diris: “Bone. Sed ankoraŭ ne sufiĉas.”

En alia tago, Yan Hui denove vidis lin kaj diris: “Mi pliboniĝis.”

Zhong Ni diris: “Kion signifas tio?”

Yan Hui diris: “Mi forgesis deĉregulojn kaj muzikon.”

Zhong Ni diris: “Bone. Sed ankoraŭ ne sufiĉas.”

Poste, en alia tago, Yan Yui denove vidis lin kaj diris: “Mi pliboniĝis.”

Zhong Ni diris: “Kion signifas tio?”

Yan Hui diris: “Mi, sidante, sinforĝis.”¹⁹⁹

Zhong Ni diris: “Kion signifas tio – ‘sidante sinforĝis?’”

Yan Hui diris: “Forĵetante korpon, reĵetante saĝon, foriĝante de formo, forlasante

¹⁹⁷ 無莊、拋梁 Nomoj de legendaj belulino kaj fortulo.

¹⁹⁸ 此所游已 Iuj esploristoj tradukas la frazon: “Ĉi tie mi (Xu You) ludas.” [YWj:70; WaB:52; Ikt1:176]

¹⁹⁹ 坐忘 Poste Zen-budhismo 禪宗 heredis tion kiel plej gravan rimedon por meditado.

intelekton, akordiĝi kun Granda Trairejo.²⁰⁰ Tio estas nomata ‘sidante sinforgesi’.”

Zhong Ni diris: “Se akordiĝos kun ĝi, ne estiĝos ja senso de ŝato. Je la transformiĝo ne estos io konstanca.²⁰¹ Vi estas tre saĝa. Mi, Qiu, petas vin, ke mi postsekvu vin.”

Zi Yu kaj Zi Sang estis amikoj. Iam pluvis dek tagojn.

Zi Yu diris: “Zi Sang, verŝajne, suferas de malsato.” Li pakis iom da manĝaĵo kaj iris por doni al Zi Sang manĝi. Enironte la pordon, li aŭdis Zi Sang kantanta kvazaŭ ploranta.

Zi Sang, ludante liuton, kantis: “Patro? Patrino? La Ĉielo? Homo?” Li apenaŭ havas voĉon por kanti, kaj tuj nur recitadis la poemon.

Zi Yu, enirinte, diris: “Kial vi kantas poemon tiel?”

Zi Sang diris: “Kiu do faligis min en tian ekstremon? Mi ne komprenas. Ĉu gepatroj dezirus, ke mi estu mizera? Se la Ĉielo amus egale ĉiujn, se la tero amus egale ĉiujn, kial la Ĉielo kaj la tero igis nur min tiel mizera? Kiel ajn mi serĉas, kiu do faris tion, sed mi ne povas trovi kiun. Ĉu estas la sorto, kiu faligis min en tian ekstremon?”

²⁰⁰ 大通 Poste en *Hui Nanzi* 覽冥篇 estos uzata tiu vorto.

²⁰¹ 化則無常 En ĉi tiu teksto troviĝas ĉefaj konceptoj por posta Zen-budhismo. Tio signifas, ke Zen heredis gravajn ideojn el *Zhuangzi*. Notinde, ke tiuj konceptoj, similaj al Zen, estas diritaj de konfuceanoj en *Zhuangzi*. Eblus konjekti, ke nuna Zen-budhismo konsistas el budhismo, taoismo kaj konfuceanismo.

7 KONFORMO AL IMPERiestro-REĜO

Nie Que demandis Wang Ni.²⁰² Tiu demandadis kvar fojojn, kaj ĉi tiu kvar fojojn respondadis, ke ankaŭ li mem ne scias. Nie Que dancante ĝojegis kaj iris al Pu Yi-zi raportiti tion.²⁰³

Pu Yi-zi diris: “Vi nun eksciis tion? You Yu ne estis pli alta ol Tai.²⁰⁴ You Yu per bonvoleco en koro provis regi la popolon kaj gajnis la popolon. Sed li ankoraŭ ne estis ibera de la strebo ektransiri la limon de ne-homo.²⁰⁵ Tai, male, dormante kvietas kaj vekiginte vagadis libere.²⁰⁶ Iam li rigardis sin ĉevalo, iam rigardis sin bovo. Lia saĝo estas fidela al senso, lia virto estas ekstreme vera. Li ne provis de komence ektransiri la limon de ne-homo.”

Jian Wu renkontis la sanktan frenezulon Jie Yu.

Jie Yu diris: “Kion diris al vi Ri Zhong Shi?”

Jian Wu diris: “Li diris al mi, ke reĝoj-nobluloj devas mem starigi principojn-regulojn, ceremoniojn, juston kaj leĝojn, tiel do neniu ne obeus kaj ne ŝanĝigus laŭ tio.”

Jie Yu diris: “Tio ja estas fi-virto tiel falsa, ke kvazaŭ je la regado de la mondo oni ŝarĝus dorson de kulo per monto, devigante regatojn transpasi maron aŭ trabori riveron. Ĉu sanktulo regus ekstere por la regado? Se unue rektigi sin, kaj poste estos farata la regado, li povas fari bone kaj solide la aferon. Se diri aldone, birdoj, flugante alte, evitas la damaĝon de sago; musoj, fosante profunden la truon sub la sankta monto, evitas minacon, ke ili ne estu ĉas- aŭ fum-pelitaj. Ĉu vi ne scias pri tiuj krejtaĵoj?”

Tian Gen²⁰⁷ vagadis sude de Yin, atingis la bordon de rivero Liao. Li hazarde renkontis

iun Sennomulo kaj demandis lin kiel regi la mondon.

La Sennomulo diris: “For, vi vurgarulo! Kian malĝojan demandon vi faras! Mi ĝuste nun interparolos kun la Kreinto, kaj poste, kiam ni satparolis, mi, rajdante sur birdo,

²⁰² En la antaŭa ĉapitro “Unueco de aĵoj”齊物論 aperis du figuroj: Nie Que, serĉanta perfektan scion, kaj Wang Ni, kiu taksis personon nenion sciantan pli alta.

²⁰³ 蒲衣子 aŭ 被衣 estas konsiderata kiel instruisto de Wang Ni.

²⁰⁴ 有虞 estas Yao, la sankta reĝo. 泰 estas Fu Xi 伏羲, legenda reĝo, pli antikva ol Huang Ti 黄帝.

²⁰⁵ 非人 Mi prenis la frazon kiel superhomon 超人. Pu Yi-zi opinias, ke Yao strebis al transformigo de homo en superhomon, t. e. ne-homon, sed ne sukcesis.

²⁰⁶ 其覺于于 Mi obeas la tradukon far de Yu Wangju. [YWj:73]

²⁰⁷ 天根 Fikcia nomo.

forfluganta senlimen, volus transflugi limon de ses polusoj²⁰⁸ eksteren. Kaj Mi intencus vagadi en la fantazia lando, kie ekzistas neino, kaj loĝi en la kampo kun senlima vasteco. Kial do vi ĉagrenas min je koro per demando pri regado de la mondo?”

Tian Gen redemandis.

La Sennomulo diris: “Lasu vin je koro ludi simple, akordu Ĉi-on kun emptines, kaj sekvu la naturon de materioj, kaj ne lasu egoon interveni en vin. Tiel do la mondo estos regata.”

Yangzi Ju²⁰⁹ renkontis Lao Dan²¹⁰ kaj diris: “Jen unu homo, rapida kiel eĥo, forta kiel trabo, penetranta en aĵojn, klarevida, ne laciĝas en lernado de la Vojo=Tao. Ĉu eblas kompari tiun personon kun Klera reĝo?”

Lao Dan diris: “Kompare kun sanktulo, tiu persono estas nur laborulo, kiu okupas sin per faktoraĵoj laboroj kaj artifikaj teknikoj, laciĝante sin je korpo kaj ĉagrenante sin je koro. Aldone, belaj feloj de tigro kaj leopardo tiroj al ili ĉasistojn, facilmovaj simioj kaj hundo, bone ĉasanta animalojn, estos ligitaj en kaĝoj. Kial eblas kompari tiujn kun Klera reĝo?”

Yangzi Ju, ŝokite, diris: “Permesu al mi demandi vin, kia estas la regado far de la Klera reĝo?”

Lao Dan diris: “En la regado de la Klera reĝo la merito kovras la mondon, tamen tio similas, kvazaŭ li mem nenion farus. Li influas ĉies reformadon, tamen la popolo ne dependas de li. Lia nomo ne estas aparte laŭdata spite lian meriton. Li lasas ĉiujn kaj ĉion ĝoji per si mem. Li, starante sur la nemezurebla alteco, ludvagadas en la mondo de esto kaj neesto.”

En Zheng-regno estis iu dieca aŭguristo, nomata Ji Xian.²¹¹ Ŝi sciigis al homoj morton, vivon, ekziston, pereon, malfeliĉon, feliĉon, vivdaŭron, antaŭtampnan forpason, eĉ kvazaŭ dio, povis ĝuste diveni la tempon: jaron, monaton, semajnon kaj tagaon. Popolanoj de Zheng, vidante ŝin, ĉiuj forkuris. Liezi, renkontinte ŝin, estas elkore

²⁰⁸ 六極 En la ĉap. 大宗師 ankaŭ estas menciite pri ĝi. Limoj de suro, subo, oriento, okcidento, sudo kaj nordo.

²⁰⁹ 陽子居 Esploristoj konsideras lin Yang Zhu 楊朱, fama pensulo, kiu agadis post Mozi aŭ samtempe. Lia ideo baziĝis sur la estimo de egoismo.

²¹⁰ 老聃 Laozi. Familia nomo estas Li 李, persona nomo estas Er 耳, bibliotekisto en Zhou-regno 周. Aŭtoro de Daode Jing 道德經.

²¹¹ 季咸 Ordinare 巫 signifis inon. Vir-aŭguristo estis 覡 [GWj:306]. Nomo de Xian 咸 estis fama, kiel la plej dieca el dek elstaraj aŭguristoj.[山海經, 詛楚文, 楚辭] Spite ke multaj esploristoj prenis ĝin por vir-aŭguristo, mi prenis ĝin kiel inon.

fascinata de ŝi. Reveninte, Liezi parolis al Huzi,²¹² dirante: “Unue mi ekpensis, ke via vojo estas la plej alta. Sed troviĝas iu pli alta ol ĝi.”

Huzi diris: “Mi instruis por vi vortojn, sed ankoraŭ ne esencon. Ĉu vi pensas, ke vi ĝuste akiris jam la Vojon? Kvankam multe da kokinoj, tamen sen koko, ne eblas fekundigi ovojn. Vi kun tia Vojo interbatalis kontraŭ la mondo, kaj, batite, nepre ekkredis la alian. Tiel vi igis la alian aŭguri vin. Prove, venu kune kun ŝi kaj montru al mi ŝin.”

En la sekva tago Liez kun ŝi vidis Huzi. Ŝi, elirinte de Huzi, diris al Liezi: “Ho ve, via Mastro mortos, ne povas vivi. Restas malpli ol dek tagoj. Mi vidis ion strangan, vidis malsekan cindron.”

Liezi, enirinte, ekploris kun larmoj, kaj, malskigite kolumon, diris al Huzi tion.

Huzi diris: “Ĵus mi montris min al ŝi en la formo de tero,²¹³ kiel svaga, ne tremanta nek staranta.²¹⁴ Ŝi apenaŭ ne vidis min ŝtopita je natura vikleco.²¹⁵ Prove, ŝi venu kun vi denove.”

En la sekva tago, ŝi denove vidis Huzi. Elirinte, ŝi diris al Liezi: “Estas feliĉe, ke via Mastro vidis min. Li resaniĝis, estante plena je vikleco. Mi vidis ŝanĝon el ŝtopiteco.”

Liezi, enirinte, diris al Huzi tion.

Huzi diris: “Nun ĵus mi montris al ŝi la Ĉielan fekundecon. Ankoraŭ havante nek nomon nek substancon, la ĝermo eliras de sub kalkanoj. Ŝi vidis min havanta bonan signon. Prove, ŝi venu kun vi denove.”

En la sekva tago ŝi denove vidis Huzi. Elirinte, ŝi diris al Liezi: “Mi ne povas aŭguri pro tio, ke ne stabilas via Majstro. Unue li stabiligu sin, kaj denove mi aŭguros lin.”

Liezi, enirinte, diris al Huzi tion.

Huzi diris: “Mi ĵus montris min al ŝi kiel la plej malplenan kaj senkonkurencan. Ŝi apenaŭ ne vidis min en mia pneŭa ekvilibro,²¹⁶ kie ĉio egalas al la kvietaj profundoj: kaj maro de baleno, kaj senmova akvo, kaj fluanta akvo. Estas naŭ profundojn entute, tamen ĉi tie nur tri. Prove, ŝi venu denove kun vi.”

En la sekva tago ŝi denove vidis Huzi. Apenaŭ ŝi ekstarus antaŭ li, ŝi tuj konsternite forkuris. Huzi diris: “Postkuru ŝin!” Liezi postkuris sed ne kaptis ŝin. Reveninte, li raportis al Huzi, dirante: “Ŝi jam malaperis. Jam perdiĝis. Mi ne kuratingis ŝin.”

²¹² 列子 Pensulo de taoismo en Milit-Regna tempo. Estas dirite, ke li vivis post Laozi antaŭ Zhuangzi. Restas la libro, nomata Liezi. 壺子 estis konsiderata kiel instruisto de Liezi. Familia nomo – Lin 林, nomiĝis alie 壺丘子.

²¹³ 地文

²¹⁴ 正. Esploristoj inklinas anstataŭigi ĝin per 止. Mi opinias, ke legeblas per originalo.

²¹⁵ 杜德機 Mi prenis ideogramon 德 kiel naturon.

²¹⁶ 衡氣機 Ekvilibla stato de animo.

Huzi diris: “Ĵus mi montris min al ŝi en mia antaŭkomenco,²¹⁷ kie mi estis vanta kaj libermova.²¹⁸ Ŝi ne konis kiu estas tiu. Ŝi vidis tiun falanta stango kaj alfluantaj ondoj. Tial do ŝi forkuris.²¹⁹”

Poste Liezi sciigis, ke li mem de komence ankoraŭ nenion lernis. Li revenis hejmen kaj ne eliris dum tri jaroj. Li kuiris por sia edzino kaj nutris porkojn, kvazaŭ homojn. Farante aferojn, li havis neniun kunlabori. Li ĉizadis sin mem kaj revenis al simpleco. Li ekstaris sola, sendepende tenante sian formon. Spite malordan ĉirkaŭon, li tenis sin en fikseco. Kaj en tiu unueco li finis la vivon.”

Ne fariĝu enkorpigito de famo; ne fariĝu kuŝejo de intrigo; ne estu ŝargita per oficoj; ne fariĝu subjekto de intelekto. Submetu korpon tute al senlimo kaj ludu en senmemoro.²²⁰ Ricevu sendistinge tute ĉion, kio estas donita de la Ĉielo, kaj estu mem nur malplene vaka. La Pleja homo uzas la koron kiel la spegulon. Ne postkuras nek alfrontas, sed nur akceptas, tamen ne alteniĝas. Tiel do li povas venki en ĉio kaj ne vundiĝas.

La reĝo de Suda Maro nomiĝis Tujo, la reĝo de Norda Maro nomiĝis Subito, kaj la reĝo de Centro nomiĝis Ĥaoso.²²¹ Renkontiĝis iam Tujo kun Subito sur la tero de Ĥaoso, kaj Ĥaoso akceptis ilin tre bone. Tujo kaj Subito dezirus danki al la virto de Ĥaoso, dirante: “Ĉiu homo havas sep truojn ĉe si kaj per tio li vidas, aŭdas, manĝas kaj ripozas. Sed s-ro Ĥaoso sola ne havas ilin. Ni provu trabori al li ilin.”

Ĉiutage po unu oni traboris, kaj sep tagojn poste mortis Ĥaoso.

²¹⁷ 未始出吾宗 Fonto, antaŭ apero de mi mem.

²¹⁸ 委蛇 havas diversajn signifojn: 1) moviĝi sinue, 2) malstreĉi, k. a. Mi prenis la duan signifon.

²¹⁹ 弟靡, 波流 Mi tradukis nur laŭlitere. Mia opinio, esploristoj tro inklinas kompreni la paragrafon kun tordite profunda signifo.

²²⁰ 無朕 Iu prenas la ideogramon 朕 por 迹(postsigno), la alia por 兆(antaŭsigno). Mi prenas ĝin kiel 我 (sin mem).

²²¹ 儻, 忽 ambaŭ signifas rapedecon. 渾沌 ĥaoso.

EKSTERAJ ĈAPITROJ

8 PALMOPIEDULO

Kvankam palmopiedo kaj sesa fingro estiĝas de naske, tamen ili estas superfluaĵoj spite virton.²²² Erupciintaj verukoj kaj pendantaj tuberoj ekaperas poste el korpo kaj ili okaze kronikiĝas, kvazaŭ naskiĝinta kvalito. Kvankam iu intencas multflanke praktikadi bonvolecon kaj justecon, tamen ĉu tiuj povus esti grefteblaj en korpon kvazaŭ kvin organoj²²³? Sed tio ne estas ĝuste konforma al “la Vojo kaj la virto²²⁴”.

Tiel do la palmopieduloj havas senutilan karnon, superflue aldonitan. Sesfingruloj havas senutilan fingron, superflue estigitan. Kiu voluptas en la konduto de bonvoleco kaj justeco, tiu volus multflanke aldoni piedon kaj fingron, superfluan al homa sento kun kvin organoj, tro multflanke uzante saĝon kun okuloj kaj oreloj.

Tiel, aldonanto de palmopiedo al okuloj diboĉas je kvin koloroj, voluptas je desegnoj. Ne bone estas droni en pompaj brokaĵoj kun koloroj: blua, flava, blanka kaj nigra. Tia estis Li Zhu.²²⁵ Kaj aldonanto de la sesa fingro al oreloj diboĉas je kvin gamoj, voluptas je ses majoraj tonoj kiel flavaj sonoriloj – el metaloj, ŝtonoj, kordoj, bambuoj, – kaj je grand-minoraj tonoj. Ne bone – ĉu? Tia estis la Majstro Kuang.²²⁶

Kiu havas superfluan fingron en bonvoleco, tiu perdas la virton kaj denaskan naturon por akiri renomon. Estas malbone devigi la mondon sekvi neatingeblan leĝregulon per fajfado kaj tamburado. Tiaj estas Zeng kaj Shi.²²⁷

Kiu havas superfluan fingron en disputo, tiu ŝpinadas frazojn kvazaŭ tegoladi unu sur la alian aŭ kvazaŭ trikadi ŝnurojn. Estas malbone ludadi koron per logikoj pri hardeco kaj blankeco inter sameco kaj malsameco, aŭ laciĝi por duonhonoro per senutilaj vortoj. Tiaj estas Yang kaj Mo.²²⁸

Tiel do ĉiuj ĉi tiuj estas la vojoj kun superflua fingro kaj neĉefa branĉo. Ilia vojo ne

²²² 性 Io konforma al denaska ecaro. 德 ĉi tiu virto signifas “normalan, bonan” naturon aŭ “naturan leĝon”. Laŭ Zhuangzi, virto estas natura esenco. Jen troviĝas la diferenco inter konfuceanoj kaj taoistoj, rilate al koncepto de virto. Por konfuceanoj ĝi estas iu artefarata moralo, akirebla nur per edukado por obeo al suprujoj. Por mohistoj la virto estas akirebla per kritikado de memo kaj ĉirkaŭo, t. e. per lukto kaj agado por justo. Konfuceanoj strebis al la estetiko de obeo al la socio, mohistoj – al la estetiko de reforma agado, taositoj – al absoluta obeo al naturo, nenion farante.

²²³ 五藏 hepato, pulmo, koro, renoj, lieno.

²²⁴ 道德 Ne eblas traduki la vorton per ĝenereale uzata signifo “moralo”.

²²⁵ 離朱 Legenda figuro kun akra vido.

²²⁶ 師曠 fama muzikisto en la epoko de Printempo-Aŭtuno.

²²⁷ 曾參, 史鱣 disĉiploj de Konfuceo.

²²⁸ 楊墨 Yang Zhu kaj Mozi. Estas notinde, ke Zhuangzi ne nomumis sofistojn, sed Yang kaj Mo, kiel disputantojn pri sameco kaj malsameco. Yang kaj Mo ĉi tie estas konsiderataj kiel antaŭirintoj de sofisma skolo.

estas la plej ĝusta en la mondo.

La persono ĝusta el ĝustaj ne perdas la denaskan senton.²²⁹ Tiel do liaj kuniĝintaj fingroj, eĉ se estus tiuj, ne estas konsiderata kiel palmopiedoj, kaj lia branĉa fingro ne estas rigardata kiel la sesa. La longeco estas rigardata kiel ne superflua, kaj la mallongeco – ne manko. Tial do kvankam gambo de anaso estas mallonga, tamen, se oni plistreĉu ĝin, li ĉagreniĝus; gambo de gruo estas longa, tamen, se oni tranĉu ĝin, li malĝojus. Tial io longa denaske ne devus esti hakita, io mallonga denaske ne devus esti plistreĉita, ĉar ne eblus per tio senigi la ĉagrenon. Tio aludas, ke ankaŭ la devseno de bonvoleco kaj justo ne estas homeca sento. Kiel multe da ĉagrenoj troviĝas ĉe la homo de bonvoleco!

Homo de kunigitaj piedofingroj ekploras, se oni distranĉus unu de la alia inter fingroj. Homo kun duperflua fingro ekkrias, se oni mordus ĝin. Ambaŭ homoj, kun fingroj multnombraj kaj malmultnombraj, malĝojas tute egale.

Nuntempaj bonvolecoj ĉagreniĝas grimacante je monda malsano, malbonvolecoj, detranĉinte denaskan senton, avidas je rango kaj riĉo. Ŝajnas, ke la devseno de bonvoleco kaj justo ne estas homeca sento. Kiel do post tri dinastioj²³⁰ tiom bruegas la tuta mondo?

Rektigi per kurbilo, rektilo, cirkelo kaj ortilo estas forskrapi la denaskecon. Ŝnuri kaj solidigi per gluaĵoj estas perforti la virton. Kiu intencas konsoladi koron de la mondo, kun oftaj sinklinoj al muziko kaj decreguloj, per vana devseno de bonvoleco kaj justo, tiu perdas konstantan naturon. La mondo havas sian konstantan naturon. Laŭ la konstanta naturo kurbas sen kurbilo, rektas sen ŝnuro-rektilo, rondas sen cirkelo, kvadratas sen ortilo, solidiĝas sen gluaĵoj, ligiĝas sen ŝnuroj. Tiel do, ne sciate kial, en la mondo ĉiuj naskiĝas sekvante unu posta la alia, kaj, ne sciate de kie, tute same estas akirita ĉio, kio necesas.

Pasinteco kaj nuno estas unu tuto sen dueco, do ne disigebla. Kial estus necese entrudi inter la virtojn sinsekve la gluaĵon kaj ŝnuron, kiel la devsenton de bonvoleco kaj justo? Tio konfuzas la mondon.

La konfuzeto ŝanĝas direkton, la konfuzego ŝanĝas denaskecon. Per kio estas sciate tiel? Post kiam la klano Yu, Shun, ekkonfuzis la mondon per levo de bonvoleco kaj justo,

²²⁹ Multaj esploristoj revizias 正正 per 至正 (la plej justa). 性命之情 denaska sento. Iu tradukas la frazon per “inborn nature (denaska naturo)”. [WaB:61]

²³⁰ 夏商周.

mondanoj ne devas ne kuradi por bonvoleco kaj justo. Ĉu tio ja ne estas ŝanĝo de denaskeco per devseno de bonvoleco kaj justo?

Prove, ni argumentu tion. Post tri dinastioj, mondanoj ne devas ne ŝanĝi la denaskecon per eksterajoj. Malgranduloj donas sin per tuta korpo al profitoj. Oficiuloj, nomata "Shi",²³¹ sindonas per tuta korpo al honoro, grandoficistoj sindonas per tuta korpo al konservo de sia familio, sanktuloj dediĉas sin per tuta korpo al la mondo. La supre menciitaj, kvankam diversas je aferoj, nomoj kaj rangoj, ĉiuj estas en tute unu samo, vundante sin je sia denaskeco, sindonante per tuta korpo.

Iam iu sklavo kun knabo-sklavo duope paŝtis ŝafajn. Unu el ŝafaj perdiĝis spite paron da paŝtistoj. Estas demadite kion la sklavo faris. La sklavo legis libron, portante volumon. La knabo, demandite, diris, ke li ludis ĵet-kubon. Kvankam aferoj malsamaj, ambaŭ tute egale perdis la ŝafon.

Bo Yi mortis por honoro-amo sub la monto Shou Yang.²³² Ŝtelisto Zhi mortis por profitamo sur la maŭzoleo Dong Ling.²³³ Ĉi tiuj du mortis pro malsama kialo, sed ili ambaŭ same vundis sian restintan vivon kaj per tio sian denaskecon. Kial oni povus taksi Bo Yi bona kaj ŝteliston Zhi malbona!

La mondo estas plena de sinoferoj. Oni nomas noblulo tiun, kiu oferis sin por bonvoleco kaj justo. Oni nomas malgrandulo tiun, kiu oferis sin por mono kaj riĉaĵo. La sinofero estas unu sama, sed malsamas nomoj kiel noblulo aŭ malgrandulo. Je vundado de la vivo kaj la denaskeco eĉ la ŝtelisto Zhi estas tute egala al Bo Yi. Kial do oni distingas unu de la alia, kiel noblulo kaj malgrandulo?

Kiu obeigas la denaskan naturon al devseno de bonvoleco kaj justo, tiun homon eĉ kiel Zeng kaj Shi, mi ne nomas bona eksperto. Kiu obeigas sian denaskan naturon al kvin bongustoj, tiun homon eĉ kiel Yu Er,²³⁴ mi ne nomas gustumisto. Kiu obeigas sian denaskan naturon al kvin tonoj, tiun homon eĉ kiel Majstro Kuang, mi ne nomas muzikisto kun aŭskultpovo. Kiu obeigas sian denaskan naturon al kvin koloroj, tiun homon eĉ kiel Li Zhu, mi ne nomas akrevidanto. Mi nomas eksperto nur la bonan je virto, sed ne je devseno de bonvoleco kaj justo. Do la bona eksperto laŭ mi ne estas t. n. bonvoleculo kaj justulo, sed nur tiu, kiu lasas sin laŭ sento de la denaska naturo.²³⁵ Laŭ mi la aŭskultpovo ne signifas aŭdi la alian, sed aŭdi sin mem. Laŭ mi la akrevido ne

²³¹ 士 rango de oficisto aŭ militisto. Sed estis uzata por esprimo de la virta personeco.

²³² 伯夷 Bo Yi malsatmortis sub la monto 首陽, protestante kontraŭ Zhou 周-dinastio.

²³³ 盜跖 Fama ŝtelisto en la epoko de Printempo-aŭtuno. 東陵 situis en Jinan.

²³⁴ 俞兒

²³⁵ 任其性命之情 En tiu senco, Zhuangzi havas komunecon kun Yang Zhu 楊朱, pensulo de egoismo-liberalismo, fragmento de kies ideo restas nur en la taoisma libro *Liezi* 列子.

estas vidi la alian, sed vidi sin mem. Kiu, vidante nur la alian, ne vidas sin mem, aŭ kiu, ricevante nur la alian, ne ricevas sin mem, tiu akiras nur la alies, sed ne akiras la sian, konformigas sin al la alies konformo, sed ne al la sia.²³⁶ Kiu konformigis sin al la aies konformo, sed ne al la siaj, tiuj estis ja ŝtelisto Zhi kaj Bo Yi. Kvankam unu estis ŝtelisto, tamen ili ambaŭ egale samas je devia perverseco.²³⁷ Mi streĉiĝas antaŭ la Vojo kaj virto.²³⁸ Tiel do mi ne aŭdacas ĉaste konduti laŭ deviento de bonvoleco kaj justo supre, nek laŭ devia perverseco sube.

²³⁶ Sama frazo estas en la ĉap. 大宗師, sed mi tradukis diverse laŭ situacioj.

²³⁷ 淫僻

²³⁸ 余愧乎道德

9 ĈEVALAJ HUFOJ

Ĉevaloj tretas prujnojn kaj neĝojn per siaj hufoj, kaj gardas sin kontraŭ vento kaj malvarmo per haroj. Ili manĝas herbon, trinkas akvon kaj saltas supren batante teron per piedoj. Tio estas la vera denaska naturo de ĉevaloj. Nenie necesas uzi al ili altan terason kaj luksan halon. Sed aperis Bo Luo,²³⁹ dirante: “Mi povas bone dresi ĉevalojn.”

Li al ĉevaloj bruletis la harojn kaj razis, skrapetis hufojn kaj brulstampis. Li vicigis ĉevalojn per martingaloj kaj vostrimenoj kaj ligis ilin en la stalo. Tiel do ili mortis du aŭ tri dekonoj. Li igis ilin malsati kaj soifi, igis ilin kuradi kaj trotadi. Li igis ilin marŝi en vico, egale sen malordo. Antaŭe ĝenate de ornamita enbuŝaĵo, malantaŭe minacate de vergo, da ili mortis jam pli ol duono.

Potisto diras: “Mi bone traktas argilon, ke la ronda konformas al cirkelo kaj la kuba – al ortilo.”

Metisto diras: “Mi bone traktas lignon, ke la arka konformas al kurbilo kaj la rekta – al rektilo-ŝnuro.”

Ĉu denaska naturo de argilo kaj ligno volus konformi al tiuj mezuriloj, kiel cirkelo, ortilo, kurbilo kaj rektilo-ŝnuro? Sed oni de generacio al generacio laŭdas ilin, dirante: “Bo Luo bone traktis ĉevalojn, potisto kaj metisto traktas bone argilon kaj lignojn.”

Tio estas ankaŭ eraro far de regantoj de la mondo. Miaopinie, ne tia estas bona reganto de la mondo. Popolo, regata de li, havas denaske la konstantan naturon.²⁴⁰ Ili teksadas kaj vestiĝas, kulturadas kaj manĝas. Tio estas nomata “akordiĝo al virto”.²⁴¹ Unu tuto, sed ne partiemas. Tio estas nomata “La Ĉiela lasado”.²⁴²

Tial do en la mondo de la pleja virto²⁴³ la piedirado estis plena de kvietaj majesteco kaj la rigardo estis plena de firma majesteco. En tiu tempo ne estis tunelo kaj pado en montoj, ne estis boato kaj ponto sur marĉoj. Ĉiuj vivis amase kaj apartenis al siaj vilaĝoj. Kortobirdoj kaj dombestoj amasiĝis en gruparoj, herboj kaj arboj kreskis bone. Tiel do oni povis ludi kun kortobirdoj kaj dombestoj ligitaj per ŝnuroj kaj grimpi supren por

²³⁹ 伯樂 Familinomo Sun 孫, persona nomo Yang 陽, alinome – Bo Luo. Fama bredisto de ĉevaloj en Qin-regno en la epoko de la duko Mu 穆公.

²⁴⁰ 常性 Konstanta denaska naturo estas egala al 本性 (vera naturo).

²⁴¹ 同德 Akordiĝo al virto egalas al la ideo “Akordiĝo al la Ĉielo” de Mozi.

²⁴² 天放 La Ĉielo lasas la popolon fari ion. Mi konjektas, ke liberalismeca ideo de Yang Zhu estas heredita de Zhuangzi.

²⁴³ 至德 Speciala vortouzado de Zhuangzi signifas ne artefaritan moralon, sed naturan ordon, laŭ kiu atingeblas plej bona rilato inter homoj. La fama verko de Laozi estas nomata Dao De jing 道德經. Tio signifas ne sutron de moralo, sed sutron de natura ordo.

rigardi nestojn de birdoj kaj pigoj.

En la mondo de la pleja virto oni vivis kune kun kortobirdoj kaj dombestoj, kolektiĝis grupe en akordo kun ĉiuj aĵoj. Kiel do oni sciis distingon de nobluloj kaj malgranduloj. Ili estis egalaj je nescio. Ili ne disiĝis de la virto. Ili estis same senavidaj. Tio estas nomata “simpleco”.²⁴⁴ En la simpleco estas efektivebla la naturo de la popolo.

T. n. la sankta homo ekaperis, pene lamante ekfaris la bonvolecon kaj ŝanceliĝante sur piedpintoj ekfaris la juston. Tiel oni ekdubis la mondon. Oni arbitre faris muzikon kaj faris detaleme decregulojn. Tiam oni ekdividis la mondon.

Sen detruo puran simplan arbon, kiel oni povus fari vinbarelon ĉizitan kun desegnoj? Sen detruo jaden, kiel oni povus fari insignon?²⁴⁵ Sen detruo virton de la natura vojo, kiel oni enkondukus devon de bonvoleco kaj justo? Sen disiĝo de natura sento, kiel oni uzus decregulojn kaj muzikon? Sen malordiĝo de kvin koloroj, kiel oni farus desegnojn. Sen malordiĝo de kvin voĉoj, kiel oni aplikus ses gamtonojn? Ke estas detruita la simpla materio kaj artefarita la instrumento, en tio kulpas metiisto. La sanktulo kulpas en tio, ke kun detruo de virto li faris bonvolecon kaj juston deviga.

La ĉevaloj, estante sur la tero, manĝas herbojn kaj trinkas akvon. Se ili ĝojas, interkruciĝante kolojn, kaj frotadas unu la alian. Se ili koleras, turnante sian dorson al la alia, kalcitradas unu la alian reciproke. Jen estis ĉio, kion la ĉevaloj sciis.

Oni aldonas al ili jugon kaj ornamaĵon al ilia frunto por bele aranĝi, kaj tiel la ĉevaloj siavice rompas kojnojn, kurbigas jugon, freneze furiozas, elvomas enbuŝaĵon, mordas kondukrimenon. Ke lasas ĉevalojn tiel ruze oponadi²⁴⁶, en tio kulpas Bo Luo.

En la epoko de la antikva reĝo He Xu²⁴⁷, popolanoj, sidante hejme, ne sciis kion fari kaj kien iri. Ili nur ĝojis, maĉante manĝaĵon en buŝoj, kaj ludis, batante siajn ventrojn. Al popolanoj nur eblis fari tiel. Kun apero de la sanktuloj, oni inklinis al decreguloj kaj muziko, kaj tiel oni provis korekti formaĵojn de la mondo, strebis trudite al bonvoleco kaj justo, kaj per tio oni konsolis koron de la mondo. Tiel do popolanoj, ekstarante sur piedpintoj, komencis ŝati la scion kaj konkurenci por profito inter si tiom, kiom estis nehaltigeble. En tio kulpas ankaŭ sanktuloj.

²⁴⁴ 素樸 neartefarita simpleco

²⁴⁵ 犧樽 estis uzataj por festado-oferado. 瑋璋 Insignoj de decreguloj uzataj en ceremonioj pro montri rangojn.

²⁴⁶ 盜 signifas ne ŝteladon, sed oponadon. [Ssk: 670]

²⁴⁷ 赫胥 Nomo de antikva reĝo, kiu aperas en la libro *Liezi*, kiel 華胥.

10 ŜTELADO DE KOFRO

Se gardi kontraŭ la ŝtelado el de kofro, sako kaj ŝranko, oni nepre vindas ilin per ŝnuroj kaj firmigas serurojn kaj agrafojn. Tio estas, t. n. saĝeco de mondanoj. Sed, okazas, ke iu granda ŝtelisto forkuras, portante ŝrankon, levante kofron kaj ŝarĝante sakon surdorse, malgraŭ prizorgado pere de firmaj seruroj kaj agrafoj. Tiel do la saĝeco de vilaĝano, supre menciita, kontraŭe akumulas predon por la granda ŝtelisto. Prove, ni argumentu pri tio. El la t. n. saĝecoj de mondanoj, ĉu troviĝus ia ajn saĝeco, kiu ne akumulas profiton por ŝtelistoj? El la t. n. sanktecoj, ĉu troviĝus ia ajn sankteco, kiu ne gardas profiton por la grandaj ŝtelistoj? De kie estas sciate pri tio?

Antikve en Qi-regno estis videblaj reciproke la najbaraj vilaĝoj-urboj²⁴⁸ kaj aŭdeblaj reciproke ilia kokokrioj kaj bojoj. Areoj, kie estis sternataj la retoj-sejnoj, kaj kampoj, kie agrokulturis plugiloj-hojoj, okupis pli ol dumil *li* kvadratojn.²⁴⁹ Ene de limoj en kvar direktoj estis kovritaj per la maŭzoleoj kaj la altaroj al la dio de tero kaj greno. Kaj regantoj de vilaĝoj-urboj, domkvartaloj, provincoj, komunumoj, kantonoj kaj ursanguloj neniam ne sekvis sanktulojn.²⁵⁰

Sed Tian Cheng-zi iu matene mortigis la reĝon de Qi kaj uzurpis la regnon.²⁵¹ Li ne nur la regnon, sed ankaŭ ŝtelis samtempe la leĝojn, kompilitajn de tieaj sanktaj saĝoj. Tial do Tian Cheng-zi, kvankam nomata “rabisto”, tamen li mem komforte sidas sur la posteno, samkiel Yao kaj Shun. Malgrandaj landoj ne riproĉas lin, grandaj regnoj ne aŭdacas puni lin. Tiele lia dinastio tenis Qi-regnon dum dek du generacioj. Ĉu tio ne signifas, ke li uzurpis Qi-regnon kaj samtempe ŝtelis la leĝojn de sanktaj saĝoj, per tio gardis sin, kiel ŝteliston?

Mi provos argumenti pri tio. El inter tiel nomataj de mondanoj, grandaj intelektuloj, ĉu troviĝas iu ajn, kiu ne akumulis predon por grandaj ŝtelistoj? Ĉu el inter sanktuloj troviĝas iu ajn, kiu ne gardis por grandaj ŝtelistoj? Per kio estas sciate pri tio?

Antaŭe, Long Feng estis tranĉita; Bi Gan estis senintestigita; Chang Hong estis

²⁴⁸ 鄰邑

²⁴⁹ 方二千餘里 ĉirkaŭ 810 km²

²⁵⁰ 邑, 屋, 州, 閭, 鄉, 曲. Yi konsistis el 12 Wu. Lü konsistis el 25 familioj. Zhou konsistis el 125 Lü. Xiang konsistis el 5 Zhou. [CGy:266]

²⁵¹ 田成子 Persona nomo estis Hen 恒 aŭ Chang 常. Cheng-zi estas postmorta nomo. En 481 a. K. la granda oficisto Tian Chang mortigis la dukon Jian, kaj starigis sur trono la dukon Ping. En 391 a. K., Tian He detronigis la dukon Kang kaj en 386 a. K., forpelinte Kang al maro, li fariĝis la reĝo de Qi-regno.

disŝirita; Zu Xi estis restigita putri.²⁵² Ĉar tiuj kvar personoj estis saĝaj, al ili ne eviteblis la tragika morto.

Iam unu el ŝtelistanoj demandis la grandan ŝteliston Zhi: “Ĉu estas Tao (la Vojo) ankaŭ por ŝtelistoj?”

Zhi respondis: “Kien ajn oni iras, nenie ne povas esti la Tao. Al ni estas sankta sondi trezorejon en iu ĉambro. Estas kuraĝo eniri la unua. Estas justo eliri la posta. Antaŭjuĝi pri ebleco aŭ neebleco etas saĝo. Dividi predon egale estas bonvoleco. En la mondo ankoraŭ troviĝas neniu granda ŝtelisto, kiu ne posedis la kvin principojn.”

Laŭ tio oni povas vidi, ke al bonulo ne eblas stariĝi sen posedi la Taon de bonuloj kaj ankaŭ al Zhi ne eblas ŝteli sen posedi la Taon de sanktuloj. En la mondo da bonuloj estas malmulte, sed da nebonuloj estas multe. Tio signifas, ke la sanktulo profitigas la mondon malpli ol malprofitigas la mondon. Tial do estas dirite: “Sen lipoj frostiĝas dentoj, kaj kiam vino de Lu-guo estas maldensa, tiam la lando de Handan estas sieĝota.”²⁵³ Estiĝo de la sanktulo okazigas la grandan kontraŭleĝulon.²⁵⁴ Batu la sanktulon kaj delasu la kontraŭleĝulojn. Tiam finfine la mondo estus bone regata. Se rivero elĉerpiĝis, la valo malpleniĝas. Se monteto ebeniĝas, la profundegejo ŝutpleniĝas. Se sanktuloj formortos, ankaŭ la kontraŭleĝuloj ne estiĝos. La mondo fariĝos paca kaj senakcidenta.

Se ne mortus la sanktuloj, ne ĉesus la grandaj ŝtelistoj. Spite ke la sanktuloj unuj post la aliaj regis la mondon, tio nur profitigis la ŝteliston Zhi unu post la alian.

Kion regantoj, establinte volumenometron, mezuras, tion ŝtelistoj ruze ekspluatas,

²⁵² Guan Long Feng estis ministro en la fino de Xia-dinastio, mortigita de Jie pro kritika admono al li. Bi Gan, onklo de Zhou, estis mortigita de Zhou, kiu volis vidi inteston de la saĝulo. Chang Hong, ministro kaj granda oficisto en Zhou-dinastio, estis mortigita de la reĝo Jing. Zi Xi, Chu-landano, granda oficisto kaj strategisto en Wu-regno, sinmortigis pro la reĝo Fu Chai kaj lia korpo estis forĵetita en la rivero.

Laŭ mia kompreno, Zhuangzi citas la ekzemplojn de saĝuloj por montri, ke ili mem estis elstaraj je “sia saĝo”, lojalaj servantoj al tiranoj kaj mortigitaj pro “sia saĝa” admono.

²⁵³ 唇竭則齒寒,魯酒薄而邯鄲圍 竭 signifas “leviĝi” kaj “elĉerpiĝi. Lipoj gardas dentojn, do por dentoj devas esti zorgataj la lipoj. Tiu proverbo ofte aperas en antikvaj ĉinaj libroj. Se Lu-guo estas atakata pro maldolĉa vino, eĉ la ĉefurbo de Zhao-guo estas sieĝata. La vino devus esti pura, sankta. Por klarigo de la frazo troviĝas du diversaj versioj. Unu estas jena: Je la kunveno de estroj de regnoj kaj landoj, iniciatita de la reĝo de Chu-regno, donacis vinon Lu-regnano kaj Zhao-regnano. Unu estas maldensa kaj la alia estas densa. Servisto de Chu-regno, ne ricevante koruptaĵon de Zhao, ŝanĝis vinojn. Do la reĝo de Chu-regno, preninte la Zhao-regnon por donacinto de maldensa vino, atakis la lastan. La alia versio estas jena: Zhao kaj Chu-regnoj estis la aliancanoj. Chu ekatakis Lu-regnon pro maldensa vino, Liang-regno, prenante okazon de militiro far Chu al Lu, ekatakis Zhao-regnon.

²⁵⁴ 盜 Laŭ la vortaro de Shirakawa estas skribite: “盜 signifas politikajn emigrantojn, kiuj rifuzis estantan socian ordon de la komunumo kaj postulas la reformon.”[Sks: 670]

uzante la volumenometron. Kiam la regantoj, establinte pesilon, pesas, tiam la ŝtelistoj ruze ekspluatas tion, uzante la pesilon. Kiam la regantoj, establinte atestilojn, kreas kreditigilojn, tiam la ŝtelistoj ruze ekspluatas tion, utiligante la kreditigilojn. Kiam la regantoj, establinte bonvolecon kaj juston, rektigas moron, tiam la ŝtelistoj ruze ekspluatas tion sub la nomo de la bonvoleco kaj justo.

Per kio estas sciante pri tio? Kiu ŝtelas bukon, tiu estas punita. Sed, kiu ŝtelas landon, tiu fariĝas landestro. Bonvoleco kaj justo apartenas al la pordo de landestroj, do ĉu tio ne signifas, ke landestroj ŝtelas la bonvolecon, juston kaj saĝon? Ili forviŝas la nomon de grandaj ŝtelistoj, fariĝinte landestroj, kaj ŝtelas ĉiujn kune, la bonvolecon-juston, kaj profiton de volumenometro, pesilo, kreditigiloj. Ilin ne eblas stimuli eĉ per laŭdado, kiel donaco de ĉaroj aŭ kronoj por altranguloj, nek eblas deteni per punado de hakiloj. Sanktuloj kulpas en tio, ke ili multfoje profitigis ŝtelistojn, kiel Zhi, kaj ne povis malpermesi.

Tiel do estas dirite: “La fiŝo ne povas forlasi la profundan akvon, kaj la plej akraj armiloj de la regno ne povas esti montrataj al homoj.”²⁵⁵

La sanktuloj estas la plej akraj armiloj en la mondo. Ili ne devas esti montrataj al la mondo.

Tial do, se forlasi la sankton kaj forĵeti la saĝon,²⁵⁶ ĉesos la granda ŝtelado. Se forĵeti la jadon kaj disrompi perlojn, ne okazos la malgranda ŝtelado. Se bruligi atestilojn kaj disŝiri kreditigilojn, la popolo fariĝos simpla. Se frakasi volumenometrojn kaj disrompi pesilojn, la popolo ne kverelos. Nur post kiam frakasitaj estas la sanktaj leĝreguloj de la mondo, la popolo ekpovos diskuti kune.

Kiam oni disrompos kaj forĵetos ses tonojn, kiam oni forbruligos fluton kaj luton, kiam oni ŝtopos orelojn de blinda majstro Kuang, nur tiam ĉiu homo en la mondo havigos al si kapablon de aŭskultado. Kiam oni ruinigos desegnojn kaj disigos kvin kolorojn, kaj kiam oni fermos per gluo okulojn de Li Zhu, nur tiam ĉiu homo en la mondo havigos al si kapablon de luma vidado. Kiam oni rezignos kurbolinilon kaj rektoŝnuron kaj forĵetos cirkelon kaj ortilon, kiam oni katenos fingrojn de metiisto Chui, nur tiam ĉiu homo en la mondo havigos al si la lertecon. Tial do estas dirite: “Granda lertulo similas al mallertulo.” Kiam oni forigos la konduton de Zeng kaj Shi, kiam oni fermos la buŝojn de Yang kaj Mo, kiam oni forĵetos la bonvolecon kaj la juston, nur tiam la virto en la mondo atingos la misteran unuecon.²⁵⁷

²⁵⁵ 老子、道德經第 36 章 Traduko de Wang Chongfang. [WCI: 210]

²⁵⁶ Ibid., ĉap. 19 絕聖棄智、民利百倍. “Forigu la saĝecon kaj rezignu la sagacon, kaj la popolo havos de tio centoble pli da bono.”[WCI:138]

²⁵⁷ 玄同 Wang Chongfang esperantigis la vorton “la perfekta harmonio”. [WCI: 290] Tiel malaperis en Ĉinio heredantoj de ideoj Yang Zhu-ismo kaj Mohismo.

Se ĉiu homo entenas la lumon, tiam la mondo ne fandiĝas. Se ĉiu homo havigas al si kapablon de aŭskultado, tiam la mondo ne komplikiĝas. Se ĉiu homo entenas la saĝon, tiam la mondo ne konfuziĝas. Se ĉiu homo entenas la virton, tiam la mondo ne deflankiĝas.

Tiuj personoj, kiel Zeng kaj Shi, Yang kaj Mo, Majstro Kuang, Metiisto Chui,²⁵⁸ Li Zhu, estas ĉiuj starigintaj la virton eksteren kaj per tio dazlis kaj misgvidis la mondon. Nenie estas uzeblaj iliaj metodoj.

Ĉu vi sola ne scias la mondon de la pleja virto? Antikve estis tiaj reĝoj, kiel Rong Cheng, Da Ting, Bo Huang, Zhong Yang, Li Lu, Li Xu, Xian Yuan, He Xu, Zun Lu, Zhu Rong, Fu Xi, kaj Shen Nong.²⁵⁹ Tiam popolo, nodante ŝnurojn, interkonsentis, gustumis la manĝaĵoj bongustaj, vestis la vestaĵon bela, ĝuis la moron plezuriga, vivis en la loĝejoj pace.

Spite ke najbaraj landoj povas vidi unu la alian kaj aŭdi reciproke kokojn-hundojn kriantaj-bojantaj, popolanoj de ambaŭ landoj ne interrilatas reciproke ĝis la maljuniĝo kaj la morto. Tia tempo eblas ekzisti nur en la epoko de la pleja regado.

Sed nun oni igas popolanojn kun streĉitaj koloj kaj levitaj kalkanoj atendi saĝulon, dirante: “Jen ie troviĝas la saĝulo!” Kaj ili iras haste tien, kunportante provizojn. Iuj el ili, forĵetinte siajn gepatrojn interne kaj forlasinte devon de servado al estroj ekstere, foriras al la landlimo aŭ veturas for eksteren je mil *lioj*. Tio okazas pro eraro, ke suprujoj ŝatas la saĝon. Se la supro, ŝatante la saĝon, ignoras la Taon (Vojon), tiam la mondo ege malordiĝas.²⁶⁰

Per kio estas sciata tiel? Ju pli multe da apartaĉoj, kiel pafarkoj, arbalestoj, retoj aŭ harpunĵetilo, des pli konfuziĝas birdoj supre. Ju pli multe da fiŝkaptiloj, kiel fiŝhokoj kun logaĵoj, seĵnoj, troloj aŭ nasoj, des pli konfuziĝas fiŝoj en akvo. Ju pli multe da bestkaptiloj, kiel kestkaptilo, enfalujo aŭ kaptoreto, des pli konfuziĝas bestoj ĉe marĉo. Ju pli multe da kuriozaĵoj de logikaĉo, kiel saĝumaĵo, ĉikanaĵo aŭ sofismaĵo pri “hardeco kaj blankeco” aŭ dialektiko pri sameco kaj malsameco, des pli konfuziĝas mandanoj je parolado. En tio, ke la mondo ĉiam ege konfuziĝas en malluma kaoso, estas kulpa la inklino al saĝeco.

Tiel do ĉiuj en la mondo povas serĉadi kion ne scias, sed tamen neniu povas serĉi kion

²⁵⁸ 工[イ垂] Legenda metiisto.

²⁵⁹ 容成, 大庭, 伯皇, 中央, 栗陸, 驪畜, 軒轅, 赫胥, 尊盧, 祝融, 伏戲 Ĉiuj estis legendaj antikvaj reĝoj.

²⁶⁰ En Rusio, en 19-a jc., Slavofiloj kritikis Okcidentalistojn per la sama logiko, ke la lastaj perdas sian fundamentan terenon, serĉante la saĝon de Eŭropo. Tio estis la plej grava temo de la rusa literaturo – “superflua persono”, suferanta pro saĝo.

jam scias. Ĉiuj povas kritikadi tion, kion oni konsideras malbona, sed tamen neniu povas kritiki tion, kion oni jam konsideras bona. Per tio ege konfuziĝas. Tiele supre oni damaĝas lumon de la suno kaj la luno, sube oni forbruligas animojn de la montoj kaj la riveroj, meze oni detruas movadon de kvar sezonoj. Eĉ neniu el peristalte moviĝantaj vermoj kaj flugilbatadantaj kreitaĵoj ne perdis la denaskan naturon. Kiel granda estas damaĝo, ke la inklino al saĝo konfuzas la mondon!

Depost la tri dinastioj daŭras nur tiele. Forlasinte simplan laŭnaturan popolon, oni ĝojas pri fervoraj ruzaj flatuloj. Forĵetinte la senafektan nenion-faradon, oni ĝojas pri trudema ambicio. La trudemeco ege konfuzas la mondon.

11 LASU ESTI

Mi aŭdis, povas esti, ke oni lasas la mondon esti laŭ ĝia plaĉo, sed ne aŭdis, povas esti, ke oni regas la mondon. Oni lasas ĝin libera pro timo, ke ne malpuriĝu la denaska naturo de la mondo. Oni toleras ĝin pro timo, ke la virto de la mondo ne transformiĝu. Se la mondo ne malpuriĝus je la denaska naturo kaj je la virto, ĉu necesus iu, kiu regas ĝin?

Antikve Yao, regante la mondon, ege ĝojigis la mondon kaj igis homojn ĝui la denaskan naturon. Tio estas maltrankvila. Kiam Jie regis la mondon, li ege lacigis la mondon kaj igis homojn suferi pro la denaska naturo. Tio estas malagrabra. Ke estas maltrankvila kaj malagrabra, tio ne estas virta. En la mondo estas nenio, kio, ne estante virta, estus longdaŭra. Se homoj nur ĝojegas, tio akcelas *yang*. Se homoj nur koleregas, tio akcelas *ying*. Kiam akceliĝas ambaŭ *ying* kaj *yang*, kvar sezonoj ne venas enorde kaj ne akordiĝas malvarmo kaj varmo. Tio, male, damagos la korpon de homoj.

Se homoj perdas limon de ĝojo aŭ kolero kaj perdas konstantecon de la vivo, tiam ili ne povas teni sin je prudenteco nek je modereco de ora mezo. Tiuokaze la mondo ekestas aroganta, impertinenta, egocentra kaj atakema, kaj poste estiĝas la konduto de la ŝtelisto Zhi aŭ de konfuceanoj Zeng kaj Shi.

Tial ne sufiĉas per tio, ke la tuta mondo rekompencu la bonulojn, ne sufiĉas per tio, ke la tuta mondo punu la malbonulojn. Kvankam la mondo estas granda, tamen ne sufiĉas, por ke ĝi povu rekompenci la homojn per laŭdado kaj punado. Depost tri dinastioj oni haste kaj malkviete okupiĝas pri laŭdado kaj punado. Oni ne povas ripozi, ne havante la tempon por sekvi la senton de denaska naturo.

Kaj kiam oni ĝuas vidadon, tiam oni diboĉas je koloroj. Kiam oni ĝuas aŭdadon, tiam oni diboĉas je voĉon. Kiam oni ĝuas bonvolecon, tiam oni konfuzas virton. Kiam oni ĝuas juston, tiam oni kontraŭas ptovidencon. Kiam oni ĝuas decregulojn, tiam oni akcelas la teknikon. Kiam oni ĝuas muzikon, tiam oni akcelas diboĉadon. Kiam oni ĝuas sanktecon, tiam oni akcelas artaĵon. Kiam oni ĝuas intelekton, tiam oni akcelas insulton.

Se la mondo kontentas je la denaska naturo, la menciitaj ok ĝuoj estas tute egale, ĉu ekzistus aŭ ne ekzistus. Se la mondo ne kontentas je la denaska naturo, tiam la ok menciitaj ekkonfuzas la mondon, komplikante, vulgarigante kaj plenŝtopante. Sed la mondanoj ekrespektas tiajn ĝuojn kaj sopiras ilin. Ho ve, kiel la mondo freneziĝas je iluzio! Ĉu oni ne devus nur preterpasi ilin? Sed, male, oni laŭdas ilin, eĉ purigante sin per abstino, promocias ilin, respektplene sidante kun rekta pozo, kaj dancas laŭ ili,

tamburante kaj kantante. Kion do mi povus fari al tio?

Tial, se noblulo okupas la postenon de regado, estas nenio pli bona ol nenionfarado. Ĉe nenionfarado oni trankvilas laŭ sento de la denaska naturo. Tiele, kiu zorgas pri si mem pli ol pri regado de la mondo, al tiu oni povas komisii la mondon. Kiu amas regi sin mem pli ol la mondon, al tiu oni povas konfidi la mondon. Tial do, se noblulo ne trudas al si disŝiri siajn kvin organojn, nek elstarigi sian saĝecon, tiuokaze li, estante mem kvieta, ekaperos kvazaŭ drakono, kaj, estante mem silenta, ektondros je sia voĉo, kaj, laŭ la movo de lia koro la Ĉielo sekvos, kaj ĉio vigliĝos, dum oni sidas kviete, nenion farante. Li dirus: “Ĉu mi havus tempon por regi la mondon?”

Cui Qu demandis Lao Dan, dirante: “Se ne regi la mondon, kiel kontroli la koron de homoj?”²⁶¹

Lao Dan diris: “Vi estu prudenta kaj ne tuŝaĉu la koron de homoj. La homa koro impetas supren, forpuŝante subon, kaj amase buĉas supron kaj subon. Iam la koro moligas la rigidaĵon per ĉarmego aŭ tranĉas kaj ĉizas ĝin. La homa koro estas arda, kvazaŭ bruliganta fajro, kaj estas frida, kvazaŭ frostiĝinta glacio. Ĝia movo estas tre subita, ke ĝi kovradas dufoje la eksteron de kvar maroj dum momento de unu kapmoviĝo de sube al supro. Kvankam ĝi dume staras kvieta, kvazau abismo, tamen, foje ekmoviĝante, subite pendiĝas sur la ĉielo. Kio, arbitra kaj kaprica, ne estas ligitebla, tio estas nur la koro de homoj.”

Antikve la Flava Imperatoro ektuŝaĉis la koron de homoj per bonvoleco kaj justo. Reĝoj Yao kaj Shun nutris la korpon de la mondanoj, laborante per ĉiuj fortoj tiel ke ili defrotis harojn sur femuroj kaj tibioj. Ili, suferigante siajn kvin organojn, faris la aferojn de bonvoleco kaj justo kaj, konsumante energion de sango kaj spiro, rektigis leĝo-regulojn. Spite ĉion ĉi tion, restis ankoraŭ io neplenumbla. Finfine Yao forsendos Huan Dou al la monto Chong, forpelis etnon San Miao al okcidenta Sanwei, ekzilis Gong Gong al la urbo You. Ĉar al li estis nevenkebla la mondo.²⁶²

Kaj ĉe la tri dinastioj la mondo ege streĉiĝis. Sube troviĝis tirano Jie kaj ŝtelisto Zhi, supre troviĝis konfuceanoj Zeng kaj Shi. Aperadis sinsekve konfuceanismo kaj mohismo. En tiu situacio suspektadis sin reciproke la gojantoj kaj la kolerantoj, trompadis sin reciproke malsaĝuloj kaj saĝuloj, kritikadis sin reciproke bonuloj kaj malbonuloj,

²⁶¹ 藏 Multaj esploristoj prenas ĝin por eraro de 臧 (plibonigi). Sed ĝi havas signifon “konservi, kontroli”.

²⁶² 黃帝, 堯, 舜 Nomoj de legendaj sanktaj reĝoj. 謹兜 estis subulo de Yao. 三苗 estis tribo, kontraŭinta al Yao. 共工 estis nomo de ofico, okupiĝanta pri akvo. 崇山, 三峽, 幽都 estas lokonomoj. Laŭ *Shiji*[五帝本紀], ili fariĝis prapatroj de barbaroj: 共工-北狄, 謹兜-南蠻, 三苗-西戎. Kaj aldone, orientaj barbaroj 東夷 – 殛鯀.

riproĉadis sin reciproke fanfaronuloj kaj honestuloj, tiele la mondo dekadencis.

En la mondo la granda virto iĝis malsama kaj la denaska naturo iĝis plena de kaoso. Mondanoj ŝatis intelekton, kaj popolanoj ne povis kontentigi sian senbridan avidon. Tiel do oni provus ekkontroli per hakiloj kaj segiloj, normigi per mezurilo de tuĉ-ŝnuroj, skulpti per boriloj kaj ĉiziloj. Kaj la mondo ege malglate konfuziĝis. Kulpas tio, ke oni tuŝacis la koron de homoj. Tiele saĝuloj kaŝite emeritiĝas en la grandaj montoj aŭ sub la krutaj rokegoj. Reĝoj de dekmil ĉaroj ĉagreniĝas sur la halo de maŭzoleo.

En nuna mondo kuŝas vice multe da punmortigitoj, amasiĝas vice multe da katenitoj kaj troviĝas vice multe da punitoj. Tiel do sub la jugo konfuceanoj kaj mohistoj ekagas energie, impetante kaj svingante manojn. Ho ve, terure! Al ili mankas prudenteco, ili ne sentas honton, ho terure. Al mi ankoraŭ ne estas sciate, ke sankta saĝo ne fariĝu la kateno por bridligi, ne sciate, ke bonvolenco kaj justo ne povus esti jugo kun ligiloj. Kiel ne estus sciate, ĉu konfuceanoj Zeng kaj Shi ne estu fajrosago²⁶³ de tirano Jie kaj ŝtelisto Zhi. Tial mi diras: “Forlasu la sanktecon, forĵetu la saĝecon, kaj la mondo estos bone regata.”

Pasis 19 jaroj post kiam ekregis la Flava Imperiestro kiel la Ĉiela Filo, kaj liaj ordonoj estis plenumataj en la mondo. Li aŭdis, ke la Majstro Guang Cheng loĝas sur la monto Kong Tong, do li iris viziti lin.²⁶⁴ Li diris: “Mi aŭdis, ke vi atingis la plejan vojon. Mi volus demandi vin, kio estas la senco de la pleja vojo. Mi dezirus, prenante la esencon de la Ĉielo kaj la Tero, helpi al kvin cerealoj kreski kaj nutri popolon. Mi dezirus ankaŭ lerni funkcion de *ying* kaj *yang* por vigligi amason da vivantoj. Kiel fari tion?”

La Majstro Guang Cheng diris: “Tio, pri kio vi volus demandi, estas la kvalito de aĵoj, tamen, tio, kion vi dezirus regi, estas feĉo de restintaĵoj. De kiam vi ekregis la mondon, lumo de la suno kaj la luno difektiĝis pli kaj pli, tiel ke pluvos, dum ne amasiĝis nuboj, tiel ke falas folioj de herboj kaj arboj, ne atendante la flaviĝon. Vi, flatulo, estas malprofunda je koro. Vi ne meritas ja la homon, al kiu indas paroli la plejan vojon.”

La Flava Imperiestro retiriĝis, forlasinte la mondon, konstruis al si la apartan ĉambron kaj, sterninte maton el blanka imperato, kviete sidis tie tri monatojn. Poste denove li iris peti de li. La Majstro Guan Cheng kuŝis, turnante sian kapon al sudo.

La Flava Imperiestro kun humila sinteno alproksimiĝis al li, irante surgenu, riverencadis ripete kun kapo mallevita surteren, kaj redemandis, dirante: “Mi aŭdis, ke

²⁶³ 嚙矢 Fajrosago signifas antaŭiranton. Sed tirano Jie vivis antikve ol konfuceanoj, do tiu vorto devas esti simbola.

²⁶⁴ 廣成子 Fikcia nomo de feo. Iu konsideras ĝin kiel alinomo de Lao-zi. [GWj: 392] 空洞 Fikcia nomo de monto. La signifo estas “malplena sameco”. Iu opinias, ke la monto reale ekzistas. [GWj: 392]

vi atingis la plejan vojon. Mi volus demandi vin, kiel vi regas vin mem por longevivi.”

La Majstro Guang Cheng ekstaris kaj diris: “Bona demando. Venu, mi diru al vi pri la pleja vojo. La kvintesenco de la pleja vojo estas profunda mallumo, la kulmino de la pleja vojo estas malluma kvieto.²⁶⁵ Do estas neniel videble, neniel aŭdeble. Se vi tenas vin kvieta je koro, tiam la korpo iĝas ĝusta per si mem. Se oni nepre tenas sin mem kvieta kaj nepre pura, sen zorgado de sia korpo, sen ŝanceliĝo de sia esenco, tiam oni povas longevivi. Se nenion al okuloj vidi, nenion al oreloj aŭdi, nenion al koro scii, via spirito ĝuste gardas la korpon, kaj tiel la korpo longevivas. Estu diskreta interne, fermu vin mem ekstere. Ju pli multe da perceptoj, des pli multe da eraroj.

Mi lasas vin supreniri la grandan lumon kaj atingi la fonton de la pleja *yang*. Mi lasas vin eniri la pordon al la profunda mallumo kaj atingi la fonton de la pleja *ying*. Sur la ĉielo kaj la tero estas la funkcioj, kaj ĉe *ying-yang* estas entenata la energio. Estu diskreta kaj singardu, la aĵoj mem plenvigliĝos. Mi gardas la unuecon, per tio sidas en la harmonio. Tial do mi regas min dum 1200 jaroj, tamen mi ankoraŭ ne putras je la korpo.”

La Flava Imperiestro riverencadis ripete kun kapo mallevita suben, dirante: “La Majstro Guang Cheng, per via vorto vi parolas al mi pri la Ĉielo.”

La Majstro Guang Cheng diris: “Venu, mi diros al vi. Tio mem estas sen limo, tamen ĉiuj homoj konsideras tion havanta la finon. Tio mem estas nemezurebla, tamen ĉiuj homoj konsideras tion havanta la limon. Kiu havigos al si mian vojon, tiu fariĝos supre imperiestro kaj sube reĝo. Kiu perdas mian vojon, tiu nur vidas lumon supren kaj iĝas turbulo suben. Cent vivaĵoj, ĉiuj naskiĝas de sub la tero kaj revenas teren. Tial do mi ĝuste forlasos vin, eniros la pordon al senlimo, kaj ludos sur senlima kampo. Mi iĝos tiel luma, kiel suno kaj luno, iĝos tiel eterna, kiel la ĉielo kaj tero. Se oni proksimiĝu al mi, ne vidas min pro minimumo, se oni malproksimiĝu de mi, ne vidas min pro mallumo. Ĉiuj homoj tute mortos, mi sola ekzistos.”

Generalo Nubo, Yunjiang, vagadis orienten, trapasinte branĉon de sankta arbo Fuyao, hazarde renkontis s-ron Univers-spiro, nomatan Hongmeng.²⁶⁶ Hongmeng estis ludanta, frapante al si femulojn kaj saltante kvazaŭ pasero. Yunjiang, vidante lin, haltis surprizite, kaj, starante senmove, demandis: “Avo, kio vi estas? Kial vi faras tiel?”

Hongmeng, ne ĉesante frapadon de femuoj kaj paser-saltadon, respondis al Yunjiang:

²⁶⁵ 窈窈冥冥, 昏昏默默 Iu esploristo komprenas la esprimon kiel “nenion”無. [GWj: 394] En Dao De Jing 21 ĉap. de Laozi estas skribite: “Tiel profunda kaj obskura ĝi [tao] estas, tamen en ĝi estas tenata la subtila esenco.” 窈兮冥兮、其中有精 [Trad. de WCf: 147]

²⁶⁶ 雲將 signifas generalon de nubo, 鴻蒙 signifas fonton de spiroj. 扶搖 estas sankta arbo, kreskanta ĉe la orienta maro.

“Mi ludas.”

Yunjiang diris: “Mi volus demandi vin.”

Hongmeng suprenrigardis Yunjiang-on, dirante: “Aha?”

Yunjiang diris: “Ĉiela spiro ne akordiĝas, tera spiro estas morna, ses *ĉ*roj ne harmonias, kvar sezonoj malordas.²⁶⁷ Nun mi dezirus akordigi ses *ĉ*rojn kaj per tio kreskigi amason da vivaĵoj. Kiel mi povas fari tion?”

Hongmeng, frapante femulojn kaj saltante kvazaŭ pasero, kapneis kaj diris: “Mi ne scias, mi ne scias.”

Yunjiang ne povis daŭrigi la demandon.

Pasis tri jaroj, Yunjiang iris ludi orienten. Trapasinte la kampon de Song-lando, li renkontis bonokaze Hongmeng. Yunjian ĝojegis kaj, kurante al li, diris: “Ho, Ĉielo! Ĉu vi forgesis min? Ĉu vi forgesis min?” Riverencante ripete, kun kapo malle vite, Yunjiang dezirus aŭdi lin.

Hongmeng diris: “Mi, flosante, ne scias kion serĉi, kaj, estante frivola, ne scias kien iri. Libere ludante, mi vidas nur seniluzion. Kion do mi scias?”

Yunjiang diris: “Ankaŭ mi mem faras frivolaĵon, tamen popolo sekvas min kien ajn mi iras. Mi ne devas ne klopodi la popolon kaj nun la popolo dependas de mi. Mi petas vin, lasu min aŭdi unu vorton de vi.”

Hongmeng diris: “Se konfuzi racion de la Ĉielo kaj kontraŭi al sento de aĵoj, la Nigra Ĉielo²⁶⁸ ne efektiviĝos. Bestoj disiĝas de gregoj kaj komunumoj, ĉiuj birdoj kantas nokte, abnormas herboj kaj arboj, plagoj trafas insektojn. Ho ve, ĉio ĉi-tio estas kaŭzita per eraro regi homojn.”

Yunjiang diris: “Se tiel, kion mi devas fari?”

Hongmeng diris: “Ho ve, vi tute toksigiĝis! Tuj foriru! For, subite!”

Yunjiang diris: “Estas malfacile por mi vidi Ĉielan homon. Mi petas vin, mi dezirus aŭdi de vi unu vorton!”

Hongmeng diris: “Ho, vi nutru mem vian koron. Se vi nur restu sen ago, ĉirkaŭaĵoj ŝanĝiĝos per si mem. Forĵetu viajn formojn, rezignu viajn perceptojn per oreloj kaj okuloj, forgesu homan etikon kaj aĵojn, kaj tute akordiĝu kun la senlima mallumo. Liberigu koron, forlasu nervon, se estu kvietaj kaj sen animo, tiam ĉio vigliĝos kaj revenos al sia propra radiko. Se reveni al la radiko, ĉio senscie en ĥaoso ne disiĝos de ĝi ĝis la fino. Se oni foje ekscios, ĉio disiĝos de ĝi. Se ne demandu la nomon, se ne observu

²⁶⁷ 天氣, 地氣, 六氣. Ses *ĉ*roj konsistas el ying, yang, vetro, pluvo, mallumo kaj lumo. [陰陽風雨晦明].

²⁶⁸ 玄天 Nigra aŭ malluma Ĉielo. En la komenco de Dao De Jing estas la fama frazo: 玄之又玄、衆妙之門[Mistero el la misteroj, la pordo de ĉiuj mirindaĵoj – trad. de Wang Chengfang]

la formon, la aĵoj nature naskiĝas per si mem.”

Yanjiang diris: “Vi, kiel la Ĉielo, komplezis min per virto, montris al mi per silento. Kion mi mem serĉis per tuta korpo, tion mi nun akiris fine.” Li riverencis ripete kun kapo mallevita, stariĝis, adiaŭis kaj foriris.

Mondanoj ĝenerale ĉiuj ĝojas je sameco de aliuloj kun si, malamas la malsamecon. Kiu ŝatas la samecon kun si kaj malŝatas la malsamecon, tiu en sia koro volas distingi sin el inter la amaso. Sed kiu en sia koro volas distingi sin el inter la amaso, tiu neniam povos elstari pli ol la amaso. Estu kontenta dependi de la amaso. Kiom ain vi aŭdus, via kapablo ne superus multediversajn talentojn de la amaso.²⁶⁹

Tamen kiu volus regi la regnon, tiu vidas nur avantaĝon ĉe tri reĝoj, sed ne ilian aflikton. Tio egalas al spekulacio per regado de regnoj. Kiom da spekulantoj ne perdis regnojn! Sukcesis daŭre ekzisti nur malpli ol unu el dek mil. Perdis regnojn pli ol dek mil, dum eĉ unu ne sukcesis. Ho ve, estas triste, ke tion ne scias regantoj de teroj.

La reganto de tero posedas ion grandan. La posedanto de io granda ne povas esti nura aĵo. Estante aĵo, li ne estas nura aĵo. Do li povas esti la aĵo de aĵoj. Kiu klare scias sin la aĵo de aĵoj, jam ne estas nura aĵo. Li povas regi ne nur la popolon sub la ĉielo, sed povas en- kaj eliradi ses regnojn kaj ludvagadi laŭ la tuta mondo, povas sola iri kaj sola veni. Tio estas nomata “Sola Esto”.²⁷⁰ Tiu “Sola Esto” estas nomata “la Pleja Kara”.²⁷¹

Instruado fare de la Grandulo similas al la ombro rilate formon, aŭ al sonoro rilate voĉon. Demandite, li responas. La demandanto elverŝas ĉion, kion havas en koro, kaj la Grandulo fariĝas lia akompananto. Li mem estas en la sensora situo kaj iras ien ajn sendirekte, flekseble iras tien kaj reen kune kun vi, kaj per tio ludvagas senlime kaj el- kaj eniradas ien ajn sendifine. Lia tago ne havas komencon. Liaj vortoj, formo kaj korpo akordiĝas kun la Granda harmonio. En la granda akordiĝo ne estas lia egoo. Sen “memo” kiel eblus esti posedaĵo? Kiu rigaras eston-posedaĵon, tiu estas antikvaj reĝoj. Kiu rigardas “neniecon”, tiu estas amiko de la ĉielo kaj la tero.

Kvankam malalta, tamen uzenda estas aĵo. Kvankam malnobla, tamen fidenda estas la popolo. Kvankam kaŝita, tamen fareda estas la afero. Kvankam kruda, tamen proklamenda estas la leĝo. Kvankam fora, tamen observenda estas la justo. Kvankam intima, tamen disvastigenda estas bonvoleco. Kvankam modera, tamen ripete praktikenda estas decregulo. Kvankam meza, tamen altigenda estas la virto. Kvankam

²⁶⁹ Problemo en punktado. Mi sekvas la punktadon 因衆以寧。所聞不如衆技衆矣。

²⁷⁰ 獨有

²⁷¹ 至貴

unu sola, tamen ŝanĝiĝenda estas la Vojo. Kvankam dieca, tamen ellernenda estas la Ĉielo.

Do la sanktulo observas la Ĉielon, sed ne petas helpon.²⁷² Li plenumas la virton, sed ne laciĝas. Li ekiras de la Vojo, sed ne pedantas. Li povas esti bonvoleca, sed ne esperas tion de aliulo. Li alproksimiĝas al la justo, sed ne alteniĝas. Li konformas al decreguloj, sed sentabua. Li faras aferojn, sed sen vortoj. Li akordiĝas al leĝoj, sed ne trouzas. Li esperas al la popolo, sed ne traktas ĝin malatente. Li devenas de aĵoj, sed ne foriras. Aĵojn ne indas fari ĉefaj, sed ne endas ne trakti ilin.

Kiu ne klaras je la Ĉielo, tiu ne povas esti pura je virto. Kiu ne konas la Vojon, tiu ne povas esti bona per si mem. Kiu ne klaras je la Vojo, tiu estas mizera.

Kio estas la Vojo? Estas la Ĉiela Vojo, kaj estas la Homa Vojo. Kara sen artefarado estas la Ĉiela Vojo. Laciga kun artefarado estas la Homa Vojo. La ĉefa estas la Ĉiela Vojo, kaj la suba estas la Homa Vojo. Oni ne devas ne kompreni, kiel fora estas distanco inter la Ĉiela Vojo kaj la Homa Vojo.²⁷³

²⁷² Multaj esploristoj konsideras esprimon 於天不助 kiel “ne helpas al la Ĉielo”.

²⁷³ En tiu ĉapitro ne estas ignorata la Homa Vojo spite distancon de la Ĉiela Vojo. Diference de antaŭaj ĉapitroj estas alte taksata la sanktulo. Esploristoj konsideras tiun malsamecon kiel ŝanĝo de aŭtoroj. Sed mi ne konsentas kun la opinio, ke ĉi tie troviĝus cedo al konfuceanismo. Gravas, ke en Zhuangzi estas starigita la Ĉiela Vojo kiel pli alta ol la Homa. Tiu ideo neniam ŝanĝiĝas.

12 LA ĈIELO KAJ LA TERO

La Ĉielo kaj la Tero estas grandaj, sed egalaj je la transformiĝo. Estaĵoj estas multaj, sed unu tuto je la ordo. Subaj homoj estas amaso da, sed la ĉefo estas la suvereno. La suvereno baziĝas sur la virto, kaj iĝas kompleta laŭ la Ĉielo. Tiel do estas dirite, ke en pratempo antikvaj reĝoj regis la mondon senage. Tio estas ja la granda virto.

Se prezenti vortojn laŭ la Vojo, suverenoj en la mondo estas ĝustaj; se prezenti distingon laŭ la Vojo, estas klara la justo inter reĝo kaj subuloj; se prezenti kapablon laŭ la Vojo, oficoj en la mondo iĝas enorde; se prezenti ĉion laŭ la Vojo, ĉiuj estaĵoj iĝas pretaj je konformo.

Tiel do trapenetranta la Ĉielon kaj la Teron estas la virto. La plenumata en ĉio estas la Vojo. Per kio la supro regas la subojn, tio estas la afero. Kio faras la kapablon arto, estas la tekniko. La tekniko kununuiĝas kun la afero; la afero kununuiĝas kun la justo; la justo kununuiĝas kun la virto; la virto kununuiĝas kun la Vojo; la Vojo kununuiĝas kun la Ĉielo.

Tial estas dirite: “Ĉe tiu, kiu nutris antikve la mondon, kvankam li mem estis senavida, tamen la mondo iĝis plensufiĉa; kvankam li estis senaga, ĉiuj estaĵoj plenkreskis; kvankam li estis profunde kvietaj, ĉiuj popolanoj estis stabilaj.” Estas skribite en la libro: “Ĉio estas plenumata en la tuta unueco, atingita la kora nenieco kaj submetiĝis la Spiritoj kaj dioj.”²⁷⁴

La Majstro diris: “La Vojo kovras kaj subtenas ĉion. Ĝi estas vasta kaj granda. Nobluloj ne devas ne malfermi la koron. Kiu, ne farante, plenumi ion, tiu estas nomata la Ĉielo. Ne farante, eldiri ion, tio estas nomata la virto. Ami homojn kaj profitigi estaĵojn estas nomata la bonvoleco. Rigardi malsamajn samaj, tio estas nomata la granda. Ne aliigi la aliajn per konduto estas nomata la tolero. Konservi ĉies malsamecon de ĉio, tio estas nomata la riĉeco. Firme teni la virton, tio estas nomata la disciplino. Tio, ke efektiviĝas la virto, estas nomata ‘memstari’. Sekvi la Vojon estas nomata ‘preteco’. Tio, ke la strebo ne rompiĝas pro aĵoj, estas nomata ‘perfekto’. Noblulo, kiu havigis al si klare ĉi tiujn dek principojn, estas vasta je amplekseco kaj granda je la koro servadi al aferoj, kaj ĉio iras plenergia.

Tia persono tenas kaŝitan oron en la monto kaj tenas kaŝitan perlon en la abismo. Li ne faras varojn kaj trezorojn profitaj, nek proksimiĝas al alta rango kaj riĉo. Li ne

²⁷⁴ 記 Ne estas sciata, en kiu libro estis skribita la citaĵo. Iuj konsideras, ke tia eldiro estis en verko de Laozi, aŭ en 西升經. Spiritoj kaj dioj 鬼神

amuziĝas per longa vivo, nek malĝojas je frua morto. Ne honoras eminentecon, nek hontas je malriĉeco. Eĉ se havus profiton de unu generacio, li ne faras ĝin sia propraĵo. Eĉ se estus la reĝo en la mondo, li ne faras tion gloro. Ĉar estas ja klare, ke ĉio estas en unu tenejo kaj morto-vivo estas tute sama.”

La Majstro diris: “La Vojo ekzistas profunde, kaj pura estas la klara fluo. Sen tio ne eblas al bronzo aŭ ŝtono sonori. Pro tio la bronzo kaj ŝtono havas sonon. Ili mem nek pensas nek sonoras. Kiu el ĉiuj estaĵoj povus disponi tiel?

Havanto de la reĝa virto, estante simpla, hontas je sia lerteco pri aferoj.²⁷⁵ Li ja zorgas starigi la fundamenton de aferoj kaj zorgas ke lia saĝo atingu diojn.²⁷⁶ Tial do lia virto estas vasta. Kiam lia koro elmontriĝas, li tuj komprenas ajnan aĵon, estantan antaŭ si. Korpo ne naskiĝas se ne laŭ la Vojo, la vivo ne klaras se ne per la virto. Kiu povas penetri la vivon, tenante la korpon, kaj povas klarigi la Vojon, starigante la virton, tiu estas havanto de la reĝa virto, ĉu ne? Li estas vasta kaj energia, ekaperas subite kaj moviĝas abrupte. Lin sekvas ĉiuj estaĵoj. Li estas nomata “persono de la reĝa virto”.

Li vidas en la tuta mallumo kaj aŭdas en senvoĉa silento. En la tuta mallumo li sola vidas tagiĝon kaj en la senvoĉa silento li sola aŭdas harmonion. Profunde kaj profunde penetrante, li povas posedi estaĵojn, kaj, rigardante ilin diecaj kaj diecaj, li povas atingi ilian spiritecon.²⁷⁷ Je la aliro al ĉiuj estaĵoj, li, farante sin pleja nenio, sekvas ilian postulon, kaj subite laŭtempe serĉas la lokon, disponendan al ili, estantan granda aŭ malgranda, longa aŭ mallonga, kompakte proksima aŭ malproksima.”

La Flava Imperiestro vagis al la nordo de Ruĝa Akvo. Li supreniris al la monto Kunlun kaj vidis suden, kaj revenis hejmen. Li poste trovis, ke li perdis la Nigran perlon. Li sendis Saĝulon serĉi ĝin, sed ne povis trovi. Li sendis Li Zhu, la akrevidulon, serĉi ĝin, sed ne povis trovi. Li sendis Disputemulon serĉi ĝin, sed ne povis trovi. Fine li sendis Senformulon, kaj la Senformulo eltrovis ĝin. La Flava Imperiestro diris: “Eksterordinara estas tiu Senformulo, li povis trovi ĝin.”²⁷⁸

La Majstro-instruanto de Yao estas Xuyou, la Majstro-instruanto de Xuyou estas Nie

²⁷⁵ 王德 reĝa virto, 恥通於事 hontas je lerteco pri aferoj. En konfuceanismo tradicie ne estis taksata ia ajn lerteco aŭ tekniko en farado de aferoj.

²⁷⁶ 知通於神 Multaj esploristoj prenas la ideogramon 神 por mistero. Ĝenerale saĝo ĉe Zhuangzi estas traktata negative, sed ĉi tie traktata pozitive.

²⁷⁷ 神之又神而能精焉 Esploristoj prenas la ideogramon 神 por mistero.

²⁷⁸ 赤水 Nomo de fikcia rivero, ruĝo estas simbola koloro de sudo. 崑崙 Nomo de montaro 玄珠 Simbolo de Tao 知, 離朱, 喫話, 象罔 Ĉiuj estas fikciaj nomoj.

Que, la Majstro-instruanto de Nie Que estas Wang Ni, la Majstro-instruanto de Wang Ni estas Pi Yi.²⁷⁹ Yao demandis Xu You, dirante: “Ĉu eblas postenigi Nie Que kiel la Ĉielan Filon? Mi tra Wang Ni volus peti lin pri tio.”

Xu You diris: “Terure! Tio endanĝerigos la mondon. Nie Que, kiel homo, estas saĝa, intelekta, kaj forta je ciferoj, kalkulante rapide.²⁸⁰ Lia denaska kapablo superas homan nivelon, spite ke li ricevis de la Ĉielo homan korpon. Li lertas malpermesi erarojn. Sed li ne scias, de kie naskiĝas la eraroj. Se surtronigi lin la Ĉiela Filo, li neniigos la Ĉielon pere de homoj. Li aliigos la formon, dum li mem restas homa kiel antaŭe. Li impetos temerare kvazaŭ fajro, kult-adorante scion. Li iĝos misiisto por komenci aferojn. Li faros estaĵojn katenataj. Li klopodos ĉiam, por ke li konformu al ĉirkaŭaĵoj kaj konformu konvene al homoamaso. Li transformos ĉirkaŭaĵon. Al li mankas dekomence la konstanta daŭreco. Kial do li estus sufiĉe kompetenta je la Ĉiela trono?”

Sed estas klanoj, estas prapatroj. Li povas fariĝi patro por popolanaj en tiu sfero. Tamen oni ne devas postenigi lin patro de patroj por la popolo. Li estas gvidanto al malordo. Li estas plago por norda flanko kaj kanajlo por suda flanko.”²⁸¹

Yao turismis la landon Hua. Limgardisto de Hua diris: “Ho, vi estas sankta, Permesu al mi gratuli por la sanktulo. Mi preĝu, ke vi, la sanktulo, longevivu.”

Yao diris: “Ne necesas.”

“Mi preĝu, ke vi, la sanktulo, estu riĉa.”

Yao diris: “Ne necesas.”

“Mi preĝu, ke vi, la sanktulo, havu multe da filoj.”

Yao diris: “Ne necesas.”

La limgardisto diris: “Esti longeviva, riĉa kaj havanta multe da filoj, deziras homoj. Kial vi sola ne deziras?”

Yao diris: “Ju pli multe da filoj, des pli multiĝas zorgoj; ju pli riĉa, des pli da aferoj; ju pli longe vivas, des pli multas hontindaĵoj. Tiu triopo ne nutras virton. Tial do mi fordankas.”

La limgardisto diris: “Unuavide mi rigardis vin sanktulo, tamen nun vi montriĝas nur noblulo. La Ĉielo naskas multe da popolanoj. Al ĉiu el ili ĝi nepre asignas laboron. Kvankam multaj estas filoj, tamen oni ne devas timi, se donos al ili laboron. Eĉ estu riĉa,

²⁷⁹ 堯 Yao, nomo de la antikva sankta reĝo. 許由 Xu You 齧缺 Nie Que 王倪 Wang Ni 被衣 Pi Yi estas nomoj de ermitoj. Nomoj havas signifojn: Xu You – permesi, Nie Que – mordi difektojn, Wang Ni – rigardi reĝe, Pi Yi – vestito.

²⁸⁰ 給數 Mi tradukis laŭlitere, sed multaj esploristoj prenas ĝin por alia signifo: elokventa, rapida, ktp.

²⁸¹ 北面 Norda flanko signifas flankon de subuloj, 南面 Suda flanko – flankon de reĝo.

se disdonus al homoj la riĉaĵon, estus nenia afero por klopodi.²⁸²

Sanktulo loĝas kvazaŭ koturno, manĝas kvazaŭ kokido, iradas kvazaŭ birdo, kaj montras sin neniom. Se en la mondo troviĝas la Vojo, li prosperas kune kun ĉiuj estaĵoj. Se en la mondo ne troviĝas la Vojo, li mem ellernas la virton kaj vivas kviete. Kiam li enuiĝas de longdaŭra vivo, tiam li foriras, suprenirante kaj rajdante blankan nubon, atingas Dian landon.

Sen tri zorgoj en koro, sen danĝero de korpo, kia hontindaĵo troviĝus?” La limgardisto forlasis.

Yao postsekvas lin, dirante: “Mi petas, permesu al mi demandi vin.”

La limgradisto diris: “Iru nur for!”

Kiam Yao regis la mondon, Bocheng Zigao enfeŭdiĝis kiel unu el landestroj. Post kiam Yao transdonis al Shun la tronon kaj Shun transdonis al Yu, tiu Bocheng Zigao ekŝiĝis de la posteno de landestro kaj ekterkulturis.

Yu iris kaj vidis lin agrokulturanta en la kampo. Yu rapide reverencis de sub li, stariĝis, kaj ekdemandis lin, dirante: “Antaŭe, kiam Yao regis la mondon, vi mem enfeŭdiĝis kiel unu el landestroj. Poste, kiam Yao transdonis al Shun kaj Shun transdonis al mi, vi rezignis la postenon de landestro kaj ekterkulturis. Permesu al mi demandi vin, kial?”

Zigao diris: “Antaŭe, kiam Yao estis reganta la mondon, la popolo diligentis sen laŭdado kaj timis sen punado. Nun vi rekompencas per laŭdado kaj punado la popolon, sed la popolo iĝas malbonvoleca. La virto per tio malfortiĝas kaj la punjuro per tio elstaras. Ekis malordo en postaj generacioj per tio. Kial vi staras ĉi tie? Ne malhelpu al mi fari mian laboron.”

Li daŭris terkulturi sen rigardi lin denove.

En la komenco estis nenio, nek estaĵo nek nomo. Ekestis Unuo. Estante, la Unuo ankoraŭ ne havis formon. Aĵo estiĝis kiel io, nomata Virto. Ankoraŭ ne havanto de la formo jam enhavas disdividon, sed nur sen spaco dividita. Tio estas nomata Destino. Movado de stoko kaj fluo naskas estaĵojn. Estaĵoj naskiĝas kaj kreskas laŭ racio. Tio estas nomata la formo. Korpo de la formo entenas Spiriton. Ĉiu havas sian leĝon-regulon. Tio estas nomata Naturo-Karaktero.²⁸³ La Naturo-Karaktero, disciplinite, revenas al la virto, atingas la saman virton kiel en la komenco. En tiu

²⁸² Per la buŝo de la limgardisto estas eldirata la idealo de la Ĉiela Vojo. Yao diras la realon de la mondo, kie abundas la kontraŭdiro: maldungo, senlaboreco, malegaleco inter riĉuloj kaj malriĉuloj.

²⁸³ 性 Naturo, Karaktero

identeco kuŝas la vanteco. Sed en tiu vanteco troviĝas la grandeco.²⁸⁴

Kune pepas birdoj. Kiel la birdoj ĥoras, kunpepante, la Ĉielo kaj la Tero kuniĝas. La kuniĝo apenaŭ videblas kaj ŝajnas stulta aŭ malklara. Tio estas nomata la Nigra Virto, identa kun la Granda Obeo.²⁸⁵

La Majstro Kong-zi demandis Lao Dan, dirante: “Tu volus posedi Vojon, forlasante la estantan diraĵon pri bono-malbono kaj jeso-neo. Li argumentas, dirante: “Eblas apartigi durecon kaj blankecon, klare montrante tion, kvazaŭ pendantan sur alero.²⁸⁶ Ĉu li povas esti nomata ‘Sanktulo?’”

Lao Dan diris: “Tiu estas nur kontoristo aŭ teknikisto, kiu iĝas laca je korpo kaj zorgoplena je koro. Li estas samkiel ligita hundo, pensanta, aŭ lertmova simio, venanta el monta arbaro. S-ro Qiu, mi diras al vi la neaŭdeblan por vi kaj la nedireblan de vi. Estas multe da homoj, kiuj, havante kaj kapon kaj piedon, ne posedas koron nek orelojn. Estas tute neniu, kiu, havante formon, povas ekzistadi kune kun io senforma kaj io senbilda.²⁸⁷ Rilate al movo kaj halto, morto kaj vivo, falo kaj leviĝo, oni nenion povas fari. Posedi ion estas homece. Forgesi aĵojn, forgesi la Ĉielon, forgesi nomojn kaj sin mem, forgesi sin mem kiel homon. Jen tio estas nomata la enirado en la Ĉielon.²⁸⁸

Jianglŭ Mian turnis sin al Ji Che,²⁸⁹ dirante: “La reĝo de Lu-regno diris al mi: ‘Mi petas, bonvole instrui min.’ Mi rifuzintus, tamen li ne permesis al mi tion. Do mi jam parolis, ne sciante, ĉu mia instruo trafis ĝuste aŭ ne. Permesu al mi prezenti mian konsilon. Mi diris al la reĝo de Lu-regno jenon: ‘Nepre estu ĝentila kaj modesta, elektu justajn kaj lojalajn personojn, ne allasu ilin flatadi nek favoradi partieme, kaj tiam kiu el popolanoj aŭdacus malpaciĝi?’”

²⁸⁴ 同之虚、虚之大. estas dialektika procezo. 虚 vanteco, malpleneco. Cirkulado al la komenco ŝajnas vanta, sed pli altigita ŝtupo.

²⁸⁵ 玄德、同乎大順. 玄 malluma, malhela. Ĉi tie signifas “profundan” virton. 順 obeado, sekvado, submetiĝo.

²⁸⁶ 離堅白若縣寓 Gongsun Long prezentis sian teorion pri atributoj de ŝtono – pri dureco kaj blankeco. Ĝenerale, peco de ŝtono, dura kaj blanka, havas tri ecojn, kiuj estas ŝtoneco, dureco kaj blankeco. Sed Gongsun Long diris, ke dureco kaj blankeco estas tute apartaj, ĉar la atributo de blankeco videblas per okuloj, sed dureco koneblas per tuŝado. Oni ne povas vidi durecon, kaj oni ne povas scii koloron per tuŝado. Do li atentigis, ke laŭ percepto de homa sento tiuj du atributoj devas esti apartigitaj.

²⁸⁷ 無形無狀 Io senforma kaj senbilda. Multaj esploristoj konsideras ĝin Vojo (Tao).

²⁸⁸ 忘己 Forgesi sin mem. En la alia loko estas esprimo 座忘 (sidi kaj forgesi 大宗師). Estas eble forgesi nur senkonscie.

²⁸⁹ Jianglŭ Mian, Ji Che, ambaŭ povas esti fikciaj nomoj. Sed iuj esploristoj konjektis, ke ili vere ekzistis. [Laŭ skribo en (藝文志), la unua estis amanto de scienco kaj verkisto. Laŭ Ma Shulun 馬叙倫, la dua estis Ji Zhen 季真]

Ji Che ridegis, dirante: “Koncernante la reĝan virton, via konsilo similas al manto, kiu kontraŭus al devojiĝinta ĉaro per siaj kolerplenaj brakoj. Do tio nepre ne adekvatas por lia afero. Se farate tiel, lia afero ĝajnus nur bruon parade, kvazaŭ altigo de turon. Tiam aĵoj amase kolektiĝos ĉe li, kaj homoamaso senkviete ĵetos sin al lia afero, sekvante lin.

Jianglü Mian, kun okuloj konsternitaj, diris: “Mi, Mian, restas foranime, aŭdinte vian eldiron. Sed tamen, Majstro, bonvolu diri al mi kion tio signifas?”

Ji Che diris: “Kiam la Granda sanktulo regas la mondon, li stimulas koron de la popolo,²⁹⁰ por ke oni plenumu instruon, ŝanĝu sian moron, tute neniigu ĉies ribeleman koron kaj ĉiu promociu sian strebon al mamstareco. Lasu la popolon sekvi kion la naturo mem direktas, kaj ili mem ne sciu kial kaj de kie ekaperas sia ago.

Ĉu tiaj homoj bezonus rigardi la instruon de Yao kaj Shun kiel de granda frato kaj submeti sin al ili stupore kiel malgranda frato? Tiuj homoj nur dezirus al sia koro akordiĝi kun la virto.”

Zigong iris suden al Chu-regno. Sur revena vojo tra Jin-regno li estis trapasanta sude de Han-rivero kaj vidis unu maljunulon faranta kampdigeton por legomejo. Tiu kampulo, enirante laŭ traborita vojeto en puton, elportadas ĉiufoje po unu sitelon da akvo kaj surverŝadas akvon. Spite ke li uzas tro multe da fortoj senpaŭze, oni vidas la efikon malgranda.

Zigong diris: “Jen estas maŝino, kiu akvumas cent kampojn en unu tago.²⁹¹ Per tre malmulte da peno troviĝas multe da efiko. Ĉu vi ne deziras uzi ĝin?”

Kulturanto de legomejo, suprenrigardante lin, demandis: “Kiel fari?”

Li respondis: “La maŝino estas farita per traborita lignoj. Malantaŭo de ligno estas peza, antaŭo estas malpeza. Ĝi levas akvon facile, kvazaŭ eltirante, kaj tiel rapide, kvazaŭ akvo elŝprucanta. Ĝia nomo estas baskulputo.”

La kulturanto de legomejo ekkoleris kun ŝanĝita vizaĝkoloro kaj poste ekridis, dirante: “Mi aŭdis de mia Majstro jenon: ‘Kiu apogas sin sur maŝino, tiu nepre okupas sin per maŝino. Kiu okupas sin per maŝino, tiu nepre havigas al si koron maŝinecan.²⁹² Kiu havas maŝinecan koron en si, al tiu mankas pura blankeco. Se mankas la pura

²⁹⁰ 搖蕩 Multaj esploristoj prenas la frazon kiel liberigi la popolon kaj lasi popolon fari kion ili volas. [CGy: 328] Sed laŭ sekva frazo 成教易俗 mi komprenas, ke popolanoj ne devas obei malbonan kutimon. 若性之自為 (Sekvi kion la naturo direktas) ne egalas al nura obo al sia kutimo, sed reakirigo de natura boneco.

²⁹¹ 百畦. Unu *qi* egalas al 91 *a*.

²⁹² 機心

blankeco, ne stabilas la spirita vivo.²⁹³ Sen stabileco de la spirita vivo oni devojiĝas de la Tao.' Mi ne uzas la maŝinon ne pro tio, ke mi ne scias, sed pro tio, ke mi hontas."

Zigong basokule hontis kaj ne respondis.

Iom poste la terkulturanto de legomejo demandis: "Kio do estas vi?"

Zigong respondis: "Mi estas unu el lernantoj de Kongfuceo."

La terkulturanto de legomejo diris: "Ĉu li ne estas tiu, kiu pretendas sin sankta per erudicio, vualas amason per fanfaronado kaj vendas reputacion en la mondo, lundante sole kod-muzikilon kaj triste kantante? Nun vi, forgesante vian spiritan energion *qi*,²⁹⁴ forĵetas vian korpan funkcion, kaj tiel vi estas proksima al li. Ĉu vi havas tempon por okupiĝi pri monda afero? For! Ne malhelpu al mi laboron."

Zigong, hontigite, perdis koloron en vizaĝo. Li restis en stuporo sen scii kion fari. Foririnte 30 *liojn*, apenaŭ li resaniĝis.²⁹⁵

Lia lernanto demandis: "Kio do estas tiu homo? Kial vi, Majstro, vidante lin, ŝanĝis mienon, perdis vizaĝkoloron kaj ne povis retrovi vin mem tutan tagon?"

Li respondis: "Komence mi konsideris nur mian Majstron la unua en la mondo, ne sciante ekziston de tia persono. Mi aŭdis mian Majstron dirinta: 'Afero postulas la efektivigon kaj utileco postulas la kompletigon. La vojo de sanktulo estas gajni pli da profitoj per malpli da uzado de fortoj.'²⁹⁶ Sed nun ne tio. Kiu prenas la vojon, tiu estas kompleta je la virto; kiu kompleta je la virto, tiu estas kompleta je la formo; kiu estas kompleta je la formo, tiu estas kompleta je la spiriteco. Perfekta je spiriteco estas la vojo de sanktulo. Je sia vivo kune iri kun la popolo ĉien, ne sciate kien ajn. Jen vaste estas la simpla pureco. En koro de tiu persono tute ne nestas penso pri profito-utileco aŭ lerta tekniko. Tia persono ne iras vojon, se ne konforman al sia strebo. Li ne faras tion, kio ne konformas al sia koro. Kiel ajn ĉiuj en la mondo laŭdus lin kaj aprobus lian opinion, li ne atentis tute aplombe. Kiel ajn ĉiuj en la mondo mallaŭdus lin kaj malaprobus lian eldiron, li ne akceptas senĝene. Laŭdo aŭ mallaŭdo far de la mondo al li tute ne profitas aŭ malprofitas. Tia persono devas esti nomata la persono de perfekta virto. Mi mem ja nomiĝas nur popolano de vento kaj ondo.²⁹⁷"

Li, reveninte al Lu-regno, parolis al Konfuceo pri tio.

Konfuceo diris: "Li nur provizore lernis la arton de s-ro Ĥaoso.²⁹⁸ Li nur scias pri unu, sed ne scias pri la dua. Li lernis nur ĝian internon, sed ne la eksteron. Vi ĝuste

²⁹³ 神生 Iuj esploristoj prenas la ideogramon 生 por 性(denaska naturo).

²⁹⁴ 神氣

²⁹⁵ 里 Unu *lio* egalas al 405 m.

²⁹⁶ Tia pensmaniero apartenas al mohismo pli ol al konfuceanismo.

²⁹⁷ 風波之民 signifas homon, facile ŝanceliĝantan inter laŭdo kaj mallaŭdo.

²⁹⁸ 渾沌氏之術 signifas taoismon.

miregis je tiu, kiu eniris en senmakulecon kun klara blankeco, tiu, kiu revenis al simpleco sen ago, tiu, kiu kun denaska naturo kaj kun spirito ludvagadas inter mondanoj.²⁹⁹ Koncernante la arton de s-ro Ĥaos, eĉ mi kaj vi neniel povus kompreni ĝin.”

Zhun Mang ĝuste estis iranta orienten al la Granda Valo kaj renkontis hazarde Yuan Feng ĉe plaĝo de la Orienta Maro.³⁰⁰

Yuan Feng demandis: “Kien vi nun iras?”

Respondis: “Nun ĝuste iras al la Granda Abismo.”

Demandis: “Kion vi faros?”

Respondis: “La Granda Abismo ja estas la spaco neplenigebla, kiom ajn da akvo oni enverŝus, neelĉerpigebla, kiom ajn da akvo oni ĉerpus. Mi ĝuste volas ludi tie.”

Yuan Feng diris: “Ĉu vi ne interesiĝas pri la popolo, havanta migdalajn okulojn?³⁰¹ Mi petas vin, bonvolu aŭdigi min pri sankta regado.”

Zhun Feng diris: “Sankta regado? Enoficigi kompetentulojn kaj ne perdiĝas la kompetenteco, promocii kapablulojn kaj ne perdiĝas ilia kapablo. Observu ĉiun realan situacion, lasu fari kion oni devas fari, kaj plenumiĝos agoj kaj vortoj per si mem, ŝanĝiĝos la mondo. Tiam laŭ moveto de mano aŭ fingro de reganto kolektiĝos la popoloj el kvar direktoj. Tio estas nomata la Sankta regado.”

“Mi petas, bonvolu diri al mi pri la Virta homo.”

Respondis: “La virta homo estas tiu, kiu, restante sen pensado, irante sen zorgo, ne havas ĉe si rezonadon pri bono-malbono aŭ belo-malbelo. En la tuta mondo ĉirkaŭita de kvar maroj estas al li ĝojo vidi, ke ĉiuj kune profitigas aliajn kaj estas al li trankvilo vidi, ke ĉiuj kune liveras reciproke al la aliaj. Kiam tristas, li malĝojas kvazaŭ bebo, perdinta la patrinon, aŭ kvazaŭ iranto, perdinta la vojon. Havante tro multe da riĉaĵoj, li mem ne scias de kie ili venas. Prenante sufiĉe multe da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, li ne scias de kie ili estas portataj.³⁰² Tio estas nomata ‘ujo de Virta homo’.”

“Mi petas, bonvolu diri al mi pri la Dieca homo.”

²⁹⁹ Multaj esploristoj prenas la frazon por aliaj signifoj. Iu komprenas, ke Zigong miregus, se li renkontiĝus kun tia ermito, kia skribita en la frazo.[FNk, WaB] Alia prenas, ke Zigong ne miregus.[KYo,Elc] La tria prenas: “Ĉu al vi necesas miregi?”.[CGy, YWj] Mia traduko estas proksima al la tria. Laŭ mi, en tiu teksto, al taoismo Konfuceo prenas la saman sintenon, kiel al kredantoj de Spiritoj.

³⁰⁰ 諄芒, 苑風 estas fikciaj nomoj. La unua havas signifon “Kvieta Obskuro” aŭ “Vaste fluanta akvo”, la dua – “Venteto, Zefiro”.

³⁰¹ 横目之民 signifas “homojn”.

³⁰² Iuj konsideras la riĉon kiel rezulton de pensmaniero 知足 [Kontentulo estas la pleja riĉulo]. [FNm: 外上 220]

Respondis: “Supra Dieco rajdas lumon, perdiĝinte je la formo. Tio estas nomata ‘Brila Vanteco’. Se oni plenumis la destinon kaj elĉerpis la denaskan senton, tiam la Ĉielo kaj la Tero ekĝojas, ĉiuj aferoj estingiĝos kaj ĉio revenos denove al la denaska sento. Tio estas nomata ‘Haosa Mallumo’.”³⁰³

Men Wugui kaj Chizhang Manji rigardis la trupon de la reĝo Wu.³⁰⁴

Chizhang Manji diris: “Li ne egalas al la klando You Yu.³⁰⁵ Do li infektiĝis je tia malsano.”

Men Wugui demandis: “Ĉu You Yu ekregis la regnon, post kiam ĝi iĝis glate regata, aŭ post kiam ĝi malordiĝis?”

Qizhang Manji respondis: “Se oni dezirus, ke ĝi glate restu regata, kial do oni bezonus klanon You Yu por fari tion. La maniero, per kiu You Yu kuracas tumoron, similas al tio, ke meti perukon sur kalva kapo, t. e., kiel voki kuraciston post nekuracebla malsaniĝo. Tion, ke obeema filo kun trista mieno flegas per medikamento sian bonkoran patron, hontas la sanktulo.³⁰⁶ En la mondo, kiun regas la pleja virto, ne estas estimata la saĝo, nek estas uzata la kapablulo. Suprulo, samkiel nura branĉo de pli alta arbo, kaj la popolo, samkiel sovaĝaj cervoj. Kvankam tio estas digna en ordo, tamen oni ne scias nomi tion justo; kvankam tio estas reciproka amo, tamen oni ne scias nomi tion bonvoleco; kvankam tio estas honesteco, tamen oni ne scias nomi tion lojaleco; kvankam tio estas konformo de vorto al ago, tamen oni ne scias nomi tion kredo. Oni reciproke praktikas tion nekonscie nature, sed ne faras tion la donitaĵo.³⁰⁷

Tial do ne restas spuroj de la agoj, nek rimedoj por transdoni la aferojn al posteuloj.

Tio, ke obeema filo ne flatadas siajn gepatrojn, kaj tio, ke lojala subulo ne lakeas al sia estro, estas bonega kiel subulo kaj filo. Kiu ĉiam jesadas al diritaĵoj de gepatroj kaj aprobas iliajn kondutojn bonaj, tiu estas nomata de mondaj popolanoj senmerita filo. Kiu ĉiam jesadas al diritaĵoj de la estro kaj aprobas lian konduton bona, tiu estas nomata de mondaj popolanoj senmerita subulo.³⁰⁸

³⁰³照曠 Brila Vanteco, 混冥 Haosa Mallumo, 情 denaska natura sento. Estas notinde, ke reveno al la komenco estas konsiderata kiel Haosa Mallumo. La reveno aŭ ripetado estas ne nur “Vantaĵo de vantaĵoj”, sed reveno al naturo.

³⁰⁴ 門無鬼, 赤張滿稽 ambaŭ estas fikciaj nomoj. 武王 la reĝo de Zhou dinastio, kiu faligis la Yin dinastion, batinte la tiranon Zhou 紂王.

³⁰⁵ 有虞氏 estas Shun 舜, al kiu estis transdonita la trono el Yao.

³⁰⁶ Ĉar multe pli bone estas, ke la patro ne malsaniĝas.

³⁰⁷ 義仁忠信 estas terminoj por esprimo de konfuceanismaj principoj. 賜 donitaĵo el supro. Mi konjektas, ke tio povus esti skribitaj leĝoj-reguloj aŭ libroj.

³⁰⁸ En la unua ĉapitro de Mozi (親士) estas skribite tiel pri flatado.

Sed ankoraŭ ne estas sciata, ĉu tia opinio nepre pravas aŭ ne. Oni ne nomas flatulo tiun, kiu jesas al diritaĵoj de mondaj popolanoj kaj aprobas bona la bonon konsideratan de mondaj popolanoj.³⁰⁹ Se tiel, ĉu mondaj popolanoj estas pli majestaj ol gepatroj kaj pli respektindaj ol estro?

Nomate sin lakeo, ili flamiĝas kun kolorigita vizaĝo pro indigno. Nomate sin flatulo, ili ekkoleras kun ruĝiĝinta vizaĝo. Malgraŭ tio, ili mem restas tia lakeo aŭ flatemulo ĝis la morto.

Ili kolektas amson ĉirkaŭ si per lerta parolado kaj per ornamitaj vortoj, sed la parolado malkoheras je branco kaj trunko de la komenco ĝis la fino. Vestite bele kaj multekolore, ili kun esprimoplena vizaĝo flatadas la tutan mondon. Spite tion ĉi tion, ili ne nomas sin flatemuloj-lakeoj. Rigardante sin unu el lernantoj de iu Majstro, ili havas saman opinion partieme pri jesado-neado, malgraŭ tio, ili ne nomas sin popolamaso. Jen kulmino de stulteco.

Kiu scias sin stulta, ties stulteco ne estas granda. Kiu scias sin ŝanceliĝanta, ties ŝanceliĝo ne estas granda. Granda ŝanceliĝinto ne komprenas sin ĝis la fino. Granda stultulo ne inspiriĝas ĝis la fino.

Kiam oni iras triope, se unu el tri ŝanceliĝas, oni povas atingi la celon pro malpli da devojiĝanto. Se du el tri ŝanceliĝas, oni ne povas atingi la celon malgraŭ granda peno, ĉar plimulte da devojiĝantoj. Nun la tuta mondo ŝanceliĝas. Kiel ajn mi preĝus por direkti rekten, neatingebla estos la celo. Estas ja triste.

Granda klasiko-maziko ne estas aŭdata per oreloj de publiko, sed oni gaje ridetas je popularaj kantoj kiel “Rompiĝinta saliko” aŭ “Reĝa floro”. Tiel do altaj vortoj ne estas akceptataj en la koro de popolamaso. Ne aperas plej altevalora vorto, ĉar superas vulgarecaj vortoj. Du trionoj da piedoj ŝanceliĝas, do neatingebla estas la celo. Kaj nun la tuta mondo ŝanceliĝas. Kiom ajn mi preĝus por direkti rekten, nenio akireblas.

Se sciante, trudi al aliuloj fari ion neatingeblan estas ankaŭ unu ŝanceliĝo. Pli preferinde estas ne altrudi, sed forlasi ilin. Se ne altrudos, neniu ĉagreniĝos kiel mi kvazaŭ jena naskinto. Iam meznokte, iu leprulino naskis sian bebon. Ŝi, haste preninte en mano fajron, ekrigardas, nur timante, ĉu la bebo similus al ŝi aŭ ne.

Centjara arbo, hakite, fariĝis bovloj por ceremonia vino, beligitaj per koloroj blua kaj flava. Ties splitoj estas forĵetitaj en fosaĵo. Se kompari la ceremonian bovlon kun la splitoj de fosaĵo, kvankam malsamas je beleco aŭ malbeleco, tamen samas je la perdo

³⁰⁹ 道諛 estas 諂諛. Laŭ mia konjekto, de tiu frazo devenus la sekvanta frazo 道人, signifanta flatulon. 世俗 publiko, mondaj popolanoj. Jam videblas kritiko al fenomeno de nuntempa populismo.

de denaska naturo. Ŝtelisto Zhi kun konfuceanoj Zeng kaj Shi estis diferencaj je sia konduto justa aŭ maljusta, sed egalaj je la perdo de denaska naturo.

En perdo de denaska naturo troviĝas kvin specoj. La unua rilatas al okuloj. Kvin koloroj malordigas okulojn kaj malklarigas ilin. La dua – al oreloj. Kvin sonoj malordigas orelojn kaj malakrigas ilin. La tria – al nazo. Kvin odoroj incitas nazon kaj nazkataro trafas frunton. La kvara – al buŝo. Kvin gustoj malpurigas buŝon kaj malsanigas ilin. La kvina – al koro. Elekto kion preni aŭ forĵeti malkvietigas la koron kaj igas la denaskan naturon superfluganta. Tiuj kvinopo ĉiuj estas obstaklo al la vivo. Kvankam Yang kaj Mo, ekstarante de komence sur piedpintoj, memfidis sin atingintaj la veron, tamen, el mia vidpunkto, ili tute ne atingis la vojon.³¹⁰

Se la atinginto suferas, kiel do eblus taksi lin atinginta?³¹¹ Ĉu oni povus rigardi atingintaj kolombon aŭ palumbon, kiuj sidas en kaĝo? Se oni povus rigardi atingintaj tiujn, kiuj blokas sian internon per elektoj, sonoj kaj koloroj, aŭ tiujn, kiuj ĉirkaŭligas sian eksteron per leda ĉapo, alced-pluma krono, sceptro, zonego kaj basko – tiujn baritajn interne kaj amasigitajn ekstere per diversaj ŝnuroj kaj ĉirkaŭligitajn per ŝnuroj –, tiam endus konsideri atinginta ankaŭ krimulon katenitan je mano kaj fingroj, kaj ankaŭ tigron kaj leopardon en kaĝo.

³¹⁰ 楊墨 Yang Zhu kaj Mozi. La unua predikis egoismon kiel la plej gravan principon, la dua – altruismon. Ambaŭ estimas saĝon kaj sciencon por perfektigi personecon.

³¹¹ La sufero devenas de saĝo samkiel ĉe superflujaj protagonistoj en la rusa literaturo. Mi ne tute konsentas kun la komento far de Cheng Xuanying 成玄英, ke la sufero devenas nur de konfuceanismaj principoj [仁義礼法約束其心者、非真性者也。既偽其性、則遭困苦。CGy1: 463] Ne nur kontraŭ konfuceanismo, sed kontraŭ Yang-Mo estas skribita la teksto pri la sufero pro devojiĝo el la denaska naturo.

13 LA ĈIELA VOJO

La Ĉiela Vojo moviĝas, ne stagnante, do ĉio estas farata. La Reĝa Vojo moviĝas, ne stagnante, do la subĉiela mondo submetiĝas. La Sankta Vojo moviĝas, ne stagnante, do ĉiuj en la mondo ĉirkaŭata de maroj sekvas.³¹² Kiu estas iluminiĝinta de la Ĉielo, familiara kun la Sankteco kaj ĉie kaj ĉiam kutima al la Reĝa Virto, ĉiu kondukas per si mem kaj estas nekonscie kvietaj kaj trankvilaj. La sankta homo estas kvietaj ne pro tio, ke li konsideras la kvietecon bona, sed pro tio, ke nenio povus konfuzi lian koro.

Se kvietaj estas akvo, ĝi povas klare speguli barbojn kaj brovojn, povas esti konforma al nivelmezurilo per sia glata surfaco, uzata de granda metiisto kiel normo. Laŭ akvo estas klare, ke meritas kvieteco. Des pli la spirito. Sanktulo estas kvietaj je koro. Tio estas spegulo por la Ĉielo kaj la Tero, spegulo por ĉio.

Tio, ke estas malplene, kviete, trankvile, senavide, silente kaj senage, estas la norma kriterio en la Ĉielo kaj la Tero, kaj la morala kulmino de la Vojo kaj la Virto. Tial do reĝoj kaj sanktuloj ripozas ĉi tie. Se ripozas, malpleniĝas la koro; se malplenas, pleniĝos; se pleniĝas, fruktodonas racie en ordo. Kiu malplena je koro, tiu ja kvietaj; kiu kvietaj, tiu ja nature moviĝas; kiu nature moviĝas, tiu ja akiras. Se kvietaj, nenion fari; se sankta reĝo estas nenion faranta, ĉiu respondeculo plenumas sian taskon. Al tiu, kiu nenion faras, estas ĝojplene kaj gaje; Kiu gajas, al tiu ne eblas resti ajna zorgo kaj timo, do tiu vivas longe.

Ke estas malplene, kviete, trankvile, senavide, silente kaj senage, tio estas ĉies fundamento. Klare kompreninte tion, surtroniĝis la reĝo Yao. Klare kompreninte tion, submetiĝis Shun, kiel ministro-subulo. Starigite supren kun tiu sinteno, reĝo posedas virton de la Ĉiela filo. Starigite suben kun tiu sinteno, kaŝa sanktulo posedas la Vojon de senkrona reĝo. Kiu, ekŝiĝinte kun tiu sinteno, ludvagadas, al tiu submetiĝas superaj personoj en riveroj, maroj, montoj kaj arbaroj. Kiu, promociiĝinte kun tiu sinteno, pacigas la mondon, ties merito fariĝas tre granda, ke la renomo elstaras rimarkinda kiel la unua sub la Ĉielo.

Estante kvietaj, li iĝas sankta; moviĝante, li iĝas reĝo; senagante, li estas respektinda. Kvankam li estas simpla per si mem, tamen neniu en la mondo povas rivali kun li je la beleco.

Kio estas klara je virto de la Ĉielo kaj la Tero, tio estas nomata 'Granda Fonto' aŭ

³¹² 天道, 帝道, 聖道 海内

‘Granda Origino’.³¹³ Tio harmonias kun la Ĉielo. Tio egaligas kaj harmoniigas la mondon, kaj tial harmonias kun homo. Tio, kio harmonias kun homo, estas nomata ‘Homa Plezuro’. Tio, kio harmonias kun la Ĉielo, estas nomata ‘Ĉiela Plezuro’.³¹⁴

Zhuangzi³¹⁵ diris: “Mia Majsro, mia Majstro! Vi dispecigas ĉion, sed tio ne nomiĝas ‘Krueleco’. Rekompenco etendiĝas al multaj generacioj, sed tio ne nomiĝas ‘Bonvoleco’. Kvankam kreskas de antikve, tamen tio ne nomiĝas ‘Longa Vivo’. Kvankam kovras la ĉielon kaj la teron kaj skulptas amason da formoj, tamen tio ne nomiĝas ‘Lerteco’. Tio estas ja nomata ‘la Ĉiela Plezuro’.”

Tial do estas dirite: “Por scianto de la Ĉiela Plezuro la vivo estas rotacio de la Ĉielo kaj la morto estas transformiĝo de estaĵo. En kvieto li havas ĉe si *yin* kun virto, en moviĝo havas ĉe si *yang* kun ondon.”³¹⁶ Tial, kiu scias la Ĉielan Plezuron, tiu ne ricevas koleron de la Ĉielo, nek ricevas malbenon de homoj, nek zorgon pri aĵoj, nek riproĉon de Spiritoj.

Tial do estas dirite: “Kun moviĝo kvazaŭ la Ĉielo, kun kvieteco kvazaŭ la Tero, kun koro fiksita en unu, li estas la reĝo en la mondo. La Spiritoj ne turmentas lin kaj lia animo ne laciĝas, lia koro estas fiksita en unu, do al li ĉio submetiĝas.”

Tio signifas, ke lia malpleneco kaj kvieteco kovras la Ĉielon kaj la Teron, kaj penetras en ĉion. Tio estas nomata ‘la Ĉiela Plezuro’. La Ĉiela Plezuro estas nutri la mondon pere de la koro de sanktuloj.

La virto de la reĝo tenas la Ĉielon kaj la Teron prapatra, la moralon ĉefa kaj la senagon konstanta. Sen ago li uzas la mondon, havante rezervitan energion. Kun ago li estas uzata de la mondo, kaj al li mankas la rezervita energio. Tial do antikvuloj estimis la senagon.

Se la supro estas senaga kaj ankaŭ la subo estas senaga, tiuokaze la subo fariĝas egala al la supro je la virto. Se la subo al la supro estas egala je la virto, tiuokaze la subo ne estas subulo. Se la subo estas agema kaj ankaŭ la supro estas agema, tiuokaze la supro kaj la subo fariĝas samaj je la vojo. Se la supro kaj la subo samas je la vojo, tiam la supro ne estas ĉefo. La supro, estante nepre senaga, uzas la mondon, kaj la subo, estante nepre agema, estas uzata de la mondo – tio estas la senŝanĝa vojo.³¹⁷

³¹³ 大本, 大宗

³¹⁴ 人樂, 天樂

³¹⁵ 莊子曰 En la ĉapitro 大宗師 aperis preskaŭ sama frazo. Laŭ tia esprimo oni povas konjekti, ke tiu teksto ne estis skribita per mano de Zhuangzi.

³¹⁶ 與陰同德, 與陽同波 Yin kaj Yang konsistigas Ĉjion 氣, kiu estas la plej elementa substanco en la universo. Ĉi tie, yin rilatas al virto kaj yang – ondo.

³¹⁷ 上必無為而用天下、下必有為為天下用、此不易之道也。 Ĉi tie videblas kompromiso al

Tial, reĝoj de la antikva mondo ampleksis per sia saĝo la Ĉielon kaj la Teron, sed la reĝoj mem ne zorgadis. Ilia kapablo de diskurso kovris ĉion, sed ili mem ne predikis. Kvankam ilia kapablo atingis ĉion de la mondo, tamen ili mem ne agis. La Ĉielo ne naskas, sed ĉio transformiĝas. La Tero ne kreskigas, sed ĉio mem kreskas. Reĝo ne agas, sed la mondo meritas.

Tiel do estas dirite: “Nenio estas pli dieca ol la Ĉielo, nenio estas pli riĉa ol la Tero, neniu estas pli granda ol reĝo.” Do estas dirite: “La virto de reĝo direktas la Ĉielon kaj la Teron.” Tio estas la vojo por ke li rajdu la Ĉielon-Teron, kuradu sur ĉio kaj uzu gregon de homamaso.³¹⁸

Fundamento estas en la supro, bagatelaĵoj estas en la subo. Gravaĵo estas en la ĉefo, detalaĵoj estas en vasaloj. Mobilizo de tri armeoj kaj kvin armiloj estas bagatelaĵo de la virto. Laŭdo kaj puno, profito-utilo kaj malprofito-malutilo, leĝaro de kvin punoj, estas bagatelaĵoj de instruo. Decreguloj, sistemo de leĝoj, ciferoj kaj mezuroj, komparado de formo kaj nomo, estas bagatelaĵoj de administrado.³¹⁹ Sono de sonoriloj kaj tamburoj, danc-ornamaĵoj el plumoj kaj haroj, estas bagatelaĵoj de muziko. Plorkriado, laŭranga funebra vesto kun kruda ŝnuro, estas bagatelaĵoj de kondolenco. Ĉi tiuj kvin bagatelaĵoj estas nur sekvantoj post la spirita rotacio kaj la kora moviĝo. Eĉ antikvuloj okupiĝis pri scienco de bagatelaĵoj, sed tion ne indas estimi kiel precedenton.

Estro antaŭiĝas kaj subuloj sekvas, patro antaŭiĝas kaj gefiloj sekvas, pli maljuna frato antaŭiĝas kaj pli juna frato sekvas, pliaĝulo antaŭiĝas kaj malpliaĝulo sekvas, viro antaŭiĝas kaj virino sekvas, edzo antaŭiĝas kaj edzino sekvas. Nobleco-malnobleco kaj antaŭiĝo-postsekvo estas rotacio de la Ĉielo kaj la Tero. Tial do sanktuloj prenis tion kiel modelon. Tio, ke la Ĉielo estas pli nobla kaj la Tero estas pli malnobla, estas la rango de dia klareco. Tio, ke printempo-somero antaŭiĝas kaj aŭtuno-vintro postsekvas, estas vicordo de kvar sezonoj. Tio, ke ĉiuj estaĵoj ŝanĝiĝas kaj naskiĝas, kaj tio, ke diversaj formoj de ĝermado kaj progreso-degreso, estas fluo de ŝanĝiĝo. La plej dieca Ĉielo kaj Tero havas vicordon inter nobleco-malnobleco kaj antaŭiĝo-postsekvo, des pli la homa vojo. Respekti parencojn en la prapatra maŭzoleo, respekti altrangulojn en la kortego, respekti pliaĝulojn en la komunumo, respekti saĝulojn en la aferoj, – estas vicordo de la Granda Vojo.

Parolante pri vojo, se ignorus la vicordon, tiu vojo ne estas la Vojo. Kiam la parolata vojo ne estas la Vojo, kiel oni povas preni la Vojon? Do antikvuloj, por klarigi la Grandan

konfuceanismo kaj ĉina legalisma skolo.

³¹⁸莫神於天、莫富於地、莫大於帝王。故曰、帝王之德配天地。此乘天地馳万物、而用人羣之道也。Ĉi tie videblas la reĝo, rajdanto sur ĉio kaj ĉiuj.

³¹⁹ 礼法度数、刑名比詳.

Vojon, unue klarigis la Ĉielon, kaj poste la Vojan virton – moralon. Post klarigo de la Voja virto, sekve studis Bonvolecon kaj Juston. Post klarigo de la Bonvoleco kaj Justo, sekve studis decan observon al la ranga devo. Post klarigo de la deca observo de la ranga devo, sekve studis rilaton inter formo kaj nomo. Post klarigo de formo-nomo, sekve studis enoficigon laŭ kompetenteco. Post klarigo de la kompetenteco, sekve studis poentadon pri laboro. Post klarigo de la poentado, sekve studis juĝon pri sukceso kaj malsukceso. Post klarigo de la juĝo, sekve studis pri laŭdado-punado. Post klarigo de la laŭdado-punado, sekve oni pristudas asignadon de stultuloj-intelektuloj laŭ konvena ordo, asignadon de nobeloj-malnobeloj laŭ oportuna rango, asignadon de bonvolecaj, saĝaj, netaŭgaj laŭ ĉirkonstanco, kaj dividas laboron laŭ kapablo inter kompetentuloj kaj nekompetentuloj, por ke la laboro nepre estu konforma al la nomo.

Tiel do oni servas al la supro kaj nutras la subon, administras aĵojn, perfektigas sin mem. Oni ne uzas ruzaĵon nek intrigon. Ĉio estas nepre konfidata al la Ĉielo. Tio estas nomata ‘Granda Paco’, t. e., la kulmino de regado.

Do en la libro estas dirite: “Estas formo kaj estas nomo.”³²⁰ Kvankam troviĝas ĉe antikvuloj la tezo de formo-nomo, tamen ĝi ne antaŭiĝas ĉion. La antikva priparolanto de Granda Vojo povis prezenti la formon-nomon nur post kvin turniĝoj kaj povis paroli pri laŭdado-punado nur post naŭ turniĝoj. Kiu subite parolas pri la formo-nomo, tiu ne scias la fonton. Kiu subite parolas pri la laŭdado-punado, tiu ne scias la komencon.

Kiu renverse parolas pri la Vojo kaj predikas kontraŭ la Vojo, tiu devas esti regata de la aliuloj. Kial li povus regi ilin. Kiu subite parolas pri la formo-nomo kaj laŭdo-punado, tiu kvankam scius ilon por regado, tamen ne scias la Vojon por regado. Li estas uzata de la mondo, tamen li ne havas sufiĉan forton uzi la mondon. Li estas nomata ‘persono de vortoj aŭ homo de unuflanka tordiĝo’. koncerne de decreguloj, leĝoj, detalaj reguloj, ciferoj kaj mezuroj, komparado de formo kaj nomo, kvankam eĉ antikvuloj havis tiujn, tamen por ke la subuloj servu al la suproj, sed ne por ke la suproj paŝtu la subulojn.

Antikve Shun demandis Yao, dirante: “Kion vi tenas en via koro, kiel reĝo?”

Yao respondis: “Mi ne arogantas antaŭ senvoĉa popolo nek forlasas mizeran popolon. Lamentas pri mortintoj, simpatias kun beboj kaj kompatas virinojn. Tion mi tenas en mia koro.”

Shun diris: “Estas tre bele. Sed tio estas ankoraŭ ne granda.”

³²⁰ 有形有名、形名参同。Akordiĝo de formo kaj nomo, la termino ofte uzata de ĉina legalisma skolo, ekz., ĉe Han Feizi. [韓非子(主道篇)] Ĝi inkluzivas akordiĝon de “enhavo kaj formo” aŭ de “ago kaj vorto”.(内容和形式、行為和言) Ĉi tie la frazo estas uzata kiel 刑名 (nomo de punjuro).

Yao demandis: “Se tiel, kiel do fari?”

Shun respondis: “Per la Ĉiela virto estiĝas la paco.³²¹ La suno kaj la luno brilas kaj kvar sezonoj iras. Konstantas tago kaj nokto. Iras nuboj, liverante pluvon. Jen tiel.”

Yao diris: “Mi tro zorgadis kaj klopodis.³²² Vi atentis harmonion de la Ĉielo. Mi atentis harmonion de homoj.”

La Ĉielon kaj la Teron, antikvuloj rigardis grandaj, kaj la Flava Imperiestro kaj Yao-Shun konsideris belaj. Kion faris la antikvaj reĝoj al la mondo? Nur sekvis la Ĉielon kaj la Teron.

Konfuceo volus deponi la verkojn okcidenten por la reĝa domo de Zhou-dinastio. Zilu diris sian ideon: “Mi aŭdis, ke en la biblioteko de Zhou estis iu bibliotekisto, nomata Lao Dan. Li ekŝiĝis de la ofico kaj loĝas hejme. Se vi, Majstro, volas deponi la librojn, prove iru viziti lin.”

Konfuceo diris: “Bona ideo.”

Li iris kaj vidis Lao Dan. Sed la lasta ne konsentis. Tial la unua montris dek du sutrojn kaj ekesprimis.

Lao Dan interrompis lian parolon, dirante: “Tro longe. Parolu koncize la esencon, mi petas.”

Kongzi diris: “La esenco konsistas en bonvoleco kaj justo.”

Lao Dan diris: “Permesu al mi demandi vin, ĉu la bonvoleco kaj la justo estas la denaska naturo de homoj?”

Kongzi diris: “Jes. Sen bonvoleco noblulo ne povas plenumi taskon kaj sen justo li ne povas vivi. La bonvoleco kaj la justo vere estas la denaska naturo de homoj. Kio alia estas necesa?”

Lao Dan diris: “Permesu al mi demandi vin, kion vi nomas la bonvoleco kaj la justo?”

Kongzi diris: “Ĝui ĉion en la koro, ami universale sen egoo.³²³ Jen tio estas sento de la bonvoleco kaj la justo.”

Lao Dan diris: “Ho! Apenaŭ. Koncernante la lastan frazon, ĉu la universala amo ne estas ĉirkaŭfrazo? Intenci forigon de egoo ankaŭ estas la egoo. Vi, Majstro, dezirus, ke la mondo ne perdu sian paŝtiston.³²⁴ Sed la Ĉielo kaj la Tero havas sian propran

³²¹ Iuj esploristoj ŝanĝas la ideogramon 出 en 土.

³²² 膠膠擾擾 Iu prenis la frazon kiel esprimon de konfuziĝo. La alia – esprimon de elasteco. Mi konsentas kun la unua.

³²³ 兼愛 La termino estis uzata de mohistoj 墨家. Estas interese, ke el la vidpunkto de taoistoj tute egalas bonvoleco de konfuceanismo kaj universala amo de mohismo.

³²⁴ Multaj esploristoj prenas la ideogramon 牧 por simpleco 朴. Sed mi sekvas la ordinaran signifon.

konstantecon. La suno kaj la luno havas sian lumon. Steloj havas sian vicordon. Birdoj kaj bestoj havas sian gregon. Arboj havas sian pozicion.

Ankaŭ vi, Majstro, se vi libere iros, sekvante la naturan virton, paŝos laŭ la Vojo, tiam estos atingite per si mem. Kial vi bezonus laŭte recitadi kaj meti supren la bonvolecon kaj la juston? Tio similas kvazaŭ serĉadi perdiĝintan infanon per batado de tamburo. Ho ve! Vi, Majstro, konfuzas la homan denaskan naturon!”³²⁵

Shi Chengqi³²⁶ renkontis Laozi kaj diris: “Mi aŭdis, ke vi, Majstro, estas sanktulo. Spite malkrosiman vojon mi venis vidi vin sen ripozo dum cent tagnoktoj, per taloj klinkovrite. Nun mi vidas vin, ke vi ne estas sanktulo. Mankas al vi bonvoleco, ke vi forlasis vian fratinton, malgraŭ ke ĉe vi estas sufiĉe da nutraĵoj en truo de ratoj. Vi rezervas senlime spite ke antaŭ vi restas multe da manĝaĵoj, kuiritaj kaj nekuiritaj.”

Laozi nur ne respondis aplombe.

En la sekva tago Shi Chengqi denove venis vidi lin kaj diris: “Hieraŭ mi pikparolis al vi, sed nun mi sentas mian koron vanta. Kial?”

Laozi diris: “Mi mem ne faras min alligita al tiu, kiu estas lerte intelekta kaj diece sankta. Hieraŭ, se vi vokus min bovo, tiam mi nomiĝus bovo; se vi vokus min ĉevalo, tiam mi nomiĝus ĉevalo. Kiam troviĝas la realeco, se oni ne akceptus la donitan nomon, tiuokaze oni ricevos denove damaĝon. Ĉiam mi obeas la obeendan. Por mi tio ne estas nura obo por obo.”

Shi Chengqi sekvis Laozi, sen treti lian ombron, piedirante samkiel ansero, paŝante piedŝove, demandis: “Kio estas perfektigo de personeco?”

Laozi diris: “Via mieno estas kruta per si mem, viaj okuloj estas malkvietaj per si mem, via frunto estas suprena per si mem, via buŝo estas bojanta per si mem, via sinteno estas tro justa per si mem. Vi similas al ĉevalo, ligite haltigita. Aktiva sed dume sindetenas, kvazaŭ sago elpafonta de arbalesto. Inspektas, juĝante; observas per saĝa lerteco, afektante aplombon. Rigardas ĉion, ne kredante. Troviĝas tia homo ĉe landlimo, kies nomo estas insidemulo.”

La Majstro diris: “La Vojo estas senfina je grandeco, senpreterlasita je malgrandeco. Tiel do ĝi estas ĉiopreta. Ĝi estas tre vasta, ke ĝi nenion ne ampleksas, kaj tre profunda, ke nemezurebla estas la profundeco. Por spirito estas bagatelaj la formaleca virto, la

³²⁵ Ankaŭ en Shiji (史記老莊申韓列傳) estas skribite pri la renkontiĝo de Laozi kaj Konfuceo. Sed nuntempe multe da esploristoj dubas eblecon de la renkontiĝo kaj konsideras, ke tia epizodo estis fabrikita de taoistoj por propagandi superecon de la skolo.

³²⁶ 士成綺 nomo fikcia. Signifo de ideogramoj – “Persono, fariĝanta bela”.

bonvoleco kaj la justo. Se ne la pleja homo, kiu do povus difini ilin?

Ĉu ne estas grandege por la pleja homo posedi la mondon? Sed li ne konsideras tion sufiĉe laciga. Dum mondanoj klopodas enpotenciĝi, li ne konkuras kun ili. Li atentis pri sensajjnigo kaj ne ŝanĝiĝas per profito. Li penetras profunde la veron de aĵoj kaj povas firme teni la fundamenton. Tiel do, estante ekstere de la ĉielo kaj la tero kaj forlasante ĉiujn estaĵojn, li ankoraŭ neniam ĝenas sin en la spirito. Li iras laŭ la Vojo konforme al la virto. Li reĵetas la bonvolecon-juston kaj forpelas la deregulojn kaj muzikon. Do la koro de la pleja homo estas stabila.

En la mondo, tiu, kiu estimas la Vojon, estimas libron. Sed la libro konsistas nur el vortoj, do la vortoj enhavas ion estimindan. Kio estas estimata en la vortoj, tio estas signifoj. Sed estas io, kion la vortoj sekvas. Tio, kion la vortoj sekvas, estas netrasdonebla per vortoj. Sed oni transdonas librojn pro tio, ke en la mondo estas estimataj la vortoj. Kvankam oni en la mondo estimas tiujn, tamen tiuj ankoraŭ ne estas sufiĉe estimindaj, ĉar tio, kion oni estimas, ne estas tiom estiminda.

Io videbla per rigardado estas formo kaj koloro. Io aŭdebla per aŭskultado estas nomo kaj voĉo. Bedaŭrinde, oni konsideras formon kaj koloron, nomon kaj voĉon, sufiĉaj por akiri la realon. Sed la formo kaj la koloro, la nomo kaj la voĉo, ne sufiĉas por atingi la realon. Do, kiu scias, tiu ne diras; kiu diras, tiu ne scias.³²⁷ Sed, ĉu oni en la mondo komprenas tion?

Duko Huan estis leganta libron sur balkono.³²⁸ Sub la balkono iu radfaristo, nomata Pian, estis ĉizanta la radon. Li, paŭzinte ĉizi, demandis la dukon Huan: “Mi aŭdacas demandi, kion vi, sinjoro duko, legas?”

La duko respondis: “Vortojn de sanktulo.”

Demandis: “Ĉu la sanktulo vivas?”

La duko respondis: “Li jam mortis.”

Diris: “Se tiel, tio, kion sinjoro legas, estas nur rekremento de la antikvulo.”

La duko Huan diris: “Koncernante libron, kiun mi legas, kial simpla radfaristo povus argumenti? Se ĉi povus sinpravigi, mi toleros. Se ne, ĉi mortos.”

Radfaristo Pian diris: “Mi observas tiel el la vidpunkto de mia laboro. Se malrapide ĉizus radon, la rado, tro malfirma, ne fiksiĝus; se rapide, ĝi, tro firma, ne eniras. Necesas ĉizi ne malrapide nek rapide. Tio eblas nur per manoj kaj konforme al koro. Per

³²⁷ Ĉapitro 56 de Laozi, Dao Dejing.

³²⁸ 桓公 La reĝo de Qi-regno, surtrone 685-643 a. K.

buŝo ne eblas diri. Kvankam devas esti certe iu cifrado en tio,³²⁹ sed tamen mi ne povas transdoni la sekreton per vortoj al mia filo.³³⁰ Ankaŭ mia filo ne povas ricevi tion de mi. Tiel do mi, maljunulo de 70-jara, ĉizadas radojn. Ankaŭ antikvuloj mortis kun io netransdonebla. Sekve, kion vi legas, tio estas nur rekrementoĵoj de antikvuloj.”

³²⁹ 有數存焉於其間 Esploristoj prenas la ideogramon 數 por tekniko 術. Sed nun en komputila epoko estas pli bone konsideri ĝin cifero.

³³⁰ 不能以喻 laŭlitere “ne eblas per paraboloj”

14 LA ĈIELA TURNADO

Ĉu la ĉielo turnas sin? Ĉu la tero mem lokiĝas? Ĉu la suno kaj la luno konkuradas sin reciproke pri la loko? Kiu do ĉefe tiras, kaj kiu do ligas per ŝnuroj? Kiu, mem nenion farante, lasas tion moviĝi kaj iradi. Aŭ ĉu estas iu mekanismo, kiu necesigas tion? Aŭ ĉu ili mem turniĝas kaj mem ne povas ĉesi?

Ĉu nubo fariĝas pluvo, aŭ pluvo fariĝas nubo? Kiu mastrumas tion? Kiu, mem nenion farante, movas tion lascive? Vento leviĝas de norde, iam blovas okcidenten, iam orienten, kaj denove leviĝas kaj vagadas. Kiu do el- kaj en-spiradas, kiu do, mem nenion farante, turnomovas? Permesu al mi demandi vin, kial?

La ŝamano, Xian, revelaciis, dirante: “Venu! Mi diros al vi. La ĉielo havas ses apogeojn kaj kvin konstantaĵojn.³³¹ Se la reĝo obeas ilin, la mondo estos regata; se kontraŭas, estiĝos sinistro. Se li sekvas naŭ disĉiplinojn,³³² kompletos la regado kaj perfektigo la virto, kaj brile kondukos la suban teron, kaj la mondo submetiĝos. Oni nomos lin la supra reĝo.”

S-ro Tang, la kanceliero de Shang-regno,³³³ demandis Zhuangzi pri bonvoleco.

Zhuangzi diris: “Tigroj kaj lupoj estas bonvolecaj.”

Tang diris: “Kion do signifas via eldiro?”

Zhuangzi diris: “Ĉu tio, ke patro kaj filo reciproke amas sin, ne estas bonvoleca?”

Tang diris: “Bonvolu diri al mi, kio estas la pleja bonvoleco?”

Zhuangzi diris: “Ĉe la pleja bonvoleco mankas korinklino.”

La kanceliero diris: “Mi, Tang, aŭdis jene: ‘Senkorinklino estas ne ami, kaj sen ami estas malfidelo al gepatroj’. Ĉu eblus konsideri la plejan bonvolecon kiel malfidelon al gepatroj?”

Zhuangzi diris: “Tute ne. La pleja bonvoleco estas tiel altvalora, ke ne eblus esprimi per la termino de fila pietato. Via opinio ne superas la terminon de fila pietato, sed eĉ ne atingas la terminon de fila pietato. Kiu iris suden kaj atingis la urbon Ying, tiu jam ne

³³¹ 六極五常. Diversas opinioj pri ses apogeoj. Iu konsideras ilin kiel kvar direktojn 東西南北 kaj supron-subon. La alia – kiel ses ĉiojn 氣(陰陽風雨晦明). Multaj konsentas, ke kvin konstantaĵoj estas kvin materioj - 木火土金水. Koncerne de ŝamano 巫咸, iu konsideras ficcia nomo, alia konsideras reale ekzistinta persono de Shang dinastio, kiu estis ministro ĉe la reĝo 中宗太戊.

³³² 九洛 Iu prenas ĝin kiel tutan mondon 九州. La alia prenas ĝin kiel naŭ instruojn 九疇洛書, kiujn Dio instruis al la reĝo Yu 禹.

³³³ 商太宰蕩 Shang estas alinomo de Song 宋.

povas vidi la nordan monton Ming.³³⁴ Kial? Li foriris laŭgrade malproksimen. Tial do estas dirite: ‘Respektante plenumi taskon de fila pietato estas facile, sed amante malfacile. Amante plenumi taskon de fila pietato estas facile, sed forgesi gepatrojn estas malfacile. Forgesi gepatrojn estas facile, sed forgesigi gepatrojn pri mi estas malfacile. Forgesigi gepatrojn pri mi estas facile, sed tute forgesi la mondon estas malfacile. Tute forgesi la mondon estas facile, sed tute forgesigi la mondon pri mi estas malfacile.’³³⁵

La virtuloj preterlasis reĝojn Yao kaj Shun kaj ne faris samkiel ili. Tiujn, kiuj donis profiton al dek-mil generacioj, la mondo ne scias. Ili estis fremdaj al tiu, kiu nur diradas fervore bonvolecon kaj filan pietaton. Koncerne de fila pietato, respekto de pliaĝuloj, bonvoleco, justo, lojaleco, fido, fideleco, pureco, ĉiuj mem estas altrudado de rolo, kiun la virto ludas. Ĉiuj ne sufiĉas por laŭdegi Tial do estas dirite: ‘La plej nobla malakceptas titolon, donatan de la regno, la plej riĉa reĵetas regnan trezoron, kaj la plej alta voto ignoras honoron.’ Tiele la Vojo ne ŝanceliĝas.”

Beimen Cheng demandis Flavan Imperiestron, dirante: “Vi, Imperiestro, okazigis koncerton de muziko Xianchi sur la kampo de Tongding. Aŭdinte ĝian komencon, mi ektimis. Aŭdante sekve, mi sentis min langvora. Aŭdante la finon, mi konfuziĝis. Fascinite kaj senvorte, mi restis foranima.”³³⁶

La Imperiestro diris: “Vi preskaŭ pravas. Mia muziko estas ludata de homoj, sonas far de la Ĉielo, iras laŭ dereguloj kaj justo, estas konstruita per la Vojo de la Granda Puro. La plej alta muziko unue konformas al homa afero, sekvas rezonon de la Ĉielo, iras laŭ kvin virtoj, konformas al la naturo. Poste ĝi harmonias kun la rezono de kvar sezonoj, kaj akordiĝas kun ĉio. Kaj poste kvar sezonoj sekvas unu posta la alia, ĉiuj estaĵoj naskiĝas laŭvice. Unu fortiĝas, la alia malfortiĝas. Milda kaj streĉita tonoj sonas bonorde³³⁷, unu iĝas hela, la alia iĝas malhela, tiel harmonias *yin* kaj *yang*. La voĉo fluas kvazaŭ lumo. Por ke vintrodormantaj vermoj kaj insektoj vekiĝu kaj ekmoviĝu, mi surprizas ilin per tondro kaj hajlo. La fino sen vosto, la komenco sen kapo. Jen morto kaj jen vivo, jen falo kaj jen leviĝo. Ĉie kaj ĉiam sen fino, do eĉ unu ne estas atendebla. Tial do vi ektimis.

³³⁴ 郢 ĉefurbo de Chu-regno. 冥山 Iuj konsideras ĝin fikcia nomo, la aliaj – nomo de reale ekzistanta monto en la sudo de Henan.

³³⁵ Argumento iras laŭgrade de alligiteco ĝis malligiteco (attachment-detachment).

³³⁶ 北門成 fikcia nomo 黃帝 Legenda Imperiestro 咸池之樂 Unu el ses dancmuzikoj en la Zhou-dinastio, ludita por la festo de Tera Spirito 洞庭 vasta kampo, ne nomo de la fama lago.

³³⁷ 文武 Troviĝas diversaj opinioj pri tiu frazo. Unu komprenas laŭlitere, la alia prenas 文 kiel tamburon, 武 kiel sonorilon. En Li Ji[礼記、樂記篇] estas skribite: “En la komenco ekludas per 文, en la fino per 武.”

Mi ludis ĝin per akordiĝo de *yin* kaj *yang*, prilumis ĝin per briloj de suno kaj luno. La voĉoj povis esti kaj mallonga kaj longa, kaj mola kaj malmola, kaj ŝanĝiĝas kaj unuiĝas, ne farante konstantecon ĉefa. Se estas valo, la valo pleniĝas de ili; se estas kavo, la kavo pleniĝas. Kovrante krevojn, gardas spiriton. Faras estaĵojn tonkvanto.³³⁸ La voĉoj tremas larĝe, kaj la signifo alte lumiĝas. Tiel do Spiritoj konservas sian misteran okultecon, la suno, la luno kaj la steloj iras laŭ sia ordo. Mi haltigas ĝin je la lasta limo, kaj lasas ĝin fluanta senĉese. Vi volus pripensi ĝin, sed ne povas scii. Vi volus observi ĝin, sed ne povas vidi, postkuri ĝin, sed ne povas kuratingi. Stuporigite, vi staras sur vojkruceto kun kvar malplenaj direktoj. Vi nur, apogante vin ĉe velkinta paŭlovnio, mallaŭte kantetas. Okuloj finas la vidpovon tie, kien vi dezirus rigardi, fortoj elĉerpiĝas tie, kien vi dezirus kuratingi. Ankaŭ al mi mem jam nenion eblas fari je tio. Formo estas regata per malpleneco kaj atingis laŭokaze libermovon. Ankaŭ vi, estante en la libermovo, eksentis vin langvora.

Sekve mi ludis ĝin per senlangvoraj voĉoj, farante la melodion laŭ ordono de naturo. Tial do ŝajnas, kvazaŭ dense naskiĝus miksaĵoj unuj post aliaj. Amaso da ĝuoj, senformaj, diverĝas ĉien, ne altirite. Ĉe mistera krepusko iĝas senvoĉe, moviĝas nenien, kaj restas en silenta mallumo.³³⁹ Tio estas nomata aŭ morto, aŭ vivo, aŭ realo, aŭ prospero. Iras, fluas, disiĝas vane. Ne faras ordinaran voĉon ĉefa. Mondanoj dubas ĝin, sed sanktuloj ja pripensas amplekse. La sanktuloj atingas la senton kaj renkontas la ordonon. Sen tio, ke la Ĉiela mekanismo ekstreĉiĝas, liaj kvin sentorganoj estas pretaj. Tio estas nomata la Ĉiela Ĝuo. Senvorte la koro ĝojas. Tiel do s-ro You Yan faris odon, dirante: “Aŭskultas ĝin, ne aŭdante la voĉon; rigardas ĝin, ne vidante la formon. Ĝi plenigas la Ĉielon kaj la Teron, ka kovras ses polusojn.”³⁴⁰

Vi ja dezirus aŭskulti ĝin, sed ne akceptis. Do vi konfuziĝis. Muziko komenciĝas de timo. Oni timas, do estas obsedota. Sekve post tio mi prezentas langvoron. Oni langvoras, do fuĝas. Fine konfuziĝas. Konfuziĝas, do stultiĝas. Stultiĝas, do troviĝas la Vojo. Oni devas teni la Vojon kaj kunesti kun ĝi.³⁴¹

³³⁸ 塗郤守神、以物爲量 Multaj esploristoj prenas la ideogramon 郤 por sentaj organoj kaj 神 por koro, sed mi prenas ilin kiel krevon kaj dion. Pri la lasta duono diversas esploristoj je kompreno. Mi konjektas, ke la frazo signifus “esprimi la estaĵon per kvanto de voĉo”. Do sekvanta frazo 揮綽 (tremante larĝa) estas ĝia daŭrigo.

³³⁹ 窈冥 La sama frazo estas en Laozi, Dao De Jing, la ĉap. 21.

³⁴⁰ 有焱氏 Gi estas 神農 La Sankta Terkulturisto (legenda reganto, la 2-a el la tri majestuloj 三皇).

³⁴¹ Koncernante muzikon, Mohistoj ignoris la valoron. Zhuangzi taksas ĝin, kiel aliron al la Vojo. Okulfrapas, ke malkiel Yuan Ji 阮籍, la muziko, taksata de Zhuangzi, donas antaŭ ĉio malĝojon (timon, langvoron, konfuziĝon).

Konfuceo iris okcidenten al Wei-regno. Yan Yuan demandis muzikiston, nomatan Jin, dirante: “Kiel vi opinias pri la vojaĝo de nia Majstro, Konfuceo?”

La muzikisto Jin diris: “Bedaŭrinde, via Majstro ja suferos.”

Yan Yuan diris: “Kial?”

La muzikisto Jin diris: “Dum la pajlhundo ankoraŭ ne estas prezentita al festo, ĝi estas enmetita en la bambua kesto kaj estas vestita per tuko, ornamita per desegnaĵo kaj brodaĵo. Kaj sendas ĝin la pastro, kiu ekzorcis sian pekon per abstino kaj sinlavo. Jam post la prezentado ĝin distretadas je ĝia kapo kaj vertebro pasantoj, aŭ prenas kaj bruligas ĝin en forno herbosarkistoj. Se iu denove prenas ĝin, enmetus en sian bambuan keston, vestus ĝin per brodaĵo kaj desegnaĵo, kunloĝus kaj dormus apud ĝi, tiam li ne povus havi bonan sonĝon, sed nepre havus oftan koŝmaron.

Nun via Majstro prenas la pajlhundon, jam prezentitaj de antaŭaj reĝoj, kaj kolektas disĉiplojn kaj kunloĝas kaj dormas apud ĝi. Tiel do al li okazadis, ke iuj hakis la arbon sur li en Song-regno kaj la aliaj forviŝis eĉ liajn piedsignojn en Wei-regno, okazadis, ke li estadis en malfacilo en landoj de Shang kaj Zhou. Ĉu tio ne estas la sonĝo? Sieĝite inter regnoj Chen kaj Cai, li ne manĝis kuiritaĵon dum sep tagoj, estis apenaŭ inter la vivo kaj morto. Ĉu tio ne estas la koŝmaro?

Por veturi akvon nenio estas pli bona ol boato, por veturi teron nenio estas pli bona ol ĉaro. Por iri laŭ akvo oni devas uzi boaton. Se oni volus puŝi la boaton laŭ tero, oni ne povus movi ĝin antaŭen eĉ je kelke da distanco ĝis la morto. La antikva epoko kaj la nuna estas malsamaj, kiel akvo kaj tero. Zhou-dinastio kaj Lu-regno malsamas, kiel boato kaj ĉaro. Se praktiki politikon de Zhou en nuna Lu-regno, tio egalas puŝi boaton surtere. Estas lacige kaj senutile. Nepre al la korpo estas danĝere. Li ankoraŭ ne scias, ke estas sendirekta ŝanĝiĝo, ke por eviti senelirejon necesas konformado al estaĵoj.

Ĉu iam vi ne vidis baskulputon? Se tiri ĝin, ĝi malleviĝas, se demeti, ĝi leviĝas supren. Ĝi estas tirata de homo, sed ne tiras la homon. Do ĝi neniom estas kulpigata de homoj pri leviĝo kaj malleviĝo.

Koncernante decregulojn, juston kaj leĝojn, Tri Majestuloj kaj Kvin Suverenoj fieris ne pri la sameco, sed pri la regebleco.³⁴² Se esprimi per metaforo, la decreguloj, justo kaj leĝoj eĉ Tri Majestuloj kaj Kvin Suverenoj similas al azarolo, piro, oranĝo kaj pampelmuso. La gustoj malsamas unuj kun la aliaj, sed ĉiuj estas manĝeblaj kaj agrablaj por la lango kaj la palato. Tiel do decreguloj, justo kaj leĝoj ŝanĝigas konforme al la tempo.

³⁴² 三皇五帝 Tri Majestuloj kaj Kvin Suverenoj estas antikvaj saĝaj reĝoj. Diferencas opinioj, kiuj estas ili. 三皇 : 天皇、地皇、泰皇 aŭ 伏羲、神農、黃帝. 五帝 : 伏羲、神農、黃帝、堯、舜 aŭ 少昊、顓頊、高辛、堯、舜.

Nun prenu por ekzemplo simion. Se oni vestus lin per vestaĵo de Zhou Gong, li nepre ekmordus, disŝirus, kaj forĵetus ĝin, kaj malkontentus.³⁴³ Ni vidas diferencon inter nuno kaj antikvo tiel same, kiel malsamecon inter simio kaj Zhou Gong.

Antaŭe Xishi pro malsano je koro malridetis, kuntirante brovojn.³⁴⁴ Iu malbela samvilaĝanino, vidante ŝin bela, post sia reveno hejmen metis manon sur la koron kaj ektiris brovojn. Sed vidante tion, najbara riĉulo ne eliris plu el sia domo kaj firme fermis la pordon. Malriĉulo, vidante tion, ekpreninte manon de sia edzino, forkuris. Ŝi eksciis grimacon bela, sed ne sciis, kial la grimaco estiĝas bela. Bedaŭrinde, ankaŭ via Majstro falos en malfacilon.”

Konfuceo, jam 51-jara, tamen al li ankoraŭ ne estas konata la Vojo. Do li iris suden al Pei por vidi Lao Dan.³⁴⁵

Lao Dan diris: “Ho, bonvenon al vi. Mi aŭdis, ke vi estas norda saĝulo. Ĉu vi trovis la Vojon?”

Konfuceo diris: “Ankoraŭ mi ne povas.”

Laozi diris: “Kie vi serĉas ĝin?”

Konfuceo diris: “Mi ekserĉis ĝin en reguloj kaj kalkuloj.³⁴⁶ Pasis kvin jaroj, sed mi ne povis trovi.”

Laozi diris: “Kaj kie vi sekve serĉis ĝin?”

Konfuceo diris: “Mi ekserĉis ĝin en la teorio de *yin-yang*.³⁴⁷ Pasis dek du jaroj, sed mi ankoraŭ ne povis trovi.”

Laozi diris: “Kompreneble. Se estus oferebla la Vojo, oni ne devus ne oferi ĝin al sia estro. Se la Vojo estus donacebla, oni ne devus ne donaci al siaj gepatroj. Se la Vojo estus direbla, oni ne devus ne diri al siaj gefratoj. Se la Vojo estus heredebila, oni ne devus ne heredigi ĝin al siaj filoj kaj nepoj. Sed ne eblas. Ne estas alia kialo ol la jena: ‘Kiu ne havas subjekton en si mem, tiun la Vojo preterpasas.³⁴⁸ Kiu ne havas ekstere de si justecon, al tiu la Vojo ne aliras. Se oni ne akceptas ekstere tion, kio eliras de interne, tiuokaze la sanktulo ne elmontras. Kiam io eniras de ekstere, se mankas subjekto ene de ricevanto, tiuokaze la sanktulo ne klopodas.’

³⁴³ 周公旦 Plijuna frato de la reĝo Wu. Konfuceo ege respektis lin.

³⁴⁴ 西施 Belulino de Yue-regno.

³⁴⁵ 沛 lokonomo en Jiangsu provinco 江蘇. En *Shiji* estas skribite pri la deveno de Laozi en la gubernio 苦(nuna Henan 河南省鹿邑). 老聃 Laozi.

³⁴⁶ 度數 En la ĉap. La Ĉiela Vojo aperas la frazo, kiel 礼法度数.

³⁴⁷ 陰陽 La libro de Ŝanĝiĝoj 易

³⁴⁸ 中無主而不止 Ĉi tie “subjekto 主” estas sentanta, volonta mi-o, kiu estas preta je la akceptado de io donata.

Fameco estas publika ilo, el kiu oni ne devas preni tro multe.³⁴⁹ Bonvoleco kaj justo estas portempa loĝejo de antaŭaj reĝoj. Sufiĉas, ke tie eblas loĝi nur unu nokton, sed ne eblas resti tie tro longe, ĉar ricevos multe da riproĉo. Antikva pleja homo rigardis bonvolecon portempa Vojo, faris juston portempa loĝejo, kaj tiel ludvagadis en vanteco. Li nutris sin per modesta rizkampo, memstaris per tereno nepruntebla.³⁵⁰ Lud-vagadi estas senago.³⁵¹ Estas facile nutri sin per la modesta rizkampo. Per la tereno nepruntebla nenion elpremi. Antikvuloj nomis tion ludo por serĉi la veron.³⁵²

Iu faras riĉaĵon grava, sed ne povas donaci la salajron al aliuloj. La alia faras eminentecon grava, sed ne povas cedi la famon. La tria estas allogita al potenco, sed ne povas doni la aŭtoritaton al aliuloj.

Proprigante tiujn al si, ili timas. Forĵetante, ili malĝojas. Sed ili neniom reflektas sin reripense, senĉese gvate celas tiujn. Ili estas ja popolanoj, mortpunataj de la Ĉielo. Venĝemo kaj sento de dankoŝuldo, prenado kaj donado, averto kaj instruo, vivigo kaj mortigo, – tiuj ok agoj estas iloj por ĝustigo. Povas utigli ilin nur tiu, kiu, sekvante grandan ŝanĝigon, ne enfermas sin en bigoteco.

Tial do estas dirite: ‘Politiko estas ĝustigo³⁵³, do, kies koro fariĝis nenatura, al tiu ne malfermiĝas la Ĉiela pordo.’”

Konfuceo renkontis Lao Dan kaj parolis pri bonvoleco kaj justo.

Lao Dan diris: “Se grajnoŝelo eniris en okulon, ĉio en kvar direktoj de la ĉielo kaj la tero turniĝas alia je pozicio. Se kies haŭton kulo aŭ tabano pikis, tiu ne povas dormi tutan nokton. La bonvoleco kaj la justo pikas per si mem nian koron kaj konfuzas. Ne estas pli granda perturbo ol ili. Vi lasu al la mondo ne perdi la simplecon. Vi moviĝu sekvante la venton kaj staru antaŭ ĉio kun natura virto. Kial vi agas supernature, kvazaŭ, portante tamburon, serĉus perdiĝintan infanon.”³⁵⁴

Cigno estas blanka, ne baniĝane ĉiutage. Korvo estas nigra, ne fulgomakulate ĉiutage. Pri la naturo de blankeco kaj nigreco ne eblas argumenti per vortoj. Kiam elsekiĝis fonto, fiŝoj, kune restigite surtere, donas reciproke unu al la alia humidan spiron aŭ ŝprucigas salivon unu al la alia por malsekigi. Sed tamen, tio ne estas pli bona ol

³⁴⁹ 名公器也。Ilo signifas rimedon provizoran, ion ne esencan.

³⁵⁰ 苟簡之田、不貸之圃 Ne estas sciate kia estis la proprieto de tero.

³⁵¹ 逍遙無為 Simila al la termino por la skolo de Aristotelo, Peripatetismo.

³⁵² 采真之遊. 遊 estas sama, kiel 逍遙.

³⁵³ 正者正也. En La Analektoj estas simila esprimo: 政者正也(顏淵篇) Eblas traduki diverse la frazon.

³⁵⁴ 亡子 Iu tradukas la frazon “fuĝinto”.

reciproka forgeso en rivero kaj lago.³⁵⁵

Konfuceo, reveninte de la renkontiĝo kun Lao Dan, ne parolis dum tri tagoj.

Iu disĉiplo demandis: “Kiam vi vidis Lao Dan, kion vi admonis al li?”

Konfuceo diris: “Mi ĝuste nun vidis drakon. La drako, volvite, fariĝas korpo; etendite, fariĝas desegno. Rajdante sur nubo kaj aero, ĝi nutras *yin kaj yang*. Mi, kun buŝo streĉita, ne povis malfermi la buŝon. Kion do mi povus admoni al Lao Dan?”

Zigong diris: “Do, ĉu li sidas firma, kvazaŭ mortinto, kaj vidas, kvazaŭ drakono, lia voĉo kvazaŭ tondro sed silentas kvazaŭ akva fundegejo, kaj impetas kvazaŭ la ĉielo kaj la tero? Ankaŭ mi devas observi lin. Fine li laŭ rekomendo de Konfuceo vizitis Lao Dan.

Lao Dan ĝuste sidis en la ĉambro kaj akceptis lin, dirante malforte: “Mi, jam maljuna, travivis multajn jarojn. Kian admonon vi ĝuste donos al mi?”

Zigong diris: “Regadomaniero de la mondo inter Tri Majestuloj kaj Kvin Imperiestroj estis malsama, tamen ilia fameco estas tute sama. Sed vi sola rigardas ilin ne sanktaj. Kial?”

Lao Dan diris: “Venu pli proksimen. Kial vi konsideras ilin malsamaj?”

Zigong respondis: “Yao cedis la tronon al Shun, Shun transdonis al Yu. Yu uzis la forton kaj Tang uzis la militpovon. La reĝo Wen obeis al Zhou kaj ne aŭdacis kontraŭi. La reĝo Wu kontraŭis al Zhou kaj ne volis obei. Tial do malsamas.”

Lao Dan diris: “Venu pli proksimen, junulo. Mi rakontos al vi pri la regadomaniero de la mondo far de Tri Majestuloj kaj la Kvin Imperiestroj. En sia regado de la mondo la Flava Imperiestro faris la koron de popolo unu. Do inter la popolo aperis tiu, kiu ne lamentas ĉe la morto de gepatroj. Kaj la popolo ne riproĉis tiun.³⁵⁶ En sia regado de la mondo, Yao faris la koron de la popolo ligiĝema. Pro ligiĝemo al siaj gepatroj kaj parencoj popolanoj traktis maldelikate aliulojn, sed ili ne riproĉis tion.³⁵⁷

En sia regado de la mondo Shun igis la koron de la popolo konkurenci. Popolanoj dezirus, ke sia bebo povu paroli jam en la kvina monato post la naskiĝo, kvankam ĝis naskiĝo bezonas dek monatoj en la ventro de gravedulino. Ili ne ĝispensas, kio antaŭ ĉio estas ja la bebo. Tiel do komenciĝis, ke homoj mortis tro frue.

En sia regado de la mondo Yu igis la koron de la popolo ŝanĝiĝi. Ĉiu homo havigis al si egoocentran koron kaj armilon, do ĉiu obeis al ili. ‘Mortigi ŝteliston estas ne

³⁵⁵ Reciproka helpo en malbona situacio estas malpli bona ol forgeso de aliuloj en bona situacio. Tio estas kritiko al mohismo, laŭdanta reciprokan helpon.

³⁵⁶ La popolanoj, unuigite je koro, ne distingis diferencon inter proksimuloj kaj malproksimuloj.

³⁵⁷ 爲其親殺其殺 La frazo estas tre malfacila por kompreni. Estas diversaj opinioj inter esploristoj. Mi prenas la ideogramon 殺 kiel maldelikatan traktadon.

hommortigo'.³⁵⁸ Ĉiu konsideris sin mem semo de la mondo, kiu nur ekzistas por li sola.

Tio ege konsternis la mondon. Leviĝis ĉiuj konfuceanismo kaj mohismo, kiuj ekfondis sian etikon. Nun ili estas por virinoj kaj filinoj.³⁵⁹ Kion oni povas diri pri tio?

Mi rakontas al vi pri la regado de Tri Majestuloj kaj la Kvin Imperiestroj. Oni nomus tion regado, sed ĝi estis nenio alia ol malordo. Saĝeco de Tri Majestuloj supre estis malpli brila ol la lumo de la suno kaj la luno, sube kontraŭis al Spiritoj de la montoj kaj riveroj, kaj meze malpliigis favoron de kvar sezonoj. Ilia saĝo estas pli venena ol vosto de skorpio. Eĉ malgrandaj bestoj ne povas pace vivi laŭ sento de denaska naturo. Malgraŭ tio, ili konsideris sin mem sanktaj. Ilia senhonteco estas hontinda.”

Konsternite, Zigong staras maltrankvila.

Konfuceo diris al Lao Dan: “Mi ellernis Ses Sutrojn: Poezio, Libroj, Decreguloj, Muziko, Ŝanĝiĝo, kaj Historio de Printempo-Aŭtuno.³⁶⁰ Mi mem okupiĝis pri tiuj temoj de longe, kaj mi konsidetas, ke mi scias bone ilin. Mi vizitadis jam 72 landestrojn, predikadis pri la Vojo de antaŭaj reĝoj kaj klarigis la aferojn de Zhou kaj Zhao.³⁶¹ Sed neniu el ili akceptis mian ideon. Ho, terure! Estas malfacile konvinki homojn, kaj malfacile klarigi la Vojon.”

Laozi diris: “Vi estas feliĉa, ke vi ne estas akceptata de la reĝoj, regantaj la nunan mondon. La Ses Sutroj estas diritaĵoj de antaŭaj reĝoj. Ili estas nur postsignoj. Kio estas dirita de vi, tio estas ankaŭ la postsigno. La postsigno estas farita per ŝuoj, do ne estas la ŝuoj mem.

Geegretoj, rigardante unu la alian sen movo de pupiloj, koncipiĝas. Insektoj, kiam viro ĉirpas alvente, ino respondas subvente, tiel koncipiĝas. Vivaĵoj per si mem konsistas el masklo kaj femalo, tiel do koncipiĝas. Neŝanĝebla estas la denaska naturo, kaj la destino ne estas aliigebla. Nehaltigebla estas la tempo, neŝtopebla estas la Vojo. Laŭ la Vojo estas nenio, kiu ne povus estiĝi per si mem. Sen la Vojo, nenio estiĝebla.

Konfuceo ne eliris dum tri monatoj. Li denove renkontis Lao Dan kaj diris: “Mi komprenis. Pigoj estas elkovitaj, fiŝoj eligas laktumon, amfobiloj aliformiĝas. Kiam naskiĝis juna frato, krias la pli maljuna frato. Dum longe mi ne fariĝis la homo laŭ natura ŝanĝiĝo. Se mi ne ŝanĝiĝus en la homon, kiel do al mi eblus ŝanĝi aliajn homojn.”

³⁵⁸ 殺盜非殺人 La sama frazo troviĝas en Mozi, la ĉap. Elekto de la malgrandan. Yu estas ideala reĝo por mohistoj.

³⁵⁹ 而今乎婦女. La frazon estas malfacile kompreni. Inter esploristoj diversas je punktuado kaj kompreno. Mi ne povas konsenti kun la opinio, ke la antaŭiranta frazo 其作始有倫 apartenus al tiu frazo kaj tradukis jene: “En la komenco estis etiko, sed poste malordiĝis.”

³⁶⁰ 六經：詩·書·禮·樂·易·春秋

³⁶¹ 周公旦、召公 ili estis fratoj de la reĝo Wu.

Laozi diris: “Bone, s-ro Qiu! Vi komprenis.”

15 POLURADO DE VOLO

Poluradi volon kaj altigi konduton, liberiĝi de homa mondo kaj apartiĝi de profanujo, kun alta idealo indigni kaj kritiki, nur tenante sin alta. Tia estas la persono de monto kaj valo, sed ne mondanoj. Tion preferas iu velka sindroniganto.

Paroladi pri bonvoleco, justo, lojaleco kaj fideleco, kaj teni sin humila-cedema, nur klopodante por sin klerigi. Tia estas la persono, strebanta pacigi la mondon kaj instrui homojn. Tion preferas tiu, kiu lernas, vojaĝante aŭ sidante hejme. Li parolas pri la granda merito, starigas la grandan honoron kaj la deregulojn inter estroj kaj subuloj kaj ĝustigas la rilaton de supra-subo, nur strebante fari la regadon. Tia estas la personeco de kortego, strebanta respekti regnestron kaj firmigi la ŝtaton. Tion preferas tiu, kiu strebas fari meriton por grandigi teritorion de la regno.

Iu loĝas en densa provinco aŭ sur vasta kampo kaj tie hokadas fiŝon, nur nenion farante. Tia estas la persono de rivero kaj maro. Tion preferas tiu, kiu, evitante la mondon, ĝuas libertempon. Li en- kaj el-spiradas aeron, eligante la malnovan kaj enigante la novan. Li ekzercadas movon de animaloj, samkiel urso kaj birdo, nur por vivi longan vivon. Tia estas la persono, induktanta tao-energion.³⁶² Li nutras sian korpon. Tion preferas tiu, kiu zorgas pri longviveco, kiel Peng Cu.³⁶³

Se alta sen poluradi volon, se eblas sinklerigi sen bonvoleco kaj justo, se eblas regadi sen merito kaj honoro, se libera sen rivero kaj maro, se longviva sen induki la tao-energion, nenion ne perdante kaj nenion ne havante, tiam eblas atingi senfinan kvietecon kaj amaso da beleco sekvas lin. Tio estas la Vojo-Tao de la Ĉielo kaj tero, tio estas la virto de sanktuloj.

Tiel do estas dirite: “En trankvila pureco, kvieta soleco kaj vanta nenio, nenion farante, oni estas paca sub la Ĉielo kaj tero. En tio kuŝas la morala kvalito de Tao kaj virto.”

Tiel do estas dirite: “Sanktuloj ripozas. En la ripozo estas paco kaj facileco. La paco kaj facileco estas pure trankvila. En la pacan facilecon kaj la puran trankvilon ne povas invadi ajna spleno, nek povas trafi ajna noca aero.”

Tial do ĉe la virto mankas nenio al spirito.

Tiel do estas dirite: “La vivo de sanktulo estas irado de la Ĉielo. Lia morto estas transformiĝo en materion. En la senmoveco *yin* kun virto akordiĝas, en la moviĝo *yang* kun ondoj akordiĝas.” Li ne fariĝas heroldo por feliĉo, nek fariĝas komenco de malfeliĉo.

³⁶² 道引 signifas taoisman ekzercadon por longigi la vivon.

³⁶³ 彭祖 Legenda homo, kiu longvivis je okcento jaroj.

Nur eksentante, li respondas; premite, ekmoviĝas; ne havante ĉe si alian rimedon, nur devontigite, li ekstas. Forigante saĝon kaj rezonadon, li sekvas la leĝon de la Ĉielo.

Tial li ricevas nek plagon el la Ĉielo, nek zorgojn pri materioj, nek riproĉojn de homoj, nek akuzon de Spiritoj. Li vivas kvazaŭ ŝvebante, mortas kvazaŭ ripozante. Li ne tro cerbumas, ne antaŭintrigas, lumas senbrile, konvinkas sin sen ajna atendo. Dormante, ne sonĝas; vekiĝinte, ne splenas. Lia menso estas pura, lia animo ne laciĝas. En vanta malpleneco li estas simpla. Do tio konformas al la Ĉiela virto.

Estas dirite: “Malĝojo kaj plezuro estas noca al virto, ĝojo kaj kolero estas devojiĝo al Tao, amo kaj malamo estas erariga al virto.” Tial do mensostato sen emocio de ĝojo-malĝojo kondukas al virto. Koro, unuiginta sen ŝanceliĝo, kondukas al kvieteco. Koro sen oponado kondukas al kompreno de vanteco. Koro, malligita al materio, kondukas al simpleco. Koro sen-spitema kondukas al eleganteco.

Estas dirite: “Se la korpo, laciĝinte, ne ripozas, tiam eluziĝos. Se la menso, senĉese uzate, laciĝas, kaj laciĝis, tiam elĉerpiĝos.” Akvo laŭ nature, se ne miksite, estas pura, se ne movite, estas ebena. Sed, se ŝtopite ne fluas, ĝi ne povas resti pura. Tio estas ja fenomeno de la Ĉiela virto.

Estas dirite: “Menso, samkiel akvo, se estas pura ne makuligite, se ununure kvieti ne ŝanceliĝante, se simpla nenion farante, tiam moviĝas laŭ la irado de la Ĉielo. Jen la Vojo, nutranta menson.”

Posedantoj de glavoj el Wu kaj Yue-regnoj konservas ilin en kestoj kaj ne aŭdacas uzi ilin praktike, ĉar ili estas la plejaj trezoroj. Spiritoj en kvar direkcioj ŝvebas laŭvice, kaj atingante ĉien ajn, eĉ supren ĝis la Ĉielon, suben ĝis la profunda tero.³⁶⁴ Ili transformigas kaj kreskigas ĉiujn estaĵojn, ne montrante sian figuron. Ili faras sian nomon egala al Dio. La pure simpla Vojo-Tao gardas menson. Tiu, gardante, ne perdas ĉi tiun, tiel do unuigas kun la menso. Traunuiginte, la spirito kuniĝas kun la Ĉiela etiko.

Estas dirite en la parolado de kamparanoj: “Popolanoj rigardas profiton grava, honestaj personoj – famon grava, saĝaj personoj – la strebon alta, sankutuloj – la spiriton kara.” Tiel do, kiu estas simpla, tiu ne estas makulota, kaj kiu estas pura, ties spirito ne estas difektota. Tiu, kiu povis enkorpiĝi la purecon kaj simplecon, estas nomata la Vera Homo.

³⁶⁴ 精神 Ĉi tie la argumento disvolviĝas de la homa menso al Spiritoj, kiuj egalas al dioj. El la teksto mem estas malfacile distingi inter la argumentado de homa menso kaj dieca spirito, kvankam tio estas tre grava por klarigi la ideon de Zhuangzi pri religio kaj psikologio, ĉu la homa menso estus dieca aŭ ne. Posteuloj en Ĉinio utiligis la tekston de Zhuangzi por kompreni Budhismon, ke la Vera Homo egalas al vekiĝinto, t. e. Budhao. [宗炳『明佛論』]

16 FLIKADO DE DENASKA NATURO

Iu volus flikti denaskan naturon per profana lernado kaj serĉas reveni al la komenco, la alia volus reguligi deziron per profana pensado kaj serĉas atingi la klerigon.³⁶⁵ Oni nomas ilin senvidpovaj popolanoj.

Antikvaj posedintoj de la Vojo-Tao nutris la intelekton per simpla trankvileco. Ili, naskiĝinte, faras nenion per la intelekto. Ili nomis tion la nutrado de trankvileco per la intelekto. La intelekto kaj la trankvileco nutras sin reciproke per mutuala apogo, kaj tiel elmontriĝas de la denaska naturo la harmonia rezono.

La virto estas harmonio, la Vojo estas rezono. Sen la virto, bonvoleco iĝas neampleksa, sen la Vojo, justo iĝas ne rezona. Se klara esas la justo, estaĵoj proksimiĝas en lojaleco. En pura vereco, reflekti senton estas ja muziko. Fidela ago kun ampleksa korpo laŭ skribita kulturo estas decreguloj. Per anticipa troigo de la decreguloj kaj muziko malordiĝas la mondo. Oni, ĝustigante ilin, kaŝas la per-si-meman virton. La virto ne devas esti kovrita, ĉar, se ĝi estu kovrita, la aĵoj nepre perdas la denaskan naturon.

Antikvuloj, estante en ĥaosa krudeco, kune kun samtempuloj de sia generacio, atingis la simplan trankvilecon. En tiu tempo harmonie kvietis *yin* kaj *yang*, Spiritoj ne tumultis, kvar sezonoj turniĝis en ordo, ĉio sen difekto, amaso da estaĵoj ne mortis trofrue. Homoj, kvankam intelektaj, tamen ne havis okazon uzi sian intelekton. Tio estas nomata la Pleja Unu-tuteco.³⁶⁶ En tiu tempo oni ne artefaris ion, sed vivis ĉiam spontanee laŭ la naturo.³⁶⁷

Kun kadukiĝo de la virto, aperis Suiren kaj Fu Xi, ekregis por la mondo.³⁶⁸ Ĉar tio estas nur konformigo, sed ne Unu-tuteco, do la virto kadukiĝis plu. Aperis Shen Nong kaj Huan Di kaj ekregis por la mondo. Tio estis nur stabiligo, sed eĉ ne konformigo, do la virto kadukiĝis plu. Aperis Tang (Yao) kaj Yu (Shun) kaj ekregis por la mondo. Ili eklevigis la fluon de transformigo je regado, maldensigis purecon kaj frakasis simplecon. Ili okupiĝis je sia bonfarado, devojiĝante de Tao, kaj kondukis, endaĝerigante la virton. Kaj poste, forĵetante la denaskan naturon, ili obeis al sia koro. Koro kaj koro, unu la alia, havigis al si sian intelekton aŭ konscion, do ekmankis la stabileco al la mondo. Do, poste,

³⁶⁵ Pri la ideogramo 滑 kontraŭas opinioj inter esploristoj. Iuj prenas ĝin por ordigo, la aliaj – por malordigo. Mi konsentas kun la unua.

³⁶⁶ 至一 Esploristoj komprenas tion kiel Perfektan unuigon kun Tao.

³⁶⁷ 常自然

³⁶⁸ Legendaj reĝoj. 燧人 Suiren instruis uzadon de fajro. 伏戲 Fu Xi instruis fiŝkaptadon per reto. Pri 神農 · 黃帝, 唐 · 虞 estas jam menciite en antaŭaj ĉapitroj.

estis aldonata la kulturo kaj abundiĝis la vastaj scioj. La kulturo pereigis la kvaliton kaj la vastaj scioj malfortigis la koron. Poste popolanoj ekkonfuziĝis, kaj ne revenas plu al la komenco de la denaska naturo.

Se ni observas tion el tiu vidpunkto, la mondo perdis la Vojon, la Vojo perdis la mondon. Kaj la mondo kaj la Vojo, unu la alia perdis sin reciproke. Kiel la persono de la Vojo povus ekflori, kaj kiel la mondo povus ekflori laŭ la Vojo. La Vojo ne povas flori en la mondo, kaj la mondo ne povas flori laŭ la Vojo. Kaŝis la virto de sanktuloj, malgraŭ ke ili ne vivas en la monto kaj la arbaro. Ĉar kaŝite, ili jam ne bezonas kaŝi sin.

Antikvaj t. n. ermitoj estis ne videblaj ne pro tio, ke ili kaŝis sin, nek pro tio, ke ili fermis sian buŝojn por paroli, nek pro tio, ke ili ne publikigis la scion, sekrete entenante ĝin. Tiaj estis nur ĉar la ordono de tempo ege diferencis de ili. Eĉ se la ordono de tempo favorus ilin kaj ili povus fari ĉion ajn en la mondo, tiam ili ne restigus sian artefaritan piedsignon, reveninte ĝuste al la Unu-tuteco. Se la ordono de tempo ne favoris ilin kaj ili falis en mizeron, tiam ili lasis sian radikon profundiĝi, atendante kviete la kulminon. Jen en tio kuŝas la Vojo, laŭ kiu oni povis teni sian ekzistadon.

Antikve, tiu, kiu tenis sian ekzistadon, ne ornamis la scion per elokvento, nek ĝis ekstremo posedis la mondon pere de scio. Li nur, memstarante en soleco, revenis al la denaska naturo. Kion necesas fari plu? La Vojo estas ja neatingebola per ageto, la virto – per scioto. La scioto damaĝas la virton, la ageto – la Vojon. Tial do estas dirite: “Nur ĝustigu sin mem.” Perfekta ĝojo – tio estas nomata efektivigo de strebo.

Antikve la efektivigo de strebo ne signifis atingon de la altrango, kiel luksa ĉaro kaj krono. Tio signifis, ke ili neniam estas profitigaj al la ĝojo. La efektivigo de strebo por nuntempuloj estas akiro de luksa ĉaro kaj krono. Kio ekzistas en la altrango, tio ne estas denaske dotita naturo, sed nur hazarde alveninta akiritaĵo. Oni ne povas preventi la hazardan alvenon de la akiritaĵo, nek povas bari al ĝi la foriron. Tial do oni ne devas lasi la strebon arbitra por la luksa ĉaro kaj krono, nek devas turni sin al vulgaraĵo pretekste de sia mizera vivteno. Ĝojo estas tute egale, ĉu tiel aŭ aliel, sed estu nur sen ajna spleno.

Nun oni malĝojas, kiam foriras de si la akiritaĵo. El tiu vidpunkto, malgraŭ ke efemere ĝojus, oni neniam povas eviti steriliĝon. Tial do estas dirite: “Kiu perdas sin mem por eksteriĝo kaj sian denaskan naturon por vulgaraĵo, tiu nomiĝas popolano invertita, staranta kapmalsupren.”

17 AŬTUNA AKVEGO

Venas la tempo de aŭtuna akvego, cento da riveroj enfluas en la Flavan Riveregon. Per fluo grandiĝas la distanco inter ambaŭ bordoj tiel, kiel ne distingeblas transriveraj bestoj, ĉu bovoj aŭ ĉevaloj. Jen ĝoegas la S-ro Rivergrafo,³⁶⁹ fierante, ke tuta belo de la mondo apartenas nur al si mem. Laŭ la fluo li direktis orienten kaj atingis la Nordan maron. Rigardu la orientan flankon, ne videblas la ekstremo de akvo.

Tiam li ekturis sin al S-ro Ruo,³⁷⁰ vidante okeanon kaj ĉagreniĝante, diris: “Estas dirite ĵargone, ke iu, aŭdinte pri la Vojo nur cent fojojn, fieris je sia supereco ol la aliaj. Tiu estas mi. Kiam antaŭe mi aŭdis iun subtaksanta la valoron de Zhongni kaj aŭdis iun malestimanta la justecon de Bp Yi, mi ne povis kredi tion unuatempe. Nun mi vidas vian neelĉerpeblan vastecon. Se mi ne alvenus al via pordo, mi estus apenaŭ endagrigita, ke mi iĝus mokridata de multaj granduloj je la Vojo.

Ruo de la Norda maro diris: “Rano en puto ne povas paroli pri maro, ĉar li vivas en la limigita spaco. Somera insekto ne povas paroli pri glacio, ĉar ĝi estas ligita al la tempo. Pedanto ne povas paroli pri la Vojo-Tao, ĉar li estas tordita per instruoj. Nun vi eliris de viaj bordoj kaj, vidante grandan maron, sciigis vian malbelecon. Tiel do nun ni kun vi povas paroli pri grandaj rezonoj.

Neniu akvo en la mondo estas pli granda ol maro. Kelkdek miloj da riveroj eniras tien, ne sciate kiam ĉesos. Sed tie ne pleniĝos. Malgraŭ, ke ien, nomatan Weilü,³⁷¹ tralikiĝas akvo, ne sciate ĝis kiam, tamen ne malpleniĝas. Ne ŝanĝiĝas en printempo kaj en aŭtuno. Okzas nek inundo nek sekeco. Ĝi multe superas ĉiun ajn fluon de riveroj eĉ nekalkuleble per nombroj kaj kvantoj. Sed mi mem neniam fieris je ĝia multeco, ĉar ĝi formiĝis laŭ la Ĉielo kaj la tero, ricevinte la Ĉjon de *yin* kaj *yang*.³⁷² Mi mem, ekzistante inter la Ĉielo kaj la tero, estas samkiel nura ŝtoneto aŭ arbeto en la granda monto. Mi ĝuste rigardas mian ekziston malgranda. Kial mi povus vidi min granda?

Ĉu tio, ke eĉ la Kvar Maroj ekzistas inter la Ĉielo kaj la tero, ne estas simila al nura formikejo en marĉego? Ĉu ekzistado de Centra Lando en la mondo ne similas al unu rizo en la granda tenejo? Se kalkuli en dekmil estaĵoj, homaro estas nur unu el ili. El homoj, loĝantaj nur kie produktiĝas grenoj kaj pasas veturiloj kiel boatoj-ĉaroj, ĉiu persono

³⁶⁹ 河伯 Dio de la Flava Rivero.

³⁷⁰ 若 Dio de la Norda maro 北海.

³⁷¹ 尾閭 imagata truo ekzistanta en marfundo.

³⁷² 受氣於陰陽.

estas unu ero. Ĉu, kompare kun multaj estaĵoj, li ne similas al unu hareto de la korpo de ĉevalo?

Jen nur tia estas la homa afero kiel heredo de Kvin Imperiestroj, luktado de Tri Reĝoj, zorgo de bonvoleculoj kaj penado de respondecaj personoj.³⁷³ Honorigi famon de Bo Yi je lia ekziĝo aŭ erudicion de Zhongni je liaj vortoj kiel grandajn aferojn, ĉu tio ne similas al via fiero je grandeco de via akvo?”

S-ro Rivergrafo diris: “Tiel do, ĉu estos sufiĉe, se mi konsideros la Ĉielon kaj la teron granda kaj la ekstreman pinton malgranda?”

Ruo de la Norda maro diris: “Ne. Kvanto de estaĵoj estas senlima, la tempo ne ĉesas, dividado estas ĉiam ŝanĝiĝanta,³⁷⁴ rilato inter komenco kaj fino estas nedistingebla. Tial do Granda sciulo observas el la vidpunkto de malproksimeco kaj proksimeco. Tiel, la eta ne estas malgranda, kaj la ega ne estas granda. Diapazono de scio estas senlima. Se klare kompreni estinton kaj estanton, oni ne ĉagreniĝas je la fora pasinteco, nek surpiedpinte hastas je la mallonga nuno. Ĉar scias, ke la tempo estas senĉesa, kaj perceptas, ke estas pleniĝo kaj malpleniĝo. Tiel do, gajninte, ne ĝojegas, perdinte, ne ĉagreniĝas, ĉar scias, ke divido estas nekonstanta. Se klare komprenas, ke la vojo estas glata, tiam la vivo ne estas ĝojo kaj la morto ne estas plago. Ĉar scias, ke la fino kaj la komenco estas nedividebla. Se kalkuli kiom da scioj akireblaj al homoj, la scio estas neniel pli granda ol la neciata. La tempo de vivdaŭro neniel pli longa ol la tempo antaŭ la naskiĝo. Havante nur malgrandan scion, oni serĉas akiri la grandan pri la vasta areo – jen tial oni ŝanceliĝas, konfuziĝas kaj ne povas akiri ĝin por si.

El tiu vidpunkto, kiel eblus decide rigardi la ekstreman pinton de hareto la malplej granda, kaj, kiel eblus absolute konsideri la Ĉielon kaj la teron la plej granda areo?”³⁷⁵

Rivergrafo diris: “Ĉiuj diskutantoj diras, ke la pleja minimumo estas senforma kaj la pleja maksimumo ne estas ampleksebla. Ĉu tio estas kredinda informo?”

Ruo de la Norda maro diris: “Kiu rigardas ion grandan el la mikra vidpunkto, ne povas kapti tuton. Kiu rigardas ion malgrandan el la makra vidpunkto, ne povas klare distingi detalon. Mikro estas ege malgranda, makro estas tre grandega. Ili konvene malsamas de infinito kaj ĉe ili estas propulso.³⁷⁶ Ĉe tiu, kiu havas la formon, estas

³⁷³ 仁人之所憂、任士之所勞. La unua estas ideala persono de kofuceanismo, la dua, laŭ mia opinio, de mohismo.

³⁷⁴ 分無常 Dividado estas ĉiam ŝanĝiĝanta.

³⁷⁵ Antikvaj ĉinaj pensuloj, kiel mohistoj, nominalistoj kaj taoistoj, jam bone sciis pri la senlimeco de la malgranda kaj la granda, pri la valordiferenco inter mallonga kaj longa dumdaŭro, kaj pri la rezonado de antaŭo kaj malantaŭo.

³⁷⁶ 勢 Multaj esploristoj prenas la ideograamon por cirkonstanco. Sed mi prenas ĝin kiel propulson, ankoraŭ direktiĝanta al minimumo kaj maksimumo. 至精(La pleja minimumo, infinitizemo) ne havas formon, sed 精(mikro) ankoraŭ havas la formon, do

grado de malgrandeco kaj grandeco, sed kiu ne havas la formon, tiu estas nedividebla per nombro. Kaj ankaŭ kiu estas neampleksebla, tiu estas ne elĉerpebla per nombro. Rilate al kruda grandeco de aĵoj oni povas argumenti per vortoj. Rilate al mikro de aĵoj oni povas atingi per supozo. Sed transe de kruda grandeco kaj mikro, jam ne eblas argumenti per vortoj, nek eblas atingi per supozo.

Tial do grandulo kondukas tiel, ke li ne malhelpu aliajn, sed ke li ne insistu pri bonvoleco kaj dankŝuldo, ke li agadu ne por profito, ke li ne malestimu nenobelojn, ke li ne konkurencu je riĉa posedaĵo, sed ke li ne rezignu sin kaj tro cedu. Je la afero li ne pruntas helpon de aliuloj, sed li ne insistas, ke oni manĝu nur per sia laboro. Sed tamen, li ne malestimas laboron de avidulo. Lia konduto estas unika, alia ol mondanoj, sed ne konsideras eksrtavagancon bona. Do li agadas obeante al popolamaso, ne malrespektas flatadon de miellangulo. Monda salajro aŭ rango ne povas sufiĉe stimuli lin. Minaco de mortigo aŭ hontigo ne povas sufiĉe ofendi lin. Li scias nedivideblecon inter jesado kaj neado kaj nedistingeblecon inter granda kaj malgranda. Mi aŭdis, ke persono de la Vojo-Tao ne estas aŭdata kaj la pleja virto ne estas akirebla. Al grandulo mankas egoo – Mi. Tio estas kulmino de divido.³⁷⁷

Rivergrafo diris: “Ie ajn, ekstere de aĵo aŭ interne de aĵo, kiel vidi distingon de granda-malgranda kaj kiel vidi distingon inter la noblan kaj la malnoblan?”

Ruo de la Norda maro diris: “El la vidpunkto de Tao, ĉe estaĵoj ne estas nobleco-malnobleco. El la vidpunkto de estaĵoj, ĉiu el ili rigardas sin nobla kaj la aliajn malnobla. El la vidpunkto de popolopinio, taksado de nobleco-malnobleco ne apartenas al ĉiu si mem. El la vidpunkto de diferenceco, se granda estas ĉiu, kiu estas rigardata kiel granda, tiam ĉiuj ne povas esti ne grandaj, kaj se malgranda estas ĉiu, kiu estas rigardata kiel malgranda, tiam ĉiuj ne povas esti ne malgrandaj. Se la Ĉielo kaj tero estas perceptata malgranda ero samkiel nura unu grajno, aŭ se la pinto de hareto estas rigardata granda kiel monto, tiuokaze videblas la relativeco je grado de diferenco. El la vidpunkto de merito, se utila estas ĉiu, kiu estas rigardata kiel utila, tiuokaze ĉiuj ne estas ne utilaj, kaj se neutila estas ĉiu, kiu estas rigardata kiel neutila, tiuokaze ĉiuj ŝajnas neutilaj. Se scii reciprokan kontraŭon inter oriento-okcidento kaj scii, ke unu ne povas esti sen la alia, tiam difina montriĝas la divido de merito. El la vidpunkto de prefero, se prava estas tio, kio estas rigardata kiel prava, tiam ĉio ne estas ne prava, kaj se

estas propulso.

³⁷⁷ 約分之至 Multaj esploristoj komprenas la ideogramon 分 por asignita devo 本分. Sed ĉi tie temas pri divido de estaĵoj. Konsentante kun Yu Yuanjun, Mi prenas 約 kiel “koncizigon, eliminon 消除”. [157] Do la frazo signifas “Persono, kiel la kulmino de nedividebla unu-tuto”. 至精, 至大, 至分 – aldono de kulmino 至 senigas la signifon de sekva vorto.

ne pravas tio, kio estas rigardata kiel ne prava, tiam ĉio estas ne prava. Se scii, ke Yao kaj Jie konsideris la sian prava kaj la alian neprava, tiam videblas la manipulado de prefero inter praveco-malpraveco.³⁷⁸

Antaŭ longa tempo Yao cedis al Shun la tronon, sed kiam Kuai cedis la tronon al Zi, la regno pereis.³⁷⁹ Tang kaj Wu prenis la tronon per lukto, sed la duko Bai luktis por la trono kaj li pereis.³⁸⁰ El tia vidpunkto, koncernante regulon de luktado aŭ cedado, konduton de Yao aŭ Jie, demandon de nobleco kaj malnobleco, decidis tempo kaj ne povas esti aŭtentika konstanteco je rezulto.

Per trabego eblas rompi muron de kastelo, sed ne eblas ŝtopi truon, ĉar diferencas la funkcio. Qiji kaj Huali estas ĉevaloj, trakurantaj mil mejlojn en unu tago, taŭgas por kapti ratojn malpli ol sovaĝkato kaj mustelo, ĉar diferencas la talemto. Strigoj nokte distingas pulon kaj perceptas pinton de hareto, sed tage ne povas vidi per siaj elstaraj okuloj eĉ montetojn, ĉar diferencas la naturo.

Tiel do estas dirite: “Kiu, farante pravecon sia ĉefo, neniigas malpravecon, aŭ kiu, farante regadon sia ĉefo, neniigas tumulton, tiu ne komprenas klare rezonon de la Ĉielo kaj tero, nek realon de ĉiuj estaĵoj. Tio similas, ke fari la Ĉielon ĉefo kaj neniigi la teron, aŭ fari *yin* ĉefo kaj neniigi *yang*. Estas klare, ke oni ne povas fari tiel. Sed oni ne ĉesas paroli tian rezonadon. Tio estas stulta kaj trompiga.

Imperiestroj kaj reĝoj malsamas je maniero de abdikto. Tri dinastioj diferencas je transdonado de trono. Tiu, kiu maltrafis la tempon aŭ kontraŭis al la kutimo, estis nomata uzurpinto. Tiu, kiu trafis la tempon kaj obeis al la kutimo, estis nomata justulo. Silenton, silenton, s-ro Rivergrafo! Kiel do vi scias pri klasoj noblaj-malnoblaj kaj pri familioj grandaj-malgrandaj?”

Rivergrafo diris: “Se tiel, kion do mi devas fari? Kion do mi ne devas fari? Por mi kion rezigni, kion akcepti, kion preni, kion forĵeti? Fĭnfine, kion al mi fari?”

Ruo de la Norda maro diris: “Observi el la vidpunkto de Tao, kio do estas nobla aŭ kio do estas malnobla, – tio estas nomata ‘reveni al ekvilibro’.³⁸¹ Ne alteniĝu al via ideala strebo, ĉar tio estas granda lamigo de Tao. Kio malmulta, kio multa, – ĉio estas nomata “Dankinda donataĵo”.³⁸² En via konduto ne strebu al nur sola unuigo, ĉar tio estas

³⁷⁸ Yao 堯 estas la sankta reĝo, sed Jie 桀 estis tirano.

³⁷⁹ 嚳 Kuai estas nomo de reĝo de Yan-regno 燕. En 316 a. K., li komisiis al Zi Zhi 子之 la regpotencon, sed la regno tuj malordiĝis.

³⁸⁰ Tang 湯 estis fondinto de Yin-dinastio, Wu 武 estis fondinto de Zhou-dinastio. 白公 Baj intencis renversi la tronon de Chu-regno, sed malsukcesis en 479 a. K.

³⁸¹ 反衍 Ideogramo 衍 signifas akvan “fluan, etendiĝon, ebeniĝon”.

³⁸² 謝施 Laŭlitera traduko estas “danko al donitaĵo” de la Ĉielo.

malkonforma al Tao.

Estu severa samkiel regnestro, sen privata virto. Estu favora samkiel la sanktejo por festado, sen privata beno. Estu vasta samkiel senfinaj kvar direkcioj, sen teritoria limo. Ampleksu universale ĉiujn estaĵojn. Kiun do aparte gardi subflugiloj? Tio estas nomata 'Sen devio'. Unu-tuteco de ĉiuj estaĵoj.³⁸³ Ne gravas, kiu estas mallonga aŭ kiu estas longa.

Tao ne havas finon kaj komencon. Ĉe estaĵoj estas morto kaj vivo. Ne estas kalkulebla la perfektigo. Jen malplena iufoje, jen plena alifoje. La formo ne estas farata kiel certa digno. Jaro estas neprokrastebla, tempo estas nehaltigebla. Je cirkonstancoj iĝas jen plene, jen malplene. Jen finiĝas, jen komenciĝas. Tial do oni parolas pri leĝoj de la granda justo kaj argumentas pri reguloj de ĉiuj estaĵoj. La vivo de estaĵoj estas rapida kvazaŭ ĉevala troto aŭ galopo. Ekzistas neniu movo senŝanĝa, neniu tempo sentransira. Kion fari? Kion ne fari? Lasu ĉion turniĝi per si mem.”

Rivergrafo demandis: “Se tiel, kial do vi estimas la Tao-n kara?”

Ruo de la Norda maro respondis: “Kiu scias la Tao-n, tiu nepre atingas la rezonon. Kiu atingis la rezonon, tiu nepre klare vidas cirkonstancojn. Kiu klare vidas cirkonstancojn, tiu ne damaĝas sin per aĵoj. La plejan virtulon ne eblas aflikti varmego per fajro, nek dronigo per akvo. Lin povas damaĝi nek malvarmo nek varmo. Lin povas ataki nek rabobirdoj nek bestoj. Mi ne diras, ke li malatentas tiujn. Mi diras, ke li antaŭdistingas la danĝerecon-sendanĝerecon. Li tenas sin trankvila kaj en malfeliĉo kaj en feliĉo, tenas sin prudenta je sia foriro kaj aliro. Do neniu povas damaĝi lin.

Tiel do estas dirite: ‘La Ĉielo ekzistas interne, la homo ekstere, la virto enestas en la Ĉielo.’ Se scii la agon de la Ĉielo kaj homoj, la fonto enestas en la Ĉielo kaj la digno enestas en la virto. Do, ŝanceliĝante tien kaj reen flekse kaj rekte, oni revenos al la esenca punkto kaj parolos la kulminon de Tao.”

Rivergrafo demandis: “Kion vi nomas la Ĉielo? Kion vi nomas homo?”

Ruo de la Norda maro respondis: “Bovo kaj ĉevalo havas respektive kvar piedojn. Tio estas nomata ‘la Ĉiela’ ago. Bridante la bovon je kolo, trabori truon je la nazo estas nomata ‘la homa’. Tiel do estas dirite: “Ne pereigu la Ĉielon per homa ago. Ne detruu la Ĉielan ordonon per homa arbitro. Ne lasu al vi per akiritaĵo sekvi famon. Tenu vin prudenta kaj ne perdu. Tio estas nomata ‘reveno al la vero’.”

Unupieda besto, nomata Kui, enviis al skolopendro, la skolopendro enviis al vento, la vento enviis al okuloj, la okuloj enviis al koro.

³⁸³ 萬物一齊 komenca kaj samtempe ideala alta stato en la filozofia sistemo de Zhuangzi

Kui diris al la skolopendro: “Mi unupiede iras hopante, do malpli rapide ol vi. Kiel bona vi sentas vin, irante sola kun multaj piedoj!”

La skolopendro diris: “Ne. Ĉu ne vidis homon sputanta al mi? Kiam li sputas la grandan, la sputaĵo ŝajnas perlo, – la malgrandan, ĝi ŝajnas gaso, nekalkuleble disŝprucanta suben sur min. Nun mi moviĝas laŭ mekanismo de la Ĉielo. Mi ne scias kial estas tiel.”

La skolopendro diris al serpento: “Kvankam mi iras per multaj piedoj, tamen malpli rapide ol vi, havanta neniun piedon. Kial?”

La serpento diris: “Tio estas laŭ la mekanismo de la Ĉielo. Kial do estus ŝanĝeble? Kiel do al mi uzeblas piedo?”

La serpento diris al vento: “Mi iras, movante vertebron kaj ripojn, kaj mi havas formon. Nun vi ekkirlas sibilante sur la Norda maro kaj sibilante eniras en la Sudan maron, havante neniun formon. Kial?”

La vento diris: “Jes. Mi sibilante ekkirlas sur la Norda maro kaj eniras en la Sudan maron. Eĉ fingro povas ekstari kontraŭ min kaj piedo povas treti min. Sed tamen mi rompas grandajn arbojn kaj forblovi grandajn domojn. Tio nur al mi eblas. Kvankam mi ne venkas amason da malgrandaĵoj, tamen venkas la grandajn. Venki la grandajn povas nur sanktulo.”

Kiam Konfuceo vojaĝis en Kuang, Song-landanoj amase ĉirkaŭbaris lin kun minaca streĉo.³⁸⁴ Spite tion, li ne ĉesis ludi liuton, kantante. Zilu eniris vidi lin kaj demandis kial la Majstro nun amuzas sin.

Konfuceo diris: “Nu, mi diru al vi jenon. Mi delonge abomenis mizeron, sed ne eviteblas la sorto. Mi delonge esperis normalan viv-kurson, sed ne favoras min la tempo. Ĉe Yao kaj Shun ne troviĝis en la mondo mizeruloj, ne pro tio, ke la homoj havis intelekton. Ĉe Jie kaj Zhou ne troviĝis en la mondo homoj de normala viv-kurso, ne pro tio, ke la homoj perdis intelekton. La tempo kaj cirkonstanco ne afablis ilin.

Vojaĝanto laŭ akvo ne timas serpenton-drakon. Tio estas kuraĝo de fiŝistoj. Vojaĝanto laŭ tero ne timas rinoceron-tigron. Tio estas kuraĝo de ĉasistoj. Antaŭ glavoj elingigitaj rigardi egale la morton samkiel la vivon estas kuraĝo de bravuloj. Konsiderante la mizeron dependanta de la sorto kaj la viv-kurson dependanta de la tempo, neniom timi ĉe malfacilego, – tio estas kuraĝo de sanktuloj. Vi, You, estu trankvila. Al mi estas destinita la sorto.”

Post kelk-tempo, iu homo armita per kiraso alvenis por adiaŭi, dirante: “Ni prenis vin

³⁸⁴ Multaj esploristoj konsideras Kuang 匡 lokonomo de Wei-regno 衛, sed ĉi tie estas skribite, ke ĝi estis en Song 宋.

por Yang Hu, do ĉirkaŭis vin.³⁸⁵ Nun evidentiĝis, ke vi ne estas tiu. Ni petas de vi pardonon.”

Kaj ili retiriĝis.

Gongsun Long demandis Mu, la princon de Wei-regno³⁸⁶, dirante: “Mi lernis de mia juneco la Vojon de antaŭirintoj, kaj, kreskiĝinte, studis pri bonvoleco-justo kaj praktikadis ĝin. Mi sintezis samecon kun malsamecon, apartigis hardecon kaj koloron, jesadon kaj neadon, pravecon kaj malpravecon. Mi embarasis sciojn de centoj da famaj pensuloj kaj faligis argumentojn de amaso da buŝoj en ekstreman malfacilon.

Mi taksis min atinginta la plej altan. Sed nun mi aŭdis la opinion de Zhuangzi kaj aliiĝis, mirkonsternite. Mi ne scias, ĉu mia argumentado estas malpli konvinka ol la lia, ĉu mia scio malpli alta ol la lia. Nun mi povas diri nenion. Ĉu mi aŭdacus demandi vin pri tio?”

La princo ĉe sia kubutapogilo suspiregis kaj pro grandega konsterno ekridis, dirante: “Ĉu vi iam ne aŭdis pri bufo en putaĉo. Turnante sin al kelonio de la Orienta maro, ĝi diris – ‘Kiel mi ĝojas! Mi saltadas sur la gardreloj ekstere de puto kaj ripozadas ĉe la rando de tegolo ene de la puto. Plonĝinte en la akvon, mi tenas mian mentonon sur akseloj. Sur la koto mi trempas miajn krurojn kaj mergas la piedojn en ŝlimon. Kompare kun kullarvoj, kraboj kaj ranidoj, neniuj povus superi min. Aldone, mi regas unu akvofonton kaj ĝojas, starante fiere sur la puto. Mi sentas min la plej bona je humoro. Kial vi ne venos al mi vidi tion?’

La kelonio de la Orienta maro enirintus tien, sed dum maldekstra piedo ankoraŭ ne eniras, la dekstra genuo jam kroĉiĝis ĉe la enirejo. Do ĝi hezitis eniri kaj retiriĝis, dirante pri la maro: ‘La grandeco estas nemezurebla per malproksimeco de mil *li*, la profundeco estas nekomparebla kun alteco de mil *ren*.³⁸⁷ En la epoko de la reĝo Yu okazadis inundo naŭ fojojn en dek jaroj, sed la akvo de la maro neniom multiĝis. En la epoko de la reĝo Tang atakadis granda sekeco sep fojojn en ok jaroj, sed akvonivelo ĉe la bordoj neniom ŝanĝiĝis. Sen ŝanĝiĝo spite longecon aŭ mallongecon de la tempo, spite multecon aŭ malmultecon, estas la granda ĝojo de la Orienta maro.’

Aŭdinte tion, la bufo en la putaĉo ege konsterniĝis kaj konfuziĝis, restante tute foranima. Ankaŭ vi, ne sciante limon de praveco kaj malpraveco, volus observi la paroladon de Zhuangzi, samkiel kulo surdorse ŝarĝita de monto aŭ diplopodo deziranta

³⁸⁵ 陽虎 Tiu epizodo estas ankaŭ en Analektoj, ĉap. 子罕 · 先進.

³⁸⁶ 公孫龍 estis fama filozofo de nominalisma skolo. Kulmino de lia agado estas supozata ĉirkaŭ dum 284 - 257 a. K. 魏牟 estis reĝido de Wei-regno, feŭdita en Zhongshan lando 中山.

³⁸⁷ Unu *li* 里 egalas ĉirkaŭ 405 m, unu *ren* 仞 – 157 cm.

transnaĝi la Flavan riveron. Nepre mankas forto por la tasko. Ĉu tiu, kiu, ne scipovante argumenti pri la plej subtilaj vortoj, adaptas sin al portempa profito, ne similas al la bufo en la putaĉo? Des pli la scio de Zhuangzi vaste turnas sin de sub la terfundo al la Ĉiela supro, energie kaj libere malkomponiĝante en kvar direkciojn, kien ajn sen sudo sen nordo, ondante nemezureble kien ajn sen oriento sen okcidento, ekiras de la Nigra mallumo kaj revenas al la Granda Vojo.

Vi, reguligante-reguligante, esploras ĉion per analizo kaj serĉas ĉion per logiko, kvazaŭ observus la Ĉielon tra truo de tubeto aŭ sondus la teron per kudrilo. Tro malgranda estas via diapazono. Vi foriru! Ĉu vi sola ne aŭdis pri iu junulo de la provinco Shoulin, kiu volus lerni la ir-manieron ĉe Handan-anoj?³⁸⁸ Dum li ne povis ellerni ĝin, li forgesis kiel iri laŭ antaŭa kutimo, tiel do revenis hejmen rampante. Se vi ne forirus, ankaŭ vi forgesus vian antaŭan pens-manieron kaj perdus vian laboron.”

Gongsun Long, stuporigite kun buŝo malfermita, kun lango levita, forkuris.

Zhuangzi estis fiŝhokanta ĉe la rivero Pu.³⁸⁹ Reĝo de Chu-regno³⁹⁰ antaŭsendis du grandajn oficistojn al li kun la peto, ke li degnu veni por helpi la regadon. Zhuangzi ne turnis sian vizaĝon al ili, tenante fiŝkanon.

Li diris: “Mi aŭdis, ke en Chu-regno estas la sankta testudo, jam mortinta je tri mil – jara.³⁹¹ La reĝo kovras ĝin per tuko kaj tenas en la kesto en la maŭzoleo. Ĉu tiu testudo preferus, ke ĝia ostoj estu tenata respektplene post la morto? Aŭ ke ĝi mem vivu, trenante la voston en koto?”

Du grandaj oficistoj diris: “Ke ĝi vivu, trenante voston en koto.”

Zhuangzi diris: “Foriru! Ankaŭ mi ĝuste trenas mian voston en koto.”

Kiam Huizi estis ĉefministro en Liang,³⁹² Zhuangzi iris vidi lin. Iu denunciis al Huiz, dirante: “Zhuangzi alvenis por fariĝi ĉefministro anstataŭ vi.”

Pro tio Huizi, timante, serĉis lin en tuta regno dum tri tagnoktoj. Zhuangzi alvenis vidi lin kaj diris: “En la sudo vivas iu birdo, nomata Yuanchu,³⁹³ ĉu vi scias ĝin? Tiu Yuanchu flugas de la Suda maro al la Norda maro. Krom ĉe la arbo de sterkulio ĝi ne

³⁸⁸ 壽陵 estis lokonomo en Yan-regno 燕. 邯鄲 estis la ĉefurbo de Zhao-regno 趙.

³⁸⁹ 濮水 La rivero estis en Pu-gubernio de Shangdong provinco 山東濮州濮陽縣.

³⁹⁰ La reĝo estas konjektata 威王.

³⁹¹ Multaj esploristoj prenas la frazon por “mortinta antaŭ tri mil jaroj”.

³⁹² 梁 ĉefurbo de Wei 魏. Huishi 惠施 fariĝis ĉefministro de Wei-regno ĉe reĝoj Hui kaj Xiang 惠王, 襄王.

³⁹³ 鶻鶻 Unu speco de feniksoj. Iu konjektas, ke ĝi estus “feniksido”.

ripozas, krom frukto de bambuo ĝi ne manĝas, krom el dolĉa fonto ĝi ne trinkas.³⁹⁴

Kiam iu milvo akiris putran muson, Yuanchu estisfluganta preter. La unua, vidante la lastan, minacis: ‘Fr!’ Ĉu ankaŭ vi volus minaci min per via regno de Liang?”

Zhuangzi kaj Huizi estis kune promenantaj laŭ vadŝtono ĉe rivero Hao.³⁹⁵

Zhuangzi diris: “Kiel fokseno naĝas trankvile! La fiŝo ĝojas.”

Huizi diris: “Vi ne estas fiŝo. Kial do vi scias, ke la fiŝo ĝojas?”

Zhuangzi diris: “Vi ne estas mi. Kial do vi scias, ke mi ne scias la fiŝon ĝojanta?”

Huizi diris: “Mi ne estas vi. Certe mi ne scias vin. Vi certe ne estas fiŝo. Estas certe, ke vi ne scias la fiŝon ĝojanta.”

Zhuangzi diris: “Bonvolu reveni al la komenco. Vi diris: ‘Kial vi scias la fiŝon ĝojanta? T. e., vi jam scias, ke mi scias pri tio. Tial do vi demandis tiel. Mi mem sciis tion ĉe la rivero Hao.”

³⁹⁴ 梧桐, 練實, 醴泉

³⁹⁵ 濠 nomo de rivero. Laŭ Chen Xuanying la rivero estis Chongli-gubernio de Huinan, nuna Anhui provinco, Fengyang-gubernio 淮南鐘離郡、安徽鳳陽縣. Tiu epizodo estas fama kiel “pensado ĉe Hao kaj Pu”. Klare videblas la diferenco inter nominalistoj (Huizi) kaj taoistoj (Zhuangzi), ke la unua konsideras konscion de aliulo nekonebla, la lasta – konebla.

18 LA PLEJA PLEZURO

Ĉu en la mondo estas la pleja plezuro, aŭ ne? Ĉu eblas teni sin vigla, aŭ ne? Nun, kion fari, al kiu fidi, kion eviti, al kiu resti fidela, kion sekvi, kion forlasi, je kio ĝoji, kion malami? Kio estas respektata en la mondo, tio estas riĉaĵo, eminenteco, longviveco kaj bono. Kio estas plezuriga, tio estas sekureco, frandaĵo, bela vestaĵo, amoreco kaj belsono. Kio estas neŝatata, tio estas malriĉeco, malnobleco, frua morto kaj malbono. Kio estas amare, tio estas ke al vivo mankas komforta ripozo, al buŝo mankas frandaĵo, al korpo mankas bela vestaĵo, al okuloj mankas belulino, al oreloj mankas belsono. Se ili mankas, oni ege malkvietiĝas kaj timas. Ili koncernas nur formon, t. e. korpon, do estas stulte prizorgadi tro.

La riĉuloj ellaciĝas pro troa laboro, kaj ili mem ne povas eluzi kion ili akumulis. Kion ili faras por sia korpo, kiel sia vivmaniero, tio estas nura eksteraĵo. La eminentuloj ĉiam tagnokte pripensas bonon aŭ nebonon. Ilia vivmaniero ankaŭ estas senenhava.

Post kiam homoj naskiĝis, ilia vivo iĝas kune kun ĉagreno. Longevivuloj demenciĝas aŭ longe splenas. Kia sufero tio estas! Ilia vivmaniero ankaŭ estas malproksima de plezuro. Inteligencio trovas bonon kaj faras ĝin por la mondo.³⁹⁶ Sed ankoraŭ ne sufiĉas fari sin mem viva. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu la laŭdata bono estas vere bona aŭ vere ne bona. Kio estas laŭdata kiel bona, tio ne povas lasi homon viva. Kio estas rigardata kiel nebona, tio povas allasi homon viva. Tial do estas dirite: “Se lojala konsilo ne estas aŭdata, obeu kaj ne luktu. Zixu luktis kaj pereigis sin.”³⁹⁷ Sed se li ne luktus, lia famo ne estiĝus. Ĉu estas vere la bono, aŭ ne?

Nun kion mondanoj faras plezuro, tion mi ankoraŭ ne scias juĝi, ĉu la plezuro estus vere plezuriga aŭ ne plezuriga. Kiam mi vidas la mondanojn plezuranta, ŝajnas al mi, ke ili amase impetas, ĝuste timante ĉu ne eblus akiri la deziratan. Sed ili ĉiuj diras, ke ili plezuras. Mi ankoraŭ ne plezuras je tio, sed ankoraŭ ne malplezuras. Ĉu vere estas plezuro? Aŭ ne estas? Mi vere konsideras senagon plezuro. Sed ĝi ege afliktas la mondanojn. Tial do estas dirite, ke la pleja plezuro estas senplezuro kaj la pleja honoro estas senhonor.³⁹⁸

³⁹⁶ 列子 aŭ 烈子 Laŭ mia opinio tiu vorto esprimas “kritike-pensanta personon”, kiu estis ideala ĉe mohistoj 墨家. Mi uzas la terminon de la rusa lingvo “inteligencio”.

³⁹⁷ 伍子胥 Wu Zixu forkonsilis misagon al la reĝo Fuchai de Wu-regno.

³⁹⁸ 至樂無樂. Plezuro ordinare estas relativa kaj kunekzistas nepre kun malplezuro. Pormomenta senigo de malplezuro estas plezuro, kaj senigo de plezuro estas malplezuro. En tio ne ekzistas absoluta plezuro. Laŭ Zhuangzi la plej alta plezuro atingeblas nur per neniigo de nepra ĉeno je plezuro-malplezuro. Tio similas al ataraksio ĉe Epikuro.

La mondo ankoraŭ ne decidis distingon de praveco kaj malpraveco. Sed la senago povas decidi tion. Nur la senago ebligas homojn vivi en la pleja plezuro. Ni provu argumenti pri tio. La Ĉielo estas pura per la senago. La tero estas kvieta per la senago. Per kombiniĝo de senago en ambaŭ sferoj ĉio transformiĝas. Ne estas vidate en mallumo kaj subtilo, de kie ĉio elvenas. En subtilo kaj mallumo ne estas vidate ĉu estas ĉies fenomenoj. Sed ĉiuj aĵoj plenumas sian taskon, kaj ĉiuj, sekvante la senagon, generas. Do estas dirite: “La Ĉielo kaj la tero estas senaga, sed troviĝas nenio, kion ili ne faras.” Kiu el homoj povas atingi tiun senagon?

Edzino de Zhuangzi mortis. Huizi kondolencis pri tio. Zhuangzi ja kun kruroj disstrenitaj, tintigante pelvon, estis kantanta.

Huizi diris: “Vi, vivante kune kun ŝi, kreskigis gefilojn kaj maljuniĝis. Spite tion, vi ne plorkrias pro ŝia morto. Tio ankoraŭ allaseblas. Sed tintigi pelvon kaj kanti estas tro ekscese.

Zhuangzi diris: “Vi ne pravas. Ĝuste kiam ŝi mortis, mi sola ne povis ne ĉagreniĝi unuafoje. Sed, primeditante ŝian komencon, mi ekpensis, ke la vivo ne estis origine. Ne mur mankis la vivo, sed origine ne estis la organismo.³⁹⁹ Ne nur mankis la organismo, sed origine ne estis *ĉjio*.⁴⁰⁰

El inter miksa ĥaoso en subtila mallumo okazis iu ŝanĝiĝo kaj estiĝis *ĉjio*. Ĉjio ŝanĝiĝis kaj estiĝis organismo. La organismo ŝanĝiĝis kaj estiĝis vivaĵo. La lasta denove ŝanĝiĝis kaj ĉi tiu nun mortis. Tio estas sama, kiel sekvante moviĝas la kvar sezonoj, printempo, aŭtuno, vintro kaj somero.

La homo, mia edzino, kviete dormis en la granda ĉambro. Ke mi plorkriegus, sekvante plorsinglutus, tion mi konsideras nekomforma al la ordono.⁴⁰¹ Tial do mi ĉesis.”

Oĉjo Zhili kaj oĉjo Huajie renkontiĝis sur la monteto de Mingbo ĉe Kunlun, kie iam restis la Flava imperiestro. Ili subite ektrovis, ke ĉe la maldekstra kubuto de Huajie aperis tumoroj. Ŝajnis, ke la lasta ege embarasiĝus pro tio.

Oĉjo Zhili diris: “Ĉu vi malŝatas tion?”

Oĉjo Huajie diris: “Ne. Kial mi malŝatus. Vivo estas io pruntita portempe. Naskiĝinte per portempa pruntado, la vivanto iĝas plena de rubaĵoj kaj malpuraĵoj. Morto ka vivo

³⁹⁹ 形 formo, korpo, organo, organismo

⁴⁰⁰ *ĉjio* 氣 En la ĉina filozofio, abstrakta koncepto rilatanta al la homa subjektiva spirito laŭ la ideismo aŭ al la plej elementa substanco en la universo laŭ la metriismo. Laŭlitera signifo estas “spiro”. Do el la ideisma vidpunkto eblas traduki ĝin per la termino “spiro”. *Ĉjio* konsistas el *yin* (pasiva energio) kaj *yang* (aktiva energio).

⁴⁰¹ Ordono 命. Eblas traduki per vortoj: Ĉiela ordono, sorto, destino, neceseco, k. a.

estas kvazaŭ la tago kaj la nokto. Mi kun vi vidas transformiĝon. La transformiĝo venis al mi. Kial do mi devas malŝati tion?”

Zhuangz estis vojaĝanta al Chu-regno, kaj vidis kranion kun sekigita formo. Li frapetis ĝin per sia ĉevalvipo kaj demandis al ĝi: “Ĉu vi fariĝis tia pro tio, ke vi estis avara je la vivo kaj perdis racion? Aŭ pro tio, ke via lando pereis kaj vi estis mortigita per armiloj? Aŭ pro tio, ke vi, farante malbonon, malhonoris familion, gepatrojn, edzinon kaj gefilojn? Aŭ pro tio, ke vin afliktis frostiĝo aŭ malsatiĝo? Aŭ pro natura forpaso de vivjaroj?” Alparolinte tiel, li faris ĝin kapkuseno kaj ekdormis.

Noktmeze, la kranio aperis en sonĝo kaj diris: “Vi parolis al mi kvazaŭ retoro. Kio estas dirita, ĉio estas nur zorgo de vivantoj. Ĉe mortintoj estas neniom da zorgo. Ĉu vi volus aŭdi la parolon de mortinto?”

Zhuangzi diris: “Jes.”

La kranio diris: “Post la morto jam estas neniu reĝo supre, nek subuloj sube, nek zorgoj pri la aferoj de kvar sezonoj. Sekvante naturon, oni faras la Ĉielon kaj la teron printempa-aŭtuna poreterne. Eĉ ajna plezuro de reĝa trono ne superas ol tio.”

Zhuangzi, ne kredante, diris: “Se mi povus peti de Dio la reganto, ke vi revivu kun korpo, ostoj, karnoj kaj haŭtoj, kaj ke vi revenu denove al gepatroj, edzino, gefiloj kaj konatoj en via hejmo, ĉu vi dezirus vian reviviĝon?”

La kranio profunde sulkis brovojn kaj nazon, dirante: “Kial do mi povus forĵeti la plezuron pli altan, ol la reĝan, kaj retroveni denove al la zorgoplena homa mondo?”

Kiam Yan Hui estis ekiranta orienten al Qi-regno, Konfuceo aspektis maltrrankvila. Zigong venis de sia sidejo al li kaj demandis: “Permesu al mi demandi vin. Kial vi maltrrankviliĝis, kiam Hui ekiris orienten?”

Konfuceo respondis: “Via demando estas tre bona. Unu antaŭa eldiro de Guanzi tre plaĉas al mi. Li diris: ‘Sako malgranda ne povas enhavi la grandan aĵon, ĉerpilo mallonga ne povas elĉerpi de profunda akvo’. Tiel do mi komprenas, ke afero efektiviĝas laŭ la natura ordono kaj al ĉiu formo utilas la konvena uzado. Je tio oni ne povas redukti nek aldoni. Mi timas, ke Hui predikus al la regnestro de Qi la Vojon de sanktaj reĝoj kiel Yao, Shun kaj la Flava imperiestro, kaj aldone parolus pri Suiren kaj Shennong. Se la estro ekserĉus ion nefareblan al si mem, li tuj embarasiĝos pro neebleco. Embarasite, li mortigos.

Ĉu vi ne aŭdis jenon? Antaŭe unu mara birdo surteriĝis en iu suburbo de Lu. Regnestro de Lu bonvenigis la birdon per vino en la maŭzoleo, kaj regalis per

muzik-koncerto de Jiu Shao kaj per kuirajo de diversaj viandoj por amuzigi ĝin.⁴⁰² La birdo vertiĝis, ĉagreniĝis kaj ne povis manĝi eĉ unu peceton, nek trinki unu taseton. Tiel tri tagojn poste go mortis. Tio estas nutri birdon per nutraĵo nur konvena al homo, sed ne konvena al la birdo. Se nutri birdojn, oni devas lasi ilin loĝi en la profundan arbaron, ludi surborde, naĝi en rivero kaj lago, manĝi kobitidojn kaj fiŝetojn, kungrupiĝi, viciĝi kaj ripozi, vagadi libere ĉie ajn.

Birdoj ne amas eĉ aŭdi voĉojn de homoj. Kial bruegi por ili? Se okazigi koncerton de Xianchi kaj Jiu Shao sur la kampo de Dongting, tiam birdoj, aŭdinte tion, forflugos, bestoj, aŭdinte tion, forkuros, fiŝoj, aŭdinte tion, subakviĝos suben, spite ke ordinaraĵoj homoj, aŭdante tion, kune alvenas kaj spektas tion.

Birdoj vivas, loĝante en la akvo, sed en la akvo mortos homoj. Ambaŭ nepre diversas unu al la alia, ĉar ili diferencas je sia sento de ŝato kaj malŝato. Antaŭaj sanktaj reĝoj ne postulis, ke ĉiuj estu samaj je kompetenteco, nek ke la aferoj estu samaj.⁴⁰³ Nomo estas konforma al realo, justo staras laŭ adaptableco.⁴⁰⁴ Tio estas nomata: ‘Ju pli la racio atingita, des pli la feliĉo tenata.’”

Leizi estis vojaĝanta kaj, ĉe vojflanko manĝante, trovis cent-jaran kranion. Li eltiris artemizon kaj per ĝi montris al la kranio, dirante: “Nur mi kaj vi scias, ke estas nek morto, nek vivo. Ĉu vere vi vivtenas vin?⁴⁰⁵ Ĉu vere mi ĝojas?”

Semo havas ĝermon.⁴⁰⁶ En la akvo ĝi fariĝas akvoplanto. Ĉe la bordo de akvo ĝi fariĝas sfagna robo de bufo. Ĉe tomba monteto ĝi fariĝas plantago. Se la plantago kreskas sur la fekunda tero, ĝi fariĝas herbo, nomata Korva kruro. Ĝia radikoj fariĝas larvo, nomata majskarabo, kaj ĝiaj folioj fariĝas papilioj. Poste papilio baldaŭ transformiĝas en insekton vivantan sub forno, kiel elŝeliĝante. Ĝia nomo estas grilo. La grilo post mil tagoj fariĝas birdo. Ĝia nomo estas pigo. Ties salivo fariĝas mikrobo, nomata Simi. Tiu Simi fariĝas asperigilo, de kiu naskiĝas laktobacilo, nomata Yiluo.⁴⁰⁷ Kaj Huangshuang naskiĝas el Jiuyou. Mourui naskiĝas el putriĝinta larvo. Yangxi,

⁴⁰² 九韶 klasika muziko de la epoko Shun. 太牢 festa kuirajo el tri viandoj: bovajo, ŝafajo kaj porkajo.

⁴⁰³ 先聖不一其能、不同其事. Eblas la alia traduko: “Antaŭaj sanktuloj diversas je sia kapablo, kaj ne samas je la aferoj.”

⁴⁰⁴ 名止於実、義設於適. Frazoj estas tre delikataj por trakti. Laŭlitera traduko estas: “La nomo haltas antaŭ la realo, la justo estas starigita laŭ konveneco.” Sed tia traduko renversus la principon de konfuceanismo. 條達而福持. Laŭlitere, “Kun la racio atingita, la feliĉo estas tenata.”

⁴⁰⁵ 養 Multaj esploristoj prenas la ideogramon por “malĝoji”.

⁴⁰⁶ Nomojn de diversaj estaĵoj nun estas malfacile konjekti, do mia traduko prezentas nur hipotezon. 幾 signifas “subtilan ĝermon”.

⁴⁰⁷ 頤輅. Mi suspektas, ke 輅 povus esti 酪. 頤 havas signifon “nutraĵo”.

kuniĝinte kun malnova putra bambuo, naskas Qingning. Qingning naskas leopardon. Leopardo naskas ĉevalon. Ĉevalo naskas homon. Homo revenas denove kaj eniras en ĝermon. Ĉiuj estaĵoj eliras el la ĝermo kaj eniras en la ĝermon.⁴⁰⁸

⁴⁰⁸ Tiu teksto estas preskaŭ sama al *Liezi*, la ĉapitro La Ĉiela bonaŭguro 列子、天瑞篇.

19 KOMPRENO DE VIVO

Kiu komprenis la realon de vivo, tiu ne penas ellabori ion ajn nefareblan per la vivo. Kiu komprenis la realon de fatalo, tiu ne penas ellabori ion ajn nefareblan per la scio. Por nutri korpon nepre necesas aĵoj antaŭ ĉio. Sed okazas, ke malgraŭ superfluaĵoj ne eblus nutri korpon. Por ke estu vivo, nepre necesas antaŭ ĉio nedisiĝo de korpo. Sed okazas, ke malgraŭ la nedisiĝo de korpo perdiĝus la vivo.

Nehaltigebla estas la alveno de vivo, ankaŭ nehaltigebla estas la foriro. Kiel bedaŭrinde estas! Oni en la mondo pensas, ke se nur eblus nutri korpon, tiam ekzistebus la vivo. Sed ne sufiĉas nur nutri la korpon por teni la vivon ekzistanta. Se tiel, kion fari por sufiĉi en la mondo?

Kvankam sciante, ke ne sufiĉas, tamen oni ne povas ne fari tiel, – ĉar tio estas supozata kiel neevitebla. Se oni deziras eviti tion por la korpo, estas preferinde forlasi la mondon. Se forlasos, estos neniuj ĝeno. Sen ĝeno, oni povas esti rekta kaj ekvilibra. Estante rekta kaj ekvilibra, oni povas renaskiĝi kun ĝi. Se renaskiĝos, revenos al la deirpunkto.

Kial estas preferinde forĵeti aferojn? Kial estas preferinde forlasi vivon? Se forĵeti aferojn, la korpo ne laciĝos. Se forlasi vivon, menso ne difektiĝos. Se la korpo kun tuta menso revigliĝos, vi fariĝos unu kun la Ĉielo. La Ĉielo kaj la tero estas la patrino de ĉiuj estaĵoj. Unuiĝinte, estiĝas la korpo. Disiĝinte, estiĝas la komenco. Kiam sendifekta estas la korpo kun menso, estas nomate ‘transformiĝebla’. Ju pli da mensoj, des pli eblas retroiri vidi la Ĉielon.⁴⁰⁹

La Majstro Liezi demandis limgardiston Yin,⁴¹⁰ dirante: “La pleja homo ne sufokiĝas subakviĝante, ne brulvundiĝas tretante sur fajro, ne timas irante super ĉion. Permesu al mi demandi vin, kiel li povis atingi tion?”

La limgardisto Yin diris: “Ĉar li gardas puran *ĉjion*. Ne pro tio, ke li havas saĝon, lertecon, decidemon, kuraĝon k. c. Jen aŭskultu, mi rakontos al vi.

Ĝenerale, kiu havas vizaĝon, fenomenon, voĉon, koloron, ĉiu estas aĵo. Unu aĵo kun la aliaj aĵoj ne malproksimas reciproke. Kiel ili povus atingi la pli foran? Ili estas nur koloroj, ne plu. Sed io kreata ankoraŭ ne havas formon kaj kreitaĵo haltas tie, kie jam ne restas formo transformiĝebla. Do, kiu povis atingi la kulminon, tiun la aĵoj neniel povas

⁴⁰⁹ 相天 Multaj esploristoj prenas 相 por “helpi”, sed mi – por “vidi”.

⁴¹⁰ 関尹 La nomo estas sama, kiel la fama limgardisto de Hangu Kuan 函谷関, kiu petis de Laozi skribi *Dao De Jing*.

haltigi. Li ĝuste restas ene de la grado neekscesa kaj situas sin en senekstrema leĝaro. Li ludvagadas ĉie ajn, eĉ tie, kie komenciĝas kaj finiĝas ĉiuj aĵoj. Kun unu denaska naturo, nutrante la *ĉjion*, akordiĝante al la virto, li konatiĝas kun la kreitaĵoj. Tian personon gardas plene la Ĉielo, kaj lin ne falpuŝas dioj. Kiel la aĵoj povus interveni?

Se iu drinkemulo falis el de ĉaro, li ne mortas, kvankam iomete vundite. Liaj ostoj kaj artikoj estas samaj, kiel de aliuloj. Diference de la aliaj, li ne vundiĝas, ĉar lia spirito estas en sia tuteco. Tute egale li ne scias, ĉu li rajdas, ĉu falas. En lian koron ne venas ajna sento, kiel morto, vivo, surprizo, timo. Do li ne timas kontraŭ ajna aĵo. Kvankam li havas tiun tutecon pere de vino, tamen li estas tia. Des pli tuteco de la Ĉielo. Sanktulo havigas ĝin al si pere de la Ĉielo. Tial do nenio povas vundi lin.

Ajna venĝemulo ne havigus al si venĝosenton al akraj glavoj, ajna flamemulo ne havigus al si venĝosenton al falinta sur sin tegolo. Tiel la mondo restas paca. Tiel ne okazus agresemaj militoj, ne estus puno per mortigo. Tion ebligas la Tao.

Ne malfermu la homan naturon, sed malfermu la Ĉielan naturon.⁴¹¹ Kiu malfermas la Ĉielan, tiu naskas virton. Kiu malfermas la homan, tiu naskas kanajlon. Ne malŝatu la Ĉielan. Ne preterlasu la homan. Por ke la popolo alproksimiĝu al la vero.⁴¹²

Zhongni estis iranta al Chu-regno. Pasante tra iu arbaro, li vidis ĝibulon kaptanta cikadojn, kvazaŭ facile plukanta.

Zhongni diris al li: “Kiel lerta vi estas! Ĉu estas iu sekreta maniero?”

Li respondis: “Jes, mi havas la manieron. Se kvin-ses monatojn trejnadas meti du balojn unu sur la alian, ke ili balanciĝu kaj ne falu de sur la pinto de stango, tiam malmultiĝos la probableco de malsukceso. Se tri baloj ne falas, malsukceso iĝas je unu dekon. Se kvin baloj ne falas, jam eblas kaptadi tiel facile, kiel plukadi. Mi tenas min kvazaŭ rigida stumpo kaj miajn kubutojn similaj al mortobranĉoj. Kiom ajn la grandeco de la Ĉielo-tero kaj la multeco de ĉiuj aĵoj, mi scias nur flugilojn de cikado. Mi, ne ŝanceliĝante tien, reen, flanken, koncentriĝas nur al la flugiloj de cikado, tute forlasinte ĉion. Kial ne sukcesus kapti?”

Konfuceo, turnante sin al disĉiploj, diris: “Tenu strebon sendisfenda kaj koncentriĝu je spirito. Jen tion diris la ĝubulo.”⁴¹³

⁴¹¹ 不開人之天、而開天之天. Ĝenerale estas aprobite kompreni 天, kiel la unu – la Ĉielo, la alia – la naturo. Tiuokaze estas notinde, ke en Zhuangzi 人之天 (la homa naturo) portas malbonan signifon. Linzi 林自 komprenas la frazon, kiel aga, artefarata, naturo kaj senaga naturo. (人之天、有為中之自然、天之天、無為中之自然.)

⁴¹² 民幾乎以之真 Laŭlitere eblas traduki alie: “Popolo estas proksima al la vero”. Se M. Bakunin, elektus tiun tradukon. Mi komprenas la frazon laŭ P. Lavrov.

⁴¹³ Preskaŭ sama teksto troviĝas en *Liezi*. (列子、黃帝篇)

Yan Yuan demandis Zhongni, dirante: “Mi iam transiris la abismon, nomatan ‘Pokala profundo’, vidis boatiston stiranta diece. Mi demandis lin, ĉu eblas lerni stiri la boaton. Li diris, ke eblas. – Bona naĝanto povas post kelkfoja trejnado. Se skafandristo, li, eĉ ne vidinta antaŭe boaton, tuj povas stiri ĝin. – Mi demandis kial, sed li ne respondis plu. Ĉu mi povus demandi vin, kion la diritaĵo signifas?”

Zhongni diris: “Bona naĝanto povas post kelkfoja sperto, ĉar li forgesas la akvon. Skafandristo, antaŭe ne vidinta boaton, tuj povas, ĉar li vidas la abismon kvazaŭ la teron. Eĉ se okazus renverso de la boato, li vidas tion kvazaŭ iu ĉaro retiriĝus malantaŭen. Kiom ajn da renverso aŭ retiriĝo viciĝas antaŭ li, li ne estas implikota tien, kaj ĉie ajn li ne perdas sian liberecon.

En pafarka vetludo oni pafas lerte la celon, se veti je tegolo. Se veti je fajna buko, oni pafas iomete kun skrupulo. Se veti je oro, oni pafas kun hezitado. Lerteco de pafarkisto estas sama. Kion oni zorgas grava, tio estas io ekstera. Ĝenerale, se rigardi la eksterajon grava, tiam la interno iĝas fuŝa.”

Tian Kaizhi vizitis dukon Wei de Zhou. La duko Wei diris: “Mi aŭdis, ke s-ro Zhu Xian lernis kiel vivi. Vi kun s-ro Zhu Xian kune vagadis. Kion vi aŭdis de li?”

Tian Kaizhi diris: “Mi nur balais ĉe li pordon kaj korton. Kion do mi povis aŭdi de la Majstro?”

La duko Wei diris: “Vi, Tianzi, ne humiliĝu tro. Mi tre volus aŭdi ion.”

Tian Kaizhi diris: “Mi aŭdis la Majstron diri jenon: ‘Kiu bone nutras la vivion, tiu similas al paŝtisto de ŝafoj. Vidante la postrestantan el ŝafaro, oni devas vipi ĝin.’”

La duko Wei demandis: “Kion signifas tio?”

Tian kaizhi diris: “En Lu-regno vivis iu, nomata Shan Bao. Loĝante inter rokoj, trinkante akvon, li ne interrilatis kun popolanoj nek kundividis profiton. Sepdek-jara, li ankoraŭ aspektis infano je sia vizaĝokoloro. Je lia malfeliĉo, li renkontis tigron malsatiĝintan, kiu mortigis lin kaj formanĝis lin.

Vivis iu, nomata Zhang Yi. Li interrilatadis kun ĉiuj, ĉu altranguloj ĉu etuloj. Li, kvardek-jara, malsaniĝis je febro, kaj mortis. Bao nutris sian internon, tamen ekstere tigro formanĝis lin. Yi nutris la eksteron, sed interna malsano atakis lin. Tiuj du personoj ne vapis la postrestantajn.

Zhongni diris: ‘Ne kaŝu sin, nek elmontru sin, estu meze staranta en la centro. Se vi tenos tiuj tri principojn, via nomo nepre atingos kulminon de reputacio.’

Kiam iu vojaĝos eksteren, se antaŭe sur la vojo unu el dek estis mortigita, parencoj de vojaĝonto, ekz., patro, filoj, fratoj, avertos lin, nepre akompanigos al vi gardistojn kaj lasos vin ekiri. Tio estas ja saĝo, ĉu ne? Oni devas prizorgi ankaŭ interne en la

dormĉambro dum amorado, kaj dum drinkado kaj manĝado. Eraras tiu, kiu ne povoscias preventi tion.”

Iu diservisto, vestite en nigra cermonia vesto kaj krono, vizitis kaĝon de oferota porko kaj diris al la porko: “Kial ci malamas la morton? Mi nutris cin ĝuste tri monatojn, ekzorcis dum dek tagoj, abstinis dum tri tagoj, kaj poste sternos blankan junkon kaj metos sur la gravuritan hakplaton ciajn ŝultrojn kaj postaĵojn. Ĉu ci deziras tion? Sed, se konsideri en la situacio de la porko, mi imagas, ke ci preferus manĝi grajnŝelojn kaj branojn, sidante en la kaĝo, ol morti. Sed, homo, el la vidpunkto de sia kariero, se povas ricevi respekton, vivante kun fajna ĉaro kaj altranga krono, mortinte per luksa ĉerkĉaro, preferus esti oferita, ĉirkaŭate per multaj ornamaĵoj.

El la vidpunkto de la porko, oni rifuzos tion. El la vidpunkto de sia kariero, oni akceptas tion. En kio kuŝas la diferenco inter tiuj?”

Duko Huan estis ĉasanta ĉe marĉo kun Guan Zhong, kiel kondukisto. La duko vidis ja fantomon. Li, prenante la manon de Guan Zhong, demandis: “Paĉjo Zhong, ĉu vi vidis iun?”⁴¹⁴ Guan Zhong respondis: “Mi nenion vidis.”

Reveninte, la duko ekdeliris kaj malsaniĝis. Li ne eliris dum kelke da tagoj. Inter oficistoj de Qi-regno estis iu, nomata Huanzi Gaoao, kiu diris: “Via Moŝto, vi mem damaĝas vin. Kiel iu fantomo povus damaĝi vin? Kaŭzas tion tro amasiĝinta *ĉjio*. Se ĝi diverĝas kaj ne revenas, tiam okazas manko. Se ĝi iras supren kaj ne reiras suben, tiam ĝi igas la homon kolerema. Se ĝi iras suben kaj ne reiras supren, ĝi igas la homon forgesema. Se ĝi, irante nek supren nek suben, trafas la koron, centron de la korpo, tiam ĝi faras la homon malsana.”

La duko Huan demandis: “Se tiel, ĉu vere ekzistas fantomoj?”

Respondis: “Jes. En koto ekzistas tiu, nomata Li. En forno ekzistas Ji. En rubujo ene de domo loĝas Lei Ting. Sub orient-norda angulo saltadas Beia kaj Walong. Sub okcident-suda angulo loĝas Yiyang. En akvo ekzistas Wangxiang, Sur monteto ekzistas Shen, sur monto – Kui. Sur herbejo vagas Panghuang. En marĉo ekzistas Weiyi.”

La duko diris: “Diru al mi, kia estas la Weiyi.”⁴¹⁵

Huangzi diris: “Weiyi estas tiel granda, kiel nabo, tiel longa, kiel timono. Ĝi vestiĝas en purpura robo kun vermiljona krono. Ĝi estas malbela. Aŭdante tondron, ĝi tuj tenas

⁴¹⁴ 桓公 Reĝo de Qi-regno (surtrone 685-643 a. K.) 管仲 fama ĉefministro. 父 Paĉjo esprimas respekton.

⁴¹⁵ 委蛇 Estas alia latinigo: Weituo. Ideogramoj de aliaj menciitaj fantomoj estas jenaj: 履, 髻, 雷霆, 陪阿, 鯉[龍+虫], 洸陽, 罔象, [山+辛], 夔, 彷徨

kapon supren. Kiu vidis ĝin, tiu preskaŭ fariĝas konkerinto.”

La duko Huan laŭte ridegis, dirante: “Jen tiun mi vidis.”

Li vestiĝis formale kun krono kaj sidiĝis. Ne pasis unu tago, lia malsano malaperis, dum ne sciate.

Ji Xinzi eknutris batalkokon por reĝo. Dek tagojn poste la reĝo demandis : “Ĉu la batalkoko estas jam preta?”

Ji respondis: “Ankoraŭ ne. Ĝi estas tro fieraj kaj blufas.”

Pasis aliaj dek tagoj. La reĝo demandis same, Ji respondis: “Ankoraŭ ne. Ĝi reagas al alies krio kaj figuro.”

Pasis aliaj dek tagoj. La reĝo denove demandis, kaj Ji respondis: “Ankoraŭ ne. Vidante la alian, ĝi tuj ege ekscitas.”

Pasis aliaj dek tagoj. La reĝo denove demandis, kaj Ji respondis: “Preskaŭ preta. Spite ke la aliaj kokerikas al ĝi, ĝi ne ŝanĝiĝas. Se vidi ĝin de malproksime, ĝi similas al ligna statuo de koko. Ĝia virto estas plene perfekta. Aliaj kokoj ne aŭdacas kontraŭi al ĝi, sed ili tuj reen forkuras.

Konfuceo turismis al Lüliang, kie akvo falas de alteco je tridek *renoj*, torentas ŝaŭmante kvardek *liojn*.⁴¹⁶ Tie ne povas loĝi salamandroj, amfibioj, fiŝoj kaj testudoj. Jen rigardu, unu homo naĝas tie! Oni konsiderus, ke li volus mortigi sin pro malĝojo. Konfuceo igis disĉiplojn alkuri al torento por savi lin. Sed tiu homo post naĝado je cent *paŝoj* eliris de akvo. Li iras promeni laŭ la bordo, kantante kun haroj malaranĝitaj.

Konfuceo sekvis lin kaj demandis lin, dirante: “Mi dubis vin fantomo, sed vi montriĝas homo. Diru al mi – Ĉu estas iu sekreto por tranaĝi la akvon?”

Li respondis: “Ne. Mi havas nenian sekreton. Mi ekvivis pro iu kialo, kaj kreskis laŭ nature, kaj fariĝis tia laŭ sorto. Mi plonĝas al kirlo en akvon, elakviĝadas kun ondoj, sekvas la akvan vojon, ne farante mem per mia volo. Jen tial mi tranaĝas la torenton.”

Konfuceo demandis: “Kion signifas ekvivi pro iu kialo, kreski laŭ nature, fariĝi laŭ sorto?”

Li respondis: “Tio, ke mi naskiĝis ĉe montkresto kaj loĝas ĉe la montkresto, estas la kialo. Tio, ke mi kreskis kun torento de akvo, estas naturo. Tio, ke mi ne scias kiel iĝi tia, estas la sorto.”

⁴¹⁶ 呂梁 lokonomo. En la epoko de Zhou-dinastio unu *ren* 仞 egalas al 7 *chi* 尺. Unu *chi* egalas al 22.5 cm. Unu *li* egalas al 300 – 360 *paŝoj* 步.

Lignoĉizisto Zi Qing,⁴¹⁷ ĉizinte lignon, faris stativon por muzikiloj-sonoriloj. La stativo estas konstruita. Kiu vidis, tiu miregis, ke ĝi estus farita de Spiritoj. La markizo de Lu-regno, vidante ĝin, demandis la ĉiziston, dirante: “Kiun teknikon vi uzas por fari ĝin?”

Li respondis: “Mi estas metiisto. Kiun teknikon posedas mi? Tamen mi havigis al mi nur unu proceduron. Ekfarante stativon, mi antaŭ ĉio penas ne perdi *ĉjion*. Nepre ordigas la koron⁴¹⁸ kaj faras la koron kvieta. Ordigante tri tagojn, mi ne zorgas pri laŭdo, rango kaj salajro. Ordigante kvin tagojn, mi ne zorgas pri kritiko, honoro, lerteco kaj mallerteco. Ordigante sep tagojn, mi trankvile forgesas min mem, havantan kvar membrojn kaj korpon. Je tiu tempo, jam al mi ne estas reĝa korto. Je koncentriĝo en la gravurado malaperas ĉio ekstera, distranta min. Poste mi eniras al monto en arbaron por observi la plej bonan formon laŭ la Ĉiela naturo. Post kiam mi prezentas al mi la farotan stativon, mi aldonas ja la manon. Se ne tiel, mi ĉesus laboron. Tiel do mia Ĉiela naturo akordiĝas al la Ĉiela naturo de ligno.⁴¹⁹ Jen, eble estus la kaŭzo, kial oni suspektis mian laboron farita de la Spiritoj.”

Iu maneĝisto, nomata Dongye Ji montris al la duko Zhuang sian teknikon. Ĉevalo iras antaŭen-malantaŭen⁴²⁰ tiel rekte, kiel laŭ tuĉlineo, turnas sin dekstren kaj maldekstren tirl ronde, kiel per cirkelo. La duko Zhuang pensis, ke eĉ desegno⁴²¹ estus malpli preciza ol la spuro. La duko ordonis al Dongye, ke ĉi tiu trairadu cent hurdojn⁴²² kaj poste revenu.

Yan He⁴²³ vidis tion kaj, enirinte, diris al la duko: “La ĉevalo de Ji tuj kadukiĝos.”

La duko silentis kaj ne respondis. Iom poste ĝi vere kadukiĝis kaj revenis. La duko demandis Yan: “Kial vi sciiĝis tion?”

Li respondis: “Malgraŭ ke la ĉevalo jam elĉerpiĝis je la forto, oni postulis de ĝi kuri plue. Tial do mi diris, ke ĝi kadukiĝos.”⁴²⁴

Iu metiisto, nomata Chui⁴²⁵, desegnis linion precize kvazaŭ laŭ lineo kaj cirkelo. Liaj

⁴¹⁷ 梓慶 梓 estas nomo de profesio. 鑿 estas stativo de sonoriloj aŭ muzikiloj.

⁴¹⁸ 齊 Iuj esploristoj prenas la ideogramon por fasti. Vid. Burton Watson, p. 152

⁴¹⁹ 以天合天 Laŭlitere – “akordiĝo de la Ĉielo kun la Ĉielo”

⁴²⁰ 進退 Mi dubas, ĉu ĉevalo povus malantaŭen iri rekte.

⁴²¹ 文. Sed multaj esploristoj konsideras tiun Zao Fu 造父.

⁴²² 鉤百 Frazo ne komprenebla. Unu el signifoj de 鉤 estas malpli longa latero de L.

⁴²³ 顏闔 Saĝulo de Lu-regno, aperas lia nomo en la ĉap. 人間世, 讓王, 列御寇篇.

⁴²⁴ Simila epizodo videblas en aliaj verkoj (荀子哀公篇, 呂氏春秋適威篇, 他). Laŭ mia opinio, la kritiko ĉi tie estas direktata al la ordono far de la duko pli ol la ĵokeo.

⁴²⁵ Lerta metiisto en la epoko de Yao. La nomo jam aperis en la ĉap. 胠篋篇

fingroj akordiĝis kun aĵoj tiom nature, ke li mem ne bezonas intenci. Do fundamento de lia spirito tute koncentriĝis en unu, kaj estis ne katenita. Oni forgesas siajn piedojn, kiam la ŝuoj estas komfortaj. Forgesas talion, kiam la zono estas komforta. Forgesas je praveco-malpraveco de scio, kiam la koro estas komforta. Okazas nek ŝanĝiĝo je interno, nek obeo je ekstero, kiam la afero iras komferte. Komforto en la komenco kaj io neniam malkomforta, – tio estas komforto de forgesita komforteco.⁴²⁶

Iu Sun Xiu venis al la pordo de Majstro Bian Qingzi⁴²⁷ kaj plendis, dirante: “Kiam mi estis en vilaĝo, oni ne rigardis min seneduka. Kiam mi estis en malfacileco, oni ne rigardis min senkuraĝa. Sed se mi kultivis sur la kampo, la jaro ne favoris min. Se mi servis al landestro, la mondo ne favoris min. Tiel mi estas forlasita hejme en la vilaĝo, ekzilita en la urbo. Je kio mi pekus al la Ĉielo? Pro kio mi devus renkonti ĉi tiun sorton?”

La Majstro Bian diris: “Ĉu vi ne aŭdis pri la pleja homo, kondukanta per si mem. Li forgesis sian hepaton kaj galon, forlasis siajn orelojn kaj okulojn, vagadis malligite ekster kotoj kaj polvoj, promenadis en senaga disciplino⁴²⁸. Tio signifas, ke li faras sed ne apogas sin sur sia forto, kreskas sed ne mastras.

Nun vi ornamas sian scion kaj konsternas malsaĝulojn. Vi disciplinas sin mem kaj klare dismontras per tio alies malpuron, kvazaŭ vi irus, parade tenante sunon kaj lunon. Vi ricevis la korpon tute perfektan kun naŭ truoj, vivante en la mezo de la vojo sen ajna difekto kiel surdo, blindo, lamo aŭ kriplaĵo. Kompare kun multaj homoj vi estas pli feliĉa ol aliaj. Kial do vi havas tempon por plendi kun rankoro al la Ĉielo kontraŭ sia malbonsorto? Vi, iru for!”

Sunzi foriris. Bianzi eniris kaj sidiĝis, iom poste ĉagreniĝis, kun vizaĝo supren al ĉielo.

Disĉiplo demadis: “Majstro, kial vi ĉagreniĝis?”

Bianzi diris: “Ĵus alvenis s-ro Xiu. Mi parolis al li pri la virto de la pleja homo. Mi timas, ke tio eble konsternis lin kaj ege konfuzis lin.”

La disĉiplo diris: “Tute ne gravas, ĉu diritaĵo de Sunzi estus prava, aŭ diritaĵo de Majstro estus malprava. Io malprava ja ne povus konfuzi la pravan. Se diritaĵo de Sunzi

⁴²⁶ Laŭ ĉi tiu teksto, “senago 無為” estas senkonscia ago, perfekte kutimiĝinta al profesia laboro. 忘適之適 estas atingebla per forgeso de komforteco-malkomforteco. En realo ekzistas multe da malkomforteco. Laŭ mi, unu malkomforteco estas forgesita per la alia malkomforteco, kontraŭpezante unu la alian.

⁴²⁷ 孫休 Estas notinde, ke alinomo de Zhuangzi estis ankaŭ Xiu 休. 扁慶子 Nomo de iu saĝulo en Lu-regno.

⁴²⁸ 無事之業 Kontraŭdira esprimo konsistanta el senago kaj 無事 afero 事業. Por la pleja homo ankaŭ senago estas ago de afero.

estas malprava kaj via diritaĵo estas prava, ĉar li venis ĉi tien jam konfuziĝinte, vi kulpas je nenio.”

Bianzi diris: “Ne eblas diri tiel. Antaŭe flugis unu birdo al la suburbo de Lu kaj haltis. Landestro de Lu ĝojis je tio, regalis la birdon per diversaj viandoj kaj per koncerto de la muziko Jiu Shao. Sed la birdo malĝojis, vertiĝis, kaj povis manĝi nenion. Estis tiele pro tio, ke oni nutris la birdon laŭ sia propra maniero. Estus bone, se la birdo estus nutrata laŭ naturo de la birdo mem, t. e., loĝante en la profunda arbaro, flosante sur rivero kaj lago, manĝante libere, sentante sin nur paca surtere. Nun s-ro Xiu estas homo kun malvasta vidkampo. Malgraŭ tio mi parolis al li pri la pleja homo. Se diri alegorie, mi provis rajdigi muson sur ĉevalĉaro aŭ amuzigi paseron per sonoriloj kaj tamburoj. Kial ne li konsterniĝis.”

20 LA ARBO DE MONTO

Kiam Zhuangzi estis iranta en monto, trovis unu grandan arbon plenplena de folioj. Iu arbohakilo staris apude, sed ne intencis haki ĝin. Zhuangzi demandis lin: “Kial?”

Li respondis: “Ĝi uzeblas por nenio.”

Zhuangzi diris: “Ĉi tiu arbo ne utilas por ligno, do povas travivi longe ĝis la natura morto.”

Zhuangzi, elirinte de la monto, noktis en la domo de sia malnova amiko. La amiko ekĝojis kaj ordonis al juna lakeo mortigi anseron por kuiri.

La lakeo demandis: “Kiun mortigi? Ĉu tiun, kiu povas gaki, aŭ tiun, kiu ne povas gaki?”

La mastro respondis: “Mortigu tiun, kiu ne povas gaki.”

En la sekva tago, disĉiplo demandis Zhuangzi, dirante: “Hieraŭ rilate al la arbo de monto, ĝi povas longe vivi ĝis la natura morto pro sia malutileco. Nun la ansero de la mastro mortis pro sia malutileco. Kiun do vidpunkton vere prenas vi, Majstro?”

Zhuangzi, ridante, diris: “Mi, Zhou, vere situas inter la utilan kaj la malutilan. Sed tiu pozicio diversas unu al la alia, kiuj, kvankam similaj, tamen tute malsamaj. Do neeviteblas miskompreno. Ne tia estas tiu, kiu laŭ la Tao kaj virto flos-vagadas.⁴²⁹ Li estas ne honorata nek riproĉata. Iam estante drako, iam estante serpento, li transformiĝas laŭtempe. Li ne restas faranto de nur unu sola afero. Iam supren, iam suben, li harmonias kiel tuta kvanto. Li flos-vagadas ĉe la fonto de ĉies fontoj, kie aĵoj ekzistas per si mem kiel aĵo en aĵo, kaj por si mem kiel malaĵo en aĵo.⁴³⁰ Do, kial li ĝenus sin? Tio estas la leĝo de Shennong kaj la Flava Imperiestro.

Tiel do ĉies realo kaj la kodo de homa etiko ne restas sama. Kuniĝo estas tuj disiĝo, perfektigo estas tuj ruiniĝo. Iu brava tuj estos tordita, iu respektinda tuj estos akuzita, faranto de afero tuj estos renversita, saĝulo tuj estos viktimo de ruza intrigo, humilulo tuj estos trompita. Kiel do eblus atingi nepre la atenditan rezulton? Ho, domaĝe! Miaj disĉiploj, nur strebu al jeno, nur al hejmo de la Tao kaj virto.⁴³¹

⁴²⁹ 浮遊者. Laulitere, flosanto-ludanto.

⁴³⁰ 物物而不物於物. Mi prenas la frazon kiel esprimon por ekzistado de du kontraŭaj en unu aĵo. La abstrakta esprimo allasas diversajn tradukojn, por ekzemplo, kiel “treating things as things but not letting them treat you as a thing” (B. Watson, 157). Je tiu kompreno Watson sekvas la tradukon de japanaj esploristoj.

⁴³¹ 道德之鄉. Se laŭ nuntempa signifo: “Strebu al la morala hejmo.” Tiu devizo similas al alvoko de narodnikoj: Стремиться к нравственному идеалу.

S-ro Shinan Yiliao vizitis la markizon de Lu-regno, kiu aspektis trista. S-ro Shinan demandis kial la reĝo sentas sin tiel trista.

La markizo de Lu diris: “Mi lernas la Vojon de antaŭaj sanktuloj kaj mastri la aferojn de antaŭaj reĝoj. Mi respektas Spiritojn kaj estimas saĝulojn. Mi mem faras la aferojn kaj neniam disiĝas de tio. Malgraŭ tio neeviteblas al mi afliktoj. Mi ĉagreniĝas je tio.”

S-ro Shinan diris: “La maniero, kiel vi penas forigi la afliktojn, estas tro supraĵa. Vulpoj kun riĉaj haroj kaj leopardoj kun bela felo loĝas en montoj kaj arbaroj, kuŝas en krutaj kavernoj, tenante sin kvietaj. Ili vagadas nokte kaj kuŝas tage, restante skrupulaj por gardo. Eĉ suferante pro malsatiĝo, ili evitas homojn kaj serĉas manĝaĵojn ĉe riveroj kaj lagoj. Tio estas ilia regulo. Spite ĉioj ĉi tion, al ili estas neevitebla la malfeliĉo de kaptiloj kiel reto kaj enfalejo. Kiu kulpas je tio? Kulpa estas ilia felo.

Ĉu nuna Lu-regno por vi ne estas la felo? Mi dezirus, ke vi detranĉu la formon forigi la felon. Purigu vian koron kaj forlasu vian avidon. Vagadu en senhoma kampo. En la sudo de Yue estas unu provinco, nomata la lando de Konstruo de Virto. Tie la popolo estas stulta kaj simpla, havante da egoismo kaj avido tre malmulte. La popolo scias kultivi kaj produkti, ne sciante konservi. Ili nur donas, ne postulante la rekompencojn. Ili ne scias kien apliki la juston, nek kiel sekvi la deregulojn. Kvankam nur kondukas propravole, freneze kaj senkonscie, tamen la popolo iras al la granda Direkto.⁴³² Ilia vivo povas esti ĝojiga, ilia morto povas ricevi funebron. Mi dezirus, ke vi foriru de via regno, forlasu la vulgaran mondon kaj iru laŭ la Tao helpante unu al la alia reciproke.”

La reĝo diris: “La Vojo estas malproksima kaj kruta, estas barita ankaŭ per riveroj kaj montoj. Mi ne havas ŝipon kaj ĉaron. Kion fari?”

S-ro Shinan diris: “Vi konsideru via ĉaro tion, ke vi ne havas arogantecon nek alligitecon.”

La reĝo diris: “La Vojo estas malluma kaj fora, kaj senhoma. Ĉe mi ne estos provizo, nek manĝaĵo, kiel mi povus atingi la celon?”

S-ro Shinan diris: “Vi elspezu malmulte, reduktu vian avidon, kaj, malgraŭ malmulteco, al vi sufiĉos la manĝoprovizio, eblos transiradi riverojn, transflosadi maron. Tiam eĉ se rigardi, antaŭ vi ne videblas ajna klifo. Ju pli vi iros, des pli ne estas sciate, kie elĉerpiĝos la limo. De sur la bordo revenos hejmen ĉiuj vin akompanintaj, do vi sola foriros de tie plu malproksimen.

Do, kiu posedas homojn, tiu laciĝas. Kiu estas posedata de homoj, tiu ĉagreniĝas. Tial do Yao ne posedis homojn, nek vidis sin posedata de homoj. Mi petas vin forĵeti la reĝan laciĝon kaj forigi la reĝan ĉagrenon. Kaj vi sola vagu laŭ Tao atingi la regnon de Granda

⁴³² 大方. Laŭ multaj esploristoj la frazo estas egala al la Granda Vojo 大道.

Krepusko.⁴³³ Kiam oni transiras riveron per ŝipo, se iu malplena boato tuŝis la ŝipon, eĉ koleremulo ne indigniĝos. Sed se unu homo troviĝas sur la boato, oni laŭte alkrios: ‘For!’ Se unu krio ne estis aŭdata, tri fojojn alkrios, nepre kun insultegoj. Je antaŭa kazo oni ne koleris, sed en la nuna koleris, ĉar antaŭe estis malplene, sed en nuno ekzistas reala homo. Tiel same, kiu povos igi sin malplena kaj ludi en la mondo, tiun nenio povos damaĝi.”

Beigong She kolektis por la duko Ling imposton kaj faris sonorilojn. Ekster la kastela pordo li konstruis podion. En tri monatoj estas finkonstruita du vicoj da pendobretoj de sonoriloj, supra vico kaj suba vico.

Princo Qingji, vidante tion, demandis: “Kian teknikon vi uzis por konstrui?”

She diris: “Nur unu⁴³⁴, krome nenion alian mi ne aŭdacis fari. Mi aŭdis jenon. Post tajlado kaj polulado, denove reveni al simpleco. En malpleneco estu senkoscie fari aferon, estu malskrupule kaj pigre por dubi homojn. Rilate al kuniĝo kaj disiĝo, sendu foriranton, akceptu alvenanton. Lasu alveni, ne barante, kaj lasu foriri, ne haltigante. Lasu iun obstine-fortan obei, lasu iun elastan sekvi, kaj lasu ĉiun konduki per sia propra nepreco⁴³⁵. Tiel do, eĉ se matene-vespere impostigate, oni neniom senkuraĝiĝas. Des pli bone faros la aferon havanto de Granda vojo⁴³⁶.”

Kiam Konfuceo estis sieĝata ĉe landlimo inter regnoj Chen kaj Cai, li ne povis manĝi la kuiritan. Dagong Ren⁴³⁷ venis al li konsoli, dirante: “Vi baldaŭ mortos.”

Li respondis: “Jes, certe.”

Ren demandis: “Ĉu vi malŝatas morton?”

Li respondis: “Jes.”

Ren diris: “Mi provu paroli al vi pri la Vojo por senmorto. Ĉe la Orienta maro estas iu birdo, nomata Pigo. La birdo ŝajnas nekapabla, fuŝbatante flugile. Nur helpate ĝi povas ekflugi. Vivante kune kun aliaj en amaso, ĝi ne aŭdacas iĝi la unua je antaŭenirado, nek la lasta je retiriĝo. Je manĝado ĝi ne aŭdacas esti la unua kaj prenas nepre la restaĵon. Tial ĝi ne estas ekskludata de la vico en grupo, kaj la fremdaj ne turmentas ĝin. Tiel ĝi evitas afliktojn.

⁴³³ 大莫之國 Ideogramo 莫 havas signifon de “krepusko”. Multaj esploristoj prenas ĝin por signifo de “Nenio” aŭ “Malpleneco”.

⁴³⁴ 一之間 Iu konjektas la frazon kiel “koncentriĝi pure en unu”, la alia – “laŭ naturo”, la tria – “sekvi popolon”.

⁴³⁵ 自窮 Mi komprenas tiun frazon, ke ĉiu laboru tiel, kiel sia propra neceseco igas lin konduki.

⁴³⁶ 大塗 Multaj esploristoj prenas la frazon kiel 大道.

⁴³⁷ 大公任 aŭ 太公任

Arbo, rekte staranta, estos unue hakita. Puto kun dolĉa akvo estos unue elĉerpita. En tiu senco, vi ornamas vin per erudicio kaj konsternas stultulojn. Per la memkulturiĝo vi malkaŝas en lumo alies malpuron, kvazaŭ vi brilante irus kun la suno kaj la luno. Tial do vi ne povas eviti malfeliĉon.

Antaŭe mi aŭdis iun kompletan grandulon dirinta: ‘Kiu fieras mem, tiu ne meritas. Kiu meritas, tiu falas. Kiu atingis renomon, tiu difektiĝas.’

Kiu do povus forĵeti sian meriton kaj renomon, kaj retroiri al unu el la popolamaso? Tao fluas, sed ne lumate pri ĝia ekzisto. Virto estas farata, sed ne nomate pri la loko. Sennoma virtulo laŭ nevidebla Tao, estante pura-pura kaj ordinara-ordinara, estas komparebla al frenezulo. Li forviŝis sian piedsignon, forĵetis sian aŭtoritaton, kaj ne faras sian meriton kaj renomon sciata. Tial do li ne akuzas aliajn, kaj la aliaj ne akuzas lin. La pleja homo ne zorgas je reputacio. Je kio vi ĝojas?”

Konfuceo diris: “Bone. Rezigni la interrilaton, foriri de la disĉiploj, fuĝi al marĉego, vestiĝi en felo kaj kruda vestaĵo, manĝi glanon kaj kaŝtanon, se tiele, irante en bestaron mi ne konfuzus gregon, enirante en birdaron ne konfuzus ilin je vicordo. Eĉ birdoj kaj bestoj ne malamuzas min, des pli homoj.”⁴³⁸

Konfuceo demandis s-ron San Hu⁴³⁹, dirante: “Mi estadis ekzilita el Lu-regno du fojojn. En Song-regno Mi estus apenaŭ premita per arbo hakita, en Wei-regno eĉ miaj piedsignoj estis forviŝitaj, en Shang kaj Zhou⁴⁴⁰ mi estis suferigita pro ekstrema mizero, ĉe landlimo inter Chen kaj Cai mi estis sieĝita. Min trafis kelke da afliktoj, mia rilato kun parenco maldensiĝis pli kaj pli, kaj miaj lernantoj kaj amikoj disiĝis de mi pli kaj pli. Kial?”

S-ro San Hu diris: “Ĉu vi iam ne aŭdis kiel eskapis iu Jia-landano⁴⁴¹, nomata Lin Hui, forĵetinte la jadon je mil *jīn* da oroj, sed portante surdorse la bebon. Oni demandis: ‘Ĉu por la mono? Sed bebo kostas malpli. Ĉu por ĝeno? Sed bebo povas ĉagreni pli. Kial forĵeti la jadon je mil *jīn* da oro kaj anstataŭe porti surdorse la bebon?’

Lin Hui respondis: ‘Kiu elektas jadon, tiu estas ligita kun profito. Ligiteco kun bebo apartenas al la Ĉielo. Kiuj elektas profiton, tiuj forĵetas unu la alian en urĝa

⁴³⁸ Multaj esploristoj konsideras la respondon de Konfuceo finiĝinta nur per “Bone 善哉.” Sed mi suspektas, ke la parolo daŭras ĝis la fino, samkiel Lu Shuzhi 陸樹芝. Laŭ mia kompreno la respondo estas ironia antaŭargumento al taoismo, ĉar li komparas sieĝantojn al birdoj kaj bestoj.

⁴³⁹ En la ĉap. 大宗師 aperas kiel 桑戶. En la alia eldono estas skribite 桑雩.

⁴⁴⁰ 商、周 Teritorio por posteuloj de Yin-dinastio, t. e. tiama Song-regno, kaj Wei-regno.

⁴⁴¹ 假 Nomo de lando. Sun Yirang suspektas, ke tio devus esti Yin 殷, t. e. Song.

malfeliĉego.⁴⁴² Kiuj elektas la apartenantan al la Ĉielo, tiuj akceptas unu la alian en urĝa malfeliĉego. Malproksima estas la distanco inter reciproka forĵetado kaj reciproka akceptado. Sed, la rilato inter nobluloj estas sensapora kvazaŭ pura akvo. La rilato inter etuloj estas dolĉa kvazaŭ vino. Sensaporeco de nobluloj kondukas al amo. Dolĉeco de etuloj kondukas al ekskludo.⁴⁴³ Kiuj akordiĝas sen kialo, tiuj disiĝas sen kialo.”

Konfuceo diris: “Mi respektoplene aŭdis vian konsilon.” Li foriris tute senĝene kun kvieta paŝo. Reveninte hejmen, li detenis sin de lernado kaj forĵetis librojn. Disĉiploj, jam sen antaŭa formala saluto, amas lin multe pli profunde.

Alian tagon s-ro San Hu aldone diris: “Ĉe sia morto Shun ordonis al Yu, dirante: ‘Vi atentu jenon. Io, havanta formon, estu rigardata laŭ leĝo-kaŭzeco. Io, koncernanta senton, estu rigardata laŭ natura normo.’ Leĝo estas nedisigebla, normo ne estas peniga. Sendise kaj senpene atendi formiĝon, ne serĉante ornamadon. Ne serĉi ornamadon sed atendi formiĝon – tio nepre ne signifas nuran atendon de materia ŝanĝiĝo.”⁴⁴⁴

Iam Zhuangzi vestis sin en granda robaĉo flikaĵplena, kun fi-ŝuoj truitaj kaj noditaj per ŝnuroj, kaj renkontiĝis kun reĝo de Wei-regno.⁴⁴⁵

La reĝo de Wei demandis: “Ĉu vi, Majstro, ekstreme laciĝis?”

Zhuangzi diris: “Pro malriĉo, sed ne pro laciĝo. Ke iu personeco, havante virton, ne povas fari aferon, tio estas pro laciĝo. Ke vestoj estas ĉifonaj kaj ŝuoj plenas je truoj, tio estas pro malriĉeco, sed ne pro laciĝo. Tio estas pro tio, ke ne favoras la tempo. Ĉu via reĝa Moŝto ne vidis simiojn viglaj, kiam ili ludas sur arboj, kiel dafnifilo, betulo, kamforo? Ili saltadas kaj pendiĝas de branĉo al branĉo, de liano al liano, kiel fieraj reĝoj, dum longe. Tiam eĉ lerta pafarkisto, kiel Yi aŭ Peng Meng, ne povus celfiksi al tiuj simioj. Se ili estus inter pikarboj, kiel bukso, dornarbeto, pikarbuso, ponciro, tiuokaze ili moviĝus zorgeme kontraŭ danĝero, rigardante maltrankvile, tremante kaj timante. Tio estas ne pro tio, ke iliaj muskoloj kaj ostoj abrupte rigidiĝis, sed pro tio, ke en malkonvena loko ili ne povas vigle moviĝi.

⁴⁴² urĝa malfeliĉego 迫窮禍患害 Laŭlitere, “urĝeco de kulmina mizero, katastrofo, malsano, damaĝo”.

⁴⁴³ 君子之交淡若水、小人之交甘若醴。君子淡以親、小人甘以絕。

⁴⁴⁴ Mi uzas vorton “leĝo-kaŭzeco” por traduki 緣, kiu esprimas interrilatajn leĝojn de estaĵoj, t. e. leĝojn de homoj, societo, naturo, historio. La vorton 率 mi prenas kiel naturan normon aŭ normalecon. Por ideogramoj 形、情、物 mi uzas respektive “formo, formiĝo”, “sento”, “materia aĵo”. La frazo 固不待物 estas laŭ mia kompreno – “nepre ne signifas nur atendi materian ŝanĝiĝon, restante kun neniam ago”. Sed tia nocio diferencas de ordinara kompreno de taoismo 無為. Iu opinias la citaĵon de Shun ĝis la 若率, alia – ĝis la fino 不待物. Ideogramo 待, laŭ mi, signifas “atendi kun espero, obei aŭ sekvi”.

⁴⁴⁵ 魏王. Iuj konsideras tiun reĝon 惠王, aliaj – 襄王.

Nun, estante inter malklaraj suproj kaj kapricaj ministroj, kiel oni povus ne laciĝi, kiom ajn dezirus tion? Tio estas ja simptomo de tiu Bi Gan, dissekcita por vidi lian koron.”

Konfuceo falis en malfacilegon ĉe la landlimo inter Chen kaj Cai. Sep tagojn li ne manĝis kuiritan manĝaĵon. Dume li, maldekstre apogante sin al velkinta arbo, dekstre batante per velkinta branĉo, estis kantanta pecon de klano Yan. Estis tia kiel perkut-instrumento, sed ne troviĝis muzikiloj por melodio. Estis voĉo, sed sen gamo⁴⁴⁶. Ligna sono kun homa voĉo movis homan koron, kvazaŭ pluganta virbovo. Yan Hui kun rekta pozo kaŝe direktis tien okulojn. Zhongni ektimis, ke Yan Hui troigu lian situacion, kaj, ke pro troa amo al li ege kompatu lin.

Konfuceo diris: “Hui, estas facile ne ricevi malprofiton de la Ĉielo. Sed estas malfacile ne ricevi profiton de homoj. Ne estas komenco, nek fino. Homoj kun la Ĉielo estas unu tuto. Kiu do estas nuna kantanto?”

Hui diris: “Permesu al mi demandi vin, kion signifas la frazo: ‘Estas facile ne ricevi malprofiton de la Ĉielo?’”

Zhongni diris: “Malfavora fenomeno, kiel malsato, soifo, malvarmo, varmego, ekstrema senelirejo, estas fenomeno farata de la Ĉielo kaj la tero, t. e. rezulto de sinturniĝo de materio. T. n., ĉio moviĝas kune kun ili. Homoj, servantaj al supro, ne povas aŭdaci foriri de tio. La Vojo de subuloj ja estas tia. Tial do, des pli oni atendas la Ĉielon.”

Hui diris: “Kion signifas la frazo: ‘Estas malfacile ne ricevi profiton de homoj?’”

Zhongni diris: “Ekdungite, oni en la komenco progresas al kvar direktoj, Rango kaj salajro kune altiĝas senĝene. Ke la persono ricevas materian profiton, tio ne dependas de la persono mem. Mia sorto estas posedata de io ekstera. Noblulo ne ŝtelas, saĝulo ne ŝteletas. Por akiri la profiton kion do mi povus fari?”

Estas dirite: ‘Neniu birdo estas pli saĝa ol hirundo. Trovante lokon malkonvena, ĝi ne ĵetas rigardon kaj tuj rapide forflugas, eĉ se ĝi faligus akiritaĵon. Ĉar ĝi timas homojn. Malgraŭ tio ĝi turnas sin al inter homoj, ĉar tie ekzistas la sanktejo al dioj de tero kaj greno.’”

Al la demando, kion signifas la frazo – Ne estas komenco, nek fino – , Konfuceo diris: “Ĉio transformiĝas multdiverse, ne sciate al kiu heredanto. Kiel eblus scii kie io finiĝas? Kiel eblus scii kie io komenciĝas? Estas ĝuste nur atendi tion.”

Al la demando, kion signifas – Homoj kun la Ĉielo estas unu tuto –, Zhongni diris: “Ke

⁴⁴⁶ 焱氏之風 muziko de Shennong 神農. 無宮角 sen gamo. Gamu konsistas el kvin 宮商角徵羽.

ekzistas homoj, tio estas dank' al la Ĉielo. Ankaŭ la Ĉielo ekzistas dank' al la Ĉielo. Sed estas denaska naturo, ke homoj ne povas posedi la Ĉielon. Do sanktulo kviete forirante mortas je la korpo kaj finiĝas.”⁴⁴⁷

Zhuang Zhou promenis en kaŝtanĝardeno de Diaoling. Li vidis unu strangan pigon alfluganta de sudo. Ĝi havas flugilojn vastajn je sep *chi*, okulojn grandajn je unu *cun*. Ĝi preterflugis lian frunton kaj eniris en la kaŝtanarbaron.

Zhuang Zhou diris: Kiu estas ĉi tiu birdo? Kun flugilegoj ĝi ne povas flugi rekte, kun okulegoj ne povas vidi.”

Li, prenante baskon, postkuris, kaj kun arbalesto en mano celis al ĝi. Vidu, unu cikado en bela ombro ripozas forgesante sin. Kaj unu manto embuske gvatas por kapti la cikadon, ankaŭ forgesante sin en la observado. La stranga pigo sekvas la manton por profitigi sin, forgesante la realon por profito. Zhuang Zhou surpriziĝis, dirante: “Ho, estaĵoj principe ofendas sin reciproke unu la alian, kaj paro de profito kaj malprofito invitas sin reciproke alterne.”⁴⁴⁸ Forĵetinte arbaleston, li estis retroiranta. Gardisto de ĝardeno postkuris lin kaj riproĉis.

Zhuang Zhou revenis hejmen kaj ne aperis publike⁴⁴⁹ dum tri monatoj. Lin Ju vidante tion demandis: “Kial vi dume tute ne aperas publike?”

Zhuang Zhou diris: “Alkroĉiĝante nur la eksteran formon, mi forgesis sin mem. Observante malpuran akvon, mi perdiĝis ĉe pura abismo. Mi aŭdis sinjorojn diranta: ‘Se eniras inter vulgarulojn, sekvu la vulgarulojn.’ Nun mi iris al Diaoling kaj tie mi forgesis min mem. Do stranga pigo tuŝis min je frunto. Promenante en kaŝtanarbaro mi forgesis realon, do gardisto de kaŝtanarbaro ege riproĉis kaj hontigis min. Do mi ne aperis antaŭ publiko.”

Yangzi⁴⁵⁰ survoje al Song-regno tranoktis en iu hotelo. La hotelmastro havas du kromvirinojn: unu estas bela, la alia – malbela. La malbela estas traktata kiel nobla, la bela – kiel malnobla. Yangzi demadis kial. La hotelmastro respondis jene:

“La bela konsideras sin bela, sed mi ne scias ŝian belecon. La malbela konsideras sin turpa, sed mi ne scias ŝian malbelecon.”

⁴⁴⁷ Laŭ la teksto, unueco de homo kaj la Ĉielo kuŝas en tio, ke ambaŭ ekzistas dank' al la Ĉielo. Per la frazo 天亦天也 estas supozate pri du specoj de la Ĉielo: la Ĉielo per si mem kaj la Ĉielo kiel kreinto, kiu devas esti Unuiversala Leĝo aŭ Dio.

⁴⁴⁸ 二類相召 Diversas opinioj pri la frazo inter esploristoj. Iu komprenas ĝin, ke du similaj specoj estas cikada kun manto kaj manto kun pigo. Alia komprenas du specojn profito-malprofito.

⁴⁴⁹ 不庭 Iu prenis la frazon por “malagrabra”, alia – por “ne aperi en kortego”.

⁴⁵⁰ 陽朱 Unu el grandaj pensuloj pri egoismo.

Yangzi diris: “Vi, mia lernanto, notu tion. Kiu, kondukante saĝe, forĵetas koron fieri sian saĝecon, tiu nepre estas amata ĉie ajn.”

21 TIAN ZIFANG

Tian Zifang estis asidua al la markizo Wen de Wei-regno.⁴⁵¹ Li laŭdis iun Qi Gong. La markizo Wen demandis: “Ĉu li estas via instruisto?”

Zifang diris: “Ne. Mia samvilagaĝano. Lia opinio pri Tao ofte trafas. Do mi laŭdas lin.”

La markizo Wen demandis: “Ĉu vi ne havas la instruiston?”

Zifang diris: “Mi havas.”

La markizo Wen demandis: “Kiu estas via instruisto?”

Zi Fang respondis: “Donguo Shunzi.”

La markizo Wen diris: “Se tiel, kial vi ne laŭdis lin antaŭe?”

Zi Fang respondis: “Kiel homo, li estas persono de vero. Lia vizaĝo estas homa, sed kvazaŭ malpleneco de la Ĉielo⁴⁵². Kvankam konformante al rilata interŝanĝo, li firme tenas la veron⁴⁵³. Estante pura, li ampleksas aĵojn. Se en iu aĵo ne troviĝas la Tao, li mem ĝustigas per sia ekzemplo kaj komprenigas tion, tiel do lasas al homoj estingi la arbitran volon. Kiom ajn mi laŭdu lin, ne sufiĉas mia laŭdado al li.”

Zifang eliris. La markizo Wen konsternite tutan tagon ne parolis. Poste li ekdiris al la staranta apude subulo: “Estas malproksime, por ke mi fariĝu noblulo de perfekta virto. Komence mi pensis, ke estus sufiĉe, se lerni eldirojn de sanktaj intelektuloj kaj konduton de bonvoleco kaj justo. Aŭdante pri la instruisto de Zifang, mi disfandiĝis je mia formo kaj ne volus moviĝi, nek volus paroli kun buŝo ŝlosita. Kion mi lernis, tio estis vere nur terpupo. La regno de Wei vere igas min nur laca.”

Wenbo Xuezi⁴⁵⁴ iris al Qi-regno, survoje tranoktis en Lu-regno. Iu Lu-landano petis renkontiĝi kun li. Wenbo Xuezi diris: “Ne. Mi aŭdis, ke noblulo en Centraj regnoj, kvankam klare konas decregulojn, tamen malvasta je kompreno de homa koro. Mi ne deziras vidi tiun. Li, atinginte Qi, retroiris al Lu. Tiu persono denove petis renkontiĝon.

Wenbo Xuezi diris: “Tien survoje li petegis vidi min, kaj nun denove sur revena vojo petegas vidi min. Nepre li havus ion por konsili al mi.”

Li eliris vidi la gaston. Reveninte, li suspiris. En la sekva tago denove vidis, kaj

⁴⁵¹ 田子方 familia nomo – Tian, nomo – Wu Ce 無擇, kromnomo – Zifang. 魏文侯 La reĝo de Wei-regno surtrone 424-387 a. K.

⁴⁵² 天虛. 虛 malpleneco estas grava koncepto de taoismo kaj zen-budhismo. Estante malplena, io povas ampleksi ĉion-ajn.

⁴⁵³ 緣而葆真. La ideogramo 緣 havas riĉan signifon en azia filozofio: kaŭzeco, kialo, motivo, antaŭdestinita interrilato, sorto, k. a.

⁴⁵⁴ 溫伯雪子 Saĝulo de Chu-regno. En 呂氏春秋 estas preskaŭ sama epizodo.

reveninte, susupiris.

Lia servanto demandis lin: “Kial vi nepre susupiras ĉiufoje post la renkontiĝo kkon la gasto?”

Li diris: “Mi jam diris al vi, ke popolanoj de Centraj regnoj scias pri decreguloj kaj justo klare, sed pri la homa koro scias malvaste. Tiu, kiun mi vidis, tenas sin tiel preciza je la konduto kiel aŭ cirkelo aŭ ortilo, tiel aplomba kiel aŭ drakono aŭ tigro. Kaj li admonas min kvazaŭ filo, kaj instruas al mi kvazaŭ patro. Tial do mi susupiris.”

Zhongni vidis lin, kaj diris nenion.

Zilu demandis: “Vi, mia Majstro, de longe deziris renkontiĝi kun Wenbo Xuezi. Post la renkontiĝo vi nenion diras, kial?”

Zhongni diris: “Rilate al tiu homo, mi vidis tuj lin havanta la Tao-n. Ne eblas esprimi lin per voĉoj.”

Yan Yuan demandis Zhongni, dirante: “Mi piediras, kiam vi piediras. Mi trotas, kiam vi trotas. Mi galopas, kiam vi galopas. Sed kiam vi impetas, restigante polvon, tiuokaze mi nur mirigite postrestas.”

La Majstro diris: “Hui, kion vi volus diri?”

Yan Hui diris: “Kiam vi piediras, ankaŭ mi piediras. – tio signifas, ke mi parolas la samon, kion vi parolas. Kiam vi trotas, ankaŭ mi trotas. – tio signifas, ke mi argumentas la samon, kion vi argumentas. Kiam vi galopas, ankaŭ mi galopas. – tio signifas, ke mi parolas pri la Tao tiel same, kiel vi parolas pri la Tao. Kiam vi impetas, restigante povon, tiuokaze mi nur mirigite postrestas. – tio signifas, ke mi neniel povas kompreni kial oni kredas vin, eĉ kiam vi ne parolas; kial oni proksimiĝas unu al la alia, eĉ se vi ne organizas grupon; kial oni kolektiĝas, eĉ se vi ne havas rangon.”

Zhongni diris: “Ho, ni ne devas ne esplori bone pri tio. Nenia malĝojo estas pli granda ol morto je koro. Ĉar la morto je homa korpo estas nur sekundara. La suno eliras de oriento kaj subiras al okcidenta limo. Ĉiuj estaĵoj direktas sin laŭ tio. Kiu havas okulojn kaj piedojn, tiu, nur atendante tion, sukcesas fari ion. Se eliras, tiam ekekestas. Se subiras, tiam estingiĝas. Ĉio iras tia. Atendante, mortas; atendante, vivas. Unufoje ricevinte la formon por kreski, mi atendas la elĉerpiĝon de la formo neŝanĝebla. Se mi moviĝas laŭ rendimento de aĵoj tagnokte senĉese, tiam pri la fino estos ne sciate. Mi mem formiĝas spontane kaj scias la ordonon de la Ĉielo ne antaŭdifinebla. Tiel mi, Qiu, estas iranta ĉiutage.

Eĉ se mi kun vi kunvivas nun man-en-mane, tamen iam perdigos. Tre bedaŭrinde. Vi lernas eĉ mi nur tion, kio aperas eksteren. Ĝi estas nur tio, ke jam elĉerpiĝis. Vi serĉas ĝin same, kvazaŭ oni serĉus ĉevalon sur vaka merkato. Tute estos forgesita tio, ke mi

servadis al vi, kaj ankaŭ tio, ke vi servadis al mi. Sed vi ne bezonas ĉagreni tion. Malgraŭ ke vi forgesos la antaŭan min, ĉe mi ankoraŭ ekzistas io neforgesebla.”

Kofuceo vizitis Lao Dan. Lao Dan, baninte sin freŝa, kaj guste estas sekiganta harojn. Li, senmova, ne similas al homo. Konfuceo senĝene atendis lin. Iom poste tiu diris, vidante lin: “Mi, Qiu, apenaŭ blindiĝus aŭ vere konvinkiĝus, al mi ŝajnas, ke via korpo staris firme kvazaŭ velkinta arbo, forlasinte aĵojn kaj disiĝinte de io homeca, estis staranta unu en soleco.”

Lao Dan diris: “Mi lasis mian koron ludanta en la komenco de estaĵo.”

Konfuceo diris: “Kion signifas tio?”

Lao Dan diris: “La koro, kiom ain baraktus, ne povas scii; la buŝo, kiel ajn perforte malfermus, ne povas paroli. Sed mi provu diskuti por vi ĝuste pri tio. La pleja *yin* estas kviete pasiva, la pleja *yang* estas vigle aktiva. Io kviete pasiva devenas de la Ĉielo, kaj io vigle aktiva devenas de la tero. Tiuj ambaŭ du miksiĝas kaj la komponaĵo estiĝas, kaj naskiĝas estaĵoj. Aŭ tio estus reguligata de iu, sed ne videblas la formo de la reguliganto. Jen malaperas, jen aperas, jen pleniĝas, ken malpleniĝas. Iam mallumas, iam lumas. Tagojn kaj monatojn ŝanĝiĝas, ĉiutage estas farate senĉese. Sed ne estos vidata la rezulto. Kie estas la vivo, tie burĝonas; kie estas la morto, tie retroiras. Inter la komenco kaj la fino, kontraŭanta unu al la alia, ne troviĝas la ekstremoj kaj estas ne sciate kie estas la ultima limo. Se ne tiun *yin-yang*, kion do fari kiel la originon?”

Konfuceo demandis: “Bonvolu diri al mi, kion signifas tio, ke vi estis ludanta.”

Lao Dan diris: “Atinginto de tiu stadio akiras la plejan belecon kaj la plejan plezuron. Kiu, atinginte la plejan belecon, ekludas en la pleja plezuro, tiu estas nomata la pleja homo.”

Kofuceo diris: “Mi petas vin, ke vi montru al mi la rimedon por atingi tion.”

Lao Dan diris: “Bestoj, herbomanĝantaj, ne malŝatas ŝanĝi herbejon. Reptilioj, vivantaj en akvo, ne malŝatas ŝanĝi profundan akvon. Se okazas malgranda ŝanĝiĝo, ili ne perdas la grandan konstantecon. Ĝojo, kolero, malĝojo kaj plezuro ne penetras en ilian bruston. La mondo de la Ĉielo kaj subo estas ejo, kie tute unuiĝas ĉiuj estaĵoj. Akirinte la unu tutecon, ĉio akordiĝas en la tuta sameco. Tiam kvar membroj kaj cent pecoj de korpo fariĝas nur polvoj. Morto-vivo kaj komenco-fino fariĝas nur unu tagnokto. Jam nenio povus konfuzi iun ajn. Des malpli interveno de gajno-malgajno kaj feliĉo-malfeliĉo. Oni forĵetas sian sklavecon, samkiel forĵetas koton kaj ŝlimon, ĉar sentas sin mem nobla eĉ en sklaveco. La nobleco kuŝas en mi mem, do ĝi neniom estus perdita per ŝanĝiĝo. Ĉio transformiĝas sen komenco senfine. Ĉu tio povus sufiĉe aflikti la koron? Kiu jam praktikas la Taon, tiu komprenas tion.”

Konfuceo diris: “Majstro, via virto kovras la Ĉielon kaj la teron. Plue, vi kulturavian koron per la pleja vorto. Kiu el antikvaj nobluloj povus paroli tiel, kirl vi?”

Lao Dan diris: “Ne, ne pravas. Akvo fluas nature kun nenio farata. Ankaŭ la virto de la pleja homo, nenion mem kultivante, ne povas disiĝi de estaĵoj. Tio estas same, kiel la Ĉielo estas mem alta, la tero estas mem dika kaj la suno kaj la luno estas mem lumaj. Kion ili kulturavias?”

Konfuceo eliris kaj diris al Yan Hui: “Rilate al Tao, mi, Qiu, similas kvazaŭ al kulo en la vazo por vino. Se la Majstro ne malfermus al mi la kovrilon, mi ne povus scii la grandan tutecon de la Ĉielo kaj la tero.”

Zhuangzi vidis la dukon Ai de Lu-regno.⁴⁵⁵

La duko de Ai diris: En Lu-regno troviĝas multe da konfuceanoj, sed malmulte da viaj adeptoj.”

Zhuangzi diris: “En Lu-regno estas da konfuceanoj nur malmulte.”

La duko Ai diris: En tuta Lu-regno troviĝas kostumoj de konfuceanoj. Kial vi opinias, ke estas malmulte da ili?”

Zhuangzi diris: “Mi, Zhou, aŭdis, ke konfuceano portas kronon por scii la Ĉielan tempon, metas al si kvdratajn ŝuojn por scii la teran formon, portas ornamaĵon kun kvin koloroj ĉe la zono por rezoluta decido. Noblulo kun Tao ne ĉiam vestas sin en tia kostumo. Kiu vestas sin en tia kostumo, tiu ne ĉiam scias la Taon. Se via Moŝto ne opinius tiel, kial vi ne dekretas al la tuta regno, ke mortopunu tiun, kiu, ne scante Taon, vestas sin en la kostumo de konfuceano?”

Pasis kvin tagoj, post kiam la duko Ai dekretis tion, kaj en Lu-regno aŭdacas vesti sin en konfuceana kostumo neniu krom unu. Tiu unu viro ekaperis en la konfuceana kostumo ĉe la pordo de la duko. La duko invitis lin kaj demandis lin pri ŝtataj aferoj, multediversaj, sed li ne konfuziĝis je respondo.

Zhuangzi diris: “En Lu-regno estas trovita nur unu konfuceano. Ĉu eblus diri tion multe?”

Baili Xi ne atentis sian titolon kaj salajron gravaj en sia koro. Pro tio ke li faras bovojn grasaj, la duko Mu de Qin-regno komisiis al li administradon de la ŝtato spite lian malnobelon. You Yu ne atentis la morton kaj vivon gravaj en sia koro. Do li povis movi homojn.⁴⁵⁶

⁴⁵⁵ 哀公 surtrone 494-468 a. K. Ne povus Zhuangzi vidi la dukon Ai.

⁴⁵⁶ 百里奚 En Chu-regno li paŝtis bovojn. Poste li estis invitita al Qin-regno, dediĉis sin al fortigo de la regno. 穆公 reĝo de Qin surtrone 659-621 a. K. 有虞氏 Dinastio de la

Reĝo Yuan de Song-regno iam volis pentraĵon, do amaso da pentristoj alvenis. Ili, ricevis pentrilojn, kaj, likante pinton de peniko, ektuĉis. Duono de ili staris ekstere. Poste unu pentristo venis, aplombe kaj ne hastante. Li ricevis pentrilon, sed ne restante, revenis al ripozejo. La duko sendis homon por vidi lin. Li malvestiĝis, etendis siajn krurojn kaj estis nuda.

La reĝo diris: “Bone. Tiu estas vera pentristo.”

Reĝo Wen faris ekskurson ĉe Zang.⁴⁵⁷ Li vidis unu viron hokfiŝanta. Lia fiŝado ne estas la fiŝado. Ne havante intencon de fiŝado, li estas fiŝanta. Kaj ĉiam fiŝas.

La reĝo Wen ekvolus promocii lin kaj komisi al li regadon. Sed la reĝo timis, ke ministroj, patro, fratoj estu maltrankvilaj. Fine li malnodigis tion. Ĉar li ne povis elteni, ke la popolo ne havigus al si la Ĉielon. Tiel do li diris al grandaj oficistoj jene:

“Hieraŭ mi songis. Iu, kun nigra vizaĝo kaj barbo, estis rajdanta sur la makula ĉevalo kun vermiljona hufo, kaj ordonis, dirante: ‘Se konfidi la regadon al viro de Zang, la popolanoj espereble resaniĝos.’”

Grandoficistoj, humiliĝinte respektplene, diris: “Tiu estas la antaŭa reĝo.”⁴⁵⁸

La reĝo Wen diris: “Se tiel, divenu tion per aŭgurado.”

La grandoficistoj diris: “La antaŭa reĝo ordonis. Nenio alia. Kial bezonus diveni?”

Finfine invitis la viron el Zang, kaj komisiis al li la regadon. Li ŝanĝis nenion en la leĝa kodo, dekretis nenion deviiĝintan.

Tri jarojn poste la reĝo vidis la regnon tia, ke vicoj da oficistoj likvidis frakciojn, malorganizis klikojn, ĉefoj ne faras troan favoraĉon kaj fremdaj mezuriloj ne intervenas trans la kvar landlimoj. Tio, ke vicoj da oficistoj likvidis frakciojn kaj malorganizis klikojn, estas ja akordiĝo. Tio, ke ĉefoj ne favoraĉas, estas justa egaligo de funkcioj. Tio, ke ne intervenas trans limoj fremdaj mezuriloj, signifas, ke landestroj ne havas mallojalecon.

Tial do la reĝo Wen volus fari tiun viron Granda Majstro, fari sin mem lian subulon kun vizaĝo al nordo, kaj demandis lin, dirante: “Ĉu eblas etendigi la politikon de tia regado al la tuta mondo?”

La viro de Zang, ne respondante klare, malakceptis proponon iel kaj tiel matene, kaj vespere fuĝis for. Poste jam ne estis aŭdate pri li.

reĝo Shun 舜 estis nomata Hu.

⁴⁵⁷ 文王 La patro de Wu, kiu disbatis Yin-dinastion kaj fondis Zhou-dinastion.

Fiŝhokisto similas al Taigong Wang 太公望吕尚, sed li servis al Wen tutan vivon.

⁴⁵⁸ La patro de Wen, nomata Ji Li 季歷.

Yan Yuan demandis Zhongni, dirante: “La reĝo Wen ankoraŭ ne estas perfekta. Kial li devis manovri per songo?”

Zhongni diris: “Silentu. Vi ne devas diri tiel. La reĝo Wen faris kion li povis. Kial do oni povus akuzi lin? Li obeis honeste la nepran necesecon.”

Lie Yukou montris sian pafarkadon al Bohun Wuren.⁴⁵⁹ Li tiris sagon plenplene kun taso da akvo starigita sur kubuto, kaj ekpafis. Sagoj trafas ĝuste la celon unu post la alia kaj unu sur la alian. Dume li staris senmove kvazaŭ statuo.

Bohun Wuren diris: “Via arkpafado estas nur konscia pafado por pafi, sed ne estas pafado nekonscia. Prove, vi rampu supren al alta monto, stariĝu ĉe danĝera ŝtono sur la abismo profunda je cent *ren*,⁴⁶⁰ ĉu vi povus pafi?”

Tiel do ili supreniris al la alta monto, stariĝis ĉe la danĝera ŝtono sur la abismo profunda je cent *ren*. Bohu Wuren retiriĝis de dorse, kun piedoj atingitaj eĉ trans la randon je du trionoj de plando, kaj invitis Yukong antaŭeniri ĝis tie. Yukong kuŝigis sin surteren, ŝvitante sur la tura korpo ĝis la kalkanoj.

Tiam Bohu Wuren diris: “La pleja homo ne ŝanĝiĝas je spirito, eĉ se li irus supren ĝis la blua ĉielo, suben en la hadeson, al la ekstretoj de ĉiuj ok direktoj. Nun vi estas tremanta pro timo. Je tia koro apenaŭ trafus celon via sago.”

Jian Wu demandis Sunshu Ao,⁴⁶¹ dirante: “Vi tri fojojn fariĝis ĉefministro, sed vi ne fieras tion gloro, tri fojojn ekŝiĝis kaj ĉagreniĝis je nenio. Unue mi dubis vin. Sed nun mi vidas vin kaj vian nazon tre leĝera kaj libera. Kiel vi uzas vian koron?”

Sunshu Ao diris: “Per kio mi superas aliajn? Mi opinias venantojn nerifuzeblij, forirantojn nehaltigeblaj. Mi konsideras, ke gajni aŭ malgajni ne koncernas min mem. Do mi neniom ĉagreniĝas. Je kio mi estus pli supera ol aliaj? Mi ne scias. Kialo kuŝas en la alia, aŭ en mi mem? Se en la alia, mi mem havas nenion ĉagreni. Se en mi mem, mi ne bezonas ĉagreni la alian. Mi mem hezitas ĝuste nun kaj ĝuste nun zorgas pri ĉirkaŭo de kvar direktoj. Neniom da libertempo mi havas por scii kiu estas nobla aŭ kiu malnobla.”

Zhongni, aŭdinte tion, diris: “Koncerne de antikva vera homo, neniu intelektulo povus plezurigi lin, neniu belulino povus allogi lin, neniu ŝtelisto povus minaci lin, eĉ Fu Xi kaj la Flava Imperiestro ne povus amikiĝi kun li. Lia morto kaj vivo estas granda, kaj

⁴⁵⁹ 列禦寇 estas Liezi 列子. 伯昏無人 ne estis reale ekzistanta. La nomo jam aperis en la ĉap. 德充府. Signifo de ideogramoj estas “En mallumo forlasinta sin mem grandulo”.

⁴⁶⁰ 仞 unu *ren* egalas ĉ. 160 cm.

⁴⁶¹ 肩吾 Legenda figuro, aperis en la ĉap. 逍遙篇. 孫叔敖 servis kiel ĉefministro al la reĝo Zhuang de Cgu-regno (莊王 surtrone 613-531 a. K.).

nenio povus ŝanĝi lin mem. Des malpli titoloj kaj salajroj. Je la persono kiel li, eĉ montego ne povus malhelpi al lia spirito travagi, profunda akvofonto ne povus malsekigi lian spiriton, eĉ se ĝi plongus tien. Li ne laciĝas ie ajn en malalta mizereco, sed vivas plenplena en la Ĉielo kaj la tero. Ju pli multe li donas al la aliaj, des pli multe li mem havigas al si.”

Reĝo de Chu-regno sidis kune kun reĝo de Fan-lando.⁴⁶² Iom poste dekstra kaj maldekstra servistoj al la reĝo de Chu raportis tri fojojn, ke la Fan-lando estas pereinta.

La reĝo de Fan diris: Tio, ke la Fan pereis, ne povas igi min perdi mian ekzistadon. Se pere de Fan ne povas perdi mian ekziston, tiam eĉ la ekzisto de Chu-regno ne povas asekuri la vian ekzistadon. El tia vidpunkto eblus diri, ke Fan ankoraŭ ne ekpereis, kaj Chu ankoraŭ ne ekekestas⁴⁶³.”

⁴⁶² 楚文王、凡僖侯. Fan estas nomo de la malgranda lando, estinta en nuna Henan provinco.河南省輝縣西南.

⁴⁶³ 楚未始存 La frazon estas malfacile kompreni. Estas demandate, kio do estas reala ekzistado. En longa historio aperis kaj malaperis multe da regnoj kaj landetoj. Per kio do oni povus aserti la ekzistadon de malaperintaj? En historio Chu-regno malaperis tute same, kiel Fan. Tial do, la frazo prezentas tutan samecon de estaĵoj.

22 SCIO VAGAS NORDE

Scio⁴⁶⁴ vagas norde ĉe la Nigra akvo. Kiam supreniris profundan monteton, li hazarde renkontiĝis kun Senago-senparolo. La Scio diris al la Senago-senparolo: “Mi volus demandi vin. Kiel pensi kaj kiel konsideri por scii la Taon? Kia loko kaj kia servado kondukas al la restado en la Tao? Kia sekvado kaj kia vojo kondukas al la akiro de la Tao?”

Al tiuj tri demandoj ne respondis la Senago-senparolo, ne pro tio, ke ne estas respondo, sed pro tio, ke ĝi ne scias respondi.

La Scio ne povis demandi plue, revenis al la sudo de la Blanka akvo. Kiam supreniris sur Soleca Ripozo, li vidis Frenezo-obstinon. La Scio kun sama vorto demandis la Frenezo-obstinon. Ĉi tiu respondis: “Ho, mi scias tion. Nun mi rakontos al vi.”

Ĝi volus paroli, sed dume forgesis kion ĝi volus paroli. La Scio ne povis demandi plu, turnis sin al Imperiestra Palaco. Vidante la Flavan Imperiestron, li demandis.

La Flava Imperiestro diris: “Sen pensado, sen konsiderado, ekkoneblas la Tao. Sen loko, sen servado, ekripozebblas en la Tao. Sen sekvado, sen vojo, ekakireblas la Tao.”

La Scio demandis la Flavan Imperiestron: “Mi kun vi scias tion. Antaŭaj ambaŭ ili ne sciis. Kiu do pravas?”

La flava Imperiestro diris: “La Senago-senparolo vere pravas. La Frenezo-obstino estis proksima al la vero. Mi kun vi finfine ne estas proksimaj al la vero. Kiu scias, ne diras. Kiu diras, ne scias. Tial do sanktuloj praktikas nedireblan instruon. La Tao estas neatingebla. La virto estas neakirebla. Eblas praktiki bonvolecon. Eblas senigi juston. Decreguloj trompas unu la alian. Tiel do estas dirite: ‘Post kiam la Tao perdiĝis, estiĝas la virto. Post kiam la virto perdiĝis, estiĝas la bonvoleco. Post kiam la bonvoleco perdiĝis, estiĝas la justo. Post kiam la justo perdiĝis, estiĝas decreguloj. Do la decreguloj estas floro de la Tao, kaj samtempe la komenco de malordo.’

Tial do estas dirite: ‘Kiu faras por la Tao, tiu malmultigas sin ĉiutage. Malmultigante sin pli kaj pli, tiu atingas senagon. Nenion fari estas ja samkiel nenion ne fari.⁴⁶⁵ Sed nun por tiu, kiu jam faras aĵojn, kiel ajn tiu dezirus reveni al la radiko, tamen estas malfacile, ĉu ne? Nur por grandulo estus facile.

La vivo estas adepto de la morto. La morto estas komenco de la vivo. Kiel estas sciate pri la leĝo reganta? La vivo de homo estas kolektiĝo de *ĉjioj*. La kohero estas vivo, kaj la

⁴⁶⁴ Roluloj en tiu teksto estas simboligintaj “scion, senagon, frenezon”: 知、無為謂、狂屈

⁴⁶⁵ 無為而無不為也 Laŭ mi, la senago estas unu el agoj, do per frazo “ne estas senago” estas supozata “la absoluta senago”, je kiu allaseblas ĉio laŭ la logiko de frazo “nenion ne fari”.

disperso estas morto. Se la vivo kaj la morto estas kunuloj, je kio do mi ĉagreniĝus? Ĉar ĉio estas unu tuto. Io bela faras diecan miraklon, io malbela – fiordan putraĵon. La fiorda putraĵo transformiĝas ja en la diecan miraklon, kaj la dieca miraklo transformiĝas ja en la fiordan putraĵon. Tial do estas dirite: “Tra la mondo estas nur unu tuto de *ĉjioj*.”⁴⁶⁶ Do sanktuloj estimas la unu tutecon.”

La Scio diris al la Flava Imperiestro: “Mi faris demandon al la Senago-senparolo, sed la lasta ne respondis al mi. Ĝi ne respondis al mi pro tio, ke ĝi ne povoscias respondi al mi. Mi faris demandon al la Frenezo-obstino. Ĝi volus paroli al mi, sed ne parolis al mi. Ĝi ne parolus al mi pro tio, ke ĝi forgesis la respondon. Nun mi faris demandon al vi, kaj vi scias respondi. Kial vi estas neproksima?”

La Flava Imperiestro diris: “Ĉar la unua atingis la veron, tial ĝi ne scias. La dua proksimiĝas al la vero, do ĝi forgesis. Mi kaj vi finfine ne estas proksimaj al tio, do ni scias.”

La Frenezo-obstino aŭdis tion kaj rigardis la Flavan Imperiestron scianta paroli.

La Ĉielo kaj la tero havas la grandan belecon, sed nenion diras. La Kvar sezonoj havas la klaran regulon, sed nenion argumentas. Ĉiuj estaĵoj havas sian rezonon, sed ne eksplikas. Saĝuloj deziras baziĝi sur la beleco de la Ĉielo kaj la tero, atingi la rezonon de ĉiuj estaĵoj. Tiel do la pleja homo estas senaga, la granda saĝulo ne artefaras. Estas dirite, ke ili observas la Ĉielon kaj la teron. Nun diece klaras la pleja esenco, per kiu la estaĵoj transformiĝas tiel multediverse, kiel morto, vivo, kvadrato, rondo, ne sciate pri radikoj. Universe kaj nature ekzistas ĉio firme de antikve. La Universo⁴⁶⁷, kvankam estas granda, tamen ne disigita el la interno de Tao. Haro de aŭtunaj bestoj estas kvankam malgranda, tamen estiĝas kaj kreskas per funkcio de Tao. La mondo ne ĉesas flosadi supren kaj malsupren kaj eterne ne iĝas malnova. *Yin-yang* kaj Kvar sezonoj respektive moviĝas laŭvice en ordo. Tio, spite ke ne videblas klare kvazaŭ nenio, tamen ekzistas. Malgraŭ ke saĝnas senforma, tamen estas la spirito. Tio nutras kaj kreskigas ĉiujn estaĵojn, sed ne sciate. Tio estas nomata ‘Fonta radiko’, perceptebla je la Ĉielo.⁴⁶⁸

Nie Que demandis Pi Yi pri la Tao.⁴⁶⁹

Pi Yi diris: “Vi, ĝustigu vian formon, koncentru en unu la vidon, vi atingos ja la Ĉielan harmonion. Forlasu vian scion, unuigu vian sintenon, la spiritoj ja venos en vin. La virto

⁴⁶⁶ Tiu frazo estas origino de *Ĉjio*-monismo 氣一元論 en la ĉina filozofio.

⁴⁶⁷ 六合 La Ĉielo, la tero, kaj kvar direktoj, t. e., la Universo.

⁴⁶⁸ 本根. Fonta radiko, t. e. fonto de fontoj, radiko de radikoj.

⁴⁶⁹ 齧欠, 被衣 aperis en ĉap. 応帝王篇.

ĝuste faros vin bela. La Tao ĝuste faros vin sia loĝejo. Viaj okuloj iĝos naturaj, kvazaŭ ĉe novenaskiĝinta bovido, ne serĉos egotistan memon.”

Antaŭ ol li finintus la paroladon, Nie Que ekdormis. Pi Yi gojegis kaj foriris, kantante jenon.

“Ties formo kvazaŭ velkinta korpo. Ties koro kvazaŭ mortinta cindro. Vera estas ties reala scio. Ne havante ĉe si egotistan memon, meze kaj nebule, vivas senzorge, nenion havante en koro. Kiu do estas tiu homo?”

Shun demandis Cheng: “Ĉu eblas akiri kaj posedi la Taon?”⁴⁷⁰

Cheng diris: “Vi ne posedas eĉ vin mem, kial vi povus posedi la Taon?”

Shun diris: “Se mi ne posedas min mem, kiu do posedas min.?”

Cheng diris: “La Ĉielo kaj la tero komisiis al vi la formon. Ankaŭ la vivo ne estas via posedaĵo. Tio estas harmonio, komisiita de la Ĉielo kaj la tero al vi. Ankaŭ denaska naturo kaj sorto ne estas via posedaĵo. Tio estas submetiĝo, komisiita de la Ĉielo kaj la tero al vi. Ankaŭ nepo ne estas via posedaĵo. Tio estas elŝeliĝo, komisiita de la Ĉielo kaj la tero. Tial do estas ne sciante al homo, kien li, irante, atingos; kie li, loĝante, tenos sin; kion li, manĝante, gustumas. Nur estas forta *Yang-ĉjio*⁴⁷¹ de la Ĉielo kaj la tero. Kiel la homo mem povus posedi ion ajn?”

Konfuceo demandis Lao Dan: “Hodiaŭ ni havas abundan libertempon, do permesu al mi demandi vin pri la pleja Tao.”

Lao Dan diris: “Vi abstinu, sinlavu je koro, purigu spiriton, kaj frakasu vian scion. La Tao estas tre profunda, ke estas malfacile paroli per vortoj. Kion mi parolos al vi, tio estas nura kompendio. La brilo naskiĝas en mallumo. Io, havanta ordon, naskiĝas en senformo. Spiritoj naskiĝas en Tao. Fonto de korpo naskiĝas en kvintesenco. Ĉiuj estaĵoj naskiĝas kun forma aspekto. Estaĵoj kun naŭ truoj naskiĝas el utero, kaj estaĵoj kun ok truoj naskiĝas el ovoĵoj. Ili venas de io senpostsigna kaj iras al senlimo, survoje estas nek pordo nek ĉambro, iras ĉien al kvar direktoj. Kiu sekvas tiun vojon, tiu fariĝas forta je membraro, penetrebla je pensado, akra kaj klara je oreloj kaj okuloj, ne laciĝas spite koron zorgoplenan, konformiĝas al ĉio ajn. Tiam la Ĉielo ne devas ne alta, la tero ne devas ne vasta, la suno kaj la luno ne devas ne rondiradi, ĉiuj estaĵoj ne devas ne disfloradi. Tia estas la Tao.

Kiu estas erudicia, tiu ne nepre estas sciulo. Kiu estas elokventa, tiu ne nepre estas saĝulo. Sanktulo estas malligita de tio. Se profitis, ne pliigi profiton; se malprofitis, ne

⁴⁷⁰ 舜 nomo de reĝo, 丞 estas instruisto de Shun.

⁴⁷¹ 陽氣

pliigi malprofiton. Tia sinteno estas ĉe la sanktulo. Lia sinteno estas tiel profunda kiel maro, tiel ekstreme alta, kaj por li la fino estas ja denova komenco. Utiligi ĉion sen manko – tio estas la vojo de noblulo. Li estas ekstera. Lasi ĉiun iri helpi kiun ajn sen manko – tio estas ja la Tao.”

Homo ekzistas en Meza lando⁴⁷², nek nur ĉe *yin*, nek nur ĉe *yang*. Li loĝas inter la Ĉielo kaj la tero. Nun li fariĝis homo, sed ĝuste turnos sin al prapatro. Se observi lin el la fonto, vivanto estas estaĵo kiel kundensiĝo de *ĉji*oj. Spite ke iu estas longeviva, la alia – mallongeviva, kiom da diferenco estas je tio? Ĝojo estas nura momenta. Kial do eblus taksi reĝojn Yao kaj Jie bona aŭ malbona? Fruktoj kaj kukurboj havas rezonon de ekzistado. Rilate al la homa ordo kvankam estus komplike, tamen ili estas similaj unu al la alia je dentoj aŭ jaroj de vivdaŭro. Sanktulo ne kontraŭas al io renkontata, nek estas alligita al io trapasinta. Ke li konformas sin al harmonio, tio estas lia virto. Tio estas la Tao, ke li konformas sin al hazardo. Jen kie ekvigliĝas imperiestro, jen kie ekestiĝas reĝo.”

“La tempodaŭro de homa vivo en la mondo estas nura momento, kvazaŭ blanka ĉevalo trakuras spaceton. Abrupte-vigle ekaperas, lante-fluante malaperas. Naskiĝas transformiĝinte, kaj transformiĝinte mortas. Kompatinde estas pro tio al vivaĵoj, triste estas pro tio al homaro. Malligante sagujon, donitan de la Ĉielo, forĵetante tornistran, donitan de la Ĉielo, polvosimile leĝere estas ĝuste irona la spirito-animo. Kaj sekvas ĝin la korpo. Tio estas ja la granda reveno. Io senforma formiĝis, kaj la formo senformiĝos. Pri tio ĝenerale estas sciate al homoj. Je tia nepra estonto ne necesas klopodi. Sed popolamaso same argumentas pri tio. Kiu estas atinginta, tiu ne diskutas. Kiu diskutas, tiu ne estas atinginta. Klara vido ne indas. Estas preferinde silenti ol argumenti. La Tao estas neaŭdebla, pli bone estas ŝtopi orelojn ol aŭdi. Ĉar tio estas nomata la granda akiro⁴⁷³.”

Dongguozi demandis Zhuangzi: “Kie troviĝas t. n. la Tao?”

Zhuangzi diris: “Troviĝas ĉie ajn.”

Dongguozi diris: “Ĉu vi povus pli precize diri?”

Zhuangzi diris: “Estas ĉe talpogrilo kaj formiko.”

Dongguozi diris: Kiel malalta!”

⁴⁷² 中國 Esploristoj opinias tiun vorton nomo de lando, t. e. Centra Lando. Sed mi konsideras ĝin emfazinta “中 Mezo”.

⁴⁷³ 大得 Multaj esploristoj prenas tiun vorton kiel “Grandan Virton”大德.

Zhuangzi diris: “Ekzistas en sovaĝa panico.”

Dongguozi diris: “Pli malalta.”

Zhuangzi diris: “Ekzistas en tegolo kaj kahelo.”

Dongguozi diris: “Ju pli, des malpli alta.”

Zhuangzi diris: “Ekzistas en urino kaj fekaĵo.”

Dongguozi ne respondis.

Zhuangzi diris: “Via demando mem maltrafas la esencon. Kiam iu inspektoro demandis la intendanton de merkato pri ekzameno de porko, la lasta diris, ke ekzameni porkon je membroj ju pli malaltaj, des pli bone sciate pri la kvalito. Vi ne alteniĝu nur al nepreco. Ne preterlasu aĵojn. La Tao estas tia. Ankaŭ la grandaj vortoj estas tiaj. “Kompleteco”, “Universeco”, “Entutigo” – ĉiu el tri, kun nomoj diversaj, enhavas la saman realon, kiel unusamecon je la signifo.

Prove, ni kune ludu en la palaco de Nenio ajn. Kune diskutu pri io senlima-senfina. Kune faru nenion. Estu simpla kaj kvietaj, vasta kaj pura, harmonia kaj serena. Nia koro estas nur vanta. Nenien iradi, kaj ne sciate pri loko por atingi. Jen forirante jen alvenante, ni ne scias kie halti. Ni iradas tien kaj reen, ne sciante kie estos la fino. Vagante en konfliktplena vasteco⁴⁷⁴, ni eniros en la Grandan Scion, sed ne scias kie estos la limo. Kiu faras aĵon aĵo, tiu estas senlima infinito. Aĵo havas la limon, do ĝi estas limigita. De senlima infinito al limigitaĵo, kaj de limigitaĵo al senlima infinito.⁴⁷⁵ Tio estas nomata la procedo de “pleniĝo, malpleniĝo, atrofio, morto”. La Tao plenigas kaj malplenigas, sed Li mem ne estas plena, nek malplena. Li faras fonton ekstrema, sed Li mem ne estas fonto, nek ekstremo. Li amasigas kaj dispersas, sed Li mem ne amasiĝas, nek dispersiĝas.”

A Hegan kun Shennong kune lernis ĉe maljuna Longji. Kiam Shennong siestis ĉe kubutapogilo, A Hegan eniris al li tagmeze, malferminte pordon, kaj diris, ke Longji mortis. Shennong stariĝis de kubutapogilo, apogante sin al bastono. Sed, forĵetinte la bastonon, ekridis kaj diris: “La Ĉielo scias min tordita, obstina, maldiligenta, aroganta, do forlasis min per tio, ke lasis Longji morti. La Majstro mortis, ne dirante al mi eĉ frenezan vorton por klerigi min.”

Yan Gangdiao, aŭdinte tion, diris: “Al tiu, kiu praktikas la Taon, kolektiĝas nobluloj en la mondo. Malgraŭ ke Longji ankoraŭ sciis la Taon nur dekmilonon, tiom malpli, kiom unu haro el abunda aŭtuna hararo, Shennong rigardas lin havanta la frenezan vorton, kaj bedaŭras, ke li mortis sen transdoni ĝin. Des pli praktikanto de la Tao. La

⁴⁷⁴ 馮閱 Esploristoj prenas la ideogramon 馮 por alia signifo.

⁴⁷⁵ 不際之際、際之不際. 不際 egalas al Nenio, 際 egalas al Estaĵo.

Tao estas senforma, kiel ajn oni volus rigardi, kaj senvoĉa, kiel ajn oni volus aŭskulti. Homoj, diskutante pri ĝi, nomas ĝin mallumo-mallumo. Oni diskutas la Taon, sed la diskutata Tao ne estas la Tao mem.”

Koncernante tion, s-ro Grandpuro demandis s-ron Senlimo, dirante: “Ĉu vi scias la Taon?”

Senlimo diris: “Mi ne scias.”

Grandpuro demandis s-ron Senago. Senago diris: “Mi scias la Taon.”

Grandpuro demandis: “Ĉu estas grado, kiom vi scias?”

Senago respondis: “Mi scias Taon, ke ĝi povas esti nobla, povas esti malnobla, povas esti kondensa, povas esti dispersa. Pri tiuj gradoj estas sciate de mi.”

Grandpuro kun samaj vortoj demandis s-ron Senkomenco, dirante: “Senlimo ne scias kaj Senago scias, tiel do, kiu el ili pravas kaj kiu malpravas?”

Senkomenco diris: “Tio estas jen tiel: Ke la unua ne scias, tio signifas, ke ne scias profunde. Ke la dua scias, tio signifas, ke scias malprofunde, ne scias interne, nur scias ekstere.”

Ĉe tio Grandpuro meze suspiris, dirante: “Ne scii estas ja scii, scii estas ja ne scii. Kiel estas sciate pri tio, ke ne scii estas ja scii?”

Senkomenco diris: “La Tao estas neaŭdebla. Kio aŭdebla, ne estas la Tao. La Tao estas nevidebla. Kio videbla, ne estas la Tao. La Tao estas nedirebla. Kio direbla, ne estas la Tao. Sciu, ke tiu, kiu faras formon formita, mem ne havas formon. Taon ne eblas diri per nomo.”

Senkomenco diris: “Kiu, demandite pri la Tao, respondas, tiu ne scias Taon. Ankaŭ la demandinto de Tao ne povas aŭdi pri Tao. Pri la Tao ne eblas demandi. Eĉ se demandite, ne povas respondi al la demando. Spite ke ne eblas demandi, se demandus, tio estas senelirebla demando. Spite ke ne eblas respondi, se respondus, tio estas respondo senenhava. Senenhava respondo atendas demandon senelireblan! Tiuj homoj ne vidas ekstere la Universon, ne scias interne la Grandan Komencan. Por ili ne eblas transiri la monton Kunlun, nek eblas ludi en la Granda Vanteco⁴⁷⁶.”

S-ro Lumo demandis s-ron Neesto, dirante: “Majstro, ĉu vi ekzistas, aŭ ne ekzistas?”

Lumo, ne ricevinte respondon, estis rigardantus lian staton kaj vizaĝon. Sed estis nur vake kaj malplene. Rigardante lin tutan tagon, li vidis nenion. Li provis aŭskulti lin, sed aŭdis nenion. Li etendis manon, sed tuŝis nenion.

Lumo diris: “Kia kulmino! Kiu povus atingi tian kulminon? Mi povas distingi la

⁴⁷⁶ 太虛 Mi uzas la vorton “Vanteco” pro tio, ke en la malnova testamento, en Ekklesiasto-Predikanto estas la fama esprimo: Vanteco de vantecoj.

Eston kaj la Nenion, sed ne povas atingi la staton, ke eĉ la Nenio ne ekzistas. Kiel tiu, kiu alteniĝas je Nenio-Esto, povus atingi tian kulminon?”⁴⁷⁷

Ce iu generalo servis unu bukofaristo. Li estas okdek-jara, sed neniom perdis lertecon. La generealo diris: “Vi estas lerta. Ĉu estas iu sekreta vojo?”

Li respondis: “Mi havas ion konservi. De kiam mi estis dudek-jara, mi ŝatas forĝi bukon. Aliajn aĵojn mi ne rigardis. Escepte de buko, mi nenion esploris.”

Kiam uzas ion, li, ne uzante intence la aliajn, longdaŭre povas uzi ĝin. Des pli tiu, kiu konsideras nenion neuzebla. Kiu do el aĵoj ne helpus ion?”⁴⁷⁸

Ran Qiu demandis Zhongni: “Ĉu oni povas scii, kia estis, kiam ankoraŭ ne ekzistis la Ĉielo kaj la tero?”

Zhongni respondis: “Jes, povas. Antikve estas same, kiel nun.”

Ran Qiu sen plua demando retiriĝis. Kaj en sekva tago denove li vidis lin, kaj diris: “Hieraŭ mi demandis, ĉu eblas scii, kia estis, kiam ankoraŭ ne ekzistis la Ĉielo kaj la tero. Vi, Majstro, respondis: ‘Jes, eblas. Antikve estis same, kiel nun.’ Hieraŭ al mi ŝajnis, ke mi komprenis. Sed hodiaŭ estas al mi malklare. Mi aŭdacas demandi vin kion signifas tio?”

Zhongni diris: “Hieraŭ al vi estis klare, ĉar unue via spirito ricevis tion. Nun al vi estas malklare, ĉar iu nespírito igis vin postuli. Sen antikvo, sen nuno; sen komenco, sen fino. Ĉu iu, ne havanta gefilojn kaj nepojn, povos havigi al si posteulojn?”

Dum Ran Qiu ne respondis, Zhongni ekdiris: “Jam sufiĉe! Ne respondu. Ne eblas per vivo preni la vivon por alia ol morto, nek eblas per morto preni la morton por alia ol vivo. Morto kaj vivo ne atendas unu la alian, sed ambaŭ ili konsistas en unu tuto. Estas io antaŭ ol la Ĉielo kaj la tero estiĝas. Ĉu ĝi estus aĵo? Ne estas aĵo tiu, kiu faras aĵojn estantaj kiel aĵoj. Aĵo mem ne povas esti anticipe antaŭ ol aĵo. Se antaŭ ĉio estus la aĵo, tiuokaze la aĵo estus ne alia ol nura Nenio.

Estas ja senfine, ke sanktulo amas homojn. Ĉar la sanktulo prenas sian amon laŭ tia rezono.”⁴⁷⁹

⁴⁷⁷ Tiu rakonto temas pri filozofia-religia demando: Kio estas Nenio? Ĉu estas Nenio nur relative aŭ absolute? Tiu demando koncernas ankaŭ lingvistikon, por ekzemplo, “Ничто-Ничего” en la rusa lingvo,

⁴⁷⁸ 無不用 Laŭ litere – “Nenio ne uzebla”. Io neuzebla estas ankaŭ utila. Por forĝisto ĝi lasas lin koncentriĝi je profesio. Kaj por atinginto de Tao, eĉ se neuzebla nun, ĝi estos utila iam kaj ie. Kaj ĝuste nun samtempe io neuzebla estas utila por estigi ion uzeblan.

⁴⁷⁹ Okulfrapa estas aludo al “Amo 愛”, kiu estas la idealo de Mohistoj. En tiu teksto mi komprenas la esprimon 「有先天地生者」 kaj 「物物者非物」 idealismeca. Diversas opinioj pri tiu demando, kiu do estas antaŭulo. Iu konsideras tiun Tao (褚伯秀), la alia – Naturo

Yan Yuan demandis Zhongni: “Mi iam aŭdis de la Majstro diranta: ‘Postsekvi aŭ ne, akcepti aŭ ne?’ Mi aŭdacas demandi vin pri kiel ludi je la elekto.”

Zhongni diris: “Antikvuloj ŝanĝiĝis ekstere, sed interne ne ŝanĝiĝis. Nuntempuloj ŝanĝiĝas interne, sed ekstere ne ŝanĝiĝas. Transformiĝante kune kun aĵoj, tiu ne ŝanĝiĝas de unu tuteco. Estas ŝanĝiĝo, estas ne ŝanĝiĝo, estas ankaŭ reciproka frotado unu kun alia. Tie nepre ne estis troiĝo. Antikve estis parko de Xi Wei, ĝardeno de la Flava Imperiestro, palaco de You Hu, halo de Tang kaj Wu.⁴⁸⁰ Nobluloj, kiel mastroj de konfuceanoj kaj mohistoj, diskutadis unu kontraŭ alia pro praveco-malpraveco.⁴⁸¹ Des pli nuntempuloj.

Sanktulo loĝas ĉe aĵoj, ne difektante aĵojn. Kiu ne difektas aĵojn, tiun la aĵoj ne difektas. Nur iu nedifektiĝema povas postsekvadi kaj akceptadi homojn unu la alian reciproke. Montoj, arbaroj, marĉoj kaj kampoj lasas nin gui gaje kaj ĝojplene.

Sed, dum ankoraŭ ne finiĝas ĝojo, tuj sekvas ankaŭ malĝojo. Alvenon de malĝojo kaj ĝojo ni ne povas reguligi. Ilian foriron ni ne povas haltigi. Estas bedaŭrinde. Mondano estas nur portempa gastejo de aĵoj. Li scias renkontiĝon, sed al li ne estas sciate pri malrenkontiĝo. Li povas scii nur eblon, al li ne eblas scii pri neeblo. Al li ne eviteblas io nescigebla kaj io neebla. Zorgante eviti, tamen li ne povas eviti. Kia malĝojo tio estas! La pleja vorto estas forigo de vorto, la pleja ago estas forigo de ago. Kiel facilanime estas al li scii ĝenerale ĉion ajn.”

(自然、郭注·成疏), la tria – Nenio(無、呂), la kvara – Ŝanĝego(大易、林自), la kvina – Polusego(太極、陳景元), la sesa – Io Metafizika(形而上者、陸樹芝). Se kompreni Taon el la materialismo, Tao similas al “leĝo” de naturo, vivo, historio, universo. Sed en tiu teksto kiel la konkludo estas menciite pri Amo.

⁴⁸⁰ 豨韋氏之囿, 黃帝之圃, 有虞氏之宮, 湯武之室 Notinde, ke ĉiuj povas esti loko de akceptado kaj sendado 將迎 por “ludi 遊”..

⁴⁸¹ Tiuj frazoj en la teksto devus esti eldiroj de Konfuceo. Dum li vivis, ne okazis disputo inter konfuceanoj kaj mohistoj 儒墨. Kiel devus esti taksata tia “Taoismigita Konfuceo”? Sintezo aŭ emendo de konfuceanismo?

ĈAPITROJ DE DIVERSAĴOJ

23 GENGSAŬNG CHU

Estis iu el servistoj al Lao Dan, nomata Gengsang Chu, kiu mastris unu parteton de Tao, predikita de Lao Dan. Li ekloĝis norde en la monto Wei Lei.⁴⁸² Li forlasis siajn saĝajn subulojn-klerulojn, forigis siajn bonvolecajn intimajn virinojn kaj ekloĝis inter plumpaj kampuloj, dungante diligentan grumon. Tri jarojn poste la monta vilaĝo Wei Lei fariĝis ege riĉa kun abunda rikolto.

Popolanoj en Wei Lei kune diradis: “Ni estis konsternitaj kaj suspektemaj en la komenco, kiam s-ro Gengsang Chu alvenis unuafoje ĉi tien. Ŝajnis al ni, ke da ĉiutaga profito estus nesufiĉe, sed montriĝas, ke da ĉiujara profito fariĝis sufiĉe, kaj eĉ kun pluso. Tio estas ja certe la afero de sanktulo. Kial ni kune ne gratulos, por ke li fariĝu enpersonigita dio en la sanktejo kun altaro de tero kaj greno?”⁴⁸³

Gengsang Chu, aŭdinte tion, turnis sin al sudo kaj eksentis sin malkontenta. Unu disĉiplo suspektis tion. Gengsang Chu diris jene:

“Kial vi suspektas min? Kiam venas printempo, cent herboj naskiĝas. Ĝuste en aŭtuno maturiĝas dekmil fruktoj. La printempo kaj la aŭtuno ne povas ne fari tion, ĉar estas farata la Granda Tao. Mi aŭdis, ke la pleja homo sidas kviete en malvasta ĉambreto kaj popolanoj freneze faras kion ajn deziras, ne sciante kien iradi. Nun povraj Wei Lei-anoj ŝtele volas prokulti min, celebrante per sankta ceremonio, por apoteozi min inter saĝuloj. Ĉu mi estus gvidanto kvazaŭ la Norda Kulero?⁴⁸⁴ Se estus tia, mi kontraŭus al la vortoj de Lao Dan.”

La disĉiplo diris: “Tute ne. En ordinara fosajeto granda fiŝo ne povas turnadi sin je sia korpo, sed salamandro kaj kobitido povas naĝi libere. Sur malalta monteto grandaj bestoj nenien povas kaŝi sian korpon, sed ruzaĵoj vulpoj faras tiun lokon feliĉa. Respekti saĝulojn kaj kompensi kapablulojn, preferi bonon kaj multigi profiton, – estas meritinde ek de antikvaj Yao kaj Shun, des pli por popolanoj de Wei Lei. Vi devas aŭskulti ilin.”

Gengsang Chuo diris: “Mia karulo, venu ĉi tien! Bestego, tiel granda kiel ronĝanta ĉaron, se disiĝas de la monto, tiam ne povas eviti suferon de reto-kaptilo. Fiŝego, tiel granda kiel englutanta boaton, se elsaltas eksteren kaj perdas akvon, tiam nur fariĝas viktimo de formikoj. Jen tial birdoj kaj bestoj ne malŝatas la altan, fiŝoj kaj testudoj ne

⁴⁸² 畏壘 Iuj konsideras ĝin nomo de la monto en Lu-regno 魯 aŭ Liang-provinco 梁州.

⁴⁸³ 尸而祝之、社而稷之 Tiu teksto montras, ke ne nur mortintoj, sed ankaŭ respektindaj vivantoj estas sanktigitaj en la sanktejo 社稷. Ĉe tio oni rigardis la vivantoj mortinta 尸.

⁴⁸⁴ 杓 kulero, t. e. laŭ mia opinio, la Granda Ursino

malŝatas la profundan. Do, tiu, kiu volas travivi sian vivon plenplene per tuta korpo, kasas sin, kaj ne malŝatas ja la profundan nerimarkindan lokon.

Krome, tiuj du reĝoj, kial ili rajtus ricevi laŭdon? Koncernante ilian paroladon, ili nur traboradis truojn al muroj de popolanoj kaj lasis herbaĉojn kreskadi. Ili estas ruze artifikemaj, ke zorgadis detaleme hararanĝi aŭ kalkuladi ĉiun rizon antaŭ kuiri. Kiel ili povus savi mondon? Per promocio de saĝulojn ili alvokis reciprokan konflikton inter popolanoj. Se stimuli saĝon, tiam popolanoj ekŝtelas unuj de la aliaj. Per tiuj rimedoj ne eblas sufiĉe feliĉigi la popolon. Popolo estas tre diligenta je profito. Por sia profito filo mortigas sian patron, vasalo mortigas reĝon, oni faras ŝteladon-rabadon eĉ tagmeze, enpenetras tra muron dum tage. Mi diras al vi pri la origino de granda malordo. Tio naskiĝis certe ĉe la reĝoj Yao kaj Shun, kaj daŭros ĝis la fino de postaj mil generacioj. Kaj post mil generacioj, homoj nepre manĝos homojn unui la aliajn reciproke.”

Nanrong Zhu, perpeksigite, sidiĝis rektpoze kaj diris: “Mi, jam maljuna, vivas multajn jarojn, kiel do mi devas ekzerci min por vivi laŭ viaj vortoj?”

Gengsang Chu diris: “Vi tenu vian korpon plena je formo kaj konservu plene vian vivon. Ne okupu vin per trudpensoj tro zorgeme. Se tiel vivi tri jarojn, vi atingos la mensostataton, diritan de mi.”

Nanrong Zhu diris: “Okuloj apartenas al la korpo. Mi ne povas distingi diferencon inter ili. Blindulo mem ne povas vidi. Ankaŭ oreloj estas partoj de la korpo. Mi ne povas distingi deferencon inter ili. Surdulo mem ne povas aŭdi. La koro apartenas al la korpo. Mi ne povas distingi la diferencon inter ili. Frenezulo mem ne povas kompreni. Partoj de korpo apartenas al korpo, sed partoj malsamas unu al la alia. Kio apartigas unu de la alia, ĉu materioj? Ili deziras unu al la alia akordiĝi, sed ne povas sukcesi reciproke. Nun vi diris al mi: ‘Vi tenu vian korpon plena je formo kaj konservu plene vian vivon. Ne okupu vin per trudpensoj tro zorgeme.’ Mi *zorgeme aŭdis* vin parolanta pri Tao, kaj via parolo atingis miajn *orelojn*.”

Gengsang Chu diris: “Miaj vortoj elĉerpiĝis. Estas dirite: ‘Vespo ne povas transformiĝi en raŭpon, koko de Yue-lando ne povas elkovi ovon de cigno, sed koko en Lu-regno povas elkovi ĝin.’ Koko apartenas al kokaro. La virto⁴⁸⁵ ne malsamas inter ili. Nur estas diferenco je grandeco inter kapablulo kaj nekapablulo, tiu – granda, ĉi tiu malgranda. Nun mia kapableo estas malgranda, ke ne sufiĉas ŝanĝi vin. Kial ne vi ekiros suden vidi Laozi?”

Nanrong Zhu pakis provianton, iris sep tagojn kaj sep noktojn, kaj atingis la loĝejon de Laozi.

⁴⁸⁵ 德 Laŭ litere - “virto”. Sed ĉi tie signifo estas “natura kvalito”.

Laozi diris: “Vi venis de Gengsang Chu, ĉu ne?”

Nanrong Zhu diris: “Jes.”

Laozi diris: “Kial do vi alvenis ĉi tien kun amaso da homoj?”

Nanrong Zhu, konsternite, turnis sin malantaŭen.

Laozi diris: “Vi ne scias, kion signifas mia eldiro.”

Nanrong Zhu mallevis la kapon, kaj, levinte ĝin, diris triste: “Mi nun foregegis kiel respondi.”

Laozi diris: “Kion vi signifas?”

Nanrong Zhu diris: “Se mi ne scias, tiukaze oni opinias min stulta. Se mi scias, tiam mi mem, reflektante, suferas pro spleno je mia kapo. Se mi ne havas bonvolecon, mi vundas aliajn. Se mi havas bonvolecon, mi, reflektante, suferas pro spleno je mia koro. Se mi estas maljusta, mi difektas ĝin. Se mi estas justa, mi, reflektante, suferas pro spleno je mia memo. Kien al mi estus pli bone fuĝi de tia stato? Tiuj tri problemoj afliktas min. Dank’ al la Majstro Chu, mi turnas min al vi kun demando.”

Laozi diris: “Vidante vian glabelon, mi komprenis vin. Aŭdinte nun vian konfeson, mi konvinkiĝis je tio. Vi estas nur stereotipa.⁴⁸⁶ Kiam perdiĝis gepatroj, vi serĉas ilin en maro kun stango per mano. Vi mem perdis vin stupore. Spite ke vi dezirus reveni al via reala sento, al via denaska naturo, neniel eblas. Kiel kompatinde!”

Nanrong Zhu petis, ke li eniru en la pensionon, Tie dum dek tagoj li ekzercadis streĉi sin, por ke li havigu al si la bonon kaj forigu de si la malbonon. Li renkontis denove Laozi.

Laozi diris: “Ke vi purigadis vin multe, tio videblas plene. Sed el vi ankoraŭ tralikiĝas io malbona. Via ekstero estas tro multe ĉirkaŭligita, ke ne eblas forigi ĝin. Do vi gardas internon, barinte la eksteran. Tiu, al kiu estas ĉirkaŭligita la interno, ne povas forigi ĝin. Do tiu gardas eksteron, barinte la internan, Al kiu estas ĉirkaŭligitaj ambaŭ ekstero kaj interno, tiu ne povas teni la Taon, nek la virton. Des pli ne eblas konduti laŭ la Tao.”

Nanrong Zhu diris: “Por ekzemplo, iu vilaĝano malsaniĝis. Oni demandas kiun malsanon li havas. Li povas respondi pri la malsano. Tiukaze, malgraŭ la malsano, li ankoraŭ ne tute estas malsana. Kiam mi demandas pri la Tao, mi estas simila al tio, ke grandigas la masanon, prenate medikamenton. Mi volus aŭdi rimedon kiel teni la korpon sana.”

Laozi diris: “La metodo de sanigo estas enhavi unu tutecon. Ne perdu tion. Ne apogu sin sur aŭgurado kaj diveno de bonsorto aŭ malbonsorto. Sciu kie halti. Sciu kie fini. Sciu forlasi aferon de aliuloj, kaj serĉu aferon ĉe si mem. Sciu esti leĝera, sciu esti vaka.

⁴⁸⁶ 規規然 Laŭ Mozi, konfuceanoj serĉis mortintajn gepatrojn ĉie ajn, por montri sian filan pietaton.

Sciu esti kvazaŭ bebo. Bebo, tutan tagon kriante, ne raŭkiĝas. Ĉar akordiĝas tute harmonie. Bebo, tutan tagon premante manon, ne suferas kramfon. Ĉar laŭ la natura virto. Tutan tagon fikse rigardante, ĝi ne palpebrumas. Ĉar ĝi tute estas malligita al la ekstero. Bebo ne scias kien iri, ne scias kion fari. Ĝi estas libera kun aĵoj. Harmonias kun ondoj. Jen tio estas la rimedo de saniĝo.”

Nanrong Zhu diris: “Nu, tia estas ja la virto de la Pleja homo? “

Laozi diris: “Ne. Tio estas t. n., nur degelo de glacio, liberiĝo. La pleja homo kune manĝas kun la tero, kune ĝojas kun la Ĉielo. Li ne implikiĝas en konflikton kun homoj pro profito kaj malprofito. Li kun ili ne faras suspektindaĵon, nek intrigon nek aferon. Li iras leĝere kaj venas kun vaka koro. Tio estas nomata la rimedo de saniĝo.”

Nanrong Zhu diris: “Ĉu tio estas la plej alta?”

Laozi diris: “Ankoraŭ ne. Mi admonas vin: ‘Povosciu esti kvazaŭ bebo.’ La bebo moviĝas, ne sciante kion fari, kaj iras, ne sciante kien. Ĝia korpo similas kvazaŭ al branĉo de velkinta arbo, kaj ĝia koro kvazaŭ al mortinta cindro. Se estus tia, ne atakus vin kiu ajn malfeliĉo, nek venus al vi kia ajn feliĉo. Se estus nek feliĉo nek malfeliĉo, kial povus estiĝi iu ajn homa sufero?”

Kiu estas stabila kun grandspaca trankvileco, tiu radias la Ĉielan lumon. Kiu radias la Ĉielan lumon, tiu vidas homon kiel la homon mem [kaj vidas aĵon kiel la aĵon mem]. Kiu elkulturas sin mem, tiu havigis al si konstantecon en nuno. Homoj forĵetas la havanton de konstanteco, sed la Ĉielo helpas lin. Kiu estas forĵetita de homoj, tiu estas nomata ‘Ĉiela popolano’.⁴⁸⁷ Kiu estas helpata de la Ĉielo, tiu estas nomata ‘Ĉiela Filo’.

Lernado estas lerni la nelerneblan. Praktikado estas praktiki la nepraktikeblan. Diskutado estas diskuti la nediskuteblan. Konado haltas nur tie, kie jam ne eblas scii pli. Tio estas ja atingo de la Plejo. Se iu ne sekvas tion, lin detruas la Ĉiela Ekvilibriganto.⁴⁸⁸

Se iu estas atakata de dekmil malbonoj, malgraŭ ke li preparis aĵojn por konservi korpon, sen timo tenas la koron vivanta kaj prudente kun respekto de Mezo atingas celon, tiam ĉion ĉi-tion destinis ja la Ĉielo, sed ne homoj. Tia malbonsorto ne povas renversi lin, ne povas eniri internen en la spiritan bazon, dum li firme tenas sian

⁴⁸⁷ 人舍之. La ideogramo 舍 havas du signifojn: “loĝejo” kaj “forĵeti”. Tradukisto, prenanta la unuan signifon komprenas tute alie ol mi, tradukante: “Al havanto de konstanteco kolektiĝas homoj...” Mi konsentas kun Fukunaga kaj 褚伯秀.

⁴⁸⁸ 學者——天鈞敗之. Inter esploristoj diversas kompreno de la teksto. Iuj prenas ĝin por la kritiko de troa lernado. Sed mi komprenas la signifon, ke kvankam lerni perfekte la Taon ne eblas, tamen oni ne devas ne ellerni ĝin ĝis la limo de ebleco. Tia kompreno, eble, kontraŭus al ordinara opinio pri Senago 無為, sed laŭ mi povas riĉigi ĝian ideon.

spiritan bazon⁴⁸⁹. Kiu ne scias ĝin ekzistanta, tiu ne povas teni ĝin firme. Kiu, ne vidante tion menciitan vera, ekiras mem, ties ĉiu ekiro maltrafas. Se la destinitaĉo invadas kaj ne forĵetebblas, ĉiu misfaradas ĉiufoje pli kaj pli.⁴⁹⁰

Kiu faras malbonon en klara lumo, tiun homoj akuzas. Kiu faras malbonon en mallumo, tiun akuzas la Spiritoj. Kiu estas senkaŝe justeca kaj antaŭ homoj kaj antaŭ la Spiritoj, tiu per tio povos iri sola sendepende. Kiu promesas internen al si mem, tiu praktikas sen nomo. Kiu apogas sin al ekstero, tiu strebas al konsumado, t. e., komercisto. Kvankam homoj rigardas lin staranta sur piedopintoj, tamen li mem fieras je antaŭiro. Kiu ĉasas aĵojn ĝis fine, tiun penetras la aĵoj. Kiu rigardas aĵojn efemera, tiun la aĵoj ne povas engluti. Kial ili povus engluti la homon? Tiu, kiun ne englutas aĵoj, ne intimas al ili. Kiu ne intimas al ili, tiu perfektigas la homecon.⁴⁹¹ El armiloj neniu estas pli akra ol la strebo. Eĉ la fama glavo 'Moye' ne superas ĝin.

Estas nenio pli granda ol *ying-yang*. Nenien oni povas fuĝi de ili inter la Ĉielo kaj la tero. Vundas homon ne *ying-yang*, sed la koro igas la homon vundi.

La Tao trairas kiel la dividitaĵoj. Do ĝia efekviĝo estas detruo. La dividitaĵo estas malamata, ĉar la dividitaĵo mem estus rigardata kiel kompleta per si mem. Tial do tia kompleteco estas malamata. Ĝi havas sian kompletecon, do foje eliris, tiam ne povas jam reiri. Tiel do restas nur vidi la fantomon, t. e., foje eliris, tiam ricevas t. n. morton. Kiam estingiĝas, estas reale nur unu – fantomiĝi. Iu havanta formon stabiliĝas pere de la nehavanta formon. Tio eliras, sed sen fonto, eniras, sed sen aperturo. Estas realo, sed sen loĝejo. Estas daŭreco, sed ne estas komenco nek fino. Kio eliras sen fonto, eniras sen aperturo, tio estas realo. Kio estas la realo, sed sen loĝejo, tio estas senlimaj dimensioj de spaco. Kio havas daŭrecon, sed sen komenco kaj fino, tio estas universo sen tempa limo. Kiu ekzistas je la vivo, ekzistas je la morto, ekzistas je la eliro, ekzistas je la eniro, tamen ĉe el- kaj en-irado ne videblas la formo, tiu estas t. n. la Ĉiela Pordo. La Ĉiela Pordo estas Nenio. Ĉiuj estaĵoj eliras el la Nenio. Io estatnta ne povas fari estaĵon ekestanta, sed nepre eliras de Nenio. La Nenio estas unu tuto de Nenio kaj Io Estanta. Jen kie sanktulo kaŝas sin.

Ankaŭ antikvuloj atingis la saĝon. Kiun ili atingis? Iu konsideris, ke aĵoj de komence ne ekzistis. Li jam atingis kaj per tio elĉerpiĝis. Estis nenion aldoni. La sekva konsideris aĵojn ekzistanta kaj rigardis la vivon perdo, la morton reveno. Tiel li dividis la estaĵojn. La tria diris, ke en la komenco estis Nenio. Poste estiĝas la vivo, kaj la vivo iras baldaŭ

⁴⁸⁹ 靈臺 Iu konsideras ĝin “koro 心”, alia – “konsicio de sia memo”自我意識

⁴⁹⁰ 業 Poste koncepto “karma” de budhismo estos tradukita per tiu ideogramo.

⁴⁹¹ Ekde 與物窮者 ĝis 盡人, mia traduko estas tute malsama al aliaj renomaj esploristoj. Ĉar mi ne povas konsenti kun ili je kompreno de signifoj 窮、且、盡. Laŭ mia traduko, la signifo de teksto estas, ke homon regas la aĵo, kiun li posedas.

al morto. La kapo estas Nenio, la korpo estas la vivo, kaj la postaĵo estas la morto. Li scias unu tutecon de Nenio kaj Io estanta, de morto kaj vivo. Mi faris lin mia amiko.

Tiuj tri menciitaj, kvankam diferencas, sed apartenas la reĝa klano. Tio estas same kiel en Chu-regno, Zhao kaj Jing laŭ heredo, Jia laŭ feŭdo fariĝis reĝoj. Ili ne estas identaj unu kun la alia.

La vivo estiĝas en nigra fulgo de kaldrono. Malkovri estas nomata la transmovado de praveco. Mi provu paroli pri la transmovado de praveco, malgraŭ ke tio estas nedirebla per vortoj, ĉar ne konebla per intelekto. Se diri parabole, ĉe vintra festo de bova oferaĵo, ĝia visceroj kaj hufoj kaj devas esti apartigitaj kaj ne devas esti apartigitaj. Kiu vizitas ĉambrojn de lito kaj de altaro, tiu eniras ankaŭ la necesejon. Tia estas ekzemploj por la transmovado de praveco.

Prove mi parolu pri via transmovado de praveco. Vi faras la vivon baza, faras saĝon instruisto, kaj tiel per tio kalkulas pravcon kaj malpravcon. Rezulte estiĝas apartiĝo de nomo kaj realo. Tiel do vi faras vin mem alta je kvalito. La aliajn homojn vi rigardas partoj de vi mem. Tiel do kompanse al partoj estas morto. Tia persono rigardas iun utilan saĝa, iun malutilan stulta, elstarecon renoma, mizeron hontinda. Jen kia esta la transmovado de praveco ĉe nuntempuloj. Li estas tute sama, kiel tiuj cikado kaj kolombo.

Se surtretis alies piedon surstrate, oni pardonpetas ĝentile. Se piedon de sia frato, oni krietas 'Ho!'. Se piedon de unu el getatroj, oni nenion diras. Do estas dirite: 'La pleja deeregulo ne dependas de homoj, la pleja justo ne distingas aĵojn, la pleja saĝo ne intrigas, la pleja bonvoleco ne havas apartan korinklinon al gepatroj, la pleja fido rezignas pri oro'.

Demeti bolegon de strebado, solvi eraron de koro, forigi laciĝon de virto, elimini ŝtopiĝon de la Tao. Altrango, riĉo, eminenteco, prestiĝo, renomo, profito – tiuj ses estas bolego de strebado. Aspekto, ago, ampasio, rezonado, emo, volo – tiuj ses estas eraro de koro. Malamo, deziro, ĝojo, kolero, malĝojo, plezuro – tiuj ses estas laciĝo de virto. Rezigno, alliĝo, preno, dono, scio, kapablo – tiuj ses estas ŝtopiĝo de la Tao. Kiam tiuj kvar sesopo ĉesos ekscitiĝi en la brusto, oni rektiĝos. Se rekta, estos kvietaj. Se kvietaj, estos luma. Se luma, estos vanta. Se vanta, estos senaga kaj estos sen senaga.

La Tao estas idolo de virto. La vivo estas lumo de virto. Denaska naturo estas kvalito de la vivo. Movado de la denaska naturo estas nomata 'ago'. Mis-ago estas nomata 'perdo'. Sciado estas aliro. Sciado estas serĉado. Kio ankoraŭ ne estas sciata, tion oni ŝtelrigardas. Necesigita ago – tio estas nomata la agado laŭ virto. Ago, en kiu estas nenio alia ol memo, estas nomata 'regado'. Ambaŭ agoj ŝajnas unu kontraŭ la alia laŭ la nomo, sed akordiĝas reale unu kun la alia laŭ rezulto.

Arkpafisto Yi estis lerte trafis eĉ tre malgrandan celon, sed estis mallerta por preventi la aliulojn de laŭdi lin. Sanktulo estas lerta je rilato al la Ĉielo, sed mallerta je rilato al homoj. Ke estas lerta je la Ĉielo kaj bona je homoj, tio eblas nur al tutplena homo. Insekto povas rilati bone al insekto, kaj samtempe povas rilati bone al la Ĉielo. Sed eĉ tutplena homo iam malamas la Ĉielon kaj la naturon de malbonulo.⁴⁹² Des pli mi la Ĉielon kaj homojn.

Kiam unu pasero flugas al Yi, se Yi nepre paffaligus ĝin, tiuokaze li nur fierus je sia potenco. Se por la mondo pli bone estas fari kaĝon, el kiu la pasero povas fuĝi nenien. Tial do, Tang igis kuiriston Yi Yin eniri en sian kaĝon, la duko Mu de Qin-regno enigis Baili Xi en la kaĝon per felo el kvin ŝafoj. Tiel, neniu povas akiri en kaĝo iun kapablan krom per lia ŝatata aĵo.

Kiu ricevis punon detranĉita je unu kruro, tiu ne sentas malhonoron sen ornamo de vesto. Punlaborulo ne timas grimpi la altan krutaĵon, ĉar li jam forlasis la vivon kaj la morton. Kiu havas jam nenion hontindan, tiu forgesas homon. Forgesinte mem homon, li fariĝis la Ĉiela homo. Li, eĉ respektate, ne ĝojas; malrespektate, ne koleras. Ĉar li akordiĝis kun la Ĉiela harmonio, li fariĝis tia. Malgraŭ ke li ekkolerus, li reale ne koleras, ĉar la kolero devenas de nekolerero. Aperas senaga farado, ĉar la ago devenas de senago. Se vi dezirus kvieton, lasu *ĉjion* ebena; se vi dezirus diecon, lasu vian koron obeema. Oni deziras, ke sia farata ago trafu ĝuste, Se tiel, agu necesigite per nepreco.⁴⁹³ La necesigiteco estas la Tao de sanktuloj.

⁴⁹² 全人惡天、惡人之天 Ĉielo ĉi tie signifas 'naturon'. Ĉiuj esploristoj prenas la vorton 全人 por 'perfekta' homo. Sed por tiu signifo estas jam 至人 la pleja homo. Iuj esploristoj prenas ĉi tiun propozicion por demando, kontraŭvera. Laŭ mia konjekto, eĉ 全人 ne ĉiam estas kontenta je la Ĉiela ordono kaj je la naturo de homoj, kiel la lasta krio de Jesuo.

⁴⁹³ 則緣於不得已. La vorto 緣 estas nepreco, necesigita per interrilato.

24 XU WUGUI

Ermito Xu Wugui pere de Nü Shang ricevis aŭdiencon ĉe markizo Wu de Wei-regno⁴⁹⁴. La markizo Wu esprimis konsolon al li, dirante: “Vi malsaniĝis pro peniga vivo en monto kaj arbaro. Do vi finfine konsentis renkontiĝi kun mi.”

Xu Wugui diris: “Estas mi, kiu konsolas vin, via Moŝto. Pro kio do vi konsolas min? Vi plenigas ja laŭvole vian arbitran deziron, estante preferema je ŝato-malŝato. Do vi havigis malsanon al via sento de denaska naturo. Sed, se vi forigus la arbitran deziron kaj preferemon je ŝato-malŝato, tiuokaze vi malsaniĝos je la oreloj kaj okuloj. Ĝuste mi volas konsoli vin, kial do vi volus konsoli min?”

La markizo Wu konsternite ne respondis.

Iom poste Xu Wugui diris: “Interalie, mi rakontos al vi kiel mi taksas hundojn. La hundo de malalta kvalito senĉese satmanĝadas. Tia estas la virto de linko. La hundo de meza kvalito ŝajnas vidanta la sunon. La hundo de alta kvalito ŝajnas perdinta la unu-tutecon.

Mia taksado de hundoj estas malpli bona ol mia taksado de ĉevaloj. Laŭ mia taksado, iu ĉevalo kuras rekte kvazaŭ laŭ tuĉsnuro, turnas rekte kvazaŭ laŭ L-formo kaj kvazaŭ kvadrato, kaj rondiras kvazaŭ laŭ cirkelo. Tia estas la ĉevalo, plej bona en la regno. Sed ĝi ne povas esti pli bona ol la ĉevalo, la plej bona en la mondo. La mondskala ĉevalo kun kompleta denaska kapablo ŝajnas vanta, foranima, kvazaŭ perdinta la unu-tutecon. Tia ĉevalo superas ĉion, forkuras kaŝite de polvoj, do ne estas sciate kie ĝi vivas.”

La markizo Wu ĝojegis, ridante.

Xu Wugui eliris de renkontiĝo. Nü Shang diris: “Majstro, kion do vi parolis al nia reĝo? Tio, kio estis parolata de mi al la reĝo, estis iam pri Poezio, Decreguloj kaj Muziko, iam pri Bronza Tabulo, Ses Sagujoj⁴⁹⁵, kaj pri Servoj al Aferoj kaj pri Merituloj, nekalkuleblaj. Sed mi ankoraŭ ne vidis nian reĝon elmontranta dentojn. Nun, Majstro, kion vi parolis al nia reĝo por igis lin tiom ĝojegi?”

Xu Wugui diris: “Mi nur rakontis al li pri mia maniero taksi hundojn kaj ĉevalojn.”

Nü Shang diris: “Ho tiel.”

Xu Wugui diris: “Ĉu vi ne aŭdis pri iu ekzilinto al Yue-regno? Kelkajn tagojn poste, forlasinte sian landon, li ekĝojis vidi sian konaton. Dek tagojn kaj monatojn poste li ekĝojis vidi homon, iam vidintan samlandanojn. Jaron poste li ekĝojis vidi homon,

⁴⁹⁴徐無鬼 esmito de Wei-regno, loĝanto en la monto 緡山. 女商 favorata vasalo de Wu. 魏武侯 surtrone 396-371 a. K.

⁴⁹⁵ 金板、六韜 Iuj esploristoj konjektas, ke ili estas nomoj de ĉapitroj en iu libro de Zhou-dinastio, la aliaj – titoloj de milit-teknikaj libroj.

similan al samlandano. Ju pli longe for de siaj homoj, des pli profunde sopiras pri ili. Kiu fuĝas for en dezertan vakon, plenan de herboj kiel kenopodio aŭ sambuko kaj plenan de bestoj kiel musteloj aŭ flugsciuloj, tiu en la vaka dezerto ege ekĝojas je homa sono, aŭdante iun ajn homon piediranta. Des pli ĝojas je proksimaj voĉoj, eĉ tusoj, de fratoj kaj parencoj. Eble, de longe ne estis aŭdata de nia reĝo la voĉo de vera homo aŭ la tuso de proksimuloj.”

Xu Gui ricevis aŭdiencon ĉe la markizo Wu.

La markizo Wu diris: “Majstro, vi, loĝante en monta arbaro, manĝas nur glanon kaj kaŝtanon kaj satmanĝas poreon kaj ajlon. De longe vi ne vizitis min kiel gasto. Ĉu vi nun maljuniĝis? Aŭ vi ekdezirus gustumi vinon kaj viandon? Aŭ vi adorvizitas por mi kun beno al la altaro de dioj de tero kaj grenoj?”

Xu Wugui diris: “Mi naskiĝis malriĉa kaj mizera, do ne aŭdacas trinki kaj manĝi la reĝan vinon kaj viandon. Ĝuste mi alvenis por konsoli vin.”

La reĝo diris: “Por kio? Kiel vi konsolas min?”

Xu Gui diris: “Mi konsolas vin je via spirito kaj korpo.”

La markizo Wu diris: “Kion do signifas tio?”

Xu Gui diris: “La Ĉielo kaj la tero egale nutras homojn en unu tuto. Ne plimulte al altranguloj, nek malplimulte al malaltuloj. Vi fariĝis la ĉefo en la regno kun dekmil militĉaroj kaj donas al la popolo en la regno suferon. Per tio vi nutras vin je oreloj, okuloj, nazo kaj buŝo. Via spirito ne permesas al vi tion, ĉar la spirito amas la pacon kaj malamas diboĉon. La diboĉado estas malsano. Do mi devas konsoli tion. Kiel do vi malsaniĝis?”

La markizo Wu diris: “De longe mi volus vidi vin, Majstro. Mi dezirus ami la popolon, fari juston kaj forlasi armilojn. Ĉu eblas?”

Xu Wugui diris: “Ne, ne eblas. Ami la popolon estas komenco damaĝi la popolon. Forlasi armilojn por justo estas la fonto de ekspansio de armado. Eĉ se vi mem ekfarus tion, estus apenaŭ plenumeble. Ĝenerale, fari belon estas malbone kiel rimedo. Kvankam vi intencus efektiviĝi bonvolecon kaj juston, tamen apenaŭ ne falsus la aferon. Kreante formon laŭ forme, oni nepre ekarogantas, kaj nepre ŝanĝiĝos al la direkto de luktado kontraŭ ekstero. Via Moŝto, ne lasu preni militan formacion ‘Vico de Gruoj’ sub via observa turo, nek lasi soldatojn kaj ĉevalojn marŝi antaŭ la palaco de altaro Zitan. Ne havigu al vi ion kontraŭan al la virto, ne provu superi aliajn per lerteco, nek per intrigo, nek per milito. Se mortigi soldatojn kaj popolanojn, se aneksi alies landojn, se per tio nutri nin kaj niajn diojn, tiam ne estas sciate, kiu en la milito estus pli bona, kie estus la venko? Se vi volus fari ion ajn en nepra neceso, kulturu sincerecon en via brusto.

Per tio vi respondu al la sento de la Ĉielo kaj la tero, kaj ne konfuziĝu. Tiam la popolo estos liberigita el la morto. Kial do via Moŝto devus pripensi forĵeti armilojn?"

La Flava Imperiestro volus viziti la Grandan Glebon en la monto Juci.⁴⁹⁶ Akompanis lin Fang Ming kiel kondukisto de kaleŝo, Chang Yu dekstre de li, Zhang Ruo kaj Xi Peng kiel rajdantoj de antaŭaj ĉevaloj, Kun Hun kaj Gu Ji kiel postsekvantoj de kaleŝo. La grupo atingis la kampon de Xiangcheng. Tie sep sanktuloj perdis vojon. Estas neniu por demandi. Hazarde venis iu knabo, paŝtanta ĉevalojn. Demandis lin pri la vojo, ĉu li konas la monton Juci.

Li diris: "Jes."

"Ĉu vi scias, kie loĝas s-ro Granda Glebo?"

Li diris: "Jes."

La Flava Imperiestro diris: "Kia mirinda knabo! Li konas ne nur la monton Juci, sed ankaŭ loĝejon de s-ro Granda Glebo. Ĉu mi povus demandi vin kiel regi la mondon?"

La knabo diris: "Reganto de la mondo estas jen tia, kia nun estas farata de mi. Kio alia la afero? Mi, juna, ludas ene de la Spaco kun ses limoj⁴⁹⁷. Kiam mi malsaniĝis je okuloj, iu grandulo instruis al mi, ke mi rajdu la sunan ĉaron kaj ludu en la kampo de Xiangcheng. Nun mi iomete resaniĝas. Do mi denove volus ludvagadi trans la ses limojn de la Spaco. Regi la mondon estas tiel same, kiel tio. Kion alian mi farus la aferon?"

La Flava Imperiestro diris: "Kvankam regi la mondon estas certe ne via afero, tamen mi deziras demandi vin pri la mondo."

La malgranda knabo rezignis. Sed la Flava Imperiestro denove demandis.

La knabeto diris: "Kia diferenco troviĝas inter la regado de la mondo kaj paŝtado de ĉevaloj? Nur forigi tion, kio damaĝas la ĉevalojn."

La Flava Imperiestro reverencadis kaj retiriĝis, nomante la knabon la Ĉiela instruisto.

Intelektulo ne ĝojas sen modulado de pensoj. Retoro ne ĝojas sen okazo de parolado. Policisto ne ĝojas sen esplordemandado. Ĉiuj estas kaptataj per aĵoj. Monda elstarulo fervoras en la kortego. Servanto al popolo promociiĝas en ofico. Fortulo fieras ĉe malfacilo. Bravulo ekscitiĝas ĉe konflikto. Soldato ĝojas je milito. Ermito alteniĝas je la famo. Juristo administras vaste. Specialisto de deĉreguloj kaj muziko prudentas je formalajoj. Persono de bonvoleco kaj justo estimas limojn de konduto. Kampuloj ne

⁴⁹⁶ 大隗 Nomo de dio, jam menciita en la ĉap. 大宗師. 具茨山 siutas en Henan, la alia nomo 泰隗山. 襄城 estas en Henan provinco 河南.

⁴⁹⁷ 六合

interesiĝas pri alio ol kulturado. Komercistoj ne interesiĝas pri alio ol aferoj de merkato. Simpluloj diligentas, se estas aferoj matene kaj vespere. Metiistoj laboras energie kaj lerte kun aparatoj kaj instrumentoj. Avaruloj malĝojas, se ne amasiĝas mono kaj posedaĵo. Fieruloj tristas, se sia potenco ne superas. Spekulantoj ĝojas je ŝanĝiĝo. Kiu estas rigardata utila konforme al tempo, tiu ne povas teni sin senaga. Ĉiuj konforme al sia jaraĝo ne povis ŝanĝi aĵojn, sed lasis sian korpon kaj naturon merĝi en ĉiuj aĵoj. Kaj tiel ili ne povas reveni al sia naturo ĝis la fino de vivo. Kia tragedio!

Zhuangzi diris: “Se tiun, kiu, arkpafinte senpripense, trafis celon, oni nomus bona pafarkisto, tiam ĉiuj en la mondo estas Yi. Ĉu eblas tiel nomi?”

Huizi diris: “Jes, eblas.”

Zhuangzi diris: “En la mondo ne troviĝas iu publike akceptata vero, kaj ĉiu konsideras la sian vero. Se tiel, ĉiuj en la mondo povas fariĝi Yao. Ĉu eblas nomi tiel?”

Huizi diris: “Jes, eblas.”

Zhuangzi diris: “Tiel do, ekzistas kvar skoloj – Konfuceanoj, Mohistoj, Yangzhu-istoj, Bing-istoj⁴⁹⁸ –, aldone estas via skolo, do troviĝas nun kvin skoloj. Kiu el ili pravas? Aŭ, eble, tio memorigas min pri epizodo de Lu Ju.

Lia disĉiplo diris: ‘Mi kaptis vian Vojon. En vintro al ni eblas kuiri sen kaldrono kaj en somero fari glacian.’”

Lu Ju diris: “Tio estas ja samkiel inviti *yang* per *yang*, *ying* per *ying*. Tio ne estas mia, t. n. Vojo. Mi montros al vi mian Vojon.” Dirinte tiel, li pretigis du kotoojn agorditaj. Li starigis unu en la halo, la alian en la ĉambro. Plukis noton *gong* sur unu kotoo, ekmoviĝis la sama noto *gong* sur la alia. Plukis noton *jue* sur unu, ekmoviĝis la sama noto *jue* sur la alia. Ĉar tonalto de noto estas sama. Sekve, li reagordis unu kordon diference de aliaj kvin notoj. Se li plukis la unu kordon, tiam ĉiuj 25 kordoj kune ekresonis. La kordoj ne malsamas de komence. Estas plukita la reĝa sono de gamo. Jen tiel.⁴⁹⁹

Huizi diris: “Nun troviĝas skoloj de Konfuceanoj, Mohistoj, Yangzhu-istoj kaj Bing-istoj, kiuj disputas kun mi per dialektiko, kritikis reciproke unu la alian per vortoj, kaj atakas reciproke per voĉoj. Sed ili neniam trarefutis min de komence. Kial estas tia?”

Zhuangzi diris: “Iu Qi-regnano sendis sian filon al Song-regno. Li fariĝis pordgardisto,

⁴⁹⁸ 儒墨楊乘. Iuj konsideras Bing kiel Gongsung Long, aliaj – kiel Song Keng. Mi konjektas, ke 乘 signifas “la nun havanta”, t. e. skolo de Laozi-Zhuangzi..

⁴⁹⁹ Preskaŭ ĉiuj esploristoj prenas la tekston por kritiko al Huizi, ke maniero de Lu Ju estus tute sama, kiel de Huizi. Sed al mi ŝajnas, ke ekzemplo de Lu Ju estas prezentita por montri gravecon de unu noto, kiu resonigas ĉiujn notojn. La unu simbolas la Taon. Kvin notoj nomiĝas: 宮商角徵羽.

detranĉinte sian piedon. Kiam li devis akiri sonorilojn, li kovris kaj vindis ilin. Kiam li devis serĉi knabon, fuĝintan el domo, li ne provis eliri de sia teritorio.⁵⁰⁰ Tro alteniĝis ĉiuj agoj al la kvalifiko.

Iu Chu-regnano, preterirante, venis al la pordgardisto. Noktmeze neniu estis ĉe la pordo, do li kverelis kun boatisto. Ankoraŭ ne forlasinte la pikan tonon, li restis sufiĉe rankorplena⁵⁰¹.”

Zhuang sur revena vojo el funebro preteriris la tombon de Huizi, kaj diris al sia akompananto: “Iu Ying-ano ŝmiris sur la pinto de sia nazo per stuko kun dikeco je muŝa flugilo, lasis al metiisto Shi tranĉi la stukon. La metiisto Shi svingis hakilon kiel vento, la peco de stuko eksonis tranĉita. Kun la tuta stuko fortranĉita, la nazo restis nevundita, kaj Ying-ano staras neniom perturbite.

Reĝo Yuan de Song-regno, aŭdinte tion, venigis la metiiston Shi kaj diris: “Vi provu por mi fari la samon.”

Shi respondis: “Antaŭe mi povis tranĉi trafe. Sed mia kunulo de longe mortis.”

Post kiam la Majstro Huizi mortis, ankaŭ mi jam havas neniun kiel kunulon. Tiel do mi havas neniun por interparoli kune.”

Kiam Guan Zhong malsaniĝis, duko Huan demandis lin, dirante: “Vi malsaniĝis serioze. Do mi ne devas ne diri. Se via malsano iĝus en krizo, al kiu mi povus konfidi la ŝtatan aferon?”

Guan Zhong diris: “Al kiu Via Moŝto mem volus konfidi?”

La duko diris: “Bao Shuya.”

Guan Zhong diris: “Ne devas. Kiel personeco, li estas bona, pura kaj integra. Sed li ne donas neniom da atento al tiu, kiu estas malpli alta je kvalito ol li mem. Se li sciigis ies eraron, li ne povas forgesi ĝin ĝis la fino de sia vivo. Se vi igus lin administri la ŝtaton, li certe okazigus implikaĵojn supre kun reĝo, sube agacus la popolon. Do li estus punita de via Moŝto, dum ne longe pasos la tempo.”

La duko diris: “Se tiel, kiu do estas taŭga?”

Respondis: “Sen alia kandidato, taŭgas Xi Peng. Kiel personeco lli etas tia, ke, kvankam lin forgesas la supro, sed la subo kune sekvas lin. Li hontas, ke li ne estas tia,

⁵⁰⁰ Laŭ mia konjekto, la unua konformigis sin al la nomo de pordgardisto, samkiel konfuceano estimas la nomon. Tiam nur difektito je kruro aŭ kastrito povis fariĝi pordgardisto. La dua bindis muzikilon, samkiel mohisto malestimis la muzikon. La tria ne eliris serĉi la perdiĝintan knabon, samkiel yangzhu-isto ne movis eĉ unu hareton por savi alian.

⁵⁰¹ Estas tre malfacile kompreni la tekston, kial ĉi tie devus aperi la Chu-regnano kaj Qi-regnano. En la lasta paragrafo, eble, estas kritikata la disputemo de Huizi.

kia estis la Flava Imperiestro. Li kompatas tiun, kiu estas malpli alta je kapablo ol li. Kiu havas virton komune kun aliaj homoj, tiu estas nomata 'sankta'. Kiu dividas proprieton kun aliaj homoj, tiu estas nomata 'saĝa'. Kiu kun saĝo intencas regi homojn, tiu ne povus akiri subtenon de homoj. Sed, kiu kun saĝo turnas sin al la subo, tiu ne povas ne akiri subtenon de homoj. Eble, okazus, ke li ne aŭdos ion rilate al al ŝtata afero. Eble, okazus, ke li ne aŭdos ion rilate al familia afero. Sed, sen alia kandidato, tiam taŭgas Xi Peng.”⁵⁰²

Reĝo de Wu-regno ŝipis laŭ la rivero Chang Jiang kaj survoje estis grimpanta sur monton de simioj. Amaso de simioj, vidante lin, ektimis kaj tuj forkuris en profundan vepraĵon. Dume unu simio libere pendadis kaj saltadis de branĉo al branĉo, montrante sian lertecon al la reĝo. La reĝo pafis ĝin. Ĝi tuj kaptis la alflugantan sagon. La reĝo ordonis al siaj akompanantoj pafadi ĝin. La simio estas fine mortigita.

La reĝo turnis sin al sia amiko Yan Buyi, dirante: “Tiu simio fieris pri sia lerteco. Ĉi-okaze, fidinte sian talenton, ĝi tro arogantis antaŭ mi, tiel do finfine mortis. Tio donas al vi bonan instruon. Ho, ankaŭ vi ne montru arogantan mienon antaŭ homoj.”

Yan Buyi, reveninte, vizitis Majstron Dong Wu por forviŝi sian mienon.⁵⁰³ Yan Buyi forlasis la plezuron kaj ekŝiĝis de la alta posteno. Tri jarojn poste samlandanoj laŭdis lin.

Nanpo Ziqi sidis ĉe kubutapogilo kaj spiradis, rigardante supren la ĉielon. Yan Cheng-zi eniris kaj diris: “Majstro, vi estas supera al aĵoj. Vi igis vian korpon simila al velkinta arbo, vian koron simila al mortinta cindro.”

Nanpo Ziqi diris: “Iam mi loĝis en monta kaverno. Ĝuste tiam vizitis min Tian He unufoje.⁵⁰⁴ Qi-regnanoj laŭdadis lin tri fojojn pro tio. Nepre mi unue donis la okazon, tial do li ekkonis tion. Certe mi vendis tion, do li aĉetis tion. Se mi ne farus la okazon, kiel li povus scii pri tio? Se mi ne vendus tion, kiel li povus aĉeti tion. Ho ve! Mi malĝojis je tio, ke la aliaj perdas sin mem. Mi malĝojis je mi mem, perdinta sin. Kaj aldone mi malĝojis pro tio, ke mi malĝojas je mi mem. Poste pasis multe da tagoj for.”

⁵⁰² 鮑叔牙 Ministro de Qi-regno, amiko de Guan Zhong. Li rekomendis al la duko kontraŭreĝan Guan Zhong, kiel cefministron. 隰朋 estas klera vasalo de Qi-regno, menciita en la libro Zuo Chuan 左伝.

⁵⁰³ 顔不疑 reĝa amiko de Wu-regno 董梧 aperas simila nomo en Zuo Chuan 左伝. La epizodo montras, ke estas danĝere proksimiĝi al tirano, kaj Wu-regno pereis subite pro tia reĝo.

⁵⁰⁴ 南伯子綦=南郭子綦、顔成子 aperis en la ĉap. 齊物. 田禾=田和 potenculo de Qi-regno

Zhongni vizitis Chu-regionon. La reĝo de Chu okazigis la toston. Sun Shuao staris kun pokalo, Shinan Yiliao eicevis vinon kaj oferverŝis. Oni diris: “Antikvuloj parolis ion ĉe tio.”

Zhongni diris: “Mi, Qiu, aŭdis pri parolado sen vorto. Rilate tion mi neniam ĝis nun parolis, sed hodiaŭ mi diros al vi pri tio. S-ro Shinan Yiliao, ĵonglante buletojn, solvis malfacilon inter du familioj. S-ro Sun Shuao estis trankvile kuŝanta kun ventumilo, kaj tiel soldatoj de Ying forlasis armilojn, Permesu al mi daŭre aldoni mian bekon pli longe je tri *chioj*. La unua ago povus esti nomata ‘Senvoja Vojo’, kaj la dua povus esti nomata ‘Senvorta Parolo’. Virto estas komponata en unu tuto de Tao, kaj parolo ĉesis je la limo, kie ne estas konebla per scipovo. Kun la unu tuteco de Tao-Vojo ne povas esti egala la virto. Kio ne estas konebla per scipovo, tion ne eblas esprimi per parolado. Tia maniero, ke konfuceanoj kaj mohistoj traktas la nomon, estas malbona.⁵⁰⁵

Maro estas tre granda, ke ĝi ne rifuzas akcepti riverojn, fluantajn orienten. Sanktuloj, favorate de la Ĉielo kaj la tero, donis profiton al la mondo, sed ne estas sciata kiuj estis ili. Do ili ne havis titolon en la vivo, nek postmortan nomon. Nek monon kolektitan nek nomon starigitan – tia estas la Grandulo.

Hundo estas taksata kiel bona ne per tio, ke bojas. Homo estas taksata kiel saĝa ne per tio, ke li parolas la bonan vorton. Des pli taksado de grandeco. Por esti taksata kiel granda ne sufiĉas esti nur granda. Des pli la taksado de virto. Neniu havas la virton pli grandan ol la Ĉielo kaj la tero. Kion postulas la Ĉielo kaj la tero? – Nenion. Ĉar jam abundas. Kiu scias sin havanta multe, tiu postulas nenion, perdas nenion, forĵetas nenion kaj ne ŝanĝas sin per aĵoj. Li revenas al si mem senlime, sekvas la antikvan kaj ne forfrotiĝas. Jen kia estas sincereco de la Grandulo.”

Ĉe Ziqi estis ok gefiloj. Antaŭ ili estis alvokita Jiufang Yin. Ziqi diris al li: “Aŭguru por mi destinon de gefiloj. Kiu el ili ricevos feliĉan sorton?”

Jiufang Yin diris: “Via filo, Kun, estos bonsorta.”

Ziqi surprizite ekĝojis kaj demandis: “Kial?”

Jiufang Yin respondis: “Ĉar Kun manĝos kune kun reĝo la saman manĝaĵon ĝis la fino de sia vivo.”

Ziqi ekploris kun larmoj, dirante: “Kial do mia filo devus ricevi tian ekstreman sorton?”

Jiufang Yin diris: “Se li povos kune manĝi kun la reĝo la saman manĝaĵon, la profito

⁵⁰⁵ Mozi naskiĝis en lastj jaroj de Konfuceo, do ankoraŭ ne eblas ekzisti tiam disputo inter konfuceanoj kaj mohistoj. Konfuceo mortis en tiu jaro, kiam okazis ribelo de la duko Bai en 479 a. K., do ne eblas okazi tia renkontiĝo post la ribelo.

disvastiĝos al tri parencaĵoj. Des pli al gepatroj. Malgraŭ tio vi, aŭdinte, ekploris. Tio malhelpus la bonsorton. Kvankam la filo estas bonaŭgura, tamen la patro – malbonaŭgura.”

Ziqi diris: “S-ro Yin, kiel vi povas scii tion sufiĉe. Kun povus esti bonaŭgura, eble, li ĝissate gustumos vinon kaj viandon per sia nazo kaj buŝo. Sed ne estos sciate, de kie ili venas. Ekzemple, kiam mi neniam paŝtis ŝafojn, malantaŭ mia domo ekaperus gregoj de ŝafoj; kiam mi neniam ĉasis, en nord-orienta angulo ekaperus koturnoj, en tiu okazo kial ne mi havus dubon pri tio?”

Kie mi kun miaj gefiloj vagas kaj ludas, tie estas en la Ĉiel kaj la tero. Mi kun ili ricevas ĝojon de la Ĉielo, manĝaĵon de la tero. Mi kun ili ne faras entreprenon, nek intrigon, nek strangaĵon. Mi kun ili vivas honeste laŭ la Ĉielo kaj la tero, ke aĵoj ne tuŝu nin superflue. Mi kun ili vivas libere en unu tuteco, ne farante fuŝkonvene la aferon. Sed nun al ni estos donata iu monda sankcio! Ĝenerale, se troviĝas iu stranga antaŭsigno, tiam nepre okazos io stranga. Estas dangere.

Je tio ne kulpas mi kun mia filo. La Ĉiel, probable, donos al ni tion. Tial mi ploras.”

Iom poste li veturigis sian Kun al Yan-regno. Survoje lin kaptis rabistoj. Ili supozis, ke estus malfacile vendi lin en kompleta korpo. Do ili tranĉis al li piedon por faciligi vendon. Ili vendis lin kun piedo tranĉita en Qi-regno. Hazarde li estas vendita al iu duko Qu⁵⁰⁶, kiel pordgardisto, tiel do li povis manĝadi viandon dum sia tuta vivo.

Nie Que hazarde renkontis Xu You kaj demandis lin: “Kien vi iras nun?”

Xu You respondis: “Mi ĝuste rifuĝas nun de Yao.”⁵⁰⁷

Nie Que demandis: “Kial?”

Xu You diris: “Yao brutosimile blinde klopodas je bonvoleco. Li estos mokridata de la mondo, – mi timas, – homoj de postaj generacioj estos vorantaj homojn unuj la aliajn inter si. Ne estas malfacile kolekti amason da popolanoj. Se amu ilin, ili proksimiĝas. Se profitigu ilin, ili alvenas. Se laŭdu ilin, ili diligentas. Se ili estas traktataj malbone, ili disiras. Ami kaj profitigi devenas de bonvoleco kaj justo. Estas malmulte da homoj, farantaj neprofitoĉase bonvolecon kaj juston, sed multe da homoj, farantaj ilin por profito. Je la konduto de bonvoleco kaj justo tute mankas honesteco. Ili liveras al brutaloj kaj avaruloj konvenan ilon. Tio estas ja arbitra decido de unu persono por profitigi la mondon, kiel hermetike nevidebla. Yao scias nur tion, ke saĝuloj profitigas la mondon, sed ne scias, ke ili damaĝas la mondon. Tion oni scias nur krom saĝuloj.”

⁵⁰⁶ 渠公 Iu supozas tion iu riĉulo, alia – buĉisto. la tria – duko Kang.

⁵⁰⁷ Nie Que 齧缺 jam aperis en la ĉap. 齊物篇. Laŭ la ĉap. 天地篇 li estas instruisto de Xu You. 許由 la ermito fuĝis de la sankta reĝo Yao 堯, kiam la lasta volus abdiki al li.

Estas flatemulo, estas atendemulo, estas kroĉiĝemulo.⁵⁰⁸ T. n. flatemulo estas tiu, kiu flateme obeas la vorton de unu instruisto, kiel la sian propran, kaj mem estas kontenta je tio. Li ne scias aĵon, ankoraŭ ne estiĝantan.

Atendemulo estas sama, kiel laŭso sur porko. Ĝi elektas al si vilardon, kiun ĝi faras sia vasta palaco kaj granda parko. Ĝi trovas sian rezidejon ĉe forko, hufo, kurbaj anguloj, inter mamoj, inter femuloj, kaj faras ilin por si ripozejoj kaj konvenaj lokoj. Ĝi ne scias, ke iam buĉisto foje svingos sian brakon sur sternita herbo kaj rostos-fumaĵos la porkon, kun kiu ankaŭ ĝi mem estos forbruligita. Ĝia vivo estas tia – iradi antaŭen kaj malantaŭen depende de la lokoj. Tiu estas nomata ‘atendemulo’.

Kroĉiĝemulo estas Shun, la reĝo. Ne ŝafaĵo sopiras formikojn, sed formikoj sopiras ŝafaĵon. Ĉar la ŝafaĵo odoras. Shun kondutas kun ŝafaĵodoro. Popolamasoj ĝojas je tio. Tiel do li transloĝadis tri fojojn kaj ĉie konstruiĝis la ĉefurboj. Eĉ dezerto de Deng transformiĝis en la urbon kun pli ol cent mil domoj.

Yao aŭdis pri la saĝeco de Shun, kaj feŭdis al li virgan teron, dirante: ‘Mi petas vin fari la teron riĉa.’ Shun, feŭdite sur la virga tero, kie loĝis longe dum maljuniĝis kun feblaj dentoj kaj aŭdo-vid-povoj. Sed li ne povis ripozi kaj reveni hejmen. Li estas t. n. alkroĉiĝemulo.

Tial do al Dieca homo ne plaĉas alproksimiĝo de homamaso. Eĉ se la homamaso alproksimiĝas, li ne amikiĝas kun ili. Ĉar ne amikiĝas, li ne klopodas profitigi ilin. Al ili sintenas li ne tro intima nek tro malintima. kun entenata virto kaj varma harmonio, li akordiĝas al la mondo. Li nomiĝas ‘Vera homo’. Li forĵetas la saĝon kvazaŭ formikoj, la kalkulon kvazaŭ fiŝoj, la volon kvazaŭ ŝafoj. Li rigardas tion, kio estas vidata, aŭskultas tion, kio estas aŭdata, kaj atentigas per koro tion, kio revenas al koro. Tia persono estas trankvila kvazaŭ ekvilibra ŝnurmezurilo, kaj li transformiĝas laŭ konforme.

Antikva Vera homo atendas tion per la Ĉielo. Li eniras en la Ĉielon, ne apogante sin al homoj. La antikva Vera homo, akirinte tion, vivas, perdinte tion, mortas. Ekz-le, medikamentoj. Ili fakte estas veneno, kiel akonito, platikodono, celozio, shiling.⁵⁰⁹ Tiuj estas laŭtempe laŭokaze efikas kun reĝa efekte, do ne eblas diri kiu el ili superas.

Yuewang Goujian kun tri mil soldatoj estis sieĝata sur la monto Kuaiji. Tiam nur Zhong sola antaŭsciis la estontan restarigon el de nuna perdo.⁵¹⁰ Sed li mem ne sciis la

⁵⁰⁸ 暖姝, 濡需, 卷婁 La unua estas supozata de iu kiel servila flatemulo, de la alia memkontentulo. La dua estas tiu, kiu atendas favoron de ekstere. La tria – tiu, kiu estas mallibrerigita, aŭ tiu, kiu alkroĉiĝas je io posedata.

⁵⁰⁹ 豕零 unu speco de fungoj.

⁵¹⁰ 文種 Grandoficisto de Yue-regno, estis mortigita laŭ kalumnio post la venko al Fu Chai.

sian venontan tragikon. Tial do estas dirite: ‘Okuloj de strigo taŭgas laŭokaze, kruroj de gruo utilas laŭokaze. Estus triste al ili, se depreni iliajn membrojn.’

Estas dirite, ke se blovegas vento, rivero difektiĝas, kaj se la suno brilegas, rivero difektiĝas. Kiom ajn la suno kaj vento difektus aŭ kune protektus, la rivero mem de komence ne haltas, ĉar ĝi estas iranta de la fonto. Tiel do akvo gardas la teron skrupule, ombro gardas la homon skrupule, aĵoj gardas aĵojn unu la alian skrupule.

Sed ĝenerale antaŭ danĝero estas elmetata la homa kapablo, ekz-le nur dume okuloj vidas klare, nur dume oreloj aŭdas, nur dume koro estas obeema. Foje la danĝero fariĝis reala, estas malfacile resaniĝi. Mizero kreskas kaj svarmas sur mizero. Resaniĝo dependas ja de bonsorta ĉirkaŭaĵo. Endas longe atendi la bonan rezulton. Sed homo inklinas nur estimi sin mem kiel trezoron. Ĉu ne estas bedaŭrinda? Pro tio neniam ĉesas ŝtatpereigo kaj murdo de popoloj. Oni ne scias demandi pri tio.

Piedoj tretas, tuŝante nur parton de la tero. Sed, ili povas konfide paŝi, apogante sin sur netuŝata vasta parto. Homa scio estas malgranda. Sed, apogante sin sur nesciata parto, li povos sciiĝi kion la Ĉielo poste sciigos. Scii pri la Granda Unu-tuteco, scii pri la Granda Yin, scii pri la Grandaj Okuloj, scii pri la Granda Ekvilibro, scii pri la Granda Metodo, scii pri la Granda Fido, scii pri la Granda Stabileco, – tio estas ja atingoj de la celado. Pere de la Granda Unu-tuteco eblas penetri ion, pere de la Granda Yin eblas malnodi ion, pere de la Grandaj Okuloj eblas vidi ion, pere de la Granda Ekvilibro eblas rilatigi ion, pere de la Granda Metodo eblas realigi ion, pere de la Granda Fido eblas eblas atingi ion, pere de la Granda Stabileco eblas posedi ion.

En la fonto estas la Ĉielo, sekve estas lumo, en mallumo estas akso, en la komenco estas io. Kompreno pri tio similas al nekompreno. Scio pri tio similas al nescio. Kio estas ne sciata, tio poste estos sciata. Al la demando pri tio – ne povas ekzisti la bordo, nek povas esti senbordo. En zigzagoj troviĝas la realo, kiu ne ŝanĝiĝas antikve kaj nune, ĉar nedifektebla estas la realo. Ĉu ne eblus diri, ke estas iu Granda Leviĝo. je Certigo?⁵¹¹ Kial ne demandadi pri tio? Kial oni perpleksas tiel? Malnodi la perplekson sen perpleksi kaj denove reveni al senperplekso. Tio estas ja la pleja senperplekso.

⁵¹¹ 大揚摧 Estas diversaj opinioj pri tiuj ideogramoj. Mi tradukis laŭlitere.

25 ZEYANG

Kiam Zeyang vojaĝis al Chu-regno, Yi Jie raportis pri li al reĝo, sed la reĝo ne donis al Zeyang aŭdiencon. Yi Jie revenis hejmen. Pengyang vidis Wang Guo kaj diris: “Vi, Majstro, kial ne peras por mi al la reĝo?”⁵¹²

Wang Guo diris: “Mi ne estas pli taŭga ol Gong Yuexiu je tiu rolo.”

Peng Yang diris: “Kio estas Gong Yuexiu?”

Wang Guo diris: “Li kaptas testudojn ĉe la rivero en vintro, ripozas en arbaro de monto en somero. Se iu trapasanto demandas lin, li diras – ‘Ĉi tiu estas mia rezidejo.’ Tiu Yu Jie ne estas kapabla je la perado. Des malpli mi. Mi estas malpli taŭga ol Yi Jie. Personeco de Yi Jie estas jen tia – Senvirta, sed havanta scion. Li ne permesas al si interrilati elkore kun homoj, blindigite de riĉo kaj alta rango. Li ne konsideras reciprokan helpon virto, do li ne estas aktiva je reciproka helpado. Estas same, kiel promesi al nuna frostiĝanto pruntedoni poste vestaĵon en venonta printempo, aŭ al nuna insolaciulo doni poste fridan venton en venonta vintro.

Personeco de la reĝo de Chu-regno estas jen tia – Majesta je formo, kaj severa. Li je punado neniom toleras, kvazaŭ tigro. Neniu povus persvadi lin, krom flatemulo aŭ vera virtulo.

Se sanktulo, estante en sia mizerego, li igas siajn familianojn forgesi la malriĉecon, kaj, atinginte la altecon, li igas la reĝon kaj dukon forgesi la altrangecon kaj salajron kaj ŝanĝiĝi en humilulojn. Rilate al aĵoj, li ĝuas kun ili. Rilate al homoj, li ĝuas la Vojon, laŭ kiu kunirante, sed konservante sin mem. Tiel do li, senvorte, lasas homojn kune trinki kaj akordiĝi, kune starante mem unuvicigite kun homoj, lasas homojn fariĝi gepatroj kaj gefiloj en amikeca rilato. Sed li mem loĝas en nura unu ĉambreto por sterna sin. Li tenas sin tiel malproksima je sia homa koro. Do mi diras al vi, ‘Atendu Gong Yuexiu!’

Sanktulo, penetrante komplikaĵon, aranĝas ĉion en unu-tuton, sed ne scias mem pri sia ago. Tio estas ja lia denaska naturo. Li laŭ la Ĉiela ordono agas, farante la Ĉielon sia mastro. Homoj postsekvas lin kaj faras tion la Ĉiela ordono. Sed ili ĉagreniĝas je sia konduto pro sia scio, do, dum ne pasis kelke da tempo, ĉiam haltas. Kio eblus al ili?

Kiam troviĝas iu denaska belulino, se oni ne donus al ŝi spegulon kaj ne sciigus ŝin, ŝi mem ne sciis sin bela. Tamen tute egale, ĉu ŝi scias aŭ ne scias, ĉu ŝi aŭdas aŭ ne aŭdas,

⁵¹² 則陽 Zeyang estas kromnomo, la familinomo kaj nomo estas 彭陽 Peng Yang, Lu-regnana. 夷節 vasalo de Chu-regno. 王 Reĝo estas Wen 文王. 王果 grandoficisto de Chu-regno 公閱休 estas ermito.

ne ĉesas tio, ke estas ĝojinde je ŝia beleco, kaj ke homoj ŝatas ŝin. Ĉar tio estas denaska naturo. Estas same, kiel sanktulo amas homojn. Homoj nomas lin tia. Se oni ne sciigus al li tion, li ne scius, ke li amas homojn. Sed tute egale, ĉu li scias aŭ ne scias, ĉu li aŭdas ne aŭdas, ne ĉesas tio, ke li amas homojn, kaj ke homoj vivas pace kun li. Ĉar tio estas denaska naturo.

Malnova lando, malnova urbo, se videblas eĉ de for, oni ekĝojas. Malgraŭ ke montetoj estas kovritaj per herboj-arboj kaj naŭ dekonojn estas vidate jam malklare, tamen ĝojiga estas la hejma pejzaĝo. Des pli ĝojige estas, kiam vidas kion vidis antaŭe, aŭdas kion aŭdis antaŭe, kaj kiam estas vidata la turo alta je dek *renoj* super popolamaso.⁵¹³

S-ro Ranxiang situis sin en la centro de cirklo-rado kaj sekvis kreskadon-ŝanĝiĝon. Aĵoj kiel punktoj sur cirklo-rado ne havas finon nek komencon, nek finon, nek tempon kiel jaron aŭ sezonon. Kun ĉiama turniĝo de aĵoj ne turniĝas la unu punkto. Se oni prove forĵetus tiun kaj volus, ke la Ĉielo estu majstro, ne eblas fari la Ĉielon majstro. Ĉar tiam ĉio kun aĵoj turniĝos. Kiel eblas fari aferojn per tio?⁵¹⁴

Por sanktulo ne estis la Ĉielo de komence, nek homoj de komence, nek komenco de komence, nek aĵoj de komence. Li estis iranta kune kun la mondo kaj ne alternis. Je sia konduto ĉio estis preta kaj ne elĉerpiĝis. Kiel eblas konformiĝi al tio?

Reĝo Tang trovis iun grumon Yin havanta strebon senĉese ascendi, kaj faris lin sia mentoro. Tang sekvis lin kiel mentoron kaj ne ĉirkaŭbaris lin. Tiel do Tang akiris la frukton, kiu sekve kreskis. Tang donis al li la nomon de administranto. Tio estas nomata 'superflua metodo'⁵¹⁵, akirite per unu rimedo du eltrovoj. Zhongni elstudis tutforte tion, kaj ankaŭ faris tion sia mentono.

S-ro Rongcheng diris: 'Sen tago ne estas jaro, sen interno ne estas ekstero'.⁵¹⁶

Reĝo Ying de Wei-regno faris traktaton kun markizo Tian Mu.⁵¹⁷ La markizo Tian malplenumis ĝin. La reĝo Ying ekkoleris. Li volus sendi iun sikarion por mortigi la markizon. Generalo Gongsun Yan aŭdis tion kaj hontis pro tio.⁵¹⁸

⁵¹³ 仞 unuo de longeco, unu ren egalas al 7 chi aŭ 8 chi 尺, ĉ. 180 cm. Dek ren estas 18m. Tiu paragrafo estas rigardata kiel parabolo, ke estas ĝojiga la reveno al denaska naturo.

⁵¹⁴ 冉相氏 nomo de antikva legenda sankta reĝo.

⁵¹⁵ 贏法. Ideogramo 贏 havas signifon 'superflua, plusa'.

⁵¹⁶ 容成氏 Iu konsideras lin antikva sankta reĝo, kiu ĉe la Flava Imperiestro okupiĝis pri kalendaro. alia – instruisto de Laozi.

⁵¹⁷ 瑩 Ying estas reĝo Hui de Wei 魏惠王. 田牟 Tian Mu estas supozata reĝo Wei de Qi-regno 齊威王. Sed lia nomo estas ne Mu.

⁵¹⁸ 犀首公孫衍 generalo de Wei-regno, Gongsun Yan. 田忌 generalo de Qi-regno

Li diris: “Via Moŝto, estante la estro de dek mil batalĉaroj, volus uzi plebanon por venĝi. Mi petas, ke vi donu al mi trupon el du cent soldatoj kaj lasu min ataki lin por vi. Mi kaptos liajn popolanojn kaj bovojn-ĉevalojn. Mi igos la markizon feбриĝi interne kaj suferi pro ekzantemo surdorse. Post tio mi okupos la regnon. Se generalo Tian Ji eskapus, mi pafos al li dorson kaj disrompos lian spinon.”

Jizi, aŭdinte tion, hontis kaj diris: “Kiam oni intencas konstrui kastelon altan je dek *renoj*, se la kastelo devus esti detruita en la tempo, kiam oni estas konstruinta ĝis dek *renoj*, laboruloj nepre ege turmentigus. Nun pasis sep jaroj, post kiam ĉesis milito. Tiu paca periodo estas ja bazo por la reĝo. Generalo Yan estas perturbanto, kiun oni ne devas aŭskkulti.”⁵¹⁹

Huazi, aŭdinte tion, naŭziĝis kaj diris: “Kiu insistas ataki Qi-regnon, estas perturbanto, kaj ankaŭ kiu insistas ne ataki, estas perturbanto. Kaj, kiu kritikas ambaŭ perturbantojn, estas ankaŭ perturbanto.”

La reĝo demandis: “Tiam, kion do mi devas fari?”

Respondis: “Via Moŝto, nur serĉu mem la Vojon!”

Huizi, aŭdinte tion, rekomendis al la reĝo por konsili Dai Jinren.⁵²⁰

Dai Jinren diris: “Ĉu Via Moŝto scias t. n. helikon?”

La reĝo respondis: “Jes.”

Dai Jinren daŭre diris: “Sur la maldekstra korno de heliko estas unu regno, nomata klano Chu, kaj sur la dekstra korno de heliko estas la alia regno, nomata klano Man. Ambaŭ ili militadis por teritorio unu kontraŭ la alia, mortis kelkdek mil homoj. Unuj ĉaspelis la aliajn dum 15 tagoj kaj revenis hejmen.”

La reĝo diris: “Ha, tio estas fabelaĉo.”

Dai Jinren diris: “Mi petas vin, ke vi prenu ĝin kiel realon. Ĉu vi opinias, ke estas limo al kvar direktoj kaj supro kaj subo?”

La reĝo diris: “Ne estas limo.”

Dai Jinren diris: “Kiu scipovas igi sian koro ludi en la senlimo kaj revenas al niaj atingeblaj landoj, al tiu ŝajnas, ke niaj landoj estus tiom malgrandaj, ĉu ili ekzistas aŭ ne.”

La reĝo diris: “Certe.”

Dai Jinren diris: “Unu el niaj landoj estas Wei-regno, kaj en Wei estas la urbo Liang, kaj en Liang estas la reĝo. Ĉu estas diferenco inter la reĝo kaj la klano Man?”

La reĝo diris: “Ne diferencas.”

⁵¹⁹ 季子, 華子 vasaloj de Wei-regno.

⁵²⁰ 惠施, Huishi, amiko de Zhuangzi. Li servis al la filo de la reĝo Hui. 戴晉人 saĝulo de Wei-regno.

La gasto eliris. Huizi vidis la reĝon.

La reĝo diris: “Tiu gasto estas grandulo. Eĉ sanktulo povus esti malpli granda ol li.”

Huizi diris: “Li estas blov-instrumento. Se oni blovas, ĝi sonas laŭte. Se oni blovus trueton de tenilo de glavo, sonas nur spirado. Yao kaj Shun estas laŭdataj, sed antaŭ Dai Jinren ili similas al nura spirado.”

Konfuceo iris al Chu-regno. Li ripozis en iu taverno ĉe la monteto, nomata Formiko. Li najbare trovis unu personon ĉirkaŭita de vir- kaj inaj servantoj. Zilu demandis: “Kion faras ĉi homoj, kiuj svarmas tie?”

Zhongni diris: “Ili estas servantoj al sanktulo, kiu mem eniris en la popolon por vivi sen renomo. Li mem kaŝis sin ĉe kampodigeto. Spite ke lia famo ne estas laŭta, tamen lia strebo estas senlima. Kvankam li parolas per buŝo, tamen en koro estas vorto, ankoraŭ ne parolata. La direkto de lia vivo estas tute malsama al de mondanoj, do lia koro malestimas vivon kun ili. Tiel do li subteriĝis. Lia nomo estas Shinan Yiliao.”⁵²¹

Zilu demandis Konfuceon: “Ĉu mi iros alvoki lin?”

Konfuceo diris: “Ĉesu. Li eksciis min aperinta antaŭ si, kaj eksciis min iranta al Chu. Li supozas, ke mi nepre persvadus la reĝon de Chu dungi min. Do li rigardas min flatanto. Tia persono hontas, nur aŭdante la vorton ‘flatulo’, des pli vidante la korpon per siaj okuloj. Kial li volus kune ekzisti?”

Zilu iris vidi lin, sed la ĉambro estis malplena.⁵²²

Iu limgardisto de Zhangwu demandis Zilao, dirante: “Ĉu reĝo ne estas fuŝa je administrado? Ĉu li ne estas disdisa je regado de la popolo? Antaŭe mi faris rizon. Se terkulturis fuŝe, ankaŭ la rikolto fariĝis rekompence fuŝa, Se priklis disdise, ankaŭ la rikolto iĝis rekompence disdisa. En alia jaro, mi tute ŝanĝis manieron, profunde terkulturis kaj plugis bone, tiel do rizo fruktis amase kaj riĉe, mi povis satmanĝi tutan jaron.”

Zhuangzi, aŭdinte tion, diris: “La maniero, kiel nunaj homoj regas sin je la korpo kaj reguligi sin je la koro, ege similas al diritaĵo de la limgardisto. Ili fuĝas de la Ĉielo, disiĝas de la denaska naturo, detruas la senton, pereigas la spiriton, – jen tiel faras homamaso. Kiu traktas fuŝe la denaskan naturon, tiu kreskigas ŝosojn de avareco kaj herbaĉojn al denaska naturo, kiel kanojn, fragmitojn, arundojn. donakojn. Komence ili ŝajnus helpi nian korpon, sekve kreskas pli alte ol nia denaska naturo, ne elektas lokojn

⁵²¹ 市南宜僚 Familinomo estas 熊, alinomo Yiliao. Aperas la nomo en la ĉap. 山木、徐無鬼.

⁵²² Kiun el du figuroj estimi pli alta? Jen kuŝas diferenco inter konfuceanoj kaj taoistoj.

por vice amasiĝi, disfaladi, tralikiĝi, reaperadi, ĝuste samkiel paroniĥio, ulcero, febro, diabeto.”

Bai Ju estis lernanta ĉe Lao Dan kaj iam diris al li: “Permesu al mi vojaĝi la mondon.”

Lao Dan diris: “Ĉesu. La mondo estas sama, kiel ĉi tie.”

Bai Ju denove petis lin pri tio.

Lao Dan demandis: “Komence kien vi vojaĝos?”

Bai Ju respondis: “Mi komence vojaĝos al Qi-regno.”

Li alvenis al Qi-regno. Li vidis tie la krucimitan. Li formovis ĝin, kaj, per sia formala vesto kovris ĝin. Li plorkriis al la Ĉielo, dirante: “Ho ve, ho ve! En la mondo estas granda malfeliĉo. Vi pli frue estas atakita per tio. Estas dirite: ‘Ne ŝtelu, ne mortigu!’ Sed, post kiam estas starigite pri distingo de honoro-malhonoro, troviĝis ja malsano. Post kiam estas amasigite je varoj kaj posedaĵoj, troviĝis ja konflikto. Nun oni starigis la kaŭzon de homa malsano, amasigis la kaŭzon de homa konflikto, kaj tiel suferigas ekstreme homojn, ne donas al ili la tempon por ripoz. Ĉu eblas nun haltigi tion, kiom ajn oni dezirus?”

Antikvaj reĝoj atribuis sukceson al la popolo, malsukceson al si mem; atribuis rektecon al la popolo, imputis malrektecon al si mem. Do, se ili trovis eĉ unu difektinta la korpon, ili, reveninte, kulpigis sin mem pro tiu. La nunaj ne estas tiaj. Kaŝante aĵojn, ili rigardas nescianton mem malsaĝa. Altrudante grandan malfacilon, ili kulpigas tiun, kiu ne povas disponi. Altrudante pezan taskon, ili punas tiun, kiu ne povas plenumi. Farante vojon malproksima, ili akuzas tiun, kiu ne povas atingi. Popolanoj trovas per sia scio kaj forto nenian rimedon, alian ol elturniĝi per fraŭdo. Se multiĝas fraŭdo pli kaj pli, kial popolanoj kaj oficistoj povus ne trompadi. Sen forto, oni fraŭdas, sen saĝo, oni trompas, sen mono, oni ŝtelas. Kiun oni povus riproĉi pro ŝtelado?”⁵²³

Qu Boyu⁵²⁴, travivante dum sesdek jaroj, ŝanĝis sin sesdek fojojn. Ne okazis tiel, ke li poste ne neis kion li komence konsideris jesa. Estas ne sciate, ĉu nuna jeso ne estus tio, kio estis negata kvindek naŭ fojojn en pasinteco.

Ĉio havas la naskiĝon, sed oni ne povas vidi la radikon. Ĉio eliras, sed oni ne povas vidi la pardonon. Spite ke ĉiuj respektas konatan scion, ne esperas scii, ke la scio estas akirebla nur post kiam oni komprenas ion nekonebla. Ankaŭ pri tio estas ege suspektende. Nu lasu, lasu. Nenien eskapi. Ĉu pravus ankaŭ tio, kio estas dirita supre?

⁵²³ Tiu rakonto estas kontraŭargumento al ĉina legalisma skolo 法家.

⁵²⁴ 蘧伯玉 Grandoficisto en Wei-regno 衛. Li aperas ankaŭ en Lunyu 論語.

Zhongni demandis historiistojn s-rojn Da Tao, Bo Changqian kaj Xi Wei, dirante: “Duko Ling de Wei-regno drinkadis kaj orgiadis, ne okupante sin pri adiministrado de la ŝtato. Li absorbiĝis en ĉasado per retego aŭ sagoj kun fadeno sur kampo kaj ne klopodis interrilati kun aliaj landestroj. Spite tion, kial oni nomas lin duko Ling⁵²⁵ post la morto?”

Da Tao diris: “Ĉar tio konformas al realo.”

Bo Changqian diris: “La duko Ling havis tri edzinojn, kun kiuj li kune banadis sin. Iam s-ro Shi Qiu ricevis aŭdiencon ĉe la duko, la lasta akceptis lin ĝentile kaj helpeme kun ekzorculo en mano. Malgraŭ ke li estis ege pigra, li tenis sin tiel ĝentile al saĝulo. Tial do oni nomas lin post la morto duko Ling.”

Xi Wei diris: “Kiam la duko Ling mortis, oni aŭguris pri la antaŭdecidita loko por entombigi. Montriĝis tie malbonsorta. Sekve oni aŭguris, ĉu entombigi en iu dezerto. Montriĝis bonsorta. Oni fosis teron profunde je kelk-*renoj*, hazarde trovis tie ŝtonan ĉerkon. Oni lavis ĝin kaj vidis ĝin havanta epitafon, en kiu estis skribite: ‘Ne eblas konfidi la postan al la filo, ĉi tiun lokon prenos la duko Ling’. La postmorta nomo Ling estis jam decidita antaŭ longa tempo. Sed kiel do tiuj du povus scii tion?”

S-ro Scietulo demadis la grandan dukon Harmoniulo, dirante: “Kion signifas la vorto ‘opinio de komunumo’?”⁵²⁶

La duko Harmoniulo diris: “Komunumo konsistas el dek familinomoj kaj cent personnomoj kaj konsistigas unuon de moro. En ĝi akordiĝas la malsamaj kaj fariĝas unu samo. En ĝi disiĝas unu samo kaj estiĝas malsameco.

Nun, por ekzemplo, kvankam ĉevalo konsistus el cent membroj, tamen ne eblas nomi ciun membron ĉevalo. Sed ĉevalo kun cent membroj, staranta ligite antaŭ vi, estas nomata la ĉevalo. Tiel do, montoj fariĝis altaj kun terpecoj amasigitaj. riveroj fariĝis grandaj kun akveroj kunigitaj. Grandulo fariĝis ĝenerala, ĉar li estas tiel ampleksa, ke li ne alteniĝas al sia subjekto rilate al io envenanta de ekstere en sin mem, kaj li ne rifuzas la aliajn spite ke li konvinkiĝas prava je io elvenanta de interne de si mem.

Kvar sezonoj diferencas je *ĉjio*, sed la Ĉielo ne partiemas, do konsistigas jaron. Kvin oficoj en administrado estas malsamaj, sed reĝo ne partiemas, do estas regata la regno. Grandulo ne partiemas al civilaj kaj militaj oficistoj, ĉar li estas virta.

Kvankam ĉiuj estaĵoj havas respektive sian apartan rezonon, tamen Tao ne estas privata. Tial do Tao ne havas la nomon. Ĝi estas sennoma, do senaga. Kvankam senaga,

⁵²⁵ Ling havas signifon «spirito, animo», surtrone 534 – 493 a. K.

⁵²⁶ 丘里之言 Laŭ Leĝoj de Zhou 周礼, naŭ kamparanoj konsistigas unu vilaĝeton 井, kvar vilaĝetoj konsistigas unu vilaĝon 邑, kvar vilaĝoj konsistigas unu vilaĝegon 丘. Kvin familioj 家 konsistigas unu najbaron 鄰, kvin najbaroj konsistigas unu li 里.

tamen nenio estas farata sen ĝi.

La tempo havas la komencon kaj la finon. La mondo havas sângiĝon kaj transformiĝon. Malfeliĉo kaj feliĉo estas alfluantaj alterne, portante neakcepteblan malkonvenon kaj bonvenan konvenon. Ĉiu malsamas je surfaco laŭ sia naturo, havante konformecon kaj malkonformecon. Tion eblas kompari kun granda marĉo, kie estas en orde ĉiuj cent materialoj. Vidu grandan monton, kie arboj kaj ŝtonoj kune staras kiel unu tuto. Jen t. n. la opinio de komunumo.”

S-ro Scieto diris: “Se tiel, ĉu eblas nomi ĝin Tao?”

Granda duko Harmoniulo diris: “Ne. Nun, ekz-le, uzu esprimon de kalkulado. Oni uzas esprimon “dek mil aĵoj”, sed ĝi ne signifas centon da aĵoj, sed montras multon je nombro. Signifitaĵo malsamas al la dirita vorto. Samkiel tio, la Ĉielo-Tero signifas ion grandan je formo, *ying-yang* – ion grandan je *ĉjio*, Tao – ion ĝeneralan je ago. Do legu tiajn esprimojn kiel nur signifon de ‘grandeco’, ne plu. Tion devas kompreni nur kiel komparo. Se diri por ekzemplo, komparante ĉevalon kun hundo, ili estas malproksimaj je kvalifiko.”

S-ro Scietulo diris: “En kvar direkcioj, en ses dimensioj, naskiĝas ĉiuj estaĵoj, sed kiel tio okazas?”

Granda duko Harmoniulo diris: “*Yin* kaj *yang* radias sin unu la alian reciproke, kovras sin reciproke unu la alian, regas sin unu la alian reciproke. Kvar sezonoj alternas unu post la alia, naskiĝas unu post la alia, mortigas unu la alian. Deziro kaj malbondeziro, rifuzo kaj akcepto sekvante leviĝas. Viro kaj ino pariĝas unu kun la alia ĉiam konstante. Paco kaj danĝero alternas unu post la alia, malfeliĉo kaj feliĉo naskiĝas unu post la alia, malrapido kaj rapido je movo frotas unu post la alia, per tio estiĝas kolektiĝo kaj disiĝo. Jen tion oni devas konsideri ĉe difino de nomo kaj realo, devas strebi skrupule observi la detalojn. Sekvante viciĝas la movado reciproke laŭ rezono, serio da movo funkcias reciproke unu kun la alia. Se atingis la ekstremon, revenas. Se finiĝis, komenciĝas. Tia estas la ekzistado de aĵoj.

Elĉerpiĝas vortoj tie, kie estas atingite per scio ĝis nura konebla ekstremo de aĵoj. Kiu observas Taon, tiu ne sekvas ĝin, kie ĝi malaperas, ne serĉas fonton, kie ĝi ekaperas, kaj ĉesas diskuti pri ĝi.”

S-ro Scietulo demandis: “Ji Zhen opinias, ke neniu kreis. Jiezi opinias, ke estas iu, kiu igas.⁵²⁷ Kiu el argumentoj de du pensuloj estas prava je realo kaj kiu el ili devias de rezono?”

⁵²⁷ 季眞 filozofa de Wei-regno en la epoko de Militaj Landoj, prediktis, ke estas neniu, kiu movas la mondon. 接子 filozofa de Qi-regno, isnsistis, ke estas iu, kiu ekmovis la universon.

Granda duko Harmoniulo diris: “Kokoj krias, hundoj bojas – tio estas sciata de homoj. Sed eĉ granda sciulo ne povas diri de kie estiĝas tiel, nek povas supozi kia estos en futuro. Oni dividas objekton por analizi tiom detale, kiom ĝi dispeciĝas ĝis limo, aŭ tiom grande, kiom ĝin ne eblas entutigi. Kiu insistas ekzistadon de faranto, kaj kiu insistas neekzistadon, tiuj ambaŭ ne evitas regitecon per aĵoj, do finfine ili falas en eraron. La unua konsideras faradon reala, la dua – nenionfaradon malplena. Estas nomo kaj estas realo – tio estas rezidejo de estaĵoj. Ne estas nomo, nek realo – tio estas vanteco de estaĵoj. Ju pli da parolo aŭ da penso, des pli senenhava la vorto. Kiu ankoraŭ ne naskiĝas, tiu ne povas eviti sian naskiĝon. Kiu jam mortis, tiu ne povas kontraŭi sian morton. La vivo kaj la morto ne estas proksimaj, sed ne eblas klare observi ilian rezonon. La eldiroj, ke estas faranto, kaj ke ne estas faranto, estas nura hipotezo dubenda.

Se mi rigardas la fonton, tiam ĝi foriras senlime. Se mi rigardas la pinton de futuro, tiam ĝi alvenas senĉese. Pri tiu senlimeco kaj senĉeseco ne estas vorto. Koncernante aĵojn la rezono estas sama. Ĉu estis unue kreinto aŭ ne – tio estas samkiel la fonto, esprimata de vorto pri la fino kaj komenco de aĵoj.

Tao ne povas esti rigardata kiel esto, kaj la esto ne povas esti rigardata kiel nenio. Tio estas nomata la Tao, nur hipoteze. Estas faranto aŭ nenionfaranto – tio estas nur unu aspekto de aĵoj. Kiel do eblas fari tion Granda Regulo? Se vorto estus sufiĉa je esprimovo, tiam per la vortoj dum tuta tago eblas penetri Taon. Kvankam vorto estas ne sufiĉa, tamen, se pri aĵoj tutan tagon esplori per la vortoj, eblas penetri ilin. Tao estas la pleja ekstremo de aĵoj, ke ne eblas atingi ĝin per vortoj kaj per nevortoj. Ne per difino de vortoj nek per silento, sed per dialogo estas diskuteble pri la ekstremo.”

26 EKSTERAJ AĴOJ

Ne eblas esperi nepre la eksterajn aĵojn. Do Longfeng estis ekzekutita, Bigan estis murdita, Jizi freneziĝis, Elai mortis, Jie kaj Zhou perdiĝis. Homa mastro ne povas ne deziri lojalecon de siaj subuloj, sed tamen la lojaleco ne ĉiam estas fidata. Tial do Wu Yun estis ekzilita al la rivero Chang Jiang, Chang Hong mortis en Shu-lando kaj lia sango, konservita dum tri jaroj, ŝanĝiĝis en verdan jadon. Homaj gepatroj ne povas ne deziri filan pietaton de siaj gefiloj, sed tamen la fila pietato ne ĉiam estas amata. Tial do Xiaoji ĉagreniĝis, Zeng Shen tristis.⁵²⁸

Se oni frotas arbon kun arboj, ekbrulas. Se oro kun fajro kunestas, fluidiĝas. Se *yin* kaj *yang* moviĝas komplike, la Ĉielo kaj la tero ege fluktuas, ke ektondras, fulmas, fajras en pluvo, kaj ekbrulas eĉ granda arbo sofforo.

Homo, atakite per troa spleno, disduobligas en si mem, do nenien eskapi kaj neniom sukcesi pro mensa perturbo, obsedite per vermo de melankolio. Koro, kvazaŭ pendas sin inter la Ĉielo kaj la tero, enuas kaj falas profunden en amasiĝintan depresion. Kalkulado de profito kaj malprofito kune frotas kaj forkonsumigas lin kaj da fajro naskiĝas tro multe. Multe da popolamasoj forbruligas harmonion. Dum monato estas tute ne estingebila la fajro⁵²⁹. Jen tiel detruigiĝas kaj elĉerpiĝas la Tao.

Familio de Zhuang Zhou estis malriĉa. Li iris al markizo Jianhe por pruntpreni grenon.⁵³⁰ La markizo Jianhe diris: “Bone. Mi ricevos monon el mia feŭdo. Tiam mi pruntedonos al vi tri centoj da mono. Bone?”

Zhuang Zhou ekkoleris kun ŝanĝita vizaĝkoloro kaj diris: “Hieraŭ alvenante, mi aŭdis iun alvokanta meze de la vojo. Mi turnis min tien kaj vidis karason restanta en sulko far de rado. Mi demandis ĝin: ‘Ho, s-ro Karaso, kion vi faras ĉi tie?’”

Karaso respondis: “Mi devenis de ondoj ĉe la Orienta Maro. Se vi havas akvon, bonvolu doni al mi kelke da akvo por vivigi min.”

Mi diris: “Konsentite. Mi ĝuste estas veturanta suden al reĝoj de la regnoj Wu kaj Yue, de tie mi sendos al vi akvon de Okcidenta Rivero por akcepti vin. Bone?”

⁵²⁸ 龍逢 saĝulo en la fino de Xia-dinastio. 比干 Avertis tiranon, kaj estis dissekita. 箕子 Avertis tiranon Zhou, sed ne aŭdite, ŝajnigis sin freneza. 惡來 subulo de Zhou, estis mortigita de Wu. 桀紂 tiranoj. 伍員 Zixu, ordonita de reĝo sinmortigi. 萇弘 ekzilita laŭ kalumnio, poste sinmortigis. 孝己 Filo de reĝo Gao Zong Wuding de Yin-dinastio 曾參 disĉiplo de Konfuceo

⁵²⁹ 月固不勝火. Netradukebla estas la frazo, kiel vortoj de profeto.

⁵³⁰ Iu konjektas, ke Jian He estas markizo Wen de Wei-regno 魏文侯. Sed estas dubinde.

La Karaso ekkoleris, ŝanĝante vizaĝkoloron, kaj diris: “Mi perdis mian ordinaran kondiĉon kaj nenie loĝi. Do mi deziras havigi al mi nur kelke da akvo por vivi. Sed vi respondis per tiaj vortoj, samkiel vi preferas vidi min vendota sekigite.”

Princo Ren⁵³¹ elfaris grandan fiŝhokon kaj grandan fiŝfadenon, kun kvindek kastritaĵoj de virbovoj kiel logaĵoj, kaj sidante ĉe Monto Kuaiji, ĵetadis la fiŝkanon al Orienta Maro kaj ĉiumatene hokfiŝadis. Tutan jaron li ne gajnis fiŝon. Unu jaron poste granda fiŝo almordis logaĵon. La fiŝego tiradis hokon, mergiĝadis suben, svingante siajn naĝilojn, saltadis tiom furioze, kiom ondoj leviĝadis kvazaŭ montoj, marakvo tremadis kvazaŭ boligite. La fiŝego tiel kriadis kvazaŭ ogro aŭ fantomo, ke estis minacataj la loĝantoj en najbara teritorio de mil *li* kvadrate.

Princo Ren kaptis la fiŝegon, distranĉis ĝin kaj sekigis. Ĉiuj loĝantoj oriente de la rivero Zhejiang kaj norde la monto Cangwu satmanĝis peceton de la fiŝego. Tiel do posteuloj, ŝatantoj de malsinceraĵoj, transsendadis kun miro tiun rakonton unuj al la aliaj.

Kiu iras al irigacia kanaletoj fiŝi kun malgrandaj kano kaj fadeno, celante salamandron aŭ karason, al tiu estas malfacile gajni la grandan fiŝon. Kiu ornamas sin per malgrandaj opinioj kaj celas enoficiĝi gubernia ĉefo, al tiu estas malproksime atingi la grandan. Kiu ankoraŭ ne komprenas la manieron de Princo Ren, tiu ne povas diskuti la ŝtatan politikon, ĝis kiu estas malproksime.

Konfuceanoj perfortas tombon laŭ Poezio kaj Decreguloj. Pligranda konfuceano diris al subulo: “Jam tagiĝas oriente. Kiel iras la afero?”

Malpligranda konfuceano respondis: “Ankoraŭ ne demetis vestaĵon, kaj en la buŝo restas perlo. Estas skribite en la Poezio: ‘Verdas, verdas tritikoj, kreskantaj sur kampo dekliva de monteto. La mortinto ne donis almozon dum sia vivo, kial post la morto li enhavas perlon?’”

Preninte barbon de mortinto, premante ĝian makzelon, la konfuceano batis mentonon per martelo kaj disigis vangon. Tiel li elprenis el ĝia buŝo la perlon sendifektan.

Unu disĉiplo de Lao Laizi⁵³² eliris kolekti brullignojn. Survoje li renkontis Zhongni. Reveninte, li raportis, dirante: “Tie estis iu homo kun longa korpo kaj mallongaj kruroj, kun ĝiba dorso kaj malantaŭaj oreloj, rigardis kvazaŭ li regus kvar marojn. Mi ne scias kiu li estas kaj al kiu klano li apartenas.”

⁵³¹ 任公子 Princo de la lando Ren, kiu situis en Jining de Shandong provinco.

⁵³² 老莱子 ermito de Chu-regno. Estas skribite en *Shiji*, ke li verkis 15 librojn.

Lao Laizi diris: “Tiu estas Qiu. Invitu lin ĉi tien.”

Zhongni alvenis.

Lao Laizi diris: “S-ro Qiu, se vi forĵetus vian arogantecon kaj vian manieron ŝajngi vin scianta, vi fariĝus noblulo.”

Zhongni, riverencante, retiriĝis, kaj demandis humile kun vizaĝo ŝanĝita, dirante: “Ĉu mi povas igi mian lernadon progresi plie?”

Lao Laizi diris: “Vi ne povas elteni nunan difekton de unu generacio, kaj tiel malestimas long-tempan damaĝon de dek mil generacioj. Ĉu tia estas vi pro tio, ke vi, povrulo, etis molestata de longe, aŭ pro tio, ke al vi mankas kompreno? Favori la aliulojn kaj plezurigi sin estas abomeninde en la tuta vivo. Jen kion vi ne pripensas. Meza popolo iras nur laŭ tia vojo. Oni tiras sin reciproke por nomo, ligas sin reciproke por sekreto.⁵³³

Koncernante, ke vi laŭdas Yao kaj mallaŭdas Jie, estas preferinde forgesi ambaŭ ilin kaj ĉesi laŭdadon. Kiu kontraŭas, tiu ne devas ne vundiĝi; kiu moviĝas, tiu ne devas ne tordiĝi. Sanktuloj faris aferon heziteme, do ili sukcesis ĉiufoje. Kial do, farante tiel, ili finfine fierus?”

Reĝo Yuan de Song-regno songis iam noktomeze.⁵³⁴ Iu, kun haroj taŭzitaĵ, rigardis tra la pordon kaj diris: “Mi ekiris de la profunda abismo de Zailu, sendite de la Pura rivero al Grafo de la Flava rivero. Survoje fiŝisto Yu Ju kaptis min.”

La reĝo Yuan, vekiginte, igis iun diveni tion.

La divenisto diris: “Tiu estas sankta testudo.”

La reĝo diris: “Inter fiŝistoj troviĝas iu, nomata Yu Ju?”

Subuloj, dekstra kaj maldekstra, diris: “Troviĝas.”

La reĝo diris: “Mi ordonas, ke Yu Ju venu al la kortego vidi min.”

En la sekva tago, Yu Ju alvenis al la kortego.

La reĝo diris: “Kion vi fiŝkaptis?”

Yu Ju respondis: “En mia reto estas kaptita la blanka testudo, ronda je kvin *ĉioj*.”

La reĝo diris: “Oferu tiun testudon.”

La testudo estas alportita. La reĝo aŭ volus mortigi ĝin, aŭ volus lasi ĝin vivanta. – Li ŝanceliĝis je koro, do igis diveni kion fari.

Estas dirite: “Se mortigi la testudon, estos bonsorte.”

La testudo estas disŝirita. Per ĝi oni divenadis sepdek du fojojn, kaj neniam maltrafis

⁵³³ 相引以名, 相結以隱 Mi esperantigis laŭvorte. Laŭ Dostoevskij homoj kunligiĝas, havante komunan sekreton. (*Besy*)

⁵³⁴ 宋元君 Nomo Zuo 佐, postmorta nomo 元. Aperis en la ĉap. 田子方.

sortojn.

Zhongni diris: “La sankta testudo povis aperi en sonĝo de la reĝo, sed ĝi ne povis eviti la reton de Yu Ju. Ĝi povis divenadi trafe sepdek du fojojn sen eraro. Sed ne povis eskapi malfeliĉon je dissekcado de intestoj. Tiel, je scio estas la limo, je spirito estas io neebila. Eĉ havanto de la pleja scio povas esti enkaptita de multaj homoj per intrigo. Fiŝo ne timas reton, sed timas pelikanon. Liberigite el malgranda scio, iĝas klara la granda scio. Liberigite el fiksita ideo pri bono, estiĝas la vera bono. Bebo, naskiĝinte, povos ekparoli sen elstara instruisto, nur se ĝi kune vivas kun iu ajn kapabla paroli.”

Huizi diris al Zhuangzi: “Viaj paroloj estas senutilaj.”

Zhuangzi diris: “Nur komprenante senutilecon, oni povas ekscii la utilecon de parolo. Tero ne estas malvasta, sed granda. Sed punktoj, kiujn homo uzas por treti dum paŝo, estas nur tiom grandaj, kiom piedoj. Malgraŭ tio, se oni fokus teron ĝis la terfundo krom la punktoj de piedoj, ĉu restintaj partoj estus utilaj al la piediranto?”

Huizi diris: “Ne utilas.”

Zhuangzi diris: “Tiel do, estas klare, ke io neuzata estas utila.”

Zhuangzi diris: “Ĉu tiu, kiu povas ludi, povus ne ludi? Ĉu tiu, kiu ne povas ludi, povus ludi? Ĉu strebo al vagado kaj ermitiĝo, aŭ konduto detranĉi, ho, ne estas tasko de persono kun la pleja scio kaj plena virto?”⁵³⁵

Iu stumblas kaj falas, ne revenante. La alia kuregas kvazaŭ fajro, ne rigardante malantaŭen. Kvankam oni fariĝas aŭ estro aŭ subulo unu al la alia, tamen tio estas nur portempe. Ĉar ŝanĝiĝos generacioj, ne necesas malestimi unu la alian reciproke. Tial do estas dirite: ‘La pleja homo ne haltas je sia irado.’

Respekti antikvon kaj malestimi nunon estas maniero de pedanto. Se rigardi la nunon el la vidpunkto de la maniero de Xiwei, ĝi povas ŝajni skuiĝanta kiel ondoj. Nur la pleja homo povas ludi sen devio en la mondo. Li, obeante al la aliaj homoj, ne perdas sin mem. Li ne lernas ilian instruon. Li aŭdas ilian opinion, sed ne apartenas al ili.

Okuloj trapenetas, tio estas klara vidpovo. Oreloj trapenetas, tio estas klara aŭdo. Nazo trapenetas, tio estas akra flarsento. Buŝo trapenetas, tio estas dolĉa gustosento. Koro trapenetas, tio estas perceptpovo. Scio trapenetas, tio estas virto. Ĝenerale, Tao ne volas esti ŝtopata. Ŝtopiĝo estas sufokiĝo. Sufokiĝo estas senĉesa subpremo.

⁵³⁵ 夫流遁之志，決絕之行，噫，其非至知厚德之任與。La propozicio estas tre subtila, ke depende de la kompreno ŝanĝiĝas la fundamenta ideo de Zhuangzi. Mi prenas lastan ideogramon 與 kiel partikulon de kontraŭveraĵo.

Subpremate, estiĝas amaso da damaĝoj.

Estaĵoj, havantaj scipovon, dependas de spirado. Je la malvigleco ne kulpas la Ĉielo. La Ĉielo traboradas ĝin senĉese tagnokte. Kontraŭe, estas la homo, kiu ŝtopas la truojn. Al la korpo apartenas vicoj da malplenaj pordoj. Estas koro, ludanta en la Ĉielo. Se mankas malpleneco en la ĉambro, edzino kaj bopatrino kverelas unu kun la alia. Se la koro ne ludas en la Ĉielo, ses truoj de sensorganoj ekkonfliktas reciproke unu kun la alia inter si. Al homo estas bone en granda arbaro, monteto kaj monto. Ĉar lia spirito ne eltenas la ŝtopiĝon.

Virto elversiĝas en serĉon de renomoj, renomoj elversiĝas en inundan torenton. Intrigo elpensiĝas en senelireja krizo, saĝo elmontriĝas pro konflikto. Abatiso naskiĝas en defendo.

Aferoj de administrado estas farataj flate al konveno de popolamaso. En printempo, kiam pluvos kaj sunas, herboj kaj arboj ekkreskas furioze. Oni ekkulturas kun hojoj kaj plugiloj. Sed herboj kaj arboj denove kreskas subite, dum oni terkulturas nur duonon, tamen oni ne scias kial.

Se teni sin trankvila, eblas resaniĝi. Se masaĝi ĉirkaŭon de okuloj, eblas moderigi maljuniĝon. Kvieto ebligas haltigi maltrankvilon. Sed tiuj rimedoj estas por laborantoj. Por ripozantoj ili ne necesas, do preterlasataj sen demandi. Pri kio sanktuloj zorgas streĉite por la mondo, tion dieca homo preterlasas sen demani. Pri kio saĝuloj zorgas streĉite por la generacio, tion preterlasas sen demandi la sanktuloj. Pri kio nobluloj zorgas streĉite por la regnoj, tion la saĝuloj preterlasas sen demandi. Pri kio malgranduloj zorgas por konformiĝi al tempo, tion la nobluloj preterlasas sen demandi.

Iam apud la pordo Yan de Song-regno loĝis iu homo, kies patro mortis. Li bone maldikiĝis pro malsato por esprimo de fila pietato, do li, laŭdate, estas enoficigita kun rango. Sekve, duono da samvilaĝanoj mortis pro malsato.

Yao volus transdoni al Xu You la mondon, sed Xu You fuĝis. Tang volus transdoni la tronon al Wu Guang, sed Wu Guang ekkoleris. Ji Tuo, aŭdinte tion, foriris kun siaj disĉiploj al la rivero Kuan por kaŝi sin. Landestroj alvenis por konsoli lin dum tri jaroj. Shentu Di pro la sama kialo ĵetis sin en riveron.⁵³⁶

Naso ekzistas por kapti fiŝon. Post kiam la fiŝo kaptita, oni jam forgesas la nason. Klapo ekzistas por kapti leporon. Kaptinte leporon, oni jam forgesas la klapon. Vorto ekzistas por kapti signifon. Kaptinte signifon, oni jam povas forgesi la vorton. Kiel ajn mi dezirus renkontiĝi kun iu, kiu povas forgesi vorton, kaj interparoli kune kun li.”

⁵³⁶ 務光, 紀他, 申徒狄 aperas en la ĉap. 大宗師 kiel durkapaj, ne sciantaj kiel ĝui la vivon. Ili estis similaj al mortintoj pro malsato, imitante filan pietaton.

27 PARABOLOJ

En ĉi tiu verko, naŭ dekonoj konsistas el paraboloj, sep dekonoj – el historiaj anekdotoj, kaj la aliaj – el spritaĵoj, eldirataj ĉiutage kiel sintezo per la Ĉiela Perspektivo. Naŭ dekonoj da paraboloj mi priparolis, prunteprenante el eksteraj fontoj. Patro mem ne aranĝas geedziĝon por sia filo, ĉar laŭdado far de patro ne superas la faratan de la aliulo, kiu ne estas la patro. Tial do je la uzado de paraboloj kulpas ne mi, sed la aliuloj. Se ilia opinio estas sama kun mia, mi konsentas, se malsama, mi kontraŭas. Se samas kun mi, mi jesas, se malsamas, mi neas.

Sep dekonoj da anekdotoj estas diritaĵoj far de veteranoj-antaŭirintoj, ne de tiuj, kiuj nur maljuniĝis sen preciza logiko kaj ne indas al nomo de antaŭirintoj. Tiu, kiun ne indas nomi antaŭirinto, ne estas persono de Tao. Ne persono de Tao estas nomata ‘banalulo’.

La spritaĵoj, eldirataj ĉiutage kiel sintezo per la Ĉiela Perspektivo, ĉar etendiĝas universe, tial daŭras vivi jarojn senfine.⁵³⁷

Ne pere de vortoj estas atingita la konkordo. Konkordo per vortoj ne estas vera konkordo. Vortoj kun konkordo ne estas vera konkordo. Tial do estas dirite: ‘Sen vorto aŭ senvorta parolo. Eĉ se paroladi tutan vivon, tio povas esti samkiel ankoraŭ ne parolis. Eĉ se tutan vivon ne parolis, tio povas esti samkiel neniam ankoraŭ ne parolis.’⁵³⁸

Estas en parolado per si mem, io allasebla. Estas per si mem io neallasebla. Estas per si mem, io natura. Estas per si mem io nenatura. Kiel je natureco oni konsideras naturon natura? Kiel je nenatureco oni konsideras nenaturon nenatura? Kiel je allasebleco oni konsideras la allaseblan allasebla? Kiel je neallasebleco oni konsideras la neallaseblan neallasebla? Aĵoj principe havas ion naturan. Aĵoj principe havas ion allaseblan. Estas neniu aĵo, ne havanta naturon. Estas neniu aĵo, ne havanta ion allaseblan.

Se spritaĵo, eldirata ĉiutage, ne harmonius kun la Ĉiela Observado, kiel ĝi povus havigi al si la eternecon? Ĉiuj aĵoj estas semoj. Ili ne estas samaj je la formo, sed cedas lokojn unu al la alia reciproke, sen komenco sen fino kiel cirklo, ne distingante la limon. Tio estas nomata ‘Ĉiela Ekvilibro’. La Ĉiela Ekvilibro estas sama, kiel la Ĉiela Observado.”⁵³⁹

⁵³⁷ 卮 signifas pokalon por vino.

⁵³⁸ 無言, 言無言, 終身言未嘗言, 終身不言未嘗 La frazojn estas malfacile traduki. Prove mi tradukis laŭlitere. Laŭ mia kompreno, la frazoj signifas, ke la vorto dirita aŭ skribita estas nur aproksimaĵo al substanco.

⁵³⁹ 天均是天倪 En la ĉap. 齊物 aperas la termino 天均.

Zhuangzi diris al Huizi: “Ĝis kiam Kongzi fariĝis 60-jara, li ŝanĝiĝis 60 fojojn. Kion li opiniis prava en la komenco, tion li neis en la fino. Kion li nun konsideras jesa, ĉu tio, ne estas sciata, estus rezulto post la neado de 59 fojoj, aŭ ne.”

Huizi diris: “Kongzi diligentis, sekvante la strebon, por scii.”

Zhuangzi diris: “Kongzi forĵetis tion. Sed tamen li neniam diris pri tio. Kongzi diris: ‘Mi ricevis la kapablon el de Granda Fonto, do mi redonas tien la spiriton, kaj renaskiĝos. Tiam kio sonas, tio konformas al muzika tono; kion diras, tio trafas la leĝon. Profito kaj justo estas banalaj antaŭ tio. Ankaŭ rilate al la ŝato-malŝato aŭ praveco-malpraveco, nur simple obeu al buŝoj de homoj kaj tiel eblas igi homojn sekvi vin elkore kaj ili ne aŭdacos kontraŭstari al vi. Tiel estos starigita la monda stabileco.’

Ni ĉesu, ni ĉesu! Ni neniel povas atingi lin.”⁵⁴⁰

Zengzi estis du fojojn enoficigitaj kaj lia koro du fojojn ŝanĝiĝis.

Li diris: “Mi enoficiĝis dum miaj gepatroj vivis kun mia salajro je nura tri *fu* da greno. Poste mi estas enoficigita kun salajro je tri mil *chong*, sed mi sentas min malpli feliĉa ol antaŭe, kaj malĝojas.”⁵⁴¹

Iu disĉiplo demandis Zhongni, dirante: “Persono, kiel Zeng Shen, eblas nomi homo senriproĉa, havante nenion penti, ĉu ne?”

Zhongni diris: “Li jam havas ĉe si ion penti. Ĉu tiu, kiu havas nenion penti, povus malĝoji? Por li rigardi da salajroj tri *fu* aŭ tri mil *chong*, estas tute egale al tio, ke vidi antaŭ si grupon aŭ paseon, kulon aŭ tabanon, trapasantaj.”⁵⁴²

Yan Cheng Ziyou diris al Dongguo Ziqi⁵⁴³: “Post kiam mi ekaŭdis vian parolon, en la unua jaro mi estis kruda, en la dua jaro mi iĝis obeema, en la tria jaro al mi estiĝis kapablo komunikiĝi, en la kvara jaro mi komprenis min konsistanta el aĵoj, en la kvina jaro mi perceptis ion alvenanta, en la sesa jaro mi sentis Spiriton eniranta min, en la sepa jaro sentis la Ĉielon efektiviĝanta, en la oka jaro mi eksciis nek morton nek vivon, en la naŭa jaro mi eksentis grandan misteron. La vivo ekzistas por la morto. Konsili al duko per sia morto povas esti nature. Vivi sub la suno povas esti nenature. Ĉu vere estus tiel diri? Kiam tio konformas al realo, kaj kiam ne konformas?”

⁵⁴⁰ Mi prenas ideogramon 吾 kiel pluran ‘ni’.

⁵⁴¹ Unu 鍾 *chong* (ĉirkaŭ 40 litroj) egalas al 4 釜 marmitoj.

⁵⁴² 曾參 disĉiplo de Konfuceo, fama je sia fila pietato. Esploristoj diversas je kompreno de ĉi tiu rakonto. Mi komprenas, ke ĝojo kaj malĝojo ne dependas de kvanto de salajro.

⁵⁴³ 顏成子遊, 東郭子綦 aperas en la ĉap. 齊物篇, kaj en la ĉap. 徐無鬼 aperas dialogo inter 顏成子遊 kaj 南郭子綦.

La Ĉielo havas la ciklon kaj la nombrojn, sur la tero estas la bazo por ekzistado de homoj. Kie do ni devas serĉi la principon? Al ni ne eblas scii pri la fino, do, se tiel, kiumaniere troveblus neekzistado de la Ĉiela ordono? Al ni ne eblas scii pri la komenco, do, se tiel, kiumaniere troveblus la ekzistado de la Ĉiela ordono? Troveblas iam nedisigebla korelacio de rekompensa kaŭzeco, do, se tiel, kiumaniere oni povus konstati neekzistadon de Spiritoj? Iam ne troviĝas korelacio, do, se tiel, kiumaniere eblus konstati ekzistadon de Spiritoj?”

Duonombro demandis Ombron, dirante: “Vi antaŭe mallevis kapon, sed nun levis. Antaŭe viaj haroj estis aranĝitaj, sed nun malaranĝiĝis. Vi antaŭe sidis, sed nun staras. Vi antaŭe iris, sed nun haltis. Kial?”

La Ombro respondis: “Vi ĉikanas kaj ĉikanas. Kia fidemandeto! Mi havas neniun scion pri tio. Malplena ŝelo de cikado kaj malplena haŭto de serpento similas al mi, sed ne samas. Kun fajro kaj kun suno mi estiĝas, sed kun mallumo kaj kun nokto mi malaperas. Do kun ili mi havas interrilaton, atendante ilin. Kiel mi atendas ilin? Kiam ili venas, ankaŭ mi venas. Kiam ili foriras, ankaŭ mi foriras. Kiam ili forte lumas, ankaŭ mi forte figuras. Kial vi bezonas demandi min pri tio?”

Yang Ziju vizitis la sudan urbon Pei.⁵⁴⁴ Lao Dan jam estis veturanta okcidenten al Qin-regno. Yang Ziju direktis sin al Liang kaj suburbe li renkontiĝis kun Laozi. Laozi meze de la vojo suprenrigardis la ĉielon kaj diris, suspirante: “Komence mi taksis vin inda instrui, sed nun mi ne povas.”

Yang Ziju respondis nenion kaj revenis al sia tranoktejo, lavis sin en pelvo, gargaris, viŝis sin per viŝtuko, kombis al si harojn. Turnante sin al Laozi, li demetis siajn ŝuojn ekstere, iris genuopaŝe, kaj diris al Laozi: “Antaŭe mi, kiel lernanto, dezirus peti de vi instruon, sed vi ne havis tempon dum irado, do mi ne aŭdacis demandi. Nun vi estas libera, mi volus demandi vin pri la kialo de via lasta eldiro.”

Laozi diris: “Kun okuloj majestaj kaj oblikvaj, vi tenas vin aroganta. Kiu do volus sidi kune kun vi? La Venuso ŝajnas humila, kvazaŭ hontigite. La plena virto ŝajnas nesufiĉa.”

Yang Ziju reĝustigis sin, ŝanĝinte sian mienon, kaj diris: “Mi respektplene aŭskultis vian instruon.”

Unuafoje, kiam li venis al gastejo, la gastejanoj akceptis lin ĝentile, la mastro mem pretigis la sidkusenon al li, kaj mastrino alportis tukon kaj kombilon. Iuj gastoj evitis

⁵⁴⁴ 陽子居 estas supozata fama pensulo Yang Zhu 陽朱. Laozi loĝis en la urbo 沛 Pei, nuna 徐州. 梁 Liang estis la ĉefurbo de Wei-regno 魏.

proksimajn sidkusenojn kaj aliaj ne proksimiĝis al forno por varmigi sin. Sed post lia reveno de la vizito, la gastoj konkurence kun li estis prenantaj por si sidkusenojn.

28 CEDI LA TRONON

Yao volus cedi la mondon al Xu You, sed Xu You ne akceptis. Do, Yao provus cedi ĝin al Zizhou Zhifu. Zizhou Zhifu diris: “Eblus fari min la Ĉiela filo. Sed mi hazarde malsaniĝis je spleno. Mi devas ĝuste kuraci la malsanon, do ne havas tempon por regi la mondon. Kvankam la mondo estas tre grava, tamen pro tio oni ne devus damaĝi sian vivon. Des pli pro aliaj aĵoj. Sed kiu rigardas la mondon nenio, al tiu oni povas konfidi la mondon.

Shun dezirus cedi la mondon al Zizhou Zhibo. Zizhou Zhibo diris: “Min trafis la malsano de spleno, do mi devas ricevi kuracon. Al mi ne estas tempo por regi la mondon, ĉar la mondo estas granda aparato. Mi ne povas anstataŭigi la vivon per tio.”

Jen malsamas la persono de Tao ol vulgaraĵoj mondanoj.

Shun volus cedi la mondon al Shan Quan. Sed Shan Quan diris: “Mi staras en la universo. En vintro mi vestiĝas per felo kaj pelto, en somero – per puerario. En printempo mi terkulturas kaj semas, laborante per korpo. En aŭtuno mi rikoltas, sufiĉe nutras kaj ripozigas korpon. Kun sunleviĝo mi laboras kaj kun sunsubiro ripozas. Mi vagadas inter la Ĉielo kaj la tero. Mia koro kaj volo estas plena de memkontento. Kiel mi povus fari iun ajn aferon de la mondo? Bedaŭrinde, vi ne komprenas min.”

Finfine li ne akceptis kaj, foririnte, eniris en la profundan monton, ne sciate kien.

Shun volus cedi la mondon al sia amiko, kamparano de Ŝtona Pordo. Tiu kamparano de la Ŝtona Pordo diris: “Vi, laborema diligentulo, estas persono de forta penado.”

Li taksis la virton de Shun ankoraŭ ne kompleta. Tiel do li kune kun sia edzino, portante infanojn, foriris al maro, kaj ĝis la morto ne revenis plu.

La Granda Reĝo, Danfu, loĝis en Bin.⁵⁴⁵ Barbaroj de Di-tribo atakis ĝin.⁵⁴⁶ Danfu proponis felojn-peltojn kaj silkojn, sed Di ne ricevis. Proponis hundojn kaj ĉevalojn, sed ne ricevis. Proponis perlojn kaj jadojn, sed ne ricevis. Ĉar barbaroj de Di postulis la teron.

La Granda Reĝo, Danfu, diris: “Mortigi malgrandajn fratojn por ke mi postvivu kun

⁵⁴⁵ 亶父 prapatro de la Reĝo Wen, fondinto de Zhou-dinastio. Bin 邠 situis sudokcidente de nuna 旬邑 en Shanxi prov..

⁵⁴⁶ 狄 unu tribo de 匈奴.

iliaj grandaj fratoj, kaj mortigi filojn por ke mi postvivu kun iliaj gepatroj, estas ne elteneble al mi. Vi ĉiuj restu ĉi tie daŭre loĝi. Esti mia subuloj aŭ esti subuloj de Di estos tute same. Kia diferenco? Mi aŭdis jenon: ‘Ne damaĝu nutratojn por ilo nutranta.’⁵⁴⁷

Li, apogante sin sur bastono, forlasis la regnon. La popolo kune postsekvis lin. Kaj ili konstruis regnon sub la monto Qi.⁵⁴⁸

Endas diri, ke la Granda Reĝo, Danfu, povis estimi la vivon. Kiu povas estimi la vivon, tiu, kvankam nobla kaj riĉa, ne damaĝas sin mem, kiel viktimon por ilo nutranta. Kvankam malriĉa kaj mizera, li ne afliktas sian korpon, kiel viktimon por profito.

Nuntempuloj, starante altaj je posteno kaj esitmante rangojn, ĉiuj perdas ion gravan. Vidante profiton, ili malestimas la perdiĝon de sia korpo. Ĉu tio ne estas perturbo?

Yue-landanoj mortigis la reĝojn de tri generacioj. Princo Sou, ĉagreniĝinte pri tio, eskapis al la kavo, nomata Dan.⁵⁴⁹ Do en Yue-lando ne eskzistis reĝo. Oni serĉadis la princon Sou sed ne povis trovi lin. Sekve oni trovis lin ĉe la kavo de Dan. Sed la princo ne konsentis eliri de tie. Yue-landanoj fumpelis lin per artemizio, kaj sidigis lin sur reĝan kaleŝon. La princo Sou rajdis supren laŭ ŝnuro.

Li, supren rigardante la Ĉielon, kriis: “Ho ve, reĝo, reĝo! Kial oni ne povus lasi min libera?”

La princo Sou ne malamis fariĝi reĝo, sed malamis aflikton de reĝo. Eblas diri, ke tia reĝo, kiel la princo Sou, ne damaĝas sian vivon pro regnopotenco. Tial do Yue-landanoj deziris fari lin sia reĝo.

Regnoj de Han kaj Wei konfliktis iu kun la alia pro peco de teritorio. Majstro Huazi vidis markizon Zhaoxi.⁵⁵⁰ La markizo Zhaoxi havis ĉagreniĝintan mienon.

La Majstro Huazi diris: “Supozu, ke nun antaŭ vi estas metita la dokumento por subskribi. Sur la dokumento estas skribite: ‘Kiu ekprenos ĉi tiun per sia maldekstra mano, tiu perdos sian dekstran manon. Kiu ekprenos ĉi tiun per sia dekstra mano, tiu perdos sian maldekstran manon. Sed kiu ekprenos ĝin, al kiu nepre estos donita la tuta imperio.’ Ĉu vi povus ekpreni ĝin?”

La markizo Zhaoxi diris: “Mi ne ekprenos.”

⁵⁴⁷ 不以所用養害所養. Ilo nutranta signifas teron.

⁵⁴⁸ 岐山 nord-oriente de nuna Qi-shan en Shanxi provinco.

⁵⁴⁹ Laŭ Pi Yuan 畢沅, en 449 a. K. estis mortigita 不寿, en 376 a. K. – 子翳, en 364 a. K. – 無余. Yu Yue 俞樾 konjektas, ke 無顛 estas la princo Sou 搜.

⁵⁵⁰ 子華子 aperas en la ĉap. 則陽. Pri lia penso pri graveco de la korpo estas skribite en 呂氏春秋. Ĉe *Mozi* estas simila argumento. 昭僖侯 estas 昭侯 (surtrone 362-333 a. K.) de Han-regno 韓.

La Majstro Huazi diris: “Tre bone. Se tiel vidi la situacion, ambaŭ brakoj estas pli gravaj ol la tuta imperio. La korpo estas multe pli grava ol ambaŭ brakoj. Han-regno estas multe malpli grava ol la tuta imperio. Koncernante la nunan konflikton, ĝi estas multe malgrava al Han-regno. Vi ĉagrenas vin tiom, ke vi damaĝas vian vivon, malgraŭ ke ne akireblas la peco per via ĉagrenego.”

La markizo Zhaoxi diris: “Bone dirite. Multe da homoj instruis min, sed mi ankoraŭ ne aŭdis tian opinion. Eblas diri, ke la Majstro Huazi scias diferencon de graveco kaj malgraveco.”

Reĝo de Lu-regno aŭdis, ke Yan He estas persono de Tao, kaj sendis unue subulon kun donaco al li.⁵⁵¹ Yan He loĝis en sia domaĉo sur mizera angulo, vestante sin en kanabo kaj bredante bovon.

La sendito diris: “Ĉu tiu ĉi estas domo de s-ro Yan He?”

Yan He respondis: “Jes, ĝi estas la domo de He.”

La sendito donintus al li la donacon.

Yan He diris al li: “Eble, iu erare aŭdis la nomon. Mi timas, ke la sendito estu kulpigita pro tio. Estas pli bone, ke oni esploru skrupule.”

La sendito revenis por konstati, kaj denove alvenis viziti lin. Sed tamen li jam ne povis trovi lin. Homo, kiel Yan He, vere malŝatas riĉon kaj rangon.

Estas dirite, ke vero de Tao kuŝas ĉefe en la regado de memo je la korpo. Sekve per la restaĵo oni regas la regnon, kaj sekve per superflua feĉo oni regas la mondon. El tiu vidpunkto, afero de reĝo kaj imperiestro estas nur superfluaĵo por sanktulo. Ĉar je la afero ne eblas kompletigi la korpon kaj nutri la vivon.

Nun ordinaraĵoj en vulgara mondo plejparte endanĝerigas sian korpon kaj forĵetas sian vivon, dediĉante sin al aĵoj. Kia tragedio! Ĝenerale je sia konduto sanktuloj pripensas rezonon de sia estado kaj rezonon de sia ago.

Ekzemple, supozu, ke nun ĉi tie troviĝas iu homo, kiu estas pafanta per kugloj el perloj de markizo Sui paserojn, flugantajn alte je mil *renoj*. Mondanoj, vidante tion, nepre mokridus lin. Kial? Ĉar la ilo estas pli grava, kaj la celo estas malpli grava. La vivo estas multe pli grava ol la perlo de markizo Sui.⁵⁵²

Majstro Liezi vivis en la fundo de mizero. Lia mieno havis malsatiĝinan koloron. Iu gasto diris tion al s-ro Zi Yang, ministro de Zheng-regno: “Lie Yukou estas kvankam persono de Tao, tamen en via regno vivas en ekstrema mizero. Ĉu al vi ne plaĉus bona

⁵⁵¹ 顏闔 Lu-regnano, ermito, aperas ankaŭ en la ĉap. 人間世.

⁵⁵² 隨侯之珠 Legenda perlo, kiun la markizo Sui ricevis de serpenteo.

personeco?”⁵⁵³

Zi Yang de Zheng-regno tuj ordonis sendi al li grenojn. La Majstro Liezi renkontis la senditon, riverencadis lin, kaj rifuzis ricevi la donacon. La sendito foriris.

La Majstro Liezi eniris domon, lia edzino kun rankoro, batante la bruston, diris: “Mi aŭdis, ke edzino kaj gefiloj de persono, strebanta al Tao, ĉiuj havigus al si komforton kaj plezuron, sed tamen nun havas malsatiĝintan mienon. La ministro, sciiĝinte sian eraron, sendis al vi ion por manĝi. Sed vi ne akceptis. Ĉu tio ne estas la Ĉiela ordono?”

La Majstro Liezi, ridante, diris: “S-ro ministro mem ne konas min, li nur tra alies eldiro sendis al mi grenojn. Kiam mi estus kulpigota, li ankaŭ per alies eldiro punos min. Tial do mi ne akceptis.”

Finfine, popolanoj ekribelis kaj mortigis la ĉefministron Zi Yang.

Kiam Zhao, la reĝo de Chu-regno perdis la regnon, iu ŝafobuĉisto Yue fuĝis, sekvante la reĝon Zhao.⁵⁵⁴ Post kiam la reĝo revenis hejmen al sia regno, li zorgis rekompenci sekvintojn por lojaleco. Estas inkluzivita ankaŭ la ŝafobuĉisto Yue.

La ŝafobuĉisto Yue diris: “La Granda reĝo perdis la regnon, kaj samtempe mi perdis ŝafojn. La Granda reĝo reprenis la regnon, ankaŭ Yue reprenis la ŝafojn. T. e., rango kaj salajro de subulo jam estas restarigitaj. Kiun rekompencon vi menciis?”

La reĝo ordonis: “Ricevigu al li.”

La ŝafobuĉisto Yue diris: “En tio, ke la Granda reĝo perdis la regnon, mi ne estas kulpa, do mi ne aŭdacis ricevi akuzon. En tio, ke la Granda reĝo reprenis la regnon, mi meritis nenion, do mi ne aŭdacas ricevi la rekompencon.”

La reĝo diris: “Mi mem renkontos lin.”

La ŝafobuĉisto Yue diris: “Laŭ la leĝo de Chu-regno estos nepre multe laŭdata la grandaj merituloj, kaj nur poste eblos ricevi aŭdiencon ĉe la reĝo. Mia nuna scio ne sufiĉas por subteni ekzistadon de la regno, mia kuraĝo ne sufiĉas por rezisti kontraŭ malamika invado. Kiam armeo de Wu-regno eniris en la ĉefurbon Ying, mi ektimis malfacilon kaj eskapis ĉe malamika invado. Tial do mi ne sekvis vin, Via Moŝto. Nun via Moŝto volus kontraŭi al la leĝo kaj detruu la regulojn por aŭdienci min. Pro tio mi, kiel subulo, ricevus riproĉon, se pri tio estus aŭdate de la mondo.”

La reĝo diris al Sima Ziqi⁵⁵⁵: “Ŝafobuĉisto Yue estas nenobela laŭ deveno kaj loĝloko,

⁵⁵³ 列子, 列禦冠 La sama epizodo estas en la *Liezi* kaj *Lüshi Chunqiu*. 子陽 estis ĉefministro de Zheng regno 鄭, mortigita en 398 a. K. Laŭ alia fonto 积文 li estis mortigita de siaj subuloj per hundoj.

⁵⁵⁴ 楚王昭 Zhao estis surtrone 515-489 a. K., en 506 a. K. atakite de armeo de Wu Zi Xu 伍子胥, li fuĝis, sed en la sekva jaro revenis.

⁵⁵⁵ 司馬子綦 Maljuna frato de la reĝo Zhao laŭ malsama patrino, estis mortigita dum

tamen li eldiras justecon tre altan. Anstataŭ mi, vi promociu lin unu el Tri vasaloj de flagportistoj.”⁵⁵⁶

La ŝafobuĉisto Yue diris: “Pri la rango de Tri vasaloj-flagportistoj, mi scias, ke ĝi estas pli nobla ol mia profesio de ŝafobuĉado. Mi scias, ke la salajro je dek mil *chong* estas pli riĉa ol mia profito el ŝafobuĉado. Sed, per tio, ke mi povus ĝui grandan salajron kaj rangon, via nomo estus malestimita kiel reĝo malŝparema je favorado. Mi ne aŭdacas akcepti la favoron. Mi deziras reveni al mia profesio de ŝafobuĉado.”

Yue finfine malakceptis.

Yuan Xian loĝis en Lu-regno, en dometo malvasta je nur 1 zhang kvadrato⁵⁵⁷, ĉirkaŭita apenaŭ per kvar muraĉoj. Ĝi estis tegmentita per kreskanta herbo. Ne fermiĝas komplete pordetoj el artemizio kun akso el morusujo. Du buŝoj de rompiĝintaj potoj konsistigas fenestrojn por ĉambro, kiujn kovras ĉifonoj. De supre likas, sube humidas. Li, sidante digne, estis ludanta liuton.

Zigong venis, rajdante sur granda ĉevalo. Li vestis sin en robo de blanka silko kun subŝtofo de marista koloro. Lia luksa kaleŝego ne povas eniri en la pordon de strateto. Li piediris vidi Yuan Xian. Yuan Xian kun flora krono⁵⁵⁸ kaj rompitaĵ ŝuoj, apogante sin sur bastono el kenopodio, salutis ĉe la pordo.

Zigong diris: “Ho, sinjoro, je kio vi malsaniĝis?”

Yuan Xian respondis: “Mi aŭdis jenon. Tio, ke ne estas havaĵo, estas nomata ‘malriĉo’. Ke kvankam lernas, tamen ne povas praktiki, tio estas nomata ‘malsano’. Nun mi estas malriĉa, sed ne malsana.”

Zigong, embarasite, mienis, ke li ekhontis.

Yuan Xian ridis, dirante: “Troviĝas iu, kiu kondukas flate al la mondo, faras amikecon kliko, lernas por aliuloj, instruas por sia egoo, faras bonvolecon kaj juston kamufllilo aŭ ornamo de ĉevalo. Mi ne povas elteni tian konduton.”

Zengzi loĝis en Wei-regno.⁵⁵⁹ Li vestiĝis en vatita robo kun forfrotiĝinta surfaco. Lia vizaĝo ĝis gorĝo estis ŝvelinta. Liaj manoj kaj piedoj estis plenaj de kaloj. Tri tagojn

ribele de Bai Gong 白公 en 479 a. K.

⁵⁵⁶ 三旌 Iu esploristo konsideras la rangon egala al Tri dukoj 三公, la alia – al Tri grandoficistoj 三珪.

⁵⁵⁷ Yuan Xian 原憲 unu el disĉiploj de Konfuceo. Estas supozate, ke li verkis la ĉapitron Xian Wen de Analektoj. 堵 estas muro longa je unu *zhang* 一丈, Unu zhang kvadrato estas ĉirkaŭ 5 m². Zigong 子貢 unu el disĉiploj de Konfuceo, kaj li fariĝis riĉulo.

⁵⁵⁸ 華冠 Iu konjektas, ke ĝi estas krono el betulo. Alia – krono kun ŝiraĵo. Mi prove tradukis laŭ litere.

⁵⁵⁹ Zengzi 曾子 unu el disĉiploj de Konfuceo. Wei-regno 衛

sinsekve li ne povas manĝi kuiritaĵon per fajro. Dek jarojn li ne havis ordinaran vestaĵon. Do, kiam li portas kronon, tiam kun ornama ŝnuro de mentonbendo tranĉita; kiam li tiris refaldon, tiam elmontriĝas kubutoj; kiam li metis al si ŝuojn, tiam difektiĝas kalkanumo de ŝuoj. Sed, kiam li, dancopaŝante,⁵⁶⁰ ekkantas la odon de Shang- dinastio, la Ĉielo kaj la tero plenas de liaj voĉoj kvazaŭ elirantaj el bronzoj kaj ŝtonaj muzikiloj.

La Ĉiela filo ne povas fari lin subulo, landestroj ne povas fari lin amiko. Ĉar, kiu nutras la strebon, tiu forgesas la formon; kiu nutras la formon, tiu forgesas profiton; kiu atingas la Taon, tiu forgesas la koron.

Konfuceo diris al Yan Hui: “Nu, Hui, via familio vivas malriĉa kaj humila, kial vi ne enoficiĝos?”

Yan Hui respondis: “Mi ne volas enoficiĝi. Mi posedas en suburbo kampon vastan je 50 *mu*.⁵⁶¹ Tio estas sufiĉa por manĝi porigojn kaj kaĉon. Kaj en urbo estas 10 *mu*. Tio estas sufiĉa por produkti silkon kaj kanabon. Mi estas kontenta ludadi perkutomuzikilon kaj liuton por amuziĝi. Lernado de via Vojo estas sufiĉa por plezurigi min. Mi ne deziras enoficiĝi.”

Konfuceo, kun mieno ŝanĝita, serioze diris: “Tre bona estas via volo! Mi aŭdis, ke, tiu, kiu scias kontenton, ne lacigas sin per serĉado de profito; kiu havigas al si per sia peno, tiu ne timas perdon; kiu kulturas sin mem interne, tiu ne hontas je senrango. Mi dum longe predikas tion. Poste, nun, mi vidas Hui praktikanta tion. Jen kion mi gajnas.”

Princo Mou de Zhongshan-lando diris al Zhanzi: “Mi mem nun estas ĉe la bordo de granda rivero, sed mia koro restas sub la pordo de la palaco en Wei-regno. Kion mi devas fari?”⁵⁶²

Zhanzi diris: “Gravas la vivo. Rigardu la vivon grava, kaj la profiton malgrava.”

Princo Mou de Zhongshan diris: “Kvankam mi scias tion, tamen ne povas konkeri la senton.”

Zhanzi diris: “Se vi ne povas konkeri vin mem, tiuokaze obeu al via memo.”

Mou diris: “Sed, ĉu al spirito tio ne estas malbona?”

Zhanzi diris: “Kiu ne povas konkeri sin mem kaj trudas al si ne obei, tiu damaĝas sin t. n. duoble. Kiu damaĝas sin duoble, tiu ne estas inkludita en la grupon de longevivuloj. Mou de Wei estis la princo de regno granda je dek miloj da militĉaroj. Por vi estas pli

⁵⁶⁰ Multaj esploristoj prenas la esprimon “trene paŝi kun rompiĝintaj ŝuoj”.

⁵⁶¹ 畝 1 *mu* egalas al ĉ. 1. 8 a.

⁵⁶² Mou aperas en la ĉap.

malfacile ermitiĝi en kavo ĉe klifo, ol por ordinaraj senrangaj personoj. Malgraŭ ke vi ankoraŭ ne alvenis al la Vojo, tamen eblas diri, ke vi havas almenaŭ la strebon.”

Konfuceo estis en ekstrema mizerego survoje inter regnoj Chen kaj Cai. Dum sep tagoj li ne manĝis kuiritaĵon per fajro krom trinkaĵo el kenopodio sen ajna greno. La vizaĝkoloro iĝis treege marasma. Sed li kun liuto estis kantanta en sia ĉambro.

Yan Hui kolektis menĝeblan herbon, dume Zilu kaj Zigong babilis kune, dirante: “La Majstro estas denove elpelita el de Lu-regno. En Wei-regno oni forviŝis eĉ liajn piedsignojn. En Song-regno oni hakis la arbon, sub kiu li ripozis. Sur la teroj de Zhou kaj Shang li falis en mizeron. En Chen kaj Cai oni sieĝas lin. Tiuj, kiuj provis atenci la Majstron, estis pardonitaj, ne punate. Kiuj molestas la Majstron, al tiuj estas ne malpermesate fari tion. Spite ĉion ĉi tion, li kun muzikiloj kantas, tamburas kaj ludas liuton, neniam ĉesigante la sonon de muziko. Jen kiomgrade la noblulo ne hontas!”

Yan Hui ne respondis al ili. Enirinte, li raportis al Konfuceo.

Konfuceo flankenpuŝis la liuton, sopirĝemis kaj lamentis, dirante: “Kiaj bagateluloj estas You-ĉjo kaj Ci-ĉjo! Alvoku ilin veni ĉi tien. Mi parolos al ili.”

Zilu kaj Zigong eniris. Zilu diris: “Eblas nomi ĉi tiun situacion ekstrema mizero, ĉu ne?”

Konfuceo diris: “Kion vi diras? Koncerne la noblulon, se la Vojo-Tao estas malfermita, tiam direblas, ke estas malfermite, se la Vojo-Tao estas fermita, nur tiam direndas, ke estas fermita per mizero. Nun mi, kun la Vojo-Tao de bonvolenco kaj justo, renkontas aflikton de senorda mondo. En kia mizero mi estas? Se retrospekti sin interne, rilate al la Vojo-Tao mi estas en neniua mizero. Ĉe malfacilo la virto ne estas perdita. Spite ke la vetero estas treege malvarma kun prujno kaj neĝo, mi scias, ke plenkreskas la pino kaj kverko pli kaj pli. Ŝtopiĝo en Chen kaj Cai estas por mi feliĉo.”

Konfuceo, denove reprenante liuton, daŭrigas kanti. Ankaŭ Zilu, akompanante, tuj ekdancis kun halebardo en mane.

Zigong diris: “Mi ne scias la Ĉielon kiom alta, nek la teron kiom profunda. Kiu atingis la Vojon-Taon antikvan, al tiu mizero estas plezuro kaj ankaŭ feliĉo estas plezuro. Troviĝas plezuro ĉie, tute egale, kie ajn ne estas mizero aŭ feliĉo. Se laŭ la Vojo-Tao kaj la virto, tiukaze mizero kaj feliĉo estas samkiel nura veterŝanĝo, t. e. malvarmo, varmo, vento, pluvo. Tial do Xu You ĝuis norde de la rivero Ying, kaj Gong Bo akiris kion deziris sur la pinto de monto Gong.”⁵⁶³

⁵⁶³ 共伯 persona nomo estas 和 (surtrone 841-828 a. K.) post la reĝo Li de Zhou 厲王 li estis surtronigita de landestroj. Per lia nomo politika reĝimo nomiĝas respubliko 共和.

Shun volus cedi la mondon al sia amiko, Wu Ze, loĝanta norde. Wu Ze de nordo diris: “Kiel stranga vi estas je personeco. Antaŭe vi terkulturis en la kampo, kaj poste vi envagadis en la pordon de Yao, kaj ne ĉesas per tio. Vi dezirus malhonori min per hontinda konduto. Mi hontas vidi tion.”

Tial do Wu Ze ĵetis sin profunden en la pure-malvarman akvon.⁵⁶⁴

Tang intencis ataki Jie. Li turnis sin al Bian Sui por konsiliĝi pri intrigo. Bian Sui diris: “Tio ne estas mia afero.”

Tang demandis: “Kiu do povas?”

Respondis: “Mi ne scias.”

Tiel Tang iris al Wu Guang por konsiliĝi je la intrigo.

Wu Guang diris: “Tio ne estas mia afero.”

Tang demandis: “Kiu do povas?”

Respondis: “Mi ne scias.”

Tang diris: “Kia estas Yi Yin?”

Respondis: “Li estas forta kaj povas elteni honton. Krom tio mi ne scias.”

Tang finfine, konsiliĝante kun Yi Yin, konspiris renversi Jie kaj venkis. Poste Li volus cedi la tronon al Bian Sui.

Bian Sui rifuzis, dirante: “Kiam vi proponis al mi konspiri por renversi Jie, vi intencis nepre fari min perfidulo al dinastio. Post la venko al Jie, vi proponas cedi al mi la tronon, por ke mi nepre estu rigardata kiel avidulo. Mi naskiĝis en senorda mondo. Nun, persono sen Vojo-Tao turnas sin denove al mi por malhonori min per hontinda konduto. Mi ne povas elteni aŭdi tion.” Kaj li, forĵetinte sin en la riveron Chou, mortis.

Tang volus cedi la tronon al Wu Guang, dirante: “Intelektulo konspiras renversi reĝimon, bravulo realigas tion, kaj persono de bonvoleco regas la mondon. Tia estas la Vojo-Tao de antikvo. Kial vi ne surtroniĝos?”

Wu Guang rifuzis, dirante: “Detronigi la supron estas maljuste. Mortigi la popolon estas ne bonvoleco. Se la alia homo faris la krimon kaj mi ĝuus la profiton, tio estas ne pura. Mi aŭdis, ke estas dirite: ‘De tiu, kiu ne estas justa, oni ne devas ricevi salajron. La mondon, kie ne estas Vojo-Tao, oni ne devas enpaŝi, nek surtreti la teron.’ Ĉu vi respektas min, vi diras? Mi ne povas elteni pli longe vidi vin.”

Tiel do, li mergiĝis kun ŝtono en la riveron Lu Shui.⁵⁶⁵

⁵⁶⁴ 北人無擇 Unu ek amikoj de Yao, posta sankta reĝo. 清冷 Iu konsideras ĝin lokonomo.

⁵⁶⁵ 湯, 天乙 Tang, fondinto de Yin-dinastio. 桀 Jie, lasta reĝo de Xia-dinastio. 卞隨. 瞽光 legendaj ermitoj.

Antaŭ longa tempo, kiam leviĝis Zhou-dinastio, vivis en Guzhu du personoj, nomataj Bo Yi kaj Shu Qi. Ili ambaŭ diris unu al la alia: “Ni aŭdis, ke okcidente estas iu homo, simila al posedanto de Vojo-Tao. Prove ni iru vidi lin.”

Tiel do ili alvenis al nordo de monto Qi. Reĝo Wu, aŭdinte tion, sendis sian fraton Dan vidi ilin. Traktante kun ili, Dan diris, ke ili estos postenigitaj en la unua klaso kun salajro de la dua klaso kaj li ĵuros tion per sango de oferaĵo, enterigonte la ĵuron.

Ambaŭ Bo Yi kaj Shu Qi ekridis, vidante unu la alian, kaj diris: “Ho, Ne! Tio ne estas la Vojo-Tao, nomata de ni. Kiam antikve regis la mondon Shennong, li oferadis laŭ sezonoj kun la pleja respekto, sed tamen ne preĝis por sia feliĉo. Kiel personeco, li estis lojala kaj fidinda, okupiĝis pri la regado kaj nenion postulis. Li ĝuis nur ĝustan politikon por ĝusta politiko, ĝuis regadon por la regado. Li perfektigis sin ne per detruo de la aliaj, altigis sin ne per malaltigo de la aliaj. Li profitigis sin ne per hazarda fortuna de tempo.

Nun, Zhou, vidante malordon en Yin-dinastio, subite ekfaris ĝustigan politikon. Suproj intrigas, suboj komercas. Apogante sin sur arma forto, oni tenas majestecon. Oni faras interkonsenton per tranĉo de oferaĵo fidinda. Oni per agitado de atingitaĵo ĝojigas la popolamason. Oni kvazaŭ vetlude gajnas profiton per mortigo de malamikoj. Tio estas nur anstataŭigi tumulton per perforto.

Ni aŭdis, ke antikvaj personoj ne evitis plenumadon de taskoj en la bone regata mondo, kaj en tumulto ili ne alkroĉiĝis al sia ekzistado. Nun la mondon regas mallumo. Virto malfortiĝis en Zhou-dinastio. Al ni estas preferinde eskapi de ci tie kaj foriri rezolute, ol ŝmiri nin mem per malpuraĵo, konformigante nin al Zhou.”

Ambaŭ du iris norden, atingis la monton Shouyang. Finfine ili malsatis kaj mortis. Bo Yi kaj Shu Qi, rilate al riĉaĵo kaj posteno, estis kontentaj nur je tio, ke eblus ricevi. Ili nepre ne apogis sin al legitimilo de alta rango nek kontraŭis al si je konduto. Ili nur ĝuis sian strebon. ne flatante al la mondo. Tio estis ilia legitimilo.⁵⁶⁶

⁵⁶⁶ Guzhu 孤竹 estas nomo de la lando, kie Bo Yi kaj Shu Qi 伯夷叔齊 loĝis kiel princoj. Qi 岐陽 estis ĉefurbo de Zhou. 不賴高節 Mi prenas la ideogramon 節 kiel legitimilon, spite ke multaj esploristoj prenas ĝin por principo.

29 RABISTO ZHI

Konfuceo amikiĝis kun Liuxia Ji. Juna frato de Liuxia Ji nomiĝas Rabisto Zhi. Lin sekvis naŭ mil subuloj. La bando feroce ĉirkaŭvagadis la mondon, invade atakadis landestrojn, trude eniradis ĉambrojn, detruante pordon, kaj ŝteladis alies bovojn kaj ĉevalojn, forprenadis alies virinojn. Estante avida, Zhi forgesis siajn parencojn, ne zorgis pri siaj patro, patrino kaj fratoj, nek festis por prapatroj. Kiam la bando trapaŝadis lokojn, se grandan landon, popolanoj defendis sin en la urbo, se malgrandan, loĝantoj fermis sin en la fortikaĵo. Multe da popolanoj suferis pro la bando.

Konfuceo diris al Liuxia Ji: “Se patro, li nepre povas admoni sian filon, se frato, li nepre povas instrui malpliĝan fraton. Se la patro ne povus admoni sian filon, se la frato ne povus instrui sian malpliĝan fraton, neniiĝus valoro de parenca rilato inter patro kaj filo, inter fratoj. Nun vi estas kapabla persono en la mondo. Via frato estas rabisto Zhi. Li damaĝas la mondon. Se vi ne povus instrui lin, mi kaŝe supozas, ke vi hontas pri tio. Mi petas, permesu al mi iri anstataŭ vi admoni lin.”

Liuxia Ji diris: “Vi diris, ke se patro, li povas nepre admoni sian filon, se frato, li povas nepre instrui sian malpliĝan fraton. Sed se la filo ne aŭskultas admonon de patro, se la frato ne akceptas instruon de pliĝa frato, tiuokaze kion fari, laŭ via nuna konsilo? Aldone, personeco de Zhi estas tia, ke lia koro bolas kvazaŭ akvofonto kaj lia volo furiozas kvazaŭ ventego. Li estas sufiĉe forta por repuŝi malamikojn. Li disputas sufiĉe lerte por ŝajnigi sian eraron prava. Je tio, kio konformas al la koro, li tuj ekĝojas. Je tio, kio ne konformas al la koro, li tuj ekkoleras. Al li estas facile hontigi aliajn per vortoj. Vi nepre ne iru al li.”

Konfuceo ne aŭskultis. Yan Hui akompanis lin kiel kondukisto, Zigon – kiel dekstra mano. Ili veturis vidi la rabiston Zhi. La rabisto Zhi ĝuste lasis siajn subulojn ripozis sude de la Granda Monto kaj estis manĝanta por kolazono tranĉpecojn de vinagrita homa hepato.

Konfuceo descendis de ĉaro, antaŭen iris kaj diris respektive al peranto: “Mi estas Kong Qiu, Lu-regnano. Aŭdinte altan justecon de generalo, venis reverenci al li.”

La peranto, enirinte, transdonis tion al bandestro. Aŭdinte tion, la rabisto Zhi ege ekkoleris kun okuloj brilantaj kiel hela stelo, kun haraj disstarigitaj ĝis la krono. Li diris: “Li estas Kong Qiu, ruza trompanto de Lu-regno, ĉu ne? Ci diru al li anstataŭ mi jenon: ‘Vi fabrikas vortojn kaj inventas parolojn. Tiel vi absurde laŭdaĉas reĝojn Wen kaj Wu. Vi vestas vin strange kun krono surmetita kvazaŭ per branĉo de arbo, kun zono ornamita per ripoj de mortinta bovo. Vi paroladas multe da vortoj, plenaj de eraroj.

Mem ne terkulturante, vi manĝas; mem ne teksante, vi vestiĝas. Ŝancelante lipojn kaj tamburante langojn, vi laŭ plaĉe naskas pravecon aŭ malpravecon, kaj tiel do vi erarigas estrojn de la mondo kaj malhelpas al lernantaj personojn en la mondo reveni al baza fonto. Vi kaprice fabrikis fiideon de fila pietato kaj devo de malpliaguloj. Tiel vi esperas favoron, flatante feŭdajn landestrojn, riĉulojn kaj nobelojn. Via kulpo estas pleja grandega. Foriru rapide! Aŭ mi faros vian hepaton kuirita kaj metita por kolazono sur posttagmezan manĝtablon.”

Estas transdonita la dirtaĵo kaj Konfuceo diris al la peranto: “Mi ricevis feliĉon tra s-ro Ji koni vin, do mi dezirus videti viajn ŝuojn eĉ se el sub kurteno.”

La peranto denove transdonis al Zhi la vortojn de Konfuceo.

La rabisto Zhi diris: “Lasu lin veni antaŭ min.”

Konfuceo haste iris antaŭen, sed retropaŝinte de la seĝo, riverencadis la rabiston Zhi. La rabisto Zhi ege koleras, sidante kun kruroj dissternitaj kaj, apogante sin al glavo kun okuloj elstarigitaj, roras laŭtvoĉe, kvazaŭ ĵus naskinta tigrino: “Qiu! Venu pli antaŭen! Se tio, kion vi parolos, estos laŭa al mia volo, vi restos viva. Se mallaŭa al mia koro, vi mortos.”

Konfuceo diris: “Mi aŭdas jenon. Estas tri virtoj en la mondo. Ke iu naskiĝis, kreskas nekompareble tre bela, kaj ĉiuj ajn, infanoj, plenaĝuloj, nobeloj, nenobeloj, ĝojas vidi lin, tio estas supera virto. Ke la alia havas scion, sintezanta la Ĉielon kaj la teron, kapablon elokvente paroli pri aĵoj, tio estas meza virto. Ke la tria, estante kuraĝa kaj rezoluta, kapablas kolekti amason da homoj kaj gvidi soldatojn, tio estas suba virto. Tiu, al kiu apartenas almenaŭ unu el ili, povas sidi sur trono fronte al sudo, nomiĝi unu sola.

Nun vi, Generalo, posedas nun ĉiujn tri. Je staturo vi estas alta je 8 *chi* 2 *cun*. El vizaĝo kaj okuloj radias lumo. Lipoj koloras kvazaŭ cinabra. Dentoj vicas kvazaŭ konkajoj. Voĉo sonas kvazaŭ flava sonorilo.⁵⁶⁷ Spite ĉion ĉi tion oni nomas vin rabisto Zhi. Mi elkore ne povas ne honti tion por vi, Generalo. Generalo, se vi havas orelojn auŝkulti mian opinion, mi petas vin jen pri kio.⁵⁶⁸ Suden sendi ambasadorojn al Wu kaj Yue regnoj, norden sendi ambasadorojn al Qi kaj Lu, orienten sendi ambasadorojn al Song kaj Wei, okcidenten sendi ambasadorojn al Jin kaj Chu. Konstrui por vi, Generalo, grandan kastelon je kelk-cent *li*oj kvadrato. Starigi urbon el kelkcent mil familioj. Promocii respekti vin, Generalon, kiel unu el landestroj. Renovigi la mondon. Retiri armeon kaj doni al soldatoj ripozi. Kolekti kaj nutri fratojn kaj parencojn por komune

⁵⁶⁷ 黃鐘 Mi ne povas konsenti kun la opinio, ke ĝi signifas muzikan terminon 音律.

⁵⁶⁸ 臣請、南使吳越… Multaj esploristoj konsideras Konfuceon sendoto. Sed laŭ ĉi tiu propozicio mi ne povas legi tiel. 東使宋衛 Se Granda monto estus Tai-shan 泰山, tiu direkto “東 orienten” estas malprava.

festi la parapatrojn. Tio estas la konduto de sanktuloj kaj talentuloj. Tio estas ja espero de la mondo.”

La rabisto Zhi ege furiozas, dirante: “Qiu, vi venu proksimen. Ĝustigebla per profito aŭ konsilebla per vortoj estas nur stultaj kaj ordinaraj popolanoj. Ke kreskis tiom bela, kiom oni ĝojas vidi, tio estas la virto heredita el miaj gepatroj. Eĉ se vi ne laŭdus ĝin, mi mem scias. Mi aŭdas, ke, kiu laŭdas iun antaŭ li, tiu mallaŭdas lin malantaŭ li. Nun vi diris al mi pri la konstruo de granda urbo kun amaso da popolanoj, intrigante ĝustigi min per profito. Per tio vi fitraktas min kiel ordinaran popolanon. Kiel longe daŭrus tia profito? Kiu ajn urbo ne estas pli granda ol la mondo. Yao kaj Shun posedis la mondon, tamen al iliaj posteuloj ne restis eĉ loko pikebla per aleno. Tang kaj Wu staris kiel Filoj de la Ĉielo, tamen ekstermiĝis iliaj postaj generacioj. Ĉu ne estas pro tio, ke granda estis ilia profito?

Plue mi aŭdas, ke antikve da birdoj kaj bestoj vivis pli multe kaj ekzistis malpli multe da homoj-popolanoj. Tial do popolanoj loĝis en nestoj por eviti ilin. Tage homoj kolektadis glanojn kaj kaŝtanojn, nokte ili loĝis sur arboj. Tial oni nomis ilin popolo havanta nestojn. Antikve popolanoj ne sciis pri vestaĵoj. Somere ili amasigis multe da brullignoj, vintre hejtis per tio. Tial oni nomis ilin popolo scianta vivon. En la epoko de Shennong popolanoj, komune kuŝis komune loĝante, levante sin, iradis ĉien ajn.⁵⁶⁹ Tial ili sciis sian patrinon, sed ne sciis la patron. Ili vivis kune kun alkoj kaj cervoj. Terkultivante, manĝis. Teksante, vestiĝis. Ili ne havis koron damaĝi sin unu la alian. Tio estas florado de la pleja virto.

Sed la Flava Imperiestro ne povis atingi la virton. Li batalis kontraŭ Chi You sur la kampo Zhoulu, verŝis sangon cent *li*ojn. Yao kaj Shun fondis regnon kaj starigis adminstrantaron de oficistoj-subuloj. Tang forpelis sian mastron, la reĝo Wang mortigis Zhou. Post tio la malpli grandan regas la pligranda, la plimulto perfortas malpli multon. Post Tang kaj Wu, ĉiuj estas ribelantoj.

Nun vi, lernante Vojon de la reĝoj Wen kaj Wu, elokvente disvastigas en la opinio de la mondo kaj volas instrui ĝin al postaj generacioj. Vestante sin en loza robo kun zono malstreĉita, vi trompas per vortoj kaj hipokritas je konduto, tiel do konfuzas estrojn tra la mondo. Kaj vi deziras serĉi la riĉon kaj la altan rangon. Neniu rabisto estas pli feroca ol vi. Kial en la mondo oni ne nomas vin ‘Rabisto Qiu’, nomante min Rabisto Zhi?

Vi per miela vorto ĝojigis Zilu, igis lin sekvi vin, ke li demetis sian krestosimilan kronon, forĵetis la glavon kaj ekricevis vian instruon. Ĉiuj en la mondo diradis, ke Kong Qiu povas haltigi violenton kaj malpermesi malbonan konduton. Sed finfine Zilu

⁵⁶⁹ 臥則居居、起則于于 Mi prenas 居 kiel kunvivadon de gepatroj 居諸, kaj 于于 kiel iradon.

dezirus atenci reĝon de Wei-regno, kio ne estis plenumita.⁵⁷⁰ Lia korpo, pekulite, estis eksponata sur la orienta defendpordo. Ĉar via instruo estis ne sufiĉa.

Ĉu vi mem nomas vin talentulo-sanktulo? Oni elpeladis vin fojojn el Lu-regno, forviŝis viajn piedsignojn en Wei-regno, faligis vin en mizeron en Qi-regno, sieĝis vin en inter Chen kaj Cai regnoj. Vi ne estas akceptita de la mondo. Vi instruis al Zilu aflikton, por ke la lasta estu pekulita. Rilate al supro vi ne povas enpostenigi vin mem, rilate al subo vi nenion povas fari por homoj. Ĉu eblus diri, ke via Vojo estus sufiĉe kara? El inter estimataj de la mondo, neniu estas pli alta ol la Flava Imperiestro. Eĉ la Flava Imperiestro ne povis esti komplete virta. En la batalo de kampo Zhuolu, sango fluis cent *li*ojn. Yao ne estis mizerikorda, Shun estis sen fila pietato. Yu kadukiĝis, Tang forpelis sian mastron, reĝo Wu batis Zhou, Reĝo Wen estis izolita en provinco. Ĉi tiuj ses personoj estas rigardataj de la mondo kiel plej altaj.⁵⁷¹ Se pristudi ilin, ĉiuj por profito misrigardis la veron, kaj forte kontraŭis al denaska natura sento. Ege hontinda estas ilia konduto.

Koncerne de t. n. saĝaj personoj de la mondo, famaj estas Bo Yi kaj Shu Qi, kiuj rifuzis tronon de Guzhu-landestro. Ili malsatmortis ĉe la monto Shouyang, iliaj ostoj kaj karnoj estis forlasitaj sen funebri.

Bao Jiao alteniĝis al bela konduto, kritikante la mondon, kaj tiel li mortis, liginte sin mem al arbo. Shentu Di admonis, ne aŭdate, do ŝarĝinte ŝtonon sur sin, ĵetis sin en riveron, tiel estis formanĝita de fiŝo kaj testudoj.

Jie Zitui famas kiel la plej lojala, ĉar li, detranĉinte sian femuron, donis al duko Wen manĝi. Sed kiam la duko Wen preterlasis lin, Zitui ekkoleris kaj foriris. Li, liginte sin al arbo kaj forbruligante, sinmortigis.

Wei Sheng promesis rendevuon kun iu virino sub ponto, sed ŝi ne venis. Atendante ŝin, li ne forlasis la lokon de rendevuo malgraŭ inundo, tiel mortis, brakumante kolonon de la ponto.

Tiuj kvar homoj ne diferencas de buĉoferita hundo aŭ mergita porko kiel oferaĵoj aŭ almozuloj kun kalabaso en mane. Ĉiuj, algluiĝinte al nomo, malestimis morton, ne konsiderante la nutradon de longviveco baza principo.

Se temas pri la fideleco de subuloj en la mondo, neniu estas pli supera ol Princo Bi Gan kaj Wu Zixu. Zixu mergiĝis en riveron, koro de Bi Gan estis dissekcita. Tiuj du homoj estas famaj en la mondo kiel fideluloj, sed finfine ili estas ridmokataj de la mondo. Se observi de supre menciitaj ĝis Zixu kaj Bi Gan, ĉiuj ne povas esti estimindaj.

⁵⁷⁰ Reĝo de Wei 衛君、duko Zhuang 莊公, la personnomo estis 崩殞. Atenco okazis en 480 a. K.

⁵⁷¹ Menciitaj estas sep sanktaj reĝoj.

Vi, Qiu, parolas al mi, se temas pri Spiritoj, mi ne povas kompreni, tamen se temas pri homaj aferoj, estas sufiĉe per tio, ke mi jam rakontis. Ĉion, kion mi aŭdas, mi scias. Nun mi diras al vi pri homa sento. Okuloj deziras vidi koloron, oreloj deziras aŭskulti voĉon, buŝo deziras gustumi, strebo deziras esti plenumita. Homo vivas cent jarojn se supre, okdek jarojn se meze, sesdek jarojn se sube. Escepte de tempoj je malsano, funebrado kaj suferado, restas nur malmulte da tempo por ridi kun buŝo malfermata, nur malpli ol 4-5 tagoj en unu monato. Kvankam la Ĉielo kaj la tero estas senlimaj, tamen homo mortas en limigita tempo. Mastrumante limigitan je la tempo kondiĉon, li komisias sin al senlima spaco. La subiteco estas tute sama, kiel vidi tra fendo la ĉevalon trakuranta. Kiu ne povas ĝojigi sian strebon kaj volon, kiu ne povas nutri longvivecon, ĉiuj ne etas komprenantoj de la Vojo-Tao. Kion diras vi, Qiu, ĉion mi reĵetas. Iru tuj hejmen for! Ne ripetu vian parolon. Via Vojo-Tao estas falso, fabrikita freneze, obsedite kaj ruze. Ne eblas preni ĉion vera. Kial indas diskutadi?”

Konfuceo riverecadis kaj rapide forkuris, elirinte pordon. Li, rajdante sur ĉaron, miskaptadis tri fojon ŝnuron-apogilon. Okuloj ne vidis, stuporigite, kun vizaĝkoloro simila al cindro. Apogante sin al stango, kun kapo malsupren, li ne povis elspiri. Alveninte eksteron de la orienta pordo de Lu-regno, li hazarde renkontiĝis kun Liuxia Ji.

Liuxia Ji diris: “Abrupte dum kelke da tagoj mi ne vidis vin. La ĉaro kun ĉevalo ŝajnas ĝuste reveninta de vojaĝo. Ĉu, eble, vi iris vidi Zhi?”

Kongzi, vidante supren la Ĉielon, vespiris: “Jes.”

Liuxia Ji diris: “Ĉu Zhi ne kontraŭis al via opinio, kiel mi antaŭdiris?”

Kongzi diris: “Jes, kontraŭis. Mi, Qiu, kaŭteris min mem sen ajna malsano. Mi haste kuris al tigro por karesi lian kapon, plekti lian barbon, kaj apenaŭ ne eskapis el lia buŝo.”⁵⁷²

⁵⁷² 無病而自灸 signifas superfluan konduton. Sushi 蘇軾(1036-1101) suspektis la tekston pri Rabisto Zhi neverkita de Zhuangzi. Multaj esploristoj inklinas ne doni al la teksto grandan valoron. Laŭ mia opinio tiu teksto estas unika por pripensi la signifon de ‘konduto’ 行為. Zhi kritikis ideologion de konfuceanismo per preskaŭ sama argumento kaj vidpunkto de taoismo. Tamen argumentas ne sanktulo, sed rabisto. Konduto estas kriterio por juĝi, ĉu la parolanto pravas aŭ ne. Kiel ajn bela ŝainus la argumento, se la konduto de parolanto estas neakceptebla, ankaŭ la parolado estas fuŝa. Kia estas konduto, tia estas valoro de argumento. Estas notinde, ke graveco de konduto estas prezentata en la verko de taoismo, laŭdanta senagon 無為. Kaj estas atentinde, ke Konfuceo provus turni rabiston al la Vojo, esperante al ‘pentonto’ la konduton por granda afero. Al vera ‘pentanto’ jam ne estas tute egale kiel konduti kaj argumenti. Tiaj pentantoj estis por ekzemplo sanktaj Petro kaj Paŭlo, rusaj nobeloj kiel Leo Tolstoj. La sekva teksto estas daŭrigo de diskuto pri konduto.

Zizhang diris al Man Goude: “Kial vi ne konsideras konduton grava? Sen konduto ne estas fido. Sen fido ne eblas konfido de aliaj. Sen konfido ne eblas profito. Tial do obesrvado de nomo, kalkulado de profito, estas reale efektiveblaj per justo. Se forĵeti nomon-profiton kaj reveni al sia koro, tio estas konduto de alta persono. Ne pasas eĉ unu tago sen tia konduto.”

Man Goude diris: “Senhontulo riĉiĝas. Multeĵurpromesulo populariĝas.⁵⁷³ Kiu gajnas grandan nomon kaj profiton, tiu preskaŭ estas senhonta kaj ĵurpromesema. Ĉar li observas la nomon kaj kalkulas la profiton. Tio estas ja vero de ĵurpromeso. Se eĉ ke oni forĵetus nomon kaj profiton kaj revenus al sia koro, estus la konduto de alta personeco, tiam ĉu eblus teni la Ĉielon en brakoj?

Zizhang diris: “Antikve, Jie kaj Zhou okupis altan rangon, kiel la Ĉielan filon, kaj posedis riĉon, kiel mondon. Sed se nun oni dirus al iu sklavo aŭ popolano: ‘Via konduto similas al de Jie-Zhou’, tiuokaze li pro honto ŝanĝas la vizaĝkoloron. Li ne volas akcepti en sia koro tion, ĉar eĉ malgranduloj malestimas la tiranojn.

Zhongni kaj Mo Di estis ege malriĉaj kaj simpluloj je rango. Sed se nun oni dirus al iu ministro: ‘Vi kondutas same, kiel Zhongni kaj Mo Di’, tiam li ŝanĝos mienon radianta, dirante: ‘Ne indas laŭdi min tiel.’ Ĉar oni estimas ilin vere noblaj.

Tiel do, kiu, nun havante potencon, estas filo de la Ĉielo, tiu ne ĉiam nepre nobla. Kaj kiu estas malriĉa kaj simpla, tiu ne ĉiam nepre malnobla. La distingo inter nobleco kaj malnobleco kuŝas en konduto, ĉu bela aŭ malbela.”

Man Goude diris: “La malgrandajn ŝtelistojn oni arestas, la grandajn ŝtelistojn oni faras landestroj. Justuloj troviĝas ĉe la pordo de landestro. Antikve, la duko Huan, Xiao Baj, mortigis sian fraton kaj prenis lian edzinon kiel amatinon. Guan Zhong fariĝis lia ministro. Tian Cheng Zi Chang mortigis la reĝon kaj ŝtelis la regnon.⁵⁷⁴ Kongzi ricevis de li donacon. Tiel la ideologoj, kvankam malestimas tion laŭ sia argumento, tamen fakte laŭ sia konduto obeas la realon. Ĉu ne okzus, ke sentoj de parolo kaj konduto leviĝus konflikte en ilia brusto? Do estas skribite en la libro: ‘Kiu estas malbela kaj kiu estas bela? Kiu sukcesas, tiu fariĝas kapo; kiu ne sukcesas, tiu fariĝas vosto.’”

Zizhang diris: “Ĉe vi ne estas konduto. Se tiel, ne estas etiko por distingi rilatojn de homoj malproksima kaj proksima, nek justo de nobleco kaj malnobleco, nek vicordo de pliaĝulo kaj malpliaĝulo. Kie laŭ vi estas kvin moralprincipoj kaj ses klasifikoj, kaj per

⁵⁷³ 多信者 Ĉi tie 信 signifas ‘ĵuri, promesi’ 誓約. Zizhang, konfuceano, uzas la vorton kiel signifon de ‘fido, konfido’. Iu esploristo anstataŭigas 信 per signifo de ‘vorto 言’.

⁵⁷⁴ 恒公小白 mortigis pliaĝan fraton, surtroniĝinte, faris 管仲 ĉefministro. Menciita amafero kun frata edzino ne troveblas en aliaj libroj. 田成子常 mortigis la dukon Jian 簡公 de Qi 齊. En Analektoj 論語 estas skribite pri la protesto de Konfuceo.

kio eblus apartigi socion?”⁵⁷⁵

Man Goude diris: “Yao mortigis sian plej aĝan filon. Shun ekzilis duonfraton laŭ bopatrino. Ĉu estas etiko de parenco je proksimeco kaj malproksimeco? Tang forpelis Jie, reĝo Wu mortigis Zhou – ĉu estas justo je nobleco kaj malnobleco? Reĝo Ji surtroniĝis anstataŭ pliaĝa frato⁵⁷⁶, Duko Zhou mortigis la pliaĝan fraton, – ĉu troviĝas la aĝa vicordo? Kofuceanoj falsas vortojn.

Mohistoj propagandas universalan makroamon. El ilia vidpunkto, ĉu ‘la kvin moraloj ses klasoj’ estas ja aparta mikroamo?

Aldone, vi volas ĝustigi la nomon. Mi volas ĝustigi la koncepton de profito. Realo de la nomo kaj profito ne obeas al rezona teorio, nek estas direktata de Vojo-Tao. Kiam ni kun vi turnis nin al s-ro Wu Yue kun demando, li diris, ke etulo dediĉas sin al mono kaj noblulo – al nomo. Ili malsamas je celo, al kiu ili ŝanĝas la denaskan naturon en sian propran senton. Sed ili estas tute samaj, ĉar ili finfine forĵetas tion, kon devas fari, kaj dediĉas sin al tio, kion ne devas fari.

Tial do estas dirite: “Ne fariĝu etulo, revenu dediĉi vin al la Ĉielo. Ne fariĝu noblulo, sekvu la rezonon de la Ĉielo. Esti kaj kurba kaj rekta – ambaŭ konsistigas la Ĉielan poluson. Observadu ĉirkaŭen kvar direkciojn kaj ŝanĝiĝu laŭ tempo. Esti aŭ ne esti – ĉiukaze tenu al vi centron de cirklo, tiel do via volo efektiviĝos per si mem. Vagadu kun Vojo-Tao, ne turniĝante, iru laŭ ĝi. Ne faru vian juston, alie, vi perdos kion fari. Ne alteniĝu al riĉo, nek dediĉu vin al prosperigo, aŭ vi ĝuste forlasos la Ĉielon.

Bi Gan estis dissekcita je koro, ĉe Zi Xu estis elplukitaj la okuloj – malfeliĉa rezulto de lojaleco. Zhi Gong denunciis sian patron, Wei Sheng dronis – malsano de fideleco. Bao Jiao, starante, sekiĝis, Shenzi sinmortigis sen ajna apologio – noco de puranimo. Kongzi ne vidis la patrinon, Kuangzi ne vidis la patron – perdo pro justeco.⁵⁷⁷ Tiuj epizodoj estas transdonitaj el antaŭaj generacioj kaj estos parolataj de postaj generacioj.

Kiu volus fariĝi homo de alta personeco, tiu devas ĝustigi la vorton kaj nepre devas konduki komforme al la vorto. Tial do li devas akcepti plagon pro tio kaj devas esti obsedita de la malsano.⁵⁷⁸

⁵⁷⁵ 別 apartigi. Konfuceanoj konsideras apartigon grava. 五紀六位 estas specoj de moralo. Laŭ esploristoj diversas klasifikoj. Mohistoj kontraŭe starigis universalan amon 兼愛.

⁵⁷⁶ 季 estas patro de la reĝo Wen 文王. Pliĝaj fratoj 太伯 · 虞仲 cedis al li la tronon.

⁵⁷⁷ 直躬 aperas en Analektoj kiel honesta filo, denunciinta la patron. 鮑焦=鮑子.

Shengzi estas supozata 申生 aŭ 申徒狄, 匡章 estis Qi-regnanto, kiu admonis la patron kaj estis elpelita.

⁵⁷⁸ Tragedio de idealistoj, alteniĝintaj al abstrakta justeco, detranĉitaj el de konkreta realeco. Fikuraĝo dediĉi sian vivon al fiksita ‘justo’ per sinmortigo estas kritikata ĉi tie.

Ĉiama Malkontentulo demandis Harmonio-sciulon,⁵⁷⁹ dirante: “Troviĝas neniu ajn homo, kiu ne serĉas renomon kaj profiton. Kiu estas riĉa, al tiu obeas aliaj homoj. Obeantoj submetas sin al li. Submetiĝintoj respektas lin. Ke estas rigardata de suboj kiel respektinda, tio estas la Vojo de longviveco, korpa ripozo kaj plezurigo de volo. Nun vi sola ne havas deziron. Ĉu ĉar al vi mankas scio, ĉu ĉar vi ne kapablas fari kion la scio deziras? Aŭ ĉar vi ne forgesas juston, kiun vi intence serĉas?”

Harmonio-sciulo diris: “Tia homo rigardas la aliajn jen kiel. ‘Li naskiĝis samtempe kun mi, aŭ li devenis de la sama vilaĝo kun mi. Aŭ li estas persono, kiu vivas detranĉite el de la mondo.’ Tiele tute ne estas la ĝusta subjekto. Tial li, rigardante la tempon antikvan kaj nunan, juĝas sian distingon inter ‘Esti aŭ ne esti’. Li kune kun vulgara mondo ŝanĝiĝas, foriras de la plej grava, forĵetas la plej respektindan. Tiele li faras kion oni faras. Kaj argumentas pri la vojo de longviveco, korpa ripozo kaj plezurigo de volo! Ĉu ne estas fore? Je la korpo vi ne atentis pesi la suferplenan mizeran malsanon kaj ĝojplenan trankvilon. Je la koro vi ne atentis pesi la zorgoplenan timon kaj gajan ĝojon. Vi, sciante fari kion oni faras, ne scias por kio vi faras. Tiele, eĉ se vi fariĝus alta, kiel la Ĉiela filo, kaj posedus riĉon de la mondo, ajnokaze vi ne povas eviti aflikton.”

Ĉiama Malkontentulo diris: “Por riĉulo nenio estas ne profita. Li satĝuas belecon, akiras potencon, kiujn nek la pleja homo povus kapti nek sanktuloj povus atingi. Li povas majeste fortigi sin pere de alies kuraĝo kaj forto de kavaliroj, povas klare kompreni pere de alies saĝa konsilo de potenculoj, povas aspekti saĝa kaj bona pere de alies virto. Ne posedante regnon, li povas sinteni majeste kvazaŭ patro de reĝo. Li povas, ne lernante mem, ĝui ĝissate en sia koro la plezuron homan, kiel muzikon, virinon, bonguston, potencon. Kaj en sia korpo li povas ripozi sen ajna trejnado por teni formon. Kion avidi, kion malami, kion eviti, kion preni, por tio ne necesas instruisto. Ĉar tio estas denaska homa naturo. Ne nur mi, sed kiu alia en la mondo povus rifuzi tion?”

Harmonio-sciulo diris: “Kion saĝulo faras, tio estas movi popolanojn por ke ili ne kontraŭu al reguloj. Se ili estas kontentaj, do ili ne kverelas inter si. Ĉar li ne postulas, li nenion bezonas fari. Se li ne estus kontenta, li postulus kaj kverelus ĉie en kvar direktoj, tamen tio ne estas pro lia avideco.

Se superfluus aĵo, li malakceptus ĝin, aŭ eĉ forĵetus la regadon de mondo, tamen tio ne estas pro lia honesteco. Honesteco aŭ avideco fakte ne dependas de ekstera kondiĉo, nek de konformeco al reguloj. Do se laŭ furora modo li fariĝas la Ĉiela Filo, li ne fieriĝas antaŭ homoj malgraŭ sia alta posteno. Se li havas riĉon, kiel la mondon, li spite riĉaĵon ne mokridas homojn. Li kalkulas la riskon, konsideras la kontraŭon, kiuj povus damaĝi al li la denaskan naturon. Do li rifuzas kaj malakceptas la proponatan ne tial, ke li

⁵⁷⁹ 無足, 知和 Nomojn de protagonistoj mi tradukis laŭ signifo.

serĉas honoron.

Yao kaj Shun fariĝis reĝoj kaj pacigis la mondon, ne por ke bonvoleco estu en la mondo, sed por ke la vivo ne difektiĝu pro beleco. Shan Quan kaj Xu You malakceptis la tronon, ne por ke ili cedu sen kialo, sed por ke la afero ne damaĝu ilin mem. Ĉiuj prenis al si la profiton, rifuzis la difekton. La mondo laŭdas ilin pro saĝeco, ĉar tio laŭdeblas. Sed ili mem ne intencis fari tion por honoro.”

Ĉiama Malkontentulo diris: “Por teni nepre la renomon suferigi la korpon kaj rezigni la dolĉaĵon, nutri sin kaj per tio konservi la vivon estas tute same, kiel kuŝi sen morti en longdaŭra malsano.”

Harmonio-sciulo diris: “Mezeco faras feliĉon kaj superfluo faras damaĝon – al tio aplikiĝas nenio pli ĝuste, ol la riĉo-posedaĵo. Nun riĉuloj plezurigas siajn orelojn per belsono de sonoriloj, blov- kaj perkut-muzikiloj, siajn buŝojn per bongustaj viandoj kaj vinoj. Ili preferas sencon al volo kaj forgesas sian aferon. Tio estas ja malordo. Ili dronas en pasio, obsedite per freneza fantomo. Ili supren grimpas kvazaŭ peze ŝarĝite. Tio estas ja sufero. Por konsoli sin avidas monon, por elmontri fortecon avidas potencon, dronas dum kvieta loĝado, obsediĝas kun sukeca korpo. Eblas diri, ke tio vere estas ja malsano. Por deziri riĉon nur serĉas profiton plenplene kvazaŭ amasigi termuron – tio estas neevitebla al ili. Obsedite, ili ne povas forlasi. Tio estas ja hontinda. Amasigante monon, ili ne povas uzi, konservante skrupule, ili ne povas forlasi, Ilia koro pleniĝis de kleŝo kvazaŭ vino plena je spleno. Ili nur strebas plimultigi kaj ne povas ĉesi. Tio estas ja ĉagreno. Hejme ili suspektas alvenon de ĉantaĝistoj kaj ŝtelistoj, ekstere timas ricevi damaĝon de rabistoj. Do ili konstruas fuorton ĉirkaŭ sia domo. Eksteren ili ne aŭdacas eliradi sole. Tio estas ja timo. Tiuj ses menciitaj supre estas ja pleja malbono de la mondo, pri kio oni forgesas kaj ne povas pristudi. Tiel do la malsano atingas la kulminon. Tiam, eĉ se ili volus, eluzante denaskan naturon aŭ forkonsumante akumulitan monon, reveni al almenaŭ unutaga senzorga ripozo, tio jam ne eblas al ili.

Tial, se observi renomon, oni ne vidos ĝin. Se serĉi profiton, oni ne akiros. Por akiri ilin oni konkurencas, kun volo komplikita, kun korpo konsumita. Tio estas ja iluzio, ĉu ne?”

30 RAKONTO PRI SKERMADO

Antaŭe, reĝo Wen de Zhao-regno ŝatis skermadon.⁵⁸⁰ Da gastoj-skermistoj kolektiĝis ĉe la reĝa pordo pli ol tri miloj. Ili tagnokte skermadis antaŭ la reĝo kaj en ĉiu jaro mortis aŭ vundiĝis pli ol centoj. La reĝo tiom ŝatis ĝin, kiom ne satrigardis. Do en tri jaroj la regno ŝrumpis tiel, ke aliaj landestroj ekintrigis agresi.

Kronprinco Kui ĉagreniĝis je tio. Li alvokis dekstren kaj maldekstren, dirante: “Al tiu, kiu povis sukcese admoni la reĝon ĉesigi la skermadon, estos donita mil oroj.”⁵⁸¹

Dekstra kaj maldekstra subuloj diris: “Tion povas fari s-ro Zhuangzi.”

La kronprinco sendis sian subulon al Zhuangzi proponi mil orojn. Zhuangzi ne ricevis. Li kune kun la sendito iris renkonti la kronprincon kaj diris: “Via Moŝto, kronprinco, kion vi instrukcias al mi, donacante mil orojn?”

La kronprinco diris: “Mi aŭdis, ke vi estas klera sanktulo. Do mi tra mia subulo volus sendi al vi mil orojn, sed tamen vi malakceptis. Kion mi aŭdacus diri al vi plu?”

Zhuangzi diris: “Mi aŭdis, ke vi volus dungi min, ĉar vi deziras ĉesigi al la reĝo lian ŝatokupon. Se mi, supre admonante la grandan reĝon, kontraŭus al reĝa volo, samtempe mia ago sube ne konformus al intenco de kronprinco, tiuokaze mi mem estus kondamnita al morto. Tiam por mi je kio utilis la oro? Se mi sukcesus admoni supre la grandan reĝon konforme sube al la intenco de kronprinco, tiuokaze la regno Zhao devus doni al mi kion ajn mi postulus.”

La kronprinco diris: “Jes, konsentite. Sed kion nia reĝo atentis, tio estas nur skermistoj.”

Zhuangzi diris: “Bone, mi akceptas. Mi estas sufiĉe lerta je skermado.”

La kronprinco diris: “Skermistoj, vidataj de la reĝo, ĉiuj havas apartan formon, kun kapo taŭzita, kun barboj hirtaj, portas ĉapon kun nukŝirmilo, ligita per longa ekzotika ŝnuro, vestas sin en kurta vestaĵo, rigardegas kun minacaj okuloj kaj parolas krude. Ĉar la reĝo ĝojas je tio. Nun se vi surmetos konfuceanan vestaĵon por renkontiĝi kun la reĝo, nepre efektos tre malbone.”

Zhuangzi diris: “Do bonvolu pretigi la vestaĵon de skermisto.”

Post tri tagoj estis preta la skerma vestaĵo. Li iris vidi la kronprincon. La kronprinco lasis lin vidi la reĝon. La reĝo atendis lin kun glavo elingigita en mane. Zhuangzi eniris

⁵⁸⁰ 趙文王 Esploristoj konjektas, ke la reĝo estas 惠文王 Huiwen (surtrone 298-266 a. K.) Laŭ *Shiji* 史記、趙世家 nomo de kronprinco estis Dan 丹. Ne troviĝas Kui 惲. Ĉi tiu ĉapitro estas rigardata de esploristoj kiel fikcio. Se samtempe kun Zhunagz, reĝo devus esti Wuling 武靈王 (surtrone 325-299 a. K.)

⁵⁸¹ 千金 Unu oro egalas al ĉ. 250g.

en la pordon, ne hastante. Li, vidante la reĝon, ne riverencis.

La reĝo diris: “Kion vi deziras instrui al mi, heroldinte tra la kronprinco?”

Zhuangzi diris: “Mi aŭdis, ke Via Moŝto ŝatas la skermadon. Do mi vidas vin por montri skermarton.”

La reĝo demandis: “Kia estas via skerma kapablo por lukti?”

Zhuangzi diris: “En ĉiu deka paŝo unu homon. Eblas trairi mil *li*ojn senhaltigite.”

La reĝo tre ĝojis, dirante: “Senrivala, senkompara en la mondo!”

Zhuangzi diris: “Lerta skermisto estas jen kia – li al aliu prezentas sin malplena, je malfermo lasas la alian trovi avantaĝon, post la alies movo ekmovas sian glavon, kaj sia glavo atingas la alian pli frue ol lia. Mi volus provi tion.”⁵⁸²

La reĝo diris: “Majstro, vi ripozu en via tranoktejo, atendante ordonon. Oni pretigos la ludejon kaj petos vin.”

Sep tagojn la reĝo provis ekzameni skermistojn. Dume mortis aŭ vundiĝis pli ol 60. Estas elektitaj 5-6 por montri skermadon ĉe la palaco. Ankaŭ Zhuangzi estas alvokita kaj estas dirite al li: “Hodiaŭ okazos la matĉo, vi montru al skermistoj vian skermarton.”

Zhuangzi diris: “De longe mi deziris tion.”

La reĝo diris: “Kian lignoglavon vi uzos, Majstro? Longan aŭ mallongan?”

Zhuangzi diris: “Kian ajn eblas al mi. Sed mi havas tri specojn de glavo. Nur diru, kiun el ili Via Moŝto elektos. Antaŭ ĉio mi petas, lasu min diri kaj poste vi provu.”

La reĝo diris: “Mi volus aŭdi pri tiuj tri specoj de glavo.”

Zhuangzi diris: “Estas glavo de la Ĉiela Filo. Estas glavo de regnoestro. Estas glavo de popolano.”

La reĝo demandis: “Kio estas la glavo de la Ĉiela Filo?”

Zhuangzi diris: “La glavo de la Ĉiela Filo estas jena. Pinto de la glavo estas valo de Yan-regno kaj Ŝtona Muro, klingo estas Qi-regno kaj Monto Dai, dorso estas Jin-regno kaj Wei-regno, konko estas Zhou-dinastio kaj Song-regno, glavingo estas Han-regno kaj Wei-regno. Ĝi estas envolvita de kvar barbaraj triboj, subtenata de kvar sezonoj, ĉirkaŭita de Bo Maro, zonita de Monto Chang.⁵⁸³ Ĝi estas manipolata per kvin elementoj, kondukata per punjuro kaj virto, malfermata per *yin* kaj *yang*, subtenata per printempo kaj somero, praktikata per aŭtuno kaj wintro. Se kun la glavo tenata ĝuste antaŭen, estiĝas nenio fronte; se tenata supren, estiĝas nenio supre; se tenata suben, estiĝas nenio sube. Svingate flanken, estiĝas nenio ĉirkaŭe; se supren, estas ŝirita la

⁵⁸² 後之先 retroatako. En proverbo estas tiu esprimo: “Ekmovi pli malfrue, atingi pli frue.”

⁵⁸³ Partoj de glavo estas nomataj per norda, orienta, suda, okcidenta lokonomoj: 燕谿, 石城, 齊, 岱(泰山), 晉, 魏(衛?), 周, 宋, 韓, 魏, 夷, 渤海, 常山(北岳恒山)

nubo ŝvebanta; se suben, estas tranĉita la nodo de la Tero. Se foje uzi ĉi tiun glavon, eblas ĝustigi aliajn regnestrojn kaj obeigi la mondon. Jen tia estas la glavo de la Ĉiela Filo.”

La reĝo Wen, mirkonsternite kaj stuporite, diris: “Kia estas la glavo de regnestro?”

Zhuangzi diris: “La glavo de regnestro estas jen kia. Pinto estas persono intelekta kaj kuraĝa, klingo estas persono honesta, dorso estas persono saĝa kaj bona, konko estas lojala kaj fidela, glavingo estas persono brava. Kun la glavo tenata ĝuste antaŭen, estiĝas nenio fronte; tenate supren, estiĝas nenio supre; tenate suben, estiĝas nenio sube; svingate flanken, estiĝas nenio ĉirkaŭe. Supre la glavo sekvas la rondecon de la Ĉielo kaj per tio obeas tri lumojn; sube ĝi sekvas kvadraton de la Tero kaj per tio obeas kvar sezonojn; meze ĝi harmonias kun popola volo kaj per tio pacigas kvar direktojn. Se uzi ĉi tiun glavon, kvazaŭ tremigite de fulmo-tondro, interne en la mondo kun kvar direktoj estiĝos neniuj, kiu ne obeas aŭ ne aŭskultas la ordonon de reĝo. Jen tia estas la glavo de regnestro.”

La reĝo demandis: “Kia estas la glavo de popolano?”

Zhuangzi respondis: “La glavo de popolano estas jena. kun kapo taŭzita, kun barboj hirtaj, ĝi portas ĉapon kun nukŝirmilo, ligita per longa ekzotika ŝnuro, vestas sin en kurta vestaĵo, rigardegas kun minacaj okuloj kaj parolas krude. Ĝi batas unu la alian antaŭ si, kaj supre tranĉas alies kapon aŭ kolon, sube disfendas alies hepaton aŭ pulmon. Tia estas la glavo de popolano. Tio neniom diferencas de kokbatalo. Subite unu matenon ekstermiĝas vivo. Por ŝtata afero ne uzeblas. Nun, Via Moŝto, postenigite sur la Ĉiela Filo, ŝatas la glavon de popolano. Mi en mia koro estimas Vian Moŝton malnobla.”

La reĝo, trenante baskon, supreniris al sia halo. La reĝo, donate de servistoj al si manĝi, tri fojon ĉirkaŭvagadis la manĝotablon.

Zhuangzi diris: “Via Moŝto, trankviliĝu kaj sidiĝu por ke vi estu stabila je humoro. Rilate al la glavo, mi jam ĉion rakontis. Post tio la reĝo Wen ne eliris de la palaco tri monatojn. Dume ĉiuj skermistoj lasis sin marasmiĝi aŭ morti tie.”⁵⁸⁴

⁵⁸⁴ 服斃其處 Esploristoj prenas la frazon por sinmortigo.

31 FĪŜISTO

Kongzi vojaĝis tra arbaro, nomata nigra kurteno. La grupo ripozis sur la altaĵo kun arboj de abrikoto. Disĉiploj legis librojn. Kongzi ludis liuton, kantante. Kiam li ankoraŭ ne estas ludinta duonon de unu peco, iu fiŝisto alvenis, elboatiĝinte. Li estis kun grizaj barboj kaj brovoj, kaj kun haroj frapantaj manikojn. Suprenirante digon laŭ herbaro, li haltis surtere, kaj aŭskultis, kun maldekstera mano metita sur genuo kaj dekstra mano subtenanta mentonon. La melodio finiĝis, la gasto alvokis al du homoj, Zigong kaj Zilu, kaj montrante per fingro Konfuceon, demandis: “Kiu estas li?”

Zilu respondis: “Li estas noblulo de Lu-regno.”

La gasto demandis: “Al kiu familio apartenas li?”

Zilu respondis: “Al familio Kong.”

La gasto demandis: “Kion faras s-ro Kong laŭ profesio?”

Zilu ne respondis. Zigong respondis al la gasto: “S-ro Kong estas persono lojala kaj fidela. Li mem praktikas bonvolecon kaj juston. Li rafinas decregulojn kaj muzikon. Li kompilis la elektitan esencon de homa moralo. Supre li estas lojala al suvereno, sube li strebas transformi la popolon kaj ordigi ĝin per edukado. Tiele li profitigas la mondon. Jen kion faras s-ro Kong laŭ profesio.”

La gasto demandis: “Ĉu li posedas sian teritorion kiel landestro?”

Zigong diris: “Ne.”

Demandis: “Ĉu li asistas al landestroj kaj reĝoj?”

Zigong diris: “Ne.”

La gasto ridas kaj turnas sin retroiri, dirante: “Se temas pri bonvoleco, li estas ja homo de bonvoleco. Eble, li ne povus eviti suferadon je la koro kaj penigan laboron je la korpo. Estas danĝerigata lia denaska vereco. Ho ve! Kiel malproksime li apartiĝis de la Vojo-Tao!”

Zigong, reveninte, raportis al Kongzi pri tio. Kongzi, forlasinte la liuton, ekstaris, dirante: “Li estas sanktulo, ĉu ne?”

Kongzi iris al la bordo de marĉo. La fiŝisto ĝuste ekmovas la boaton, puŝante per bastono. Li, rimarkinte Kongzi, stariĝis, turnante sin al li. Kongzi, retroirinte malantaŭen, riverencis kaj denove antaŭeniris.

La gasto diris: “Kion vi serĉas ĝuste nun?”

Kongzi diris: “Ĵus vi, sinjoro, dirinte kelke da indikaj vortoj, foriris. Mi nomiĝas Qiu sentaŭga, ne scias ion, kio dirita de vi. Atendante humile subvente, mi havigos al mi feliĉon aŭdi vian voĉon, eldirotan per via gorĝo kaj lango. Iel ajn helpu min.”

La gasto diris: “Ha ha, vi ege ŝatas lerni!”

Kongzi reverencadis kaj stariĝis, dirante: “Mi iomete lernis sciencon, kaj tiel atingis nun 69-jaran, dum ne povis aŭdi la plejan instruon. Mi ne aŭdacas malplenigi mian koron.”⁵⁸⁵

La gasto diris: “Kiu samas je klasifiko, tiuj sekvas unu la alian, kaj voĉoj samaj, sonoras kune konforme unu al la alia. Mi petas, flanken lasu portempe la mian kaj diskutu unue pri la via. Vi okupas sin pri la temo de homa afero. Se ĝustaj estos la Ĉiela Filo, landestroj, grandoficistoj kaj popolanoj, la regado estos bela. Kiam tiuj kvar klasoj disiĝos unu de la alia, estiĝos la grandega malordo. Dum oficistoj mastrumas siajn taskojn kaj homoj zorgas pri sia servado al aferoj, estiĝos neniu altrudado.

Ke kampo iĝas sterila, en ĉambro estas humide, mankas vestaĵo kaj manĝaĵo, prokrastas impostopagon, malakordiĝas inter edzino kaj kromedzino, mankas vicordo inter pliaĝulo kaj malpliaĝulo, – tio estas ja malĝojo por popolanoj.

Ke personoj ne kompetentas al la tasko, ne bone mastrumata la administra afero, konduto ne etas pura kaj honesta, amaso da subuloj dezerte maldiligentas sen bela merito, ne estas tenata la sistemo de salajroj kaj rangoj, – tio estas ja malĝojo por grandoficistoj.

Ke en kortego ne troviĝas lojalaj vasaloj, la ŝtato estas en tuta malordo, metiistoj-inĝenieroj estas ne lertaj, tributoj al la Ĉiela Filo ne estas belaj, rango en la kortego estas malaltigita ĉe printempo-aŭtuna vizito, ne estas favorata de la Ĉiela Filo, – tio estas ja malĝojo por landestroj.

Ke *yin* kaj *yang* ne harmonias, malvarma kaj varma klimato ne regula je tempo kaj per tio difektiĝas aĵoj, tumultas landestroj, atakante unuj la aliajn laŭ plaĉe kaj per tio damaĝas popolanojn, decreguloj kaj muziko estas senprudentaj, urĝas la financa malfacilo, homa etiko estas senorda, popolanoj diboĉas, – tio estas malĝojo por la Ĉiela Filo kaj kancelieroj.

Nun vi ne okupas postenon en la alta nivelo por servi al landestroj kaj kancelieroj, nek en la malalta nivelo por servi al ministroj kaj oficistoj. Malgraŭ tio, vi ornamas decregulojn kaj muzikon, klasifikas homan etikon, tiel transformi popolon kaj ordigi ĝin, – tio estas al vi tro multe da aferoj por plenumi. Aldone, homo havas ok makulojn kaj al aferoj adheras kvar malsanoj. Pri ili oni ne devas ne konsideri.

Ne fakulo okupas sin pri la afero – tio estas nomata ‘kaĉo’. Proponi tion, kio ne estos zorgata poste – tio estas nomata ‘miellango’. Diri opinion por komplezi alies deziron – tio estas nomata ‘komplimento’. Paroli pri la temo sen jesado-neado – tio estas nomata

⁵⁸⁵ 敢不虚心 Ĉiuj esploristoj prenas tiun frazon por mala esprimado. Mi tradukas laŭ litere.

'flatado'. Ŝati klaĉadi pri aliuloj – tio estas nomata 'kalumnio'. Disfendi interrilatton kaj disigi parencojn – tio estas nomata 'interveno'. Filaŭdegi aliulon kaj per tio enfaligi lin en malvenkon aŭ malbonon – tio estas nomata 'insido'. Ŝajnigante akcepti ambaŭ kaj bonon kaj malbonon, gvati ŝancon ŝteli ĉion deziratan de si – tio estas nomata 'ruzo'. Havanto de tiuj ok makuloj ekstere konfuzas homojn kaj interne vundas sin mem. Nobluloj ne faras lin sia amiko. Klera reĝo ne faras lin sia vasalo.

Se temas pri kvar malsanoj, jen tiuj. Ŝati entrepreni grandan aferon, ĉiam ŝanĝante planon, tiel ŝajnigi sin meritulo – tio estas nomata 'fanfarono'. Pretendi sin fakulo pri scio kaj pri afero, tiel lasi al si libere interveni por sia utilo en alies aferon – tio estas nomata 'avido'. Ne korekti sian eraron trovitan kaj, aŭdante alies admonon, des pli rigidigi sin – tio estas nomata 'obstineco'. Se aliulo estas sama je opinio al li, li aprobas, se aliulo havas malsaman opinionon, li ne aprobas, eĉ se alies opinio estas bona – tio estas nomata 'aroganteco'. Jen estas kvar malsanoj. Nur kiam eblus forigi ok makulojn kaj preventi je konduto kvar malsanojn, tiam vi povus komenci vian aferon de instruado."⁵⁸⁶

Kongzi ĉagreniĝinte suspiris. Li riverencadis kaj, stariĝinte, diris: "Mi estadis ekzilita du fojojn el Lu-regno. En Wei-regno oni forviŝis eĉ miajn piedsignojn. En Song-regno oni hakis la arbon sur mi. Inter Chen kaj Cai regnoj oni sieĝis min. Mi ne scias en kio mi kulpas. Kial sekvadis min la kvarfoja persekutiĝo?"

La gasto triste ŝanĝis mienon, dirante: "Domaĝe, ke al vi estas malfacile kompreni! Jen estus iu, kiu, timante sian ombron, malamas siajn piedsignojn, forkuras de tie. Ju pli kuras kun piedoj levataj, des pli multe da piedsignoj. Spite ke li kuras laŭeble rapide, la ombro neniom foriras de li. Li mem pensis, ke li kuras tro malrapide, kaj sen ripozo kuregis. Finfine li mortis, forkonsumiĝinte. Al li ne estis sciata, ke en mallumo ĉesas la ombro kaj en kvieteco endas ripozigi piedojn. Kiel stulta li estis.

Vi esploras rilaton inter bonvolenco kaj justo, studas limon de sameco kaj malsameco, observas ŝanĝiĝon inter movo kaj senmovo, provas ĝustigi regulon por ricevi kaj doni, volas raciigi emocion de ŝato kaj malŝato, deziras harmoniigi ritmon de ĝojo kaj kolero, sed tamen vi mem apenaŭ eskapas damaĝon. Estu prudenta por kulturi vin mem, tenu skrupule la veron, redonu aĵojn al homoj – kaj neniu zorgo lacigos vin. Nun, dum vi mem ne plenkulturas vin, vi postulas multe de aliaj homoj. Ĉu tio ne estas mistrafa?"

Kongzi, grimacante, diris: "Permesu al mi demandi vin, kion signifas la 'vero'?"

La gasto diris: "La vero kuŝas en pleja sincereco kaj honesteco. Se ne sincera, se ne honesta, oni ne povas movi homojn. Tial do, kiu devigas sin plorkrii, tiu ne tristas

⁵⁸⁶ 八疵四患：摠佞諂讒賊隱險；叨貪很矜 Ĉu tiuj ok makuloj kaj kvar malsanoj estas produktoj de denaska naturo, aŭ ne? Taoisto devas konsideri ilin nedenskata. Sed tamen Konfuceano – denaska, kaj ili per decreguloj estas korektendaj.

kvankam malĝoja; kiu ŝajnicas sin koleranta, tiu ne efikas eĉ se severa; kiu ŝajnicas sin esti intima, tiu ne amikiĝas eĉ se ridante. Vera malĝojo senvoĉe tristas, vera kolero sen eksplodo minacas, vera intimo sen rido akordigas. Kiu havas veron interne, tiu movas dion ekstere. Ĉar la vero estas altvalora.

Se estas la vero en la homa rilato, ĉe servado al gepatroj estiĝas kompato kaj fila pietato, aŭ ĉe servado al reĝo – lojaleco kaj ĉasteco. Ĉe drinkado kaj kunmanĝado – gajeco kaj ĝojo, ĉe funebro – malĝojo kaj tristeco. En lojaleco kaj ĉasteco estas plej grava la merito, en drinkado kaj kunmanĝado estas plej grava la gajeco kaj ĝojo, en funebro estas plej grava la molĝojo, en servado al gepatroj estas plej grava la ĝustatempeco. Beleco je efektivigo de merito ne estas nur unu maniero. Kaj ĉe komforta servado al gepatroj povas esti ajna maniero. Ĉe plezuriga drinkado kaj kunmanĝado ne necesas elekti ilojn. Ĉe esprimo de malĝojo en funebro ne temas pri la dereguloj. Dereguloj apartenas al vulgaraĵoj. Oni ricevas la veron pere de la Ĉielo. Ĝi per si mem ne estas ŝanĝebla. Tial la sanktulo laŭ la Ĉielo faras la veron altvalora, kia ajn estus vulgara mondo. Stultuloj faras malon, ne povas laŭ la Ĉielo konduki kaj, zorgante je populareco inter homoj, ne scias altvalorecon de la vero. Ili vegete ŝanĝiĝas, influate de vulgara mondo. Tiel do ili estas malkontentaj. Estas domaĝe, ke vi frue mergiĝis en falso kaj ekaŭdis la Grandan Vojon-Taon malfrue.”

Kongzi riverencadis kaj stariĝis, dirante: “Nun, ke mi renkontiĝis kun vi, tio ŝajnas al mi feliĉo, donacita de la Ĉielo. Sinjoro, vi sen hezito akceptis min kiel lernanton kaj mem instruis al mi. Mi aŭdacas demandi vin, kie vi loĝas. Mi petas, mi volus ricevi instruon kaj ellerni ĉe vi la grandan Vojon-Taon.”

La gasto diris: “Mi aŭdis jenon. Kiu povas kune iri kun iu, tiu povas kune atingi la mirindan Vojon-Taon. Kiu ne povas kune iri, tiu ne komprenas la Vojon-Taon. Atentu, por ke vi ne kunestu kun la lasta, kaj vi povos eviti eraron. Estu diligenta je tio. Mi adiaŭas vin, mi adiaŭas vin!”

Li ekveturis per la boato, deŝovita de stango, kaj foriris laŭ akvolinio inter kanoj.

Interalie, Yan Yuan revenis per ĉaro. Zilu donis al Kongzi apogŝnuron por rajdi. Sed Kongzi ne atentis tion. Li atendis ondojn de lago ebeniĝintaj, kaj post kiam iĝis ne aŭdata la sono de remilo, li finfine aŭdacis surĉariĝi.

Zilu, sidante apud li sur ĉaro, demandis, dirante: “Mi, You, longe servis al vi, tamen ankoraŭ ne vidis vin tiom respekteme renkontinta homon. Eĉ reĝoj de dek mil militĉaroj kaj landestroj de mil militĉaroj, renkontinte vin, salutas unu la alian sur egala nivelo, aŭ vi aspektas eĉ pli fiera ol ili. Nun al la fiŝisto, havante bastonon, staras antaŭ vi, kaj vi, kontraŭe, kun kokso mallecita kaj spino kurbigita riverencadis kaj aŭdadis. Ĉu tio ne estas tro? Ĉiuj disĉiploj dubis vian sintenon. Kial iu fiŝisto povus esti respektinda por

vi?”

Kongzi, apogante sin al stango, spirĝemis kaj diris: “Ho ve! Kiel malfacile estas al vi, You, ŝanĝiĝi! Kvankam dum longe vi okupiĝis pri dereguloj kaj justo, tamen vi ne povas forigi ĝis nun vian servilecan koron. Proksimiĝu, mi parolu al vi: ‘Estas maldece ne respekti pliaĝulon rekontiĝintan. Estas ne bonvoleco, se, vidante saĝulon, ne respekti lin. Eĉ se li ne estus persono de pleja bonvoleco, vi ne devas malestimi lin. Estas ne sincere rigardi homon senvalora, se tiel ne eblas atingi la veron. Pro tio dum longe oni difektas sin mem. Domaĝe. Manko de bonvoleco estas al homo la plej granda eraro. Bedaŭrinde, ke vi, You, kondutas tiel. Se temas pri la Vojo-Tao, ĉio kaj ĉiuj estaĵoj devenas de la Vojo-Tao. Estaĵoj, kiuj perdas ĝin, mortas; kiu posedas ĝin, vivas. Farante aferon, se kontraŭ ĝi, malsukcesas; se konforme al ĝi, sukcesas. Tial do, kiu ajn havas la Vojon-Taon, tiun sanktulo respektas. Nun, koncerne la fiŝiston, eblas diri, ke li posedas la Vojon-Taon. Ĉu mi aŭdacus ne respekti lin?’”

32 LIE YUKOU

Lie Yukou estis iranta al Qi-regno. Mezvoje li retroiris malantaŭen kaj hazarde renkontis s-ron Bohun Wuren.

Bohun Wuren demandis: “Kio do igis vin nun reveni?”

Lie Yukou diris: “Mi konsterniĝis.”

Demandis: “Je kio vi konsterniĝis?”

Diris: “Mi manĝis en dek bufedejoj laŭ vojo. En kvin el ili oni donis al mi manĝi ekstervice pli frue ol al la aliaj.”

Bohun Wuren diris: “Se tiel, kial vi konsterniĝis?”

Diris: “Se interne ne asimiliĝas la sincereco, tiam la formo elmontras sin kaj eligas radion. Ĝi eliras eksteren kaj subpremas koron de homoj. Tio igas homojn facilanimaj je respektado de maljunuloj kaj faras al ili afliktojn. Bufedistoj gajnas monon nur per kuirado de manĝaĵoj, vendante multe, ricevas malmulte da profito.

Kvankam ili ne tiom estas potencaj, tamen ili traktis min tiel. Se temas pri reĝo kun dek mil militĉaroj, kiel? Korpo laĉiĝos pro ŝtato, scio elĉerpiĝos pro aferoj, ĉar la reĝo nepre komisiis al mi la ŝtatan aferon, atendante de mi meriton. Mi konsterniĝis je tio.”

Bohun Wuren diris: “Estas tre bone, ke vi, observante tion, kondukis tiel. Homoj ĝuste volas teni vin ĉe si.”

Dum ne pasis kelke da tempo, baldaŭ ĉe la pordo de Lie Yukou iĝis plenplene de ŝuoj.

Bohun Wuren staris, turnante sin norden kaj apogante sian mentonon sur bastonon. Starante dume, li silente sen ajna diro foriris. Lakeo raportis pri li al Liezi. Liezi kun ŝuoj en mane haste kuris nudpiede post lin. Ĉe la pordo Liezi atingis lin.

“Majstro, vi alvenis, kial ne vi diras al mi medikamentan vorton?”

Li diris: “Ĉesu! Mi jam diris al vi, ke homoj ĝuste volas teni vin ĉe si. Kaj fakte ili tenas vin. Tiu estas ne vi, kiu igis ilin teni vin, sed vi mem ne povas lasi ilin ne teni vin. Por kio tio utilis? Vi donas al ili ion aparte mirindan kaj afekcias ilin. Se estas la afekcio, nepre ŝancelas bazan denaskan naturon. Mi havas nenion diri al vi. Kiuj ludas kune kun vi, tiuj ankaŭ parolas al vi nenion. La vortetoj, dirataj de ili, ĉiuj estas venenoj por homoj. Ili neniam vekiĝas, neniam komprenas. Kiel do ili povus interhelpi unu la alian? Laciĝas lertulo, ĉagreniĝas intelektulo. Al nekapabluloj mankas io serĉi.⁵⁸⁷ Ili satmanĝadas kaj ludadas laŭplaĉe. Samkiel malligita boato, ili nur laŭplaĉe ludadas

⁵⁸⁷ 無能者無所求.. Tiun esprimon multaj esploristoj (krom rusa tradukisto) prenas por idealo de taoismo, sed mi ne povas kompreni tiel. Mi supozas, ke nekapabluloj estas tiuj, kiuj kolektiĝas ĉirkaŭ Liezi. En la libro *Liezi* mankas tiu parto.

vante.”

Estis iu Zheng-regnano, nomata Huan, kiu legis librojn en la loko de Qiushi. Tri jarojn poste Huan fariĝis konfuceano. Kiel la Flava rivero fekundigas la terenon, foran je 9 *Lioj*, ankaŭ liaj parencoj de tri familianoj⁵⁸⁸ riĉiĝis dank’ al lia kariero. Li faris sian plijunan fraton mohisto. La fratoj, kiel konfuceano kaj mohisto, disputadis unu kontraŭ la alia. Ilia patro subtenis la mohiston Di.⁵⁸⁹ Post dek jaroj Huan sinmortigis. La patro songiĝis, ke Huan diras jene: “Estas mi, kiu lasis vian plijunan filon fariĝi mohisto. Kial vi ne vizitos mian tombon vidi kverkon jam kreskanta kun glanoj en aŭtuno?”⁵⁹⁰

Kiam la Kreinto de estaĵoj rekompencas iun homon, ne rekte lin rekompencas, sed rekompencas la Ĉielon, kiu lasis lin fariĝi tia.⁵⁹¹ Tiu Huan konsideras sin posedanta ion diferencon ol aliuloj, kaj li malestimas sian patron. Tio estas sama, kiel Qi-regnanoj kverelis unu kun la alia ĉirkaŭ tio, ke kiu rajtas trinki el la puto. Do estas dirite, ke en la nuna mondo ĉiuj esas samkiel Huan, konsiderante sin mem prava. Kiu posedas virton, tiu ne scias pri tio, des pli tiu, kiu posedas la Vojon-Taon. Antikvuloj nomis tion ‘puno pro ignoro de la Ĉielo’.⁵⁹² Sanktulo ripozas tie, kie eblas ripozi, kaj ne ripozas tie, kie ne eblas ripozi. Popolamasoj ripozas tie, kie ne eblas ripozi, kaj ne ripozas tie, kie eblas ripozi.

Zhuangzi diris: “Estas facile scii la Vojon-Taon, sed malfacile ne paroli pri ĝi. Ne paroli kion scias – tio estas aliro al la Ĉielo. Paroli kion scias – tio estas aliro al homoj. Antikvuloj aliris al la Ĉielo, ne al homoj.

Zhu Pengman lernis buĉadon de drako ĉe Zhili Yi. Por tio li elspezis mil *jinojn*, tutan posedaĵon de sia domo.⁵⁹³ Pasis tri jaroj, kaj li mastris la lertecon. Sed troviĝis nenie, kie al li eblus elmontri la lertecon.

⁵⁸⁸ 三族 parencoj laŭ patro, patrino kaj edzino.

⁵⁸⁹ 翟 Nomo de plijuna frato. Sed ankaŭ la nomo de Mozi, fondinto de mohismo.

⁵⁹⁰ Iuj esploristoj prenas 秋 por 楸, kaj 柏 por 栢.

⁵⁹¹ 夫造物者之報人也, 不報其人, 而報其人之天 Estas notinde, ke en tiu frazo Kreinto estas pli alta, ol la Ĉielo. Sed termino “Kreinto 造物者” aperas rare en la verko de *Zhuangzi*. (en ĉap. 大宗師篇) Multaj esploristoj supozas, ke ĉi tie ‘la Ĉielo 天’ indikas ‘naturon 天性, 自然’.

⁵⁹² 遁天之刑 signifas punon al tiu, kiu, konsiderante subjektan agon grava, malatentas naturon. En ĉi tiu teksto estas prezentata granda temo, kiel konfuceanismo, mohismo, homa ago, Ĉielo, kaj Kreinto, sed, bedaŭrinde, mankas preciza argumentado. Estas tre strange, ke konfuceano Huan malestimas la patron (賤其親).

⁵⁹³ 朱泚漫 Familinomo – Zhu, persona nomo Pengman (Laŭ 成疏) 支離益 Familinomo – Zhili, persona nomo – Yi. 千金 egalas al ĉ. 250 g da oroj.

Sanktulo ne faras neprecon neevitebla, tial do ne havas armilon. Popolamaso faras neneprecon neevitebla, tial do havas multajn armilojn. Ili obeas al armiloj, tiel do iras kaj postulas. Kiu apogas sin al armiloj, tiu pereas.

Kompreno de malgrandulo ne malligiĝas de donado-redonado kaj interŝanĝo de leteroj, tiel do ili laciĝas je spirito por malprofundaj bagatelaĵoj. Sed tamen ili dezirus sintezi Vojon-Taon kun Estaĵoj en la malplena unu tuteco. Tiaj personoj ŝanceliĝas en la spactempo de kosmo. Ili, kun korpo implikigita, ne scias komencon de komencoj.

La pleja homo lasas sian spiriton reveni al Senkomenco kaj dormi dolĉe en la vilaĝo de Nenio, kie akvo fluas senforme kaj ekŝprucas kun granda pureco.

Ho ve! Bedaŭrinde, vi faras ion ajn, sciante nur harfendan bagatelaĵon. Vi ne scias Grandan Trankvilecon.”

Song-regnano, nomata iu Cao Shang, estas sendita de la reĝo de Song al Qin-regno.⁵⁹⁴ Kiam li ekveturis, li estis asignata kelke da ĉaroj. La reĝo de Qin tre ĝojis vidi lin kaj donacis al li cent carojn. Kiam li revenis al Song, li vidis Zhuangzi kaj diris: “Al mi ne estas konvene iri malvastan pordon aŭ sufokan straton kaj teksadi sandalojn en povra vivo kun malgrasa kolo kaj flav-palaj oreloj. Al mi estas konvene konsili al reĝo kun dek mil militĉaroj kaj sekvigi al mi cent militĉarojn.”

Zhuangzi diris: “La reĝo de Qin alvokas kuraciston, kiam li malsaniĝas. Kiu lancetas furunkon aŭ drenis absceson, tiu ricevas unu ĉaron. Kiu likas hemorojdon, tiu ricevas kvin ĉarojn. Ju pli malalta iĝas la kuracata parto, des pli multe da ĉaroj. Kian kuracadon por hemorojdo vi faris, ricevinte tiom multe da ĉaroj? Vi iru for!”

Duko Ai de Lu-regno demandis Yan He, dirante: “Se mi proponus postenigi Zhongni estrarano, ĉu la regno resaniĝus?”⁵⁹⁵

Yan He respondis: “Estos preskaŭ dangere fari tiel. Zhongni ĝuste ŝatas ornamadi per plumoj kaj pentraĵoj, okupiĝas pri belaj vortoj, prenante branĉon por ĉefo. Li altrudas paciencon al denaska naturo kaj tiel observas la popolon, kiun li ne scias nek kredas. Akceptante per sia koro subjektive, li mastrumas spiritualisme. Kiel li povus administri de supre la popolon? Se al vi plaĉas li, tiam mi prizorgos lin. Tiuokaze la eraro estos allasebla. Sed disigi la popolon de realo kaj lernigi al ili falson – tio jam ne estas la

⁵⁹⁴ 曹商 Familinomo – Cao, persona nomo – Shang. Laŭ Sima Biao 司馬彪, reĝo de Song estis 偃-康王 (surtrone 328-286 a. K.), reĝo de Qin - 惠文王 (surtrone 337-311 a. K.).

⁵⁹⁵ 哀公 (surtrone 494-467 a. K.) 顏闔 Subulo en Lu-regno, aperas en ĉap. 人間世, 讓王.

observado de la popolo. Tio estos maltrankvilo por postaj generacioj. Estas preferinde ĉesi tion. Al li estas malfacile administri.

Favori la aliajn kaj ne forgesi kion favoris – tio ne estas la Ĉiela maniero. Eĉ Komercestoj ne kalkulas siajn dentojn-virtojn, spite ke negocado estas ja kalkulado.⁵⁹⁶ Dieca homo ne kalkulas siajn virtojn.

Ekstera punado estas farata per metaloj kaj lignoj, interna punado estas farata per laboro kaj ekzilo. Kiam malgrandulo ricevas eksteran punadon, metalo kaj ligno akuzas lin. Kiu ricevas internan punadon, tiun mordas *yin* kaj *yang*. Kiu povas eviti ajnan punadon eksteran aŭ internan, tiu estas nur Vera Homo.⁵⁹⁷

Kongzi diris: “Ĝenerale homa koro estas pli kruta ol montoj kaj riveroj, pli malfacile scii ĝin ol scii la Ĉielon. Se temas pri la Ĉielo, estas periodeco kiel printempo, aŭtuno, vintro, somero, mateno kaj vespero. Sed koncerne de homoj, mieno estas dika kaj sento estas profunda. Okazas, ke vizaĝo aspektas humila, sed fakte estas aroganta. Ŝajnas kapabla, sed fakte estas sentaŭga. Ŝajnas tordita je karaktero, sed fakte estas fakulo. Ŝajnas firma, sed fakte estas loza. Aspektas milda, sed fakte estas malkompatema.

Tiel do troviĝas iu, estinte iam fervora je serĉado de justo, forlasas poste la juston arde. Tial la reĝo, forigante iun ajn personon malproksimen, observas lian lojalecon; venigante lin proksimen, observas gradon de lia respekto; donante al li komplikan taskon, observas lian kapablon; abrupte demandante lin, observas lian saĝon; urĝe promesante kun li, observas lian fidelecon; komisiante al li monon, observas lian bonvolecon; sciigante lin pri urĝa danĝero, observas lian fidelecon; donante al li drinki vinon, observas lian decon de sinregado; lasante lin miksiĝi kun virinoj, observas lian inklinon al volupto. Per tiuj naŭ provoj estas rekoneble pri personeco, malgranda aŭ ne.”

Zheng Kaofu, enoficigite unuafoje, iradis kapkline; oficigite duafoje en alta rango, iradis dorskline; oficigite triafoje en plialta rango, iradis lumbokline laŭ vojflanka muro. Kiel do li aŭdacus mispaŝi?⁵⁹⁸

⁵⁹⁶ 齒 Estis esprimo 齒德, do mi prenas la ideogramon kiel kalkuladon de virto, kiom da favoroj oni donis al aliaj homoj.

⁵⁹⁷ 動·過 Mi prenas tiun punadon kiel punlaboron kaj elpelon en foran vojon. Multaj esploristoj prenas ilin por maltrankvilo kaj rimorso. Vera Homo 真人.

⁵⁹⁸ 正考父 estis prapatro de Konfuceo antaŭ dek generacioj, servis kiel Grandoficisto en Song-regno en 8 jc. a. K.

Se temas pri ordinarulo, unuafoje enoficigite, li sintenas aroganta, rigardante sin alta kaj granda; duafoje oficigite, li dancas sur kaleŝo; triafoje, li eknomas pliaĝajn parencojn per personaj nomoj. Kial li povus egali al Tang kaj Xu?⁵⁹⁹

Ne estas malbono pli granda ol subjektiva virto en koro. La koro havas okulharojn. Se havas okulharojn, vidas subjektive de interne. Kiu vidas de interne, eraras.

Estas kvin sinistraj virtoj. El ili ĉefa estas interna virto.⁶⁰⁰ Kion oni nomas ‘interna virto’? Interna virto estas ‘taksi sin bona’ kaj ‘kritiki tiun, kiu ne faras same’.

Estas ok ekstremoj, mizerigantaj homon. Estas tri necesaj kondiĉoj, alportantaj sukceson. Estas ses faktoroj, kondukantaj al punado.

Ok ekstremoj estas jenaj – beleco, barboj de vangoj, alta staturato, granda konstitucio, plena energio, belstilo, kuraĝo, decidemo. Se iu je ĉiuj ok punktoj superas ol aliuloj, suferos de mizero pro tio.

Tri necesaj estas jenaj – obeado al situacio, sinkaŝado kaj malleviĝo, humila timemo. T. e. malaltigi sin ol aliajn. Kiu havigas al si ĉiujn tri sintenojn, tiu sukcesos je promocio.

Kiu havas intelekton kaj saĝon, tiu estos defaligita el de promocio; kiu havas kuraĝon kaj aktivecon, tiu alvokos vengemon; kiu havas bonvolecon kaj juston, tiu estos multe akuzata. (Jen ses faktoroj.)

Kiu akiras senton de la vivo, estas granda; kiu akiras scion, estas malpli granda. Kiu komprenas la grandan ordonon de la Ĉielo, tiu sekvas ĝin; kiu komprenas la malgrandan ordonon, tiu estas kondukata de hazardo.

Iu homo had aŭdiencon kun reĝo de Song-regno, kiu degnis donaci al li dek kaleŝojn. Li montris parade kaj fiere tiujn dek kaleŝojn al Zhuangzi.

Zhuangzi diris: “Ĉe Flava rivero loĝis iu malriĉa familio, kiu vivtenis per teksado de kanoj kaj artemizoj. Iam filo mergis sin en profundon kaj prenis perlon de mil *jinoj*. Lia patro diris al la filo: ‘Frakasu la perlon per ŝtono! Ĝi devis troviĝi nepre en abismo, profunda naŭoble, sub la mentono de Nigra drako. Vi povis akiri ĝin, ĉar la Nigra drako estis dormanta. Se ĝi vekigus, kiom da pecetoj el via korpo restus?’

Nun abismo de Song-regno estas multe pli profunda ol la rivera abismo, profunda naŭoble. La reĝo de Song estas multe pli feroĉa ol Nigra drako. Vi povis ricevi koleŝojn nepre pro tio, ke la reĝo hazarde estis dormanta. Se oni vekus la reĝon de Song, vi estus frakasita en pluvorojn.”

⁵⁹⁹ 唐許 estas reĝo Yao 堯 kaj ermito 許由.

⁶⁰⁰ 中德 malfacile traduki la frazon. Plia klarigo estas sube 有以自好也而叱其所不爲者也. T. e. rigardi sin mem bona kaj kritiki la aliajn, ne samajn laŭ sia opinio. Kritiko 叱 ĉe taoismo estis maltaksata laŭ ĉi tiu teksto. Sed la verko *Zhuangzi* estas plena de kritiko al aliaj pensmanieroj.

Iu provis inviti Zhuangzi kiel altrangulon. Zhuangzi respondis al la sendito, dirante: “Ĉu vi iam vidis bovon, oferotan al altaro? Oni vestas ĝin per ornamita vesto kun brodaĵo kaj donas al ĝi manĝi greson kaj fabon. Sed, kiam ĝi estas entirita en maŭzoleo, eĉ se ĝi dezirus fariĝi ankoraŭ foje unusola bovido, jam neniel eblas.”

Zhuangzi estis mortanta. Disĉiploj volus lukse fenebri lin.

Zhuangzi diris: “Mi faros la Ĉielon kaj la teron ekstere kaj interno de mia ĉerko, faros la sunon kaj la lunon vico da muroj, faros stelojn perloj kaj gemoj, faros ĉion adiaŭa oferaĵo. Ĉu ne estas preta mia funebraĵo? Kion ankoraŭ aldoni?”

Disĉiploj diris: “Ni timas, ke korvoj kaj milvoj formanĝos vin.”

Zhuangzi diris: “Se supren, mi fariĝu manĝaĵo por korvoj kaj milvoj, se suben, fariĝu manĝaĵo por talpogriloj kaj formikoj. Tio estas nur forpreni de unu kaj doni al la lia. Kia bigoteco troviĝas en tio?”

Se uzi maljuston por atingi juston, ĉi tiu justo ne estas justa. Se uzi la malklaran pruvon por atingi klarecon, ĉi tiu klareco ne estas klara. Klera homo uzas ion ajn por fari devontecon. Dieca homo klarigas tion. La klera ne superas por ĉiam ol la dieca. Sed stultuloj kredas kion ili vidas, kaj enmetas tion inter homojn. La merito estas nur ekstera. Ĉu tio ne estas bedaŭrinda?”⁶⁰¹

⁶⁰¹ La teksto temas pri justeco de luksa funebro, rigardata de konfuceanoj kiel grava devo. Mohistoj kontraŭis al ili, kaj pledis por simpligo de funebro. Estas interese, ke je la funebro Zhuangzi mem staras sur la sama pozicio kun mohistoj, sed liaj disĉiploj staras por konfuceanismo. Mortanta Zhuangzi konsideras luksan funebro maljusta, senpruva kaj malklara.(不平, 不徵)

33 LA MONDO

En la mondo troviĝas multe da sciencistoj, el kiuj ĉiu konsideras la sian superba kaj nealdonebla plu. Kie do ekzistas t. n. antikve ‘Arto de Tao’? Estas dirite: “Estas nenie, kie ĝi ne ekzistas.” Oni demandas: “De kie dioj descendas? De kie lumiĝo devenas?”

Estis kie sanktuloj naskiĝis. Estis kie reĝoj surtroniĝis. Ĉiuj devenas de unu sama fonto. Kiu ne disiĝas de Prapatro, tiu estas nomata ‘la Ĉiela homo’. Kiu ne disiĝas de Spiritoj, tiu estas nomata ‘la Dieca homo’. Kiu ne disiĝas de Vero, tiu estas nomata ‘la Pleja homo’.

Fari la Ĉielon sia Prapatro, fari la virton sia fonto, fari la Taon sia pordo, antaŭvidi ŝanĝon kaj transformacion – tio estas nomata agmaniero de Sanktulo.

Fari bonvolecon sia devo, juston sia racio, decregulojn bazo de sia konduto, muzikon sia harmonio, kaj plenigi sin per bonodoro de mizerikordo – tio estas nomata agmaniero de Noblulo.

Fari leĝojn normoj de distingo, nomojn tabulo de rangoj, komparadon metodo de eksperimento, konsideron bazo de decido – per tio estas ordigite en la vico kvazaŭ nombro 1, 2, 3, 4. Tiel eblas asigni cent oficistojn al rangoj por reciproke servadi. Fari servadon ĉiamo, liveri vestaĵon kaj manĝaĵon kiel ĉefon, multigi dombestojn kaj amasigi posedaĵon-trezoron, zorgadi pri malfortaj maljunuloj, orfoj kaj vidvinoj por nutri ĉiujn – tio estas ja rezonado por la popolo.

Antikvuloj disponis ĉion al si, do ili havigis al si diecon kaj klerecon, estis puraj kaj majestaj samkiel la Ĉielo kaj la tero, kreskigis ĉiujn estaĵojn, akordigis la mondon, rekompencis popolanojn, klarigis bazan politikon, kunligis delikatajn regulojn laŭ ĉiuj anguloj kaj ĉiuj ajn grandaj aŭ malgrandaj principoj kaj detaloj. Estis nenio, kion ili ne traktis.

La klereco, realigita en reguloj kaj malnovaj leĝoj, transdoniĝis al postaj generacioj per libroj de historio, kaj ankoraŭ troviĝas multe en ili. Kio estas transdonita en la libroj de *Poezio*, *Libroj*, *Decreguloj-Ritualoj* kaj *Muzikoj*, tion povis multe klarigi kaj publikigi personoj de Zou- Lu-regnoj kaj sinjoroj kun portebla skribtableto en zono.⁶⁰² *Poezio* instruas pri strebo, *Libroj* instruas pri aferoj, *Decreguloj-Ritualoj* instruas pri kondutoj, *Muziko* instruas pri harmonio, *Libroj de Ŝanĝiĝo* instruas pri *yin* kaj *yang*, *Printempo-Autuno* instruas pri nomoj kaj distingo de rangoj. Tiuj diversaj verkoj disvastiĝis multnombro en la tuta mondo kaj establiĝis en la Meza Regno laŭdate ofte kun la nomo kiel sciencoj de cent skoloj.

⁶⁰² 鄒魯之士, 縉紳先生 indikas Konfuceon, Mengzi, kaj konfuceanojn.

Poste la mondo ege malordiĝis. Malaperis sanktuloj kaj saĝuloj. Koncepto de Tao kaj virto perdis unuecon. Multaj en la mondo komprenas unu flankon prava por sia vidpunkto. Por ekzemplo, oreloj, okuloj, nazo, buŝo – ĉiu pretendas la sian prava, kaj tiel inter ili ne eblas komunikiĝi. Talentuloj de cent skoloj, ĉiu el ili posedas sian bonan talenton, uzeblan laŭokaze kaj laŭtempe. Sed ili, ne havante senpartiemon, estas nur unuflankaj fakuloj. Ili malkombinas la belon de la Ĉielo kaj la tero, malkomponas la rezonon de ĉiuj estaĵoj, se kompari kun la kompleteco de antikvuloj, ili tre malmulte povas posedi la belon de la Ĉielo kaj la tero aŭ la amplekson de dieco kaj klereco. Tiel do la Vojo-Tao de sanktuloj interna kaj de reĝoj ekstera kaŝiĝis en mallumo, ne klaras, vualite, ne elmontriĝas. Homoj en la mondo, ĉiu el ili faras kion volas, nur konsiderante sin prava. Domaĝe! Cent skoloj, nur impetante, ne revenas, kaj nepre ne kuniĝas. Sciencistoj de postaj generacioj, malfeliĉaj, ne povas vidi purecon de la Ĉielo kaj la tero aŭ grandan ampleksecon de antikvuloj. Por la mondo distordiĝis la scienco de Tao.

En antikva ideologio estis instruo jen kia – ne lasi al postaj generacioj elspezi tro ekscese, ne lasi superkonsumadi ĉiujn aĵojn, ne lasi trouzi leĝ-regulojn, sed pretigi sin al la monda urĝo per sinperfektigo, apogante sin al preciza scienco-tekniko, kiel mezuriloj de ‘carpentista lineo’.

Mo Di kun Qin Guli aŭdis tiun moralon kaj ĝojis je tio. Sed ili faris tion tro ekscesa, ĉesis malŝparon, obeante al la ideo tro ekscese, ke ili ignoris muzikon.⁶⁰³ Ili ordonis tion, dirante, ke tio estas ŝparado-ekonomio.

Vivi, ne kantante; morti sen ricevi servadon. Mozi predikis universalan amon, reciprokan profitigon, kaj neatakadon. Lia Vojo ne baziĝas sur kolero. Li amis lernadon de scienco amplekse kaj sendevie. Sed li ne samas kun antikvaj reĝoj je neglekto de antikvaj muzikoj kaj ritualoj.

Ĉe la Flava Imperiestro estis muziko, nomata Xianchi; ĉe Yao estis Dazhang; ĉe Shun – Dashao, ĉe Yu – Daxia, ĉe Tang – Dahuo, ĉe reĝo Wen – muziko de Biyong, ĉe reĝo Wu kaj duko Zhou prezentiĝis muziko, nomata Wu.⁶⁰⁴

En antikvaj funebroj estis distingo de ritoj inter nobeloj kaj nenobeloj, ditingo de rangoj inter supro kaj subo. Se la Ĉiela Filo – kun sep tavoloj de internaj kaj eksteraj ĉerkoj, regnestroj – kun kvin tavoloj, grandoficistoj – tri tavoloj, oficistoj – du tavoloj.

⁶⁰³ 作為非樂. Ideogramo 樂 signifas ambaŭ muzikon kaj plezuron. Ĝi originas el religia ceremonio por plezurigi diojn-spiritojn per muziko. Mohistoj kontraŭis al plezurigo de homoj per pompa muziko far de riĉuloj-potenculoj.

⁶⁰⁴ 咸池, 大章, 大韶, 大夏, 大濩, 辟雍, 武. Ankaŭ Mozi sciis la ekzistadon de muziko ĉe antikvaj reĝoj. Li kritikis muzikon pro tio, ke la muziko estis ludata por landestroj pere de ekspluato al laboruloj, kaj pro tio, ke muziko ne efikas al plibonigo de politiko.

Nun sola Mozi predikas, ke ne kantu, vivante, kaj ke ne servadu al mortinto. Ĉerko sufiĉas nur interna sen ekstera, farita per paŭlovnio dika je 3 *cun*oj. Tio estis normo. Se oni predikus tion al homoj, tiam, eble, ne povus ami homojn. Se iu farus tiel nur por si mem, li ne amus sin mem. Kvankam ankoraŭ ne estas venkita la Vojo de Mozi, sed tamen, ĉu tio estas homeca, ke ne kantas, kiam oni volus kanti, ne ploras, kiam oni volus plori, ne ĝojas, kiam oni volus ĝoji?⁶⁰⁵ Oni diligentas dum sia vivo, sed la morto estas traktata flegme, se tiel, tia Vojo estas tre modesta, ke faras homon ĉagrena kaj malĝoja. Do estas malfacile kondukti laŭ tio. Eble, oni ne povas konsideri ĝin kiel la Vojon de sanktuloj. Se kontraŭa al koro de la mondo, la mondo ne povas elteni. Malgraŭ ke Mozi sola povus plenumi la taskon, kiel povus sekvi lin la mondo? Se disiĝas disde la mondo, estas malproksime de la reĝa Vojo.

Mozi rakontas pri sia Vojo jene: “Antaŭe, Yu konstruis digojn por preventi inundon, ĝustigis direktojn je fluo de Flava Rivero kaj la Longa Rivero kaj trafluigis ilin tra landoj de kvar barbaroj kaj naŭ provincoj kun tricent famaj montoj, tri mil branĉaj riveroj kaj nenombreblaj riveretoj. Tiam Yu mem, havante en mano korbegon kaj ŝovelilon, kombinis riverojn de la mondo. Sur liaj suroj kaj tibioj disfrotiĝis haroj. Surŝutate per forta vento kaj surŝprucigate per torenta pluvo, li establis ĉiujn landojn de la mondo. Yu estas la Granda Sanktulo. Li tiom pene laboris per sia tuta korpo por la mondo. Sekvante lin, mohistoj de postaj generacioj vestiĝas en sovaĝa felo kaj kruda vestaĵo, metas al si lignoŝuojn aŭ pajlsandalojn, sen ripozi tagnokte, dediĉas sin mem al ekstreme peniga laboro, dirante – ‘Kiu ne povas esti tia, tiu devojiĝas de la Vojo de Yu, kaj ne povas nomi sin mohisto.’”

Disĉiploj de Xiangli Qin, lernantoj de Wuhou, sudaj mohistoj kiel Ku Huo, Ji Chi, Deng Lingzi k. s., ĉiuj kune recitas la Kanonojn de Mozi, sed tamen ili, malsamaj, disputas unu kontraŭ la alia, nomas la aliajn mohistojn frakciuloj. Ili kontraŭas kaj kritikis unu la alian rilate al temo de ‘sameco-malsameco inter hardeco kaj blankeco’ aŭ oponas unu al la alia, kiel nepara kaj para nombroj. Ĉiu sekto starigas sian Grandulon sankta, kaj ĉiuj deziras, ke sia Grandulo fariĝu ĉefa heredonto por posteuloj-mohistoj, kaj tio ĝis nun ankoraŭ restas nedecidita.⁶⁰⁶ Ideo de Mozi kaj Qin Guli estis bona, sed ilia agado ne estis bona. Ĝuste, ili donis al postaj mohistoj labori penige kun nepra memsuferado. Ili kune nur impetas kun suroj kaj tebioj senharigitaj.

⁶⁰⁵ Mozi pledis por simpligo de funebro, kaj ke popolanoj komencu labori post la funebro laŭeble rapide. Zhuangzi mem ordonis al disĉiploj sian funebro multe pli simplan ol de Mozi. (ĉap. 32)

⁶⁰⁶ 相里勤, 五侯, 苦獲, 己齒, 鄧陵子 estas nomoj de postaj mohistoj. 墨經 estas Kanonoj kaj Dialektoj. 別墨 Frakcioj de mohistoj. 堅白同異 estas temo de disputo pri sameco kaj malsameco. 觚偶不侔 estas diverseco inter para kaj nepara nombroj.

Ili superas je okazigo de malordoj, sed malsuperas je regado. Spite tion, Mozi estas la vera amanto de la mondo. Dum la serĉata celo ne estas atingita, Mozi sindone laboradis, senkonsidere pri sia korpo malgrasita. Li estis kapabla persono.

Ne ĝenate de vulgara mondo, nek flikante aĵojn, nek riproĉante la aliajn, nek spitante homamason, ili nur deziris al la mondo pacon, deziris vigligi la popolon en la vivo, deziris, ke nur sufiĉu nutraĵo por si kaj la aliuloj. Per tio ili faris sian koron blanka. La antikva arto de Tao apartenas al ili. Ili estas Song Xing kaj Yin Wen, kiuj, aŭdante la moralon de Tao, ĝojis je tio. Ili portis ĉapon forme de la monto Hua kaj per tiu signo prezentis sin.⁶⁰⁷ Ili komencis sian metodon per aliro al ĉiuj aĵoj kun distingo kaj klasifiko. Ili argumentis pri enhavo de koro kaj provis formuli la movadon de koro. Ili provis komponi komunan ĝojon per la molo kaj harmoniigi la tutan mondon. Ili deziris meti senavidecon kiel ĉefan sintenon.⁶⁰⁸

Tiel do, ili ne hontis, hontigite, kaj dediĉis sin al la lukto por savado de popolo. Ili predikis malpermeson de agreso kaj neuzadon de armiloj. Ili luktis por savi la mondon. Por tio ili ĉirkaŭiradis la mondon, predikis al supro kaj instruis al subo. Malgraŭ ke la mondo ne alprenis ilin, tamen ili forte kaj laŭte paroladis kaj ne ĉesis paroli. Spite ke kaj supro kaj subo ne volus vidi ilin, sed ili aŭdacis vizitadi la supron kaj la subon.

Kvankam ili faris tro multe por la aliaj, tamen por si mem ili faris tro malmulte, dirante: “Bonvolu doni al ni 5 *sheng* da rizon, tio sufiĉas por ni.”⁶⁰⁹

Eble, ili mem ne povas satiĝi. Disĉiploj, kvankam malsataj, ne forgesante pri la mondo, ne ripozis tagnokte kaj diris: “Ni nepre devas esti viglaj.”

Kia granda strebo! Ili estas personoj, savantoj de la mondo.

Ili diris: “Noblulo ne devas esti tro skrupula kaj ne dediĉas sin al efemeraj aĵoj.”

Ili konsideris, ke ne necesas okupiĝi pri io ajn malutila por la mondo. Ekstere ili postulis malpermeson de agreso kaj neuzadon de armiloj, interne – malgrandigon de avideco. Jen kia estas resumo de ilia ideo kaj konduto, ampleksanta pensadon detalan kaj grandan, subtilan kaj ĝeneralan.

Publikema kaj nepartiema, ebena kaj malegoisma, distranĉita kaj senmastra,

⁶⁰⁷ 宋鉞 estis pensulo, kiu verkis 宋子十八篇. Li estas fama je pacifisto senperfortisma, kiel tolstoĵismo. 尹文 verkis 尹文子. Sed ambau verkoj perdiĝis. Ili metis sur sin ĉapon, smilan je formo al la monto Hua 華山之冠, kiel simbolo de egalismo inter supro kaj subo. Ili estas pensuloj samtempaj kun Mengzi kaj Zhuangzi.

⁶⁰⁸ 別宥 difino, klarigo de koncepto kaj klasifiko de aĵoj. 白心 pura koro kaj 寡欲 senavideco estis fama devizo de Song Xing.

⁶⁰⁹ 1 *sheng* 升 egalas al ĉirkaŭ 0.2 litroj.

scivolema sed neambaŭamema, li ne zorgas pri bagatelaĵo, nek intrigas je scioj, nek elektas aĵojn, kaj iras kune tiel. Jen kia estis la antikva Arto de Tao. Peng Meng, Tian Pian kaj Shen Dao aŭdis tiun moralon kaj ĝojis je tio.⁶¹⁰ Antaŭ ĉio estas ĉefa la tuteco de ĉiuj estaĵoj.

Estas dirite: “La Ĉielo povas kovri, sed ne povas subteni, kaj la tero povas subteni, sed ne povas kovri. La Granda Tao povas ampleksi, sed ne povas distingi. Sciu, ke ĉiu el estaĵoj havas ion eblan, kaj ion neeblan.”

Tial estas dirite: “Se elektas, la ĝeneraleco perdiĝas. Se instruas, ne atingeblas. La Tao forlasas nenion.”

Tial do Shen Dao rezignis scion kaj forĵetis egoon, kaj sekvis neprecon per si mem, objekte observis la naturan fluon de estaĵoj. Li faris tion teorio de Tao, dirante: “Sciu, ke vi ne scias.”⁶¹¹ Li ĝuste malestimus scion kaj poste per tio apenaŭ ne vundus sin mem.

Kiel ajn malbela aŭ ne, li senrespondece mokridas promocion de saĝoj en la mondo. Kiel ajn arbitra kaj libervola aŭ ne, li sendece akuzas grandajn sanktulojn en la mondo. Kion ajn renkontante, puŝante kaj hakante, kun ĉio li kune turnadas sin, tute egale, ĉu tio pravas aŭ ne pravas. Se eblus eviti ian ajn ĝenon, li ne faras scion kaj penson sia gvidanto. Ne konsiderante pri antaŭo kaj malantaŭo, li nur staras alta kaj fiera. Li, pusite iras, tirite reiras, kvazaŭ kirlas vento, kvazaŭ turniĝas ventrado de plumoj, kvazaŭ rotacias muelŝtono. En ĉio estas neriproĉebla, je movo kaj je kvieto estas senerare. Neniam ĝis nun li restas kulpigebla. Kial? Ĉar senintelktaj estaĵoj ne konstruas al si aflikton, ne lacigas sin per senutila scio, kaj tiel en ilia racio ne disiĝas movo kaj kvieto. Kaj dum la tuta vivo li restas fremda al honoro.

Tial do estas dirite: “Finfine nur estu tia samkiel senintelektaj estaĵoj. Ne utilas saĝeco kaj sankteco. Terbulo ne perdas la Vojon-Taon.”

Sed eminentuloj kune mokridas, dirante: “La Vojo de Shen Dao ne estas la vojo, laŭ kiu vivantoj iras, sed ĝi kondukas al rezonado de mortintoj. Certe trafas fantomon.”

Ankaŭ Tian Pian estis tia. Li lernis ĉe Peng Meng, ke ne eblas instrui. Mastro de Peng Meng diris, ke antikvaj serĉantoj de Tao atingis nur vidpunkton rigardi nenion prava kaj nenion malprava, ĉar la stato estas nur de subita momento. Kiel do pri tio direblas? Li ĉiam kontraŭis al homoj, ne altiris atenton, sed ne povis eviti hakadon. La Vojo-Taon nomata de li ne estis la Vojo-Taon. Jesado dirita de li ne povis eviti esti neado. Peng Meng, Tian Pian kaj Shen Dao ne atingis la komprenon de Vojo-Taon. Sed tamen ili

⁶¹⁰ 彭蒙 estis instruisto de 田駢. 田駢 kaj 慎到 estis scienculoj, kolektiĝintaj en Qi-regno, kiel 稷下之学士. Ĉefa ideo estas la tuteco de ĉiuj estaĵoj 齊萬物.

⁶¹¹ 知不知 Eblus diverse traduki la frazon.

ĉiuj estis aŭdintoj iam pri tio ĝenerale.

Konsiderante fonton esenca, aĵojn senesencaj, amasiĝon mankohava, sidi sola kviete kun spirita heleco – en antikva ‘Arto de Vojo-Tao’ troviĝas tia ideo. Limgardanto Yin kaj Lao Dan, aŭdinte tiun moralon, ekĝojis je tio. Ili starigis koncepton de ‘Konstanta Nenio kaj Esto’, kaj principon de ‘Granda Unueco’. Kiel ekstero esprimiĝas malforteco kaj humileco, kiel esenco – malpleneco, kiu ne detruas ĉiujn aĵojn.⁶¹²

La limgardisto Yin diris: “Se oni sidas, farante sin nenio, tiam estaĵoj, havantaj formon, prezentiĝas per si mem. Ili moviĝas samkiel akvo, silentas samkiel spegulo, resonas samkiel eĥo, obskuriĝas kvazaŭ perdo, kvietas samkiel io pura. Kiu akordiĝas, tiu harmonias. Kiu prenas, tiu perdas. Neniam anticipas antaŭ ol aliuloj, ĉiam sekvas ilin poste.

Lao Dan diris: “Scii virecon, teni virinecon, kaj fariĝi la monda ravino. Scii purecon, teni malhonoron, kaj fariĝi la monda valo. Aliuloj ĉiuj prenu antaŭ ol vi, kaj vi prenu post ili.”

Li diris: “Akceptu la mondan malpuraĵon. Aliuloj ĉiuj prenu frukton, vi prenu ja malplenon. Ne akumulu, ĉar restas superfluo. Estas ja granda superfluo. Je konduto tenu sin lanta aŭ komplezema, kaj ne konsumiĝu tro. Nenion farante, vi ridas alies lertecon. Aliuloj ĉiuj serĉas feliĉon, sed vi sola restu perfekta en tordiĝo.”

Li diris: “Estus bone, nur se eviteblus peko. Prenu profundecon kiel radikon, ŝparemon kiel regulon.”

Li diris: “Io malmola detruigiĝas, io akra rompiĝas. Ĉiam estu tolerema al estaĵoj. Ne estu severa al aliuloj.”

Eblas nomi tion la plej alta. La limgardisto Yin kaj Lao Dan estas ja grandaj je vasteco kaj Veraj homoj samkiel antikvuloj.

Obskura, senforma. Transformiĝas, ŝanĝiĝas sen konstanteco. Aŭ mortas aŭ naskiĝas. Ĉu estas kune en vico kun la Ĉielo kaj la tero? Ĉu iras kun spirita heleco? Kien, foranimite, iras? Kien, subite, impetas? Viciĝas tute sinsekve ĉiuj estaĵoj. Sed neniu el ili estas sufiĉe fidinda por apogo. Troviĝas tia pensmaniero en antikva ‘Arto de Tao’. Zhuang Zhou, aŭdinte tion, ekĝojis je tio.

Li uzadis absurdajn parolojn, fantaziplenajn vortojn kaj nedifineblajn terminojn. Estante iam arbitra kaj kaprica, li ne partiemis, nek deviis je vidpunkto. Rigardante la mondon kotmakulita kaj ne kapabla akcepti seriozan justan alparoladon, li babladis malkoncize kun ŝercoplenaj vortoj, veraĵojn parolis kun vortoj citataj kaj propagandis

⁶¹² 常無有, 太一, 空虛 gravaj konceptoj de taoismo. 太一 estas alinomo de Tao 道.

per vortoj de parabolo.⁶¹³ Li sola interkomunikiĝis kun spiritoj de la Ĉielo kaj la tero, sed rigardis estaĵojn sen aroganteco, ne akuzadis ilin laŭ praveco kaj malpraveco. Tiel do li kunloĝadis kun vulgarej mondanoj. La libro aspektas granda kaj bela, sed glata kaj sendifekta. La vortoj estas kvankam multdiversaj, tamen indas aprezi mirindan artifikon. Neniam ĉesas lia fruktplena skribmaniero. Supre li ludas kune kun Kreinto de estaĵoj, sube li amikiĝas kun tiu eternulon, kiu havas ne komencon nek finon, estante ekster morto kaj vivo. Je la fonto – vasta, granda, malfermita, profunda kaj libera. Je la enhavo – eblas diri, kondensa, modera, kaj atinginta supron. Sed, se temas pri tio, ke respondi laŭ transformiĝo kaj solvi pri aĵoj, lia rezonado ankoraŭ ne sufiĉas, nek elŝeliĝas, tiel do restante svaga kaj malklara, ankoraŭ ne atingis la celon.⁶¹⁴

Hui Shi estis persono kun multopa talento. Li havis kvin ĉarojn da libroj.⁶¹⁵ Lia doktorino estis senorda kaj konfuzita. Troviĝas eldiro maltrafa. Li menciis rilaton inter signifo kaj aĵo, dirante jen tiel:

Estas Nenio ekster maksimumo, tio estas nomata Granda Unuo. Estas Nenio ekster minimumo, tio estas nomata Malgranda Unuo.

Ne eblas amasigi ion sendikecan. Sed la dimensio povas esti granda je mil *lioj*.

Kaj la ĉielo kaj la tero estas malalta, kaj monto kaj marĉo estas ebena.

La suno post tagmezo kliniĝas, estaĵoj, naskiĝinte, estas mortanta.

Granda sameco diferencas de Malgranda sameco. Tio estas nomata Malgranda sameco-malsameco. Ĉiuj estaĵoj samas kaj malsamas, tio estas nomata Granda sameco-malsamaco.

Sudo estas senlima kaj limigita.

Mi iras al Yue-regno hodiaŭ, kaj alvenis hieraŭ.

Ringo, kunĉenigitaj, estas elĉenigeblaj.⁶¹⁶

Mi scias centron de la mondo. Ĝi estas norde de Yan, sude de Yue.

Se ami universale ĉiujn estaĵojn, la ĉielo kaj la tero estas unu tuto.

Hui Shi konsideris sin kiel penetrinton de la mondo, kaj klerigis sofistojn. Sofistoj en

⁶¹³ 卮言, 重言, 寓言 Tiuj tri vortoj estis jam en la ĉap. “寓言”.

⁶¹⁴ 其應於化.....未之盡者 Diversas opinioj pri la lastaj frazoj. Iu prenas ilin kiel kritikon de Zhuangzi, la alila – kiel laŭdon de mistera profundeco. Mi konsentas kun la unua.

⁶¹⁵ Iuj konektas librojn verkitajn de Hui Shi, aliaj – posedatajn.

⁶¹⁶ 連環可解也 Ŝajnas, ke en ĉi tiu frazo troviĝas nenio kurioza. Estas kompreneble nur kondiĉe, ke estis epizodo pri donacita magia ringo de Qin-regno al Qi-regno. La ringo estis detruita, ne elĉenigite. 戰國策.

la mondo kune ĝuis tion.

Ovo havas plumojn.

Koko havas tri krurojn.

Ĉefurbo Ying posedas la mondon.

Hundo povas esti konsiderata kiel ŝafo.

Ĉevalo havas ovojn.

Bufo havas voston.

Fajro ne estas arda.

Monto eliris el de buŝo.

Rado ne premas la teron.

Okuloj ne vidas.

Fingro-montrilo ne atingas la objekton. Se ĝi atingis, la objekto ne neniigas.⁶¹⁷

Testudo estas pli longa ol serpento.

Ortilo ne estas rekta. Cirkelo ne povas krei cirklon.

Mortezo ne ĉirkaŭjuntas la tenonon.

Ombro de fluganta birdo neniam movas sin.

Rapidas sago, sed al la fluganta sago estas tempo ne iri kaj ne halti.

Gou ne estas Qian.⁶¹⁸

Flava ĉevalo kaj nigra bovo estas tri.

Blanka hundo estas nigra.

Orfa ĉevaleto neniam havas patrinon.

Skurĝo, longa je unu *chi*, eĉ se depreni el ĝi po duono ĉiutage, ne elĉerpiĝos eterne.

Tiele sofistoj kun Hui Shi interparoladis senĉese dum la tuta vivo. Huan Tuan kaj Gong Sunlong estis tiuj sofistoj.⁶¹⁹ Ili ornamis koron de homoj kaj kompleksis al homoj menson. Ili per buŝo povis venki aliajn en disputo, sed ne povis sekvigi alies koron. Jen la limo de sofistoj.

Hui Shi tagon post tago per sia scio diskutadis kun homoj, kaj aparte kune kun sofistoj konsternis la mondon per kuriozaĵo. Jen kia estas la skizo. Je parolado kaj diskutado Hui Shi mem konsideris sin plej saĝa, dirante: “Ĉu la Ĉielo kaj la tero estas pli viglaj ol mi?” Hui Shi estis heroo, sed sen Arto.

Li estas malforta je virto, sed forta je aĵoj. Lia vojo estas malrekta. El la vidpunkto de

⁶¹⁷ Diversas frazoj je diversaj tekstoj. 指不至, 物不絕 aŭ 至不絕.

⁶¹⁸ 狗非犬 Gou kaj Qian ambaŭ signifas en la ĉina lingvo “hundon”. Nur nomo diversas.

⁶¹⁹ 桓團 Zhao-regnano. 公孫龍 aperas en la ĉap. 秋水.

Vojo-Tao je la Ĉielo kaj la tero, kapablo de Hui Shi similas nur al laboro de moskito aŭ kulo. Koncernante la aĵojn, kio utila estas lia opinio? Estis allaseble, se li enfokusiĝus al unu. Estas dirite, ke estus iom pli bone, se li pli respektus la Vojon-Taon. Sed Hui Shi mem ne povis kontentiĝi je tio, kaj, ne laciĝinte, malkoncentre okupadis sin per ajnaj aĵoj. Kaj tiel li finis la vivon, kiel renoma sofisto. Tre bedaŭrinde! Talenta estis Hui Shi, sed li misuzis la talenton kaj akiris nenion. Ĉasadis ĉion ajn, kaj ne revenis. Tio estas samkiel per laŭta voĉo ĉasadi eĥon, kvazaŭ korpo konkurencas kun sia ombro je vetkurado. Estas triste.

POSTPAROLO JE ESPERANTIGO DE ZHUANGZI

BIOGRAFIO

Zhuangzi – familinomo estas Zhuang 莊, persona nomo estas Zhou 周. Li devenis de Meng 蒙, Song-regno 宋国, en nuna Henan provinco 河南省, proksime al tiama ĉefurbo Shangqiu 商邱.⁶²⁰ Nun tie staras monumento de Zhuangzi, montranta lian loĝlokon. Kaj restas la puto, nomata Zhuangzi Jing 莊子井. Ĉirkaŭe nun staras malgrandaj dometoj de kamparanoj, sterniĝas kampo kaj ne videblas monto. Lia rondforma tombo alta je 9 m estas konstruita en 1789 p. K. de imperatoro Qian Long en la vilaĝo, nun nomata Yanji Xiang. Tie staras la sanktejo por Zhuangzi.⁶²¹

Ne estas certe, en kioma jaro li naskiĝis kaj mortis. Estas skribite en *Shi Ji* jene:

“Zhuangzi devenis de Meng. Persona nomo estas Zhou. Li estis malaltranga oficisto de uruŝia arbaro 漆園吏. Li estis samtempulo kun reĝo Hui de Liang-regno kaj reĝo Xuan de Qi-regno. Lia scienco traktis multediversajn sferojn, sed la bazo estas sama kun la ideo de Laozi. La verko enhavas pli ol cent mil vortojn, en kiu troviĝas multe da paraboloj. En la ĉapitroj “Fiŝisto”, “Rabisto Zhi”, “Ŝtelado de kofro”, li kritikis konfuceanojn kaj klarigis la Arton de Laozi. <...> Kiam la reĝo Wei de Chu-regno, aŭdinte pri lia saĝo, sendis sian subulon al li kun donaco kaj propono, ke li enoficiĝu kiel ministro, li rezignis, ridante.”

Laŭ Ma Xulun – 369 – 286 a. K., laŭ Liang Qichao – 375 – 300 a. K., laŭ Qian Mu – 368 – 268 a. K. Estas malfacile konjekti pri datoj, ĉar eĉ epoko de menciitaj reĝoj diversas inter *Shiji* 史記 kaj *Analo de Bambua Libro* 竹書紀年. Fakte, li estis samtempulo de Hui Shi 惠施, fama nominalisto kaj amikiĝis kun li. (360?- a. K.). Ankaŭ Hui Shi naskiĝis en Song-regno kaj diference de Zhuangzi li servis kiel ĉefministro al reĝoj de Wei-regno (惠王, 襄王). Hui Shi vizitis Zhuangzi je la morto de lia edzino. Hui Shi, ekŝiĝinte, foriris al Chu-regno en 306 a. K. Zhuangzi vivis pli longe ol Hui Shi. Zhuangzi adorvizitis la tombon de Hui Shi. Ili disputadis inter si kaj profundigis siajn argumentojn.

Mengzi (372-289 a. K.) estis samtempulo kun Zhuangzi. Sed ŝajne, ili ne interrilatis, samkiel Tolstoj kaj Dostojevskij, Ĉeĥov kaj Zamenhof. Nur unu fojon en *Zhuangzi* estas menciita iu ‘konfuceano de Zou 鄒’, kiu povus esti Mengzi.⁶²²

Zhuangzi, ekŝiĝinte postenon de Uruŝio-arbaro, li vivtenis sian familion, farante

⁶²⁰ Nuna adreso 河南省民权县顺河乡青莲寺

⁶²¹ Nun la loko estas nomata 河南省民权县老颜集乡唐庄村. Sed estas diversaj opinioj pri hejmo de Zhuangzi – iu konsideras ĝin Chu 楚, la alia – Qi 齐, la tria – Lu 魯, ĉar troviĝas tie ja lokonomo 蒙城, 蒙山.

⁶²² 蔡元培 asertas, ke Zhuangzi estas Yang Zhu, kritikata de Mengzi. 中国倫理学史第 8 章

pajlsandalojn kaj hokfiŝante. Samtempe li verkis kaj profundigis lernadon. Li havis edzinon kaj gefilojn. Sed pri liaj familianoj restis neniu informo. Ĉe li estis ankaŭ disĉiploj, kiuj funebris lin.

Lia materia vivo estis malriĉa, ke li loĝis en malvasta angulo, vestiĝis ĉifone kaj prunteprenadis manĝaĵojn. Kiam li renkontiĝis kun reĝo de Wei-regno, la lasta konsterniĝis pro lia mizera vestaĵo, kun vesto frikita, kun ŝnuro zonita, kun ŝuoj rompiĝintaj. Kolorŝanĝigis liaj oreloj en flavajn kaj malgrasiĝis lia kolo. Sed li diris: “Mi estas kvankam malriĉa, tamen nepre ne mizera.”

En la alia loko estas skribite:

“Iam Zhuangzi vestis sin en granda robaĉo flikaĵplena, kun fi-ŝuoj truitaj kaj noditaj per ŝnuroj, kaj renkontiĝis kun reĝo de Wei-regno.

La reĝo de Wei demandis: ‘Ĉu vi, Majstro, ekstreme ellaciĝis?’

Zhuangzi diris: ‘Pro malriĉo, sed ne pro ellaciĝo.’”

Sub tia kondiĉo li verkis ‘pli ol cent mil vortojn’ (laŭ *Shi Ji*). Tiel do lia verko estas plena de epizodoj, ke pro malriĉeco kaj malsato suferis grandaj pensuloj, kiel Konfuceo, Liezi k. a. Spite malriĉon, Zhuangzi ne sentis sin mizera nek laciĝinta, sed ludvagadis, pensante kun fantazio.

STRUKTURO DE TEKSTOJ

Nuna libro de Zhuangzi, kompilita de Guo Xiang 郭象, konsistas el tri partoj: Internaj 內篇(7 ĉapitroj), Eksteraj 外篇(15 ĉapitroj), kaj Diversmiksaĵaj 雜篇(11 ĉapitroj). Sed en antikvaj libroj estis skribite, ke ekzistis 52 ĉapitroj. Guo Xiang rearanĝis la libron, ekskludinte tri dekonojn. Multaj el esploristoj rigardas la Internan parton esenca kaj teorie klara, verkita de Zhuangzi mem, kaj jam antikve en la epoko Han estis elektitaj sep ĉapitroj. Aliaj partoj, Eksteraj kaj Diversaj, enhavas multe da epizodoj, kaj estas malfacile trovi iun ajn normon por distingi tiujn partojn. Multaj tekstoj en ili estas rigardataj dubendaj, kiel verkitaj de posteuloj. En tiuj tekstoj iuj esploristoj eĉ vidas pensmanieron alispecan ol Zhuangzi, admonon de subjektivisma agmaniero de persono, samkiel ĉe konfuceanismo.

Mi opinias, ke en la Eksteraj kaj Diversmiksaĵaj aperadas iuspeca dialektika pensmaniero, kiel “Jes, sed tamen...”(ekz-le pri Utileco de senutilaĵo). Iu rigardas tion devia el la pura ideo de “nenionfarado kaj naturo”. Sed mi konsideras, ke tio ne estas devio sed disvolviĝo. Rakontoj pri la inklino de Konfuceo al Taoismo estas prezentita ankaŭ kiel disvolviĝo de konfuceanismo. Konfuceo, ne forlasante sed tenante sian ideon, aŭskultas instruon de Laozi. Ŝajnas, ke verkistoj intencis skribi daŭrigon aŭ kompletigon de Analektoj 論語. Mi opinias, ke oni ne devas ekskludi verkojn de Eksteraj

kaj Diversaj ĉapitroj kiel herezon, sed devas konsideri ilin kiel havantan saman valoron kun Internaj ĉapitroj.

ANTAŬIRINTOJ

Mi opinias, ke Zhuangzi mem strebis sinkreti konfuceanisman kaj sian ideon. Por tio estas fabrikitaj multaj fabeloj pri Konfuceo, kvazaŭ daŭrigo de Analektoj. Per la buŝo de Konfuceo estas elparolate pri 'evoluo' de konfuceanismo laŭ la Vojo de Laozi kaj Zhuangzi.

Unuflanke, Konfuceo kaj konfuceanoj estas objekto de kritiko el la vidpunkto de Laozi kaj Zhuangzi pro artifiko de formalajtoj, kiel decreguloj, justo, bonvoleco, kaj aliaj moralaj disciplinoj. Sed samtempe konfuceanismo donas al Zhuangzi la altan nivelon de etiko, sur kiu estis konstruita la ideo de Zhuangzi.

Mozi kaj mohismo predikis gravecon de scienco, saĝo, scio kaj tekniko. Zhuangzi kritikis scion aŭ saĝon, kiun Mozi konsideras grava. Neglekto de saĝo ĉe Laozi kaj Zhuangzi eblas nur surbaze de mohismo, predikanta estimon al saĝo 尚賢. Verko de Zhuangzi estas plena de kritiko al saĝo (vid. ĉap. 8-10). Se ne estus mohismo, ne troviĝus eĉ la objekto de kritiko. Mozi taksis aktivan agadon de personoj kaj sinperfektigon de personeco pere de scienco kaj tekniko. Sen tia ideologio, ne eblas ankaŭ la kontraŭa ideo, kiel taksado de nenionfarado. Do mohismo liveris al Zhuangzi la objekton de kritiko el la vidpunkto de 'naturo aŭ senago'.

Alta nivelo de du ĉinaj ideologioj, kiel konfuceanismo kaj mohismo, faris Zhuangziisman tiel rafinita, ke eĉ nun ĝi donas al homaro inspiron por pensado. Konfuceanismo estas arkaika ideologio de naciismo, kastismo kaj feŭdalismo, estante gvidlibron por reĝoj-nobluloj 君子 kaj subuloj 臣民. Nuntempe ĝi donas al gvidantoj inspiron por regado de diversaj organizoj, kiel kompanio, firmao k. c., ĉar pensmaniero de konfuceanismo liveras saĝon por firme konservi societeton kaj ŝtaton per solida vicordo.

Mohismo – moderna ideologio de internaciismo, socialismo kaj scienco. Ĝi estas ideologio por inĝeniero kaj pensanta proleto. Ĝi akcelas modernigon per scienca kaj utilisma pensmaniero.

Sed Zhuangzi – ideologio de superfluulo, do restos eterna revo por estonteco. Ĝia kritiko al modernigo estas ĝuste trafa el la ekologia vidpunkto.

SENAGO-NENIONFARADO KAJ KONTRAŬ SCIO-SAĜO

Por kompreni koncepton 'senago' ni devas scii kion Zhuangzi mem 'faris', kiel 'agadis'. Li manĝis, laboris, verkis, instruis, nutris familion... Do li mem ne devus konsideri tiun

menciitan ‘faradon’ kiel ‘agon’. Lia ‘senago’ signifas adomonon, ke ne faru kontraŭon al naturo 自然. Kaj lia kritiko estas ĉefe direktata al aparta sfero, kiel politiko. Estas skribite en Zhuangzi pri fikcia diskuto inter Laozi kaj Konfuceo:

“Lao Dan diris: ‘Permesu al mi demandi vin, kion vi nomas la bonvoleco kaj la justo?’”

Kongzi diris: ‘Ĝui ĉion en la koro, ami universale sen egoo.⁶²³ Jen tio estas sento de la bonvoleco kaj la justo.’

Lao Dan diris: ‘Ho! Apenaŭ. Se temas pri la lasta frazo, ĉu la universala amo ne estas ĉirkaŭfrazo? Intenci forigon de egoo ankaŭ estas la egoo.⁶²⁴ Vi, Majstro, dezirus, ke la mondo ne perdu sian paŝtiston. Sed la Ĉielo kaj la Tero havas sian propran konstantecon. La suno kaj la luno havas sian lumon. Steloj havas sian vicordon. Birdoj kaj bestoj havas sian gregon. Arboj havas sian pozicion.

Ankaŭ vi, Majstro, se vi libere iros, sekvante la naturan virton, paŝos laŭ la Vojo, tiam je ĉio estos atingite per si mem. Kial vi bezonus laŭte recitadi kaj meti supren la bonvolecon kaj la juston? Tio similas kvazaŭ serĉadi perdiĝintan infanon per batado de tamburo. Ho ve! Vi, Majstro, konfuzas la homan denaskan naturon!”

Ĉi tie estas esprime pri la kerna ideo de Lao-Zhuang 老莊思想, kiel nenionfarado kaj obeo al naturo 無為自然, kaj kritiko kontraŭ konfuceanismo kaj mohismo por artefarado de justo kaj amo. Koncernante renkontiĝon de Laozi kaj Kongzi, multaj el nuntempaj esploristoj suspektas la verecon, malgraŭ ke estas skribite en *Shiji* pri la renkontiĝo.⁶²⁵

PENSADO GRANDA KAJ MALGRANDA

En la unua ĉapitro de Zhuangzi estas plena de fantazio. Iu Granda Fiŝo ŝanĝiĝis en grandan birdon, nomatan Peng, kiu flugas suden naŭdek mil *liojn*. Cikado kaj turto mokridas tion, dirante: “Ni foje ekflugas supren impete, strebas sidi sur branĉoj de arboj, kiel ulmo kaj pterokarpo, tamen ne atingante eĉ tien, estas tiritaj suben al tero. Por kio do necesus flugi suden je naŭdek mil *lioj*?”

Unuavide tiu fabelo rakontas pri tio, ke malgranduloj ne povas kompreni koron de granduloj, do gravas liberigo el de konvencia pensmaniero kaj el de ŝablona scio. Certe, estas kritikata la scio kaj saĝo, laŭdata en konfuceanismo kaj mohismo. Sed la rakonto pensigis legantojn pri gravaj temoj. Kompilinto de la nuna verko de *Zhuangzi*, Guo Xiang mem interpretis ĝin jene:

⁶²³ 兼愛 La termino estis uzata de mohistoj 墨家. Estas interese, ke el la vidpunkto de taoistoj tute egalas bonvoleco de konfuceanismo kaj universala amo de mohismo.

⁶²⁴ Laŭ ĉi tiu argumento, ankaŭ altruismo kaj universala amo estas egoismo.

⁶²⁵ Hu Shi 胡適 kredis la realan ekzistadon de Laozi, sed Qian Mu 錢穆 ignoris ĝin. En la epoko de Zhuangzi kaj Sima Qian la renkontiĝo estis rigardata kiel la historia fakto.

“Kvankam ili diversas je grandeco kaj malgrandeco, sed tamen ĉiuj havigis al si sian lokon laŭ sia naturo de estaĵoj asignita de la Ĉielo. Ĉiu laŭ sia kapablo okupiĝas pri asignita devo, do ĉiu estas tute unu sama je sia ludvagado.”

Laŭ Guo Xiang, eĉ cikado ludvagadas, samkiel Peng. En realeco ĉiuj estaĵoj, inkluzive homojn, povas ludvagadi nur same, kiel cikado kaj turto, ene de natura limo. Sed en la unua ĉapitro estas pli laŭdata la ludvagado de Peng. Kaj tiu Peng estas fikcia birdego, fantazie fabrikita per ‘vortoj’ en la cerbo de Zhuangzi. Li mem en reala vivo estis ekstreme malriĉa, ke li povis ludvagadi nur en limigita sfero de Song-regno. Tiel do al li eblus libere ludvagadi nur en fantazio, konsistanta el vortoj. En la verko de Zhuangzi estas prezentite pri du specoj de libero: mensa libero kaj korpa libero. La mensa libero apartenas al romantikismo, la korpa – realismo.

LIBERO KIEL SENKATENIĜO

La cikado kaj la turto vivas en naturo, flugante de branĉo al branĉo. Ili estas pli feliĉaj ol birdoj en la kaĝo. Estas skribite en Zhuangzi jene:

“Fazano ĉe marĉo bekas unu fojon en ĉiu deka paŝo, trinkas unu fojon en ĉiu centa paŝo, sed ĝi ne volas esti nutrata en la kaĝo. Eĉ se oni traktus vin kvazaŭ reĝon, via animo ne sentas sin bona.”

Zhuangzi mem rifuzas la kaĝon, do li rezignis proponon de reĝo de Chu-regno posteniĝi kiel ministro. Zhuangzi preferas ludvagadon ol kaĝon, sed ludvagadi ne tiel, kiel cikado kaj turto. Li revus ludvagadi, kiel Peng, sed efektiviĝi la revon en realo ne eblas. Tial do li verkis fabelojn per vortoj, por prezenti al legantoj sian ideon. Vortoj estas flugiloj al malriĉa Zhuangzi por liberiĝi el de ŝablona, konvencia pensmaniero.

La scio, saĝo kaj vortoj, kiujn Zhuangzi mem havis, devas esti ekskluditaj el objekto de kritiko.

MALKONFIDO AL VORTOJ

Antaŭ ĉio oni ne devas preterrigardi, ke Zhuangzi verkis pli ol cent mil vortojn kaj instruis per vortoj. Malgraŭ tio, je transdono de vero li malkonfidis al vortoj. Li skribis jenon: (天道篇)

“En la mondo, tiu, kiu estimas la Vojon, estimas libron. Sed la libro konsistas nur el vortoj, do la vortoj enhavas ion estimindan. Kio estas estimata en la vortoj, tio estas signifoj. Sed estas io, kion la vortoj sekvas. Tio, kion la vortoj sekvas, estas netransdonebla per vortoj. Sed oni transdonas librojn pro tio, ke en la mondo estas estimataj la vortoj.<...> Io videbla per rigardado estas formo kaj koloro. Io aŭdebla per aŭskultado estas nomo kaj voĉo. Bedaŭrinde, oni konsideras formon kaj koloron, nomon

kaj voĉon, sufiĉaj por akiri la realon. Sed la formo kaj la koloro, la nomo kaj la voĉo, ne sufiĉas por atingi la realon. Do, kiu scias, tiu ne diras; kiu diras, tiu ne scias.”

Vorto estas nur signo, ne transdonebla la vero. Zhuangzi pravus, ĉar per vortoj estas netransdoneble pri gusto, pri koloro, pri sono, pri ceteraj realo kaj vero. Ankaŭ netransdoneble estas la lerteco, akumulita per sperto.

“Radfaristo Pian diris: <...> Necesas ĉizi ne malrapide nek rapide. Tio eblas nur per manoj kaj konforme al koro. Per buŝo ne eblas diri. Kvankam devas esti certe iu cifrado en tio, sed tamen mi ne povas transdoni la sekreton per vortoj al mia filo. Ankaŭ mia filo ne povas ricevi tion de mi. Tiel do mi, maljunulo de 70-jara, ĉizadas radojn. Ankaŭ antikvuloj mortis kun io netransdonebla. Sekve, kion vi legas, tio estas nur rekremento de antikvuloj.”

Estas skribite, ke “Vortoj estas nur rekremento, feĉoj”. Tio estas memkritiko de Zhuangzi. Zhuangzi mem estas verkisto per vortoj, sed tamen atentigas, ke je vortoj estas limo por transsendi signifon.

Kiu ricevas vorton, tiu komprenas laŭ sia kapablo signifon de la vorto. Ju pli alta je kapablo de ricevanto, des pli riĉa la kompreno. Ankaŭ leganto de libro komprenas vortojn laŭ sia propra sperto. Ju pli riĉa la sperto de leganto, des pli riĉa la kompreno de vortoj. Maltaksado de vortoj per Zhuangzi montras gravecon de senĉesa altigo de personeco kaj sperto pere de praktikado tiomgrade, kiom tia ago ŝanĝiĝos en senkonscian kutimon, en mensostaton similan al nenionfarado. Zhuangzi prezentas en la epizodo de Radfaristo la konatan proverbon: “Kutimo estas la dua naturo”. Kaj samtempe, “naturo je lerteco” estas atingebla ne per legado de libroj, sed per longdaŭra sperto kaj praktikado.

LIBERO: KUTIMIĜINTA LERTECO

En Zhuangzi estas montritaj kelkaj ekzemploj de libera movado de korpo, kiel kutimiĝinta lerteco. Pri lerta buĉisto estas skribite jene:

“Ĉe ĉiu tuŝado per mano, ĉe ĉiu levado de ŝultro, ĉe ĉiu paŝado de piedoj, ĉe ĉiu premado per genuoj, membroj de bovo estas distranĉataj kun belsono. Kun ĉiu movo de haktranĉilo eksonas muzikharmonie, simile al la danco de Morusa Arbaro aŭ al la movimento Jingshou. La reĝo Wen Hui diris: ‘Ho, bonege! La tekniko atingis tioman altecon.’”

Zhuangzi rigardas senkonscian lertecon senaga nenionfarado aŭ libera ago.

“Iu metiisto, nomata Chui, desegnis linion precize kvazaŭ laŭ lineo kaj cirkelo. Liaj fingroj akordiĝis kun aĵoj tiom nature, ke li mem ne bezonas intenci. Do fundamento de lia spirito tute koncentriĝis en unu, kaj estis ne katenita. Oni forgesas siajn piedojn,

kiam la ŝuoj estas komfortaj. Forgesas talion, kiam la zono estas komforta. Forgesas je praveco-malpraveco de scio, kiam la koro estas komforta. Okazas nek ŝanĝiĝo je interno, nek obeo je ekstero, kiam la afero iras komforte. Komforto en la komenco kaj io neniam malkomforta, – tio estas komforto de forgesita komforteco.⁶²⁶

Je libera situacio oni forgesas sin mem, kaj iĝas libera korpe kaj mense..

Zhongni diris: “Bona naĝanto povas post kelkfoja sperto, ĉar li forgesas la akvon. Skafandristo, antaŭe ne vidinta boaton, tuj povas, ĉar li vidas la abismon kvazaŭ la teron. Eĉ se okazus renverso de la boato, li vidas tion kvazaŭ iu ĉaro retiriĝus malantaŭen. Kiom ajn da renverso aŭ retiriĝo viciĝas antaŭ li, li ne estas implikota tien, kaj ĉie ajn li ne perdas sian liberecon.

En pafarka vetludo oni pafas lerte la celon, se veti je tegolo. Se veti je fajna buko, oni pafas iomete kun skrupulo. Se veti je oro, oni pafas kun hezitado. Lerteco de pafarkisto estas sama.(p120 KOMPRENO DE VIVO)

Zhuangzi asertas, ke troa konscio malhelpas liberan movon. Do konscio estas katenas homon.

MEMFORGESADO

Laŭ Zhuangzi ‘forgesado’ estas fenomeno de liberiĝo. Kulmino de forgesado estas ‘forgesi sin mem 忘我’

“Mi nepre ordigas la koron kaj faras la koron kvietan. Ordigante tri tagojn, mi ne zorgas pri laŭdo, rango kaj salajro. Ordigante kvin tagojn, mi ne zorgas pri kritiko, honoro, lerteco kaj mallerteco. Ordigante sep tagojn, mi trankvile forgesas min mem, havantan kvar membrojn kaj korpon <...> Tiel do mia Ĉiela naturo akordiĝas kun la Ĉiela naturo de ligno. Jen, eble estus la kaŭzo, kial oni suspektis mian laboron farita de la Spiritoj.. (19:p.124)

Ideala estas la natura movo, kiam la lerteco atingas tiom altan gradon, kiom iĝas forgesite pri ĉio krom la celo.

“La Majstro Bian diris: ‘Ĉu vi ne aŭdis pri la pleja homo, kondutanta per si mem. Li forgesis sian hepaton kaj galon, forlasis siajn orelojn kaj okulojn, vagadis malligite ekster kotoj kaj polvoj, promenadis en senaga disciplino. Tio signifas, ke li faras sed ne apogas sin sur sia forto, kreskas sed ne mastras’.”

Tiu stadio de lerteco estas atingebla nur per ĉiama trejnado, t. e. ‘farado’.

Prof. Yan Shian trafe rimarkis, dirante: “Ideo de Zhuangzi ekis el la punkto de ‘Por

⁶²⁶ Laŭ ĉi tiu teksto, “senago 無為” estas senkonscia ago, perfekte kutimiĝinta al profesia laboro. 忘適之適 estas atingebla per forgeso de komforteco-malkomforteco. En realo ekzistas multe da malkomforteco. Laŭ mi, unu malkomforteco estas forgesita per la alia malkomforteco, kontraŭpezante unu la alian.

Egoo' kaj atingis la punkton 'Sen Egoo'."627 Zhu Xi 朱熹, Qian Mu kaj Feng Youlan atentis al Egoismo, kaj rigardis Zhuangzi heredanto de egoismo-liberalismo laŭ Yang Zhu 楊朱. Sed Zhuangzi, kritikante profiton-utilecon kaj egocentrismon, laŭdis akordiĝon al naturo. Per tio li idealigis mensostaton de Sen-egoismo. Jen en kio kuŝas granda diferenco de altruismo (Mozi) kaj bonvoleco (Konfuceo).

"Post tajlado kaj polulado, denove reveni al simpleco. En malpleneco estu senkoscie fari aferon, estu malskrupule kaj pigre por dubi homojn. Rilate al kuniĝo kaj disiĝo, sendu foriranton, akceptu alvenanton. Lasu alveni, ne barante, kaj lasu foriri, ne haltigante."628

Forgesado estas mensostato de simpleco kaj malpleneco.

"Posedi ion estas homece. Forgesi aĵojn, forgesi la Ĉielon, forgesi nomojn kaj sin mem, forgesi sin mem kiel homon. Jen tio estas nomata la enirado en la Ĉielon."629

La esprimo "forgesi sin mem" estas pli konkreta kaj ĝusta ol "sen egoo", ĉar estas dirite de Zhuangzi mem, ke "Intenci forigon de egoo ankaŭ estas la egoo."(p.87)

Sed tamen Zhuangzi mencias ankaŭ pri danĝereco de "forgesi sin mem", okazanta dum alkroĉiĝo al eksteraĵo.

"Zhuang Zhou diris: 'Alkroĉiĝante nur la eksteran formon, mi forgesis sin mem. Observante malpuran akvon, mi perdiĝis ĉe pura abismo'. Mi aŭdis sinjorojn diranta: 'Se eniras inter vulgarulojn, sekvu la vulgarulojn.' Nun mi iris al Diaoling kaj tie mi forgesis min mem. Do stranga pigo tuŝis min je frunto. Promenante en kaŝtanarbaro mi forgesis realon, do gardisto de kaŝtanarbaro ege riproĉis kaj hontigis min."630

Tiel la argumento far de Zhuangzi estas ofte dialektika, ke en tio kunestas "neado de neado".

LAŬ NATURO

Por Zhuangzi la Ĉiela naturo ekzistis en pasinteco kaj ekzistas ekstere de homoj. Li idealigis la laŭnaturan vivon de antikvuloj, en kiu estis ĥaoso, simpleco kaj harmonio. 繕性篇 2

"Antikvuloj, estante en ĥaosa krudeco, kune kun samtempuloj de sia generacio, atingis la simplan trankvilecon. En tiu tempo harmonie kvietis *yin* kaj *yang*, Spiritoj ne tumultis, kvar sezonoj turniĝis en ordo, ĉio sen difekto, amaso da estaĵoj ne mortis trofrue. Homoj, kvankam intelektaj, tamen ne havis okazon uzi sian intelekton. Tio

627 颜世安 庄子评传 南京, 1999 p311

628 山木篇、p.128

629 天地篇. 忘己 Forgesi sin mem. En la alia loko estas esprimo 座忘 (sidi kaj forgesi 大宗師). Estas eble forgesi nur senkoscie.

630 山木最後 p.133

estas nomata la Pleja Unu-tuteco 至一. En tiu tempo oni artefaris nenion, sed vivis ĉiam spontanee laŭ la naturo.”

Zhuangzi distingas naturon inter la homan kaj la Ĉielan. Li atentigis, por ke homoj ne lasu la homan naturon elmontriĝi laŭplaĉe, sed lasu la Ĉielan naturon disvolviĝi en la homoj. Li diris jenon:

“Ne malfermu la homan naturon, sed malfermu la Ĉielan naturon.⁶³¹ Kiu malfermas la Ĉielan, tiu naskas virton. Kiu malfermas la homan, tiu naskas kanajlon. Ne malŝatu la Ĉielan. Ne preterlasu la homan. Por ke la popolo alproksimiĝu al la vero.”

En tiu aserto videblas, ke homa denaska naturo ne ĉiam estas aprobata. Zhuangzi rigardas la subjekton de personeco grava por akcepti la Vojon. 天運 1 4 : 5 自力

“Kiu ne havas subjekton en si mem, tiun la Vojo preterpasas.⁶³² Kiu ne havas ekstere de si justecon, al tiu la Vojo ne aliras. Se oni ne akceptas ekstere tion, kio eliras de interne, tiuokaze la sanktulo ne elmontras.”

Sed tamen, Zhuangzi substrekas ‘senagon laŭ naturo’. Li preferas la eksteran Ĉielan forton ol la propran personan forton.

“La mondo ankoraŭ ne decidis distingon de praveco kaj malpraveco. Sed la senago povas decidi tion. Nur la senago ebligas homojn vivi en la pleja plezuro. Ni provu argumenti pri tio. La Ĉielo estas pura per la senago. La tero estas kvietita per la senago. Per kombiniĝo de senago en ambaŭ sferoj ĉio transformiĝas.”(p114 PLENA PLEZURO)

Laŭ mia opinio, rilato inter persona ago kaj naturo similas al skiado. Glitas laŭ naturo kaj bremsas kaj akcelas per homa volo. Sen bremsa estas danĝere kaj ankaŭ troa akcelado endanĝerigas. Konfuceo taksas la bremson alta, Mozi – la akcelon, Zhuangzi – la naturon.

UTILECO DE SENUTILECO 無用之用

Zhuangzi prezentas kelkajn ekzemplojn por klarigi utilecon de io ŝajna malutila.

“Huizi diris al Zhuangzi: ‘Viaj paroloj estas senutilaj.’

Zhuangzi diris: ‘Nur komprenante senutilecon, oni povas ekscii la utilecon de parolo. Tero ne estas malvasta, sed granda. Sed punktoj, kiujn homo uzas por treti dum paŝo, estas nur tiom grandaj, kiom piedoj. Malgraŭ tio, se oni fokus teron ĝis la terfundo krom la punktoj de piedoj, ĉu restintaj partoj estus utilaj al la piediranto?’

Huizi diris: ‘Ne utilas.’

⁶³¹ 不開人之天、而開天之天. Ĝenerale estas aprobite kompreni 天, kiel la unu – la Ĉielo, la alia – la naturo. Tiuokaze estas notinde, ke en Zhuangzi 人之天(la homa naturo) portas malbonan signifon.

⁶³² 中無主而不止. Ĉi tie “subjekto 主” estas sentanta, volanta mi-o, kiu estas preta je la akceptado de io donata.

Zhuangzi diris: 'Tiel do, estas klare, ke io neuzata estas utila.' 179 外物篇

En nuna tempo oni rigardas senutila tion, kio ne profitdonas 'nun', malgraŭ ke ne estas sciata kiam ĝi fariĝos utila. Io, kio ŝajnas senutila nun, povos esti utila iam en estonteco aŭ fakte eĉ nun estas utila el la alia vidpunkto. Zhuangzi ofte mencias pri la lasta. Arbo povas kreski granda, ĉar ĝi ne uzeblas por lignoj. La granda arbo, rigardata kiel senutila, diris jenon:

"Fruktarboj el rozacoj, piroj, oranĝoj, citronoj, kaj aliaj fruktarboj kaj vinberoj, - tiuj arboj estos hontigitaj, post kiam iliaj fruktoj, maturiĝinte, estis rikoltitaj. Branĉoj, la grandaj estas rompigitaj, malgrandaj estas tiritaj. Ili suferas sian vivon pro sia kapablo. Do ili ne plenumas sian donitan de naturo vivon, survoje mortas junaj. Ili estas disbatataj de monda bagatelajo. Al neniu el ili eviteblas tia sufero.

Koncernante min, mi delonge serĉis resti senutila, ke nenie mi estu uzata. Nun proksima al morto, mi atingis la celon, per tio mi faris la grandan utilon. Se mi estus iam utila, ĉu al mi eblus atingi la grandan?" 人間世

Verko de Zhuangzi estas plena je laŭdado de io superflua. Sed tamen, la laŭdado de senutileco ne ĉiam estas aplikebla laŭ Zhuangzi. 山木篇冒頭 p.127

"Disĉiplo demandis Zhuangzi, dirante: 'Hieraŭ rilate al la arbo de monto, ĝi povas longe vivi ĝis la natura morto pro sia malutileco. Nun la ansero de la mastro mortis pro sia malutileco. Kiun do vidpunkton vere prenas vi, Majstro?'

Zhuangzi, ridante, diris: 'Mi, Zhou, vere situas inter la utilan kaj la malutilan. Sed tiu pozicio diversas unu al la alia, kiuj, kvankam similaj, tamen tute malsamaj. Do neeviteblas miskompreno.'

Fama tezo "Utileco de malutilaj" estas principo por Zhuangzi, sed la apliko al realo ŝanĝiĝas depende de situacio.

VANTO DE VANTOJ

Zhuangzi prenas ŝanĝiĝon kiel neprecon por estaĵoj. En la ĉapitro 'Arbo de Monto' estas skribite jene:

"Kuniĝo estas tuj disiĝo, perfektigi estas tuj ruiniĝo. Iu brava tuj estos tordita, iu respektinda tuj estos akuzita, faranto de afero tuj estos renversita, saĝulo tuj estos viktimo de ruza intrigo, humilulo tuj estos trompita. Kiel do eblus atingi nepre la atenditan rezulton? Ho, domaĝe! Miaj disĉiploj, nur strebu al jeno, nur al hejmo de la Tao kaj virto 道德之鄉."

En 'La Predikanto (Kohélet)' estas skribite: "Vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo". Pensmaniero de Zhuangzi estas simila al la eldiro de la Predikanto. Kaj samtempe troviĝas komuneco kun budhismo.

Rilate al la morto de sia edzino, Zhuangzi ĉesis plorkriadi, dirante pri nepreco de ŝanĝiĝo jene.

“El inter miksa ĥaoso en subtila mallumo okazis iu ŝanĝiĝo kaj estiĝis *Ĉjio*. *Ĉjio* ŝanĝiĝis kaj estiĝis organismo. La organismo ŝanĝiĝis kaj estiĝis vivaĵo. La lasta denove ŝanĝiĝis kaj ĉi tiu nun mortis. Tio estas sama, kiel sekvante moviĝas la kvar sezonoj, printempo, aŭtuno, vintro kaj somero.

La homo, mia edzino, kviete dormis en la granda ĉambro. Ke mi plorkriegus, sekvante plorsinglutus, tion mi konsideras nekomforma al la ordono. Tial do mi ĉesis.”

NEPRECO KAJ VOLO

Vanto ĉe Zhuangzi ne estas hazarda okazo, sed ŝanĝiĝo laŭ nepra leĝo de la Vojo. Kion fari al ĉiu persono en la mondo? Respondo de Zhuangzi al tiu demando estas “Nenion fari”. Sed homoj vivas kaj agas por vivteni sin. Lia ‘nenionfarado’ signifas ‘vivon laŭ naturo’. Por tio necesas polurado de personeco. Persona altigo estas atingebla ne laŭ decreguloj de konfuceanismo, ne laŭ scienco de mohismo, sed nur laŭ taoismo. Estas skribite jene:

“Poluradi volon kaj altigi konduton, liberiĝi de homa mondo kaj apartiĝi de profanujo, kun alta idealo indigni kaj kritiki, nur tenante sin alta. Tia estas la persono de monto kaj valo, sed ne mondanoj. Tion preferas iu velka sindroniganto.

Paroladi pri bonvoleco, justo, lojaleco kaj fideleco, kaj teni sin humila-cedema, nur klopodante por sin klerigi. Tia estas la persono, strebanta pacigi la mondon kaj instrui homojn. Tion preferas tiu, kiu lernas, vojaĝante aŭ sidante hejme. Li parolas pri la granda merito, starigas la grandan honoron kaj la deregulojn inter estroj kaj subuloj kaj ĝustigas la rilaton de supro-subo, nur strebante fari la regadon. Tia estas la personeco de kortego, strebanta respekti regnestron kaj firmigi la ŝtaton. Tion preferas tiu, kiu strebas fari meriton por grandigi teritorion de la regno.

Iu loĝas en profunda provinco aŭ sur vasta kampo kaj tie hokadas fiŝon, nur nenion farante. Tia estas la persono de rivero kaj maro. Tion preferas tiu, kiu, evitante la mondon, ĝuas libertempon. Li en- kaj el-spiradas aeron, eligante la malnovan kaj enigante la novan. Li ekzercadas movon de animaloj, samkiel urso kaj birdo, nur por vivi longan vivon. Tia estas la persono, induktanta Tao-energion.⁶³³ Li nutras sian korpon. Tion preferas tiu, kiu zorgas pri longviveco, kiel Peng Cu.”⁶³⁴

Ne nur en monton kaj riveron, sed ankaŭ en popolon troviĝas la ermito. En la ĉapitro Ze Yang estas skribite per la buŝo de Konfuceo: ヱナロード隠遁者、市南宜僚 則陽篇

⁶³³ 道引 signifas taoisman ekzercadon por longigi la vivon.

⁶³⁴ 彭祖 Legenda homo, kiu longvivis je okcento jaroj.

“Zhongni diris: ‘Ili estas servantoj al sanktulo, kiu mem eniris en la popolon por vivi sen renomo. Li mem kaŝis sin ĉe kampodigeto. Spite ke lia famo ne estas laŭta, tamen lia strebo estas senlima. Kvankam li parolas per buŝo, tamen en koro estas vorto, ankoraŭ ne parolata. La direkto de lia vivo estas tute malsama al de mondanoj, do lia koro malestimas vivon kun ili. Tiel do li subteriĝis. Lia nomo estas Shinan Yiliao.’”⁶³⁵

Tiel do Zhuangzi admonas homojn ermitiĝi el de vulgara mondo al izolita monto aŭ en popolon, kaj vivi laŭ nepreco de naturo. La nepreco estas ne Dia volo, nek Ĉiela ordono, nek Ĉiela volo, sed elmonro de Tao.

“Oni ne povas vidi en fenomenoj de naturo arbitron de iuj mondregantoj. Nek la arbitro, aŭ diaj pasioj, nek blindaj hazardoj povas klarigi la vivon de la naturo. Ĉiu fenomeno en la naturo – falo de iu ŝtono, fluo de iu rivero, vivo de certa arbo, aŭ animalo, – estas necesaj elmonroj de la ecoj de la kompleta tuto, de la tuta viva kaj malviva naturo.”

Vortoj, uzataj de Zhuangzi, donis al Budhismo ŝlosilan terminologion, ekz-le, 緣.⁶³⁶

“Alian tagon s-ro San Hu aldone diris: ‘Ĉe sia morto Shun ordonis al Yu, dirante: «Vi atentu jenon. Io, havanta formon, estu rigardata laŭ leĝo-kaŭzeco. Io, koncernanta senton, estu rigardata laŭ natura normo.» Leĝo estas nedisigebla, normo ne estas peniga.”⁶³⁷

Zhuangzi uzas la terminon 緣(leĝo-kaŭzeco) por esprimi la necesajn elmonrojn.

“Ili estas neeviteblaj kaj logika sekvo de la evoluo de fundamentaj trajtoj de la naturo kaj de la tuta ĝia antaŭa vivo.”

Zhuangzi opinias, ke ĉi tiujn leĝojn ne povas malkaŝi la homa intelekto. Sed kaŭze de tio ĉinaj pensuloj ofte anticipis la eltrovojn de scienco, esprimante ilin en poezia formo. Efektive, dank’ al tia kompreno de la universala vivo jam en kvina-kvara jc. a. K., kelkaj ĉinaj pensuloj esprimis tiujn supozojn pri naturfenomenoj, ke oni povas nomi ilin antaŭanoncintoj de la moderna scienca fiziko.

INFLUO AL BUDHISMO

Se temas pri la influo de Zhuangzi al taoismo, oni ne bezonas mencii, ĉar li estas

⁶³⁵ 市南宜僚 Familinomo estas 熊, alinomo Yiliao. Aperas la nomo en la ĉap. 山木, 徐無鬼.

⁶³⁶ Ankaŭ al kristanismo influo de Laozi-Zhuangzi estas granda. Ekz-le fama frazo “En la komenco estis la Vorto”(laŭ Johano) estas tradukita en la ĉinan: 太初有道. “En la komenco estis Tao.”

⁶³⁷ Mi uzas vorton “leĝo-kaŭzeco” por traduki 緣, kiu esprimas interrilatajn leĝojn de estaĵoj, t. e. leĝojn de homoj, societo, naturo, historio.

adorata kiel unu el fondintoj de taoismo. Do ĉi tie mi skribas pri ĉinigitaj sutroj de budhismo.

En mia infaneco mi recitadis ĉinigitajn sutrojn de budhismo ĉiumatene kaj ĉiuvespere kune kun geavoj kaj patrino. Sutroj estas skribitaj ne en sanskrito sed en la antikva ĉina lingvo. Mi ekhavis jenan demandon. Kial ni ne recitas sutrojn en barata originalo, en sanskrito? Oni respondis: “Ĉar sutroj de ĉinaj ideogramoj estas multe pli alta je budhisma kvalito kaj profitdona 御利益 ol de sanskrito.” Mi ne komprenis tian klarigon, do mi iomete studis sanskriton en mia juneco, kaj provis legi sanskrite sutron de praĵnja paramitta 般若心經, kiu mirakle restas en Japanio en templo Hōryūzi 法隆寺. Tiam mi komprenis, ke traduko en la ĉina lingvo ŝajnas al mi multe pli profunda je signifo. Kial? Ĉar ĉiu ideogramo havas en si profundan signifon dank’ al konfuceanismo, mohismo, taoismo kaj poemoj, unuvorte, surbaze de riĉa pens-historio de Ĉinio.

Aparte, en sutroj de budhismo estas uzitaj multe da ideogramoj de Laozi-Zhuangzi. Alteco de iliaj ideoj plialtigis la budhismon, importitan el Barato. En Ĉinion enfluis budhismo ĉirkaŭ antaŭ la unua j. c. p. K., sed ekprosperis poste en la 4-a j. c., ĝuste post la apero de rimarkigo al Zhuangzi 莊子注 far de Guo Xiang 郭象(? – 312?), nuna originala teksto, kiu revivigis la ideon de Zhuangzi. Guo Xiang aldonis sian rimarkigon laŭ sia kompreno je tutegaleco.

Dum samtempa Tumulto en la epoko de Yongjia 永嘉之乱 norda parto de Ĉinio estas okupita de barbaroj, kaj starigitaj la landoj, nomataj 五胡十国. Tiam budhistoj-barbaroj alvenis el okcidento al Ĉinio. Do revivigo de Zhuangzi kuniĝis kun alveninta budhismo el Okcidenta Azio 西域.

Budhisto Zhi Dun 支遁(316-366) interpretis la 1-an ĉapitron de Zhuangzi alie ol Guo Xiang. Guo Xiang rigardis la Grandan Peng kaj malgrandan birdon egalaj, ĉar ambaŭ ili vivas laŭ sia naturo. Sed Zhi Dun asertis diferencigi la naturon inter bonan kaj malbonan, dirante, ke nur al tiu, kiu altigas sian naturon, estas permesate ludvagadi. Zhi Dun komprenas ‘ludvagadon 逍遥’ kiel ‘liberigon aŭ malligiĝon 解脱’ de budhismo.⁶³⁸ Tiel Budhismo enkondukis gravecon de persona ekzercado en komprenon de Zhuangzi.⁶³⁹

Ankaŭ budhismo estis interpretita per konceptoj de Laozi-Zhuangzi. Budhistoj, uzante iliajn terminojn, klarigis konceptojn de budhismo. Tia maniero estis nomata ‘Geyi budhismo’ 格義仏教.⁶⁴⁰ Aparte Hui Yuan utiligis Zhuangzi por klarigo de budhismo. Estas dirite, ke fama traduko far Jiu Mo Luo Shi 鳩摩羅什(350-409) konkeris tiun

⁶³⁸ 邓联合, p. 350

⁶³⁹ 『世説新語』文学篇、「高僧伝」四.

⁶⁴⁰ 竺法雅, 竺道潜(286-347), 慧遠(344-416)

taoismecan budhismon. Sed, tia eldiro estas dubenda, car tuj poste en Ĉinio naskiĝis novaj skoloj de budhismo, enhavanta ideon de Laozi-Zhuangzi. Tio estas Zen-budhismo 禪宗 kaj Purlandismo 淨土宗.

Ambaŭ skoloj baziĝas sur ignoro de saĝo aŭ scio por atingi altan staton, t. e. ekzaltigo de natura senpera kompreno. Gravaj nocioj en Zen-budhismo, kiel nestariĝinta litero 不立文字 kaj sid-meditado 座禪, havas similan pensmanieron en Zhuangzi (忘言, 座忘).⁶⁴¹ Sed, Zhuangzi, predikante ‘nenionfaradon’ 無為, estis pli proksima al Purlandismo, ol al Zen-budhismo. Laŭ Tan Luan (曇鸞 476-542), Dao Chuo (道綽 562-645) kaj Shan Dao (善導 617-681), nur per recitado de Amitabo, per plej facila ago, oni povas esti savita kaj povas atingi la paradizon. En tio reflektiĝas la ideo de senfarado kaj la obeo al naturo 無為自然.

NENIO, MALPLENECO KAJ SENLIMO-INFINITO

Oni ofte diras, ke diference de okcidenta filozofio, rigardanta ‘Eston 有’ grava, budhismo konsideras grava la Malplenecon 空 kaj Laozi – Neniecon 無. Zhuangzi, starante sur la pozicio de “Unu-tuteco 万物齐同”, kritikis la distingon de Esto kaj Nenio. Zhuangzi diris jene:

“Morto kaj vivo ne atendas unu la alian, sed ambaŭ ili konsistas en unu tuto. Estas io antaŭ ol la Ĉielo kaj la tero estiĝas. Ĉu ĝi estus aĵo? Ne estas aĵo tiu, kiu faras aĵojn estantaj kiel aĵoj. Aĵo mem ne povas esti anticipe antaŭ ol aĵo. Se antaŭ ĉio estus la aĵo, tiuokaze la aĵo estus ne alia ol nura Nenio.”

Zhuangzi vidas ne ‘Nenion’, sed senlimon-infiniton en la komenco de estaĵoj.

“Je la Estaĵo estis la komenco. Antaŭ la komenciĝinta Estaĵo estis io, ke ankoraŭ ne komenciĝas. Ĉe la antaŭa komenciĝonta Estaĵo estis ankaŭ io, ke ankoraŭ ne komenciĝis. Estis Estaĵo. Estis Ne-estaĵo⁶⁴². Ĉe Ne-estaĵo estis antaŭe io, ke ankoraŭ ne komenciĝas. Ĉe la komenciĝonta Ne-estaĵo estis antaŭe ankaŭ io, ke ankoraŭ ne komenciĝis. Subite, ekestis Estaĵo kaj Ne-estaĵo. Inter Estaĵo kaj Ne-estaĵo estas ne sciate, kiu estas Estaĵo aŭ kiu estas Ne-estaĵo. Nun mi jam diris ion. Sed estas ne sciate, ĉu, io dirita de mi, estas Estaĵo aŭ Ne-estaĵo. <...> Universo⁶⁴³ kaj mi naskiĝis kune. Ĉiuj aĵoj kunfandiĝis kun mi en unu.”⁶⁴⁴

En la lasta parto de ĉap. Ze Yang, videblas argumento, kontraŭa al Nenio el la

⁶⁴¹ 達磨 estis rigardata kiel fondinto de Ĉina Zen-budhismo. Poste aperis multaj bonzoj, kiel 弘仁(601-674), 神秀(?-706), 惠能(638-713), 神会(670-762) k. a.

⁶⁴² Mi uzas por esprimo de 有 kaj 無 vortojn “Estaĵo” kaj “Ne-estaĵo”, anstataŭ “Nenio”.

⁶⁴³ 天地 Ĉielo kaj tero, t. e. Universo.

⁶⁴⁴ Esperantigita Zhuangzi, p. 16. La lasta frazo memorigas nin la eldiron en Ĉeĥov, *Mevo*.

vidpunkto de Senlimo.

“Se mi rigardas la fonton, tiam ĝi foriras senlime. Se mi rigardas la pinton de futuro, tiam ĝi alvenas senĉese. Pri tiu senlimeco kaj senĉeseco ne estas vorto. Koncernante aĵojn la rezono estas sama. Ĉu estis unue kreinto aŭ ne – tio estas samkiel la fonto, esprimata de vorto pri la fino kaj komenco de aĵoj. Tao ne povas esti rigardata kiel esto, kaj la esto ne povas esti rigardata kiel nenio. Tio estas nomata la Tao, nur hipoteze.”⁶⁴⁵

Tao estas nur hipoteza nomo. Zhuangzi opinias, ke per vorto ne eblas difini la Taon. Li rigardas koncepton de Tao disvolviĝanta per disputo aŭ dialogo.

“Estas faranto aŭ nenionfaranto – tio estas nur unu aspekto de aĵoj. Kiel do eblus fari tion Granda Regulo? Se vorto estus sufiĉa je esprimpovo, tiam per la vortoj dum tuta tago eblus penetri Taon. Kvankam vorto estas ne sufiĉa, tamen, se pri aĵoj tutan tagon esplori per la vortoj, eblas penetri ilin. Tao estas la pleja ekstremo de aĵoj, ke ne eblas atingi ĝin per vortoj kaj per nevortoj. Ne per difino de vortoj nek per silento, sed per dialogo estas diskuteble pri la ekstremo.”⁶⁴⁶

Dialogo pri Tao estas senlima. Koncepto de Unu-tuteco senlime ampleksas en si mem ĉion ajn, Eston kaj Nenion. Kio povas ampleksi en si mem ĉion ajn, tio devas esti malplena. Do malplena kaj senlima estas kvalito de Unu-tuteco.

KONKLUDO

Legante Zhuangzi, mi rememoras la ofte uzatajn de rusoj vortojn: ‘Всё равно (Tute egale), Ничего (Nenio)’ kaj filozofajn terminojn ‘цельность, целость, одно целое (unu tuteco)’, ‘лишний человек (superfluulo)’. Tutegalismo en Rusio formigis karakteron malzorgeman pri bagatelaj detaloj kaj ebligas ampleksi ĉiujn ajn diversaĵojn, kaj formiĝis la plej granda lando en la mondo. Sed, unu fojon, kiam estis enkondukita la normo de distingo, kiel leĝo-reguloj, partiemo, naciismo, profitamo k. a., la lando frakasiĝis kaj dispeciĝas. Se la tutegalismo kombiniĝas kun aroganteco, tiuokaze estiĝas tirano. Se ĝi akordiĝas kun humileco, naskiĝas elstara rusa literaturo – Puŝkin, Tolstoj, Dostojevskij k. a. Mi opinias, ke amantoj de Rusa literaturo nepre povas trovi en ĝi la similan pensmanieron, kiel ideon de Zhuangzi.

Zhuangzi predikis unu tutecon. Sed li mem elektas la vojon, veran, liberan kaj taŭgan por si mem. Per la buŝo de rabisto Zhi estas dirata la sama pensmaniero de tutegalismo. Tio signifas, ke la elektado far de persono estas grava. Proponite je la posteno de ministro, li rifuzis. Al li ne estis tute egale fariĝi altranga oficisto aŭ ne. Do en lia propra vivo la libera volo por li estis pli grava ol la tutegalismo.

⁶⁴⁵ p. 175.

⁶⁴⁶ p. 174. 非言非默、議有所極。(則陽)

Se temas pri saĝo-scio, en 70-aj jaroj de XIX jc. aperis disputo inter revolucia movado de narodnikoj: narodnikismo de Lavrov pledis por graveco de scio, sed Bakunin – por malutileco de scio. Pensmaniero de Zhuangzi similas al bakunismo.⁶⁴⁷

Scientistoj en Japanio tre ŝatis pensmanieron de Zhuangzi. Unu el ili estas fama fizikisto Yukawa Hideki (1907-1981), ricevinta Nobel-premion en 1949. Rilate al renkontiĝo de gastoj el nordo kaj sudo ĉe Ĥaoso en lasta rakonto de Internaj Ĉapitroj, Yukawa diris, ke Zhuangzi donis al li inspiron por la eltrovo de Mezono 中間子..

“Lastatempe mi ekpensas, ke tiu fabelo estas multe pli interesa ol antaŭe. Mi provas konsideri, ke Shu kaj Hu similas al elementaj partikloj. Dum ĉiu el ili respektive propravole kuras, tiam nenio okazas. Sed ili, venintaj de sudo kaj de nordo, kuniĝis en la teritorio de Ĥaoso kaj koliziis unu kun la alia. <...> Tiuokaze la Ĥaoso estas la spaco kaj la tempo, akceptanta la partiklojn 素粒子.”⁶⁴⁸

Zhuangzi, sen komputilo, sen aviadilo, liveras al homaro neelĉerpeblan fonton de ideo pri Universo. Ne nur al fizikistoj, sed ankaŭ poetoj-verkistoj kaj budhistoj ricevis sugestojn el Zhuangzi.

⁶⁴⁷ Mao Dun 茅盾 menciis pri nihilismo 虛無主義 kaj anarkismo 無政府主義 de Zhuangzi. Vid. 名家品 78

⁶⁴⁸ 湯川秀樹 「莊子」湯川秀樹著作集 6 1989年 岩波書店, pp.24-25